

DANTE:
IN FERRO

TRADUKIS:
K. KALOCSAY

ELDONO DE LITERATURA MONDO
BUDAPEST MCMXXXIII.

DANTE ALIGHIERI:
KOMEDIO

UNUA PARTO:
INFERO

ELDONO DE LITERATURA MONDO
BUDAPEST MCMXXXIII.

D A N T E :
I N F E R O

TRADUKIS:
K. KALOCSAY

ELDONO DE LITERATURA MONDO
BUDAPEST MCMXXXIII.

**LA DEKKVAR BILDOJ ILUSTRANTAJ LA LIBRON
ESTAS REPRODUKTITAJ LAŬ LIGNO-
GRAVUROJ DE PENTRART-
ISTO DEZSŐ FÁY**

Antaŭparolo

La traduko de la Komedio, en la originala versformo, postulas tiajn fortostreĉojn, ke ĝi ofte ŝajnas tute ne plenumbla. Mi konfesas ke la inkuba sento pri ĝia neebleco ofte, kaj ĉiam denove, kaj ĝis la lasta kanto de l' Infero vekigis en mi, vere, eĉ antaŭ la lasta kanto mi dubis, ke mi povos ĝin fini. La koncizo, mirinda esprimforto, vortabundo kaj kolor-riĉo de l' dantea lingvo, la aparta graveco kaj beleco de ĉiu vorto kaj vortlokiĝo, la ĉiam *deviga* fideleco (ĉar ja preskaŭ ĉiu verso havas apartan etan literaturon) vere povas malesperigi la tradukanton. Kaj al ĉio ĉi venas ankoraŭ la versformo: la *tercino*, por kiu ofte ŝajnas tute neeble trovi la malbenitan *trian* rimon, la sorĉista implikiteco de la rimoj, kiuj prezentas kvazaŭ senfinan trikajon: ŝiri ĝin unuloke, signifas malvolvi la tuton.

Kaj tamen, oni *devas* traduki Dante, kaj oni devas ĝin traduki en la originala versformo. Ĉar *Babits*, la hungara tradukinto de la Komedio, certe estas prava en tio, ke la senrima Dante ne estas Dante. Ĉe li la rimoj estas ne nur vestaĵo kaj ornamo, sed ankaŭ flugiloj de l' penso, kvazaŭ kanalo de l' verstorento. Se oni forprenas ilin, la versoj perdas sian fluejon, la risorton de sia salto, ŝajnas kvazaŭ nemotivitaj. Tion sentis kaj eldiris eĉ senrimaj tradukintoj, kiel Witte.

Ne ekzistas aŭtoro pli malfacile tradukebla ol Dante. Sed ŝajne ĝuste ĉi tiu malfacileco, kiel la ĉarmoj de nekonkerebla virino, havis tian altiran forton, ke grandaj lingvoartistoj oferis al ĝi grandan parton de sia vivo kaj forto, pluraj eĉ sian tutan vivon. Kaj certe, ĉi tiu malfacileco tentis ankaŭ min. Ne pro la vanta plezuro de l' enigmo-solvo. La tradukarto estas ne nur ilo de l' interpreto, sed ankaŭ ilo de l' riĉiĝo. Ilo de riĉiĝo intelekta kaj ilo de riĉiĝo lingva. Kaj estas kompreneble, ke ĉi tiu riĉiga povo de la

traduko estas proporcia al ĝia malfacilo. La lingvo, per la solvo de malfacilaj taskoj, pruvas sian kapablon kaj akiras kapablojn novajn. Al nia lingvo vere mi estus povinta alkrii komencante la tradukon de l' Infero:

»...jen estos prov' pri via noblo vera!«

*

Kaj Esperanto pruvigis mirinda instrumento. Eĉ, iel speciale taŭga por la interpreto de Dante, eble ĉar ĝi estas same nerigidigita ankoraŭ per tradicioj, same nova lingvo, kiel la lingvo de si, per kiu Dante kantis.

Kaj oni devis nur iom plivastigi la tro striktajn katenojn de la »klasikaj« ritmoreguloj, proksimigante al la pli liberpaŝa itala metriko, por akiri tiun plenan flekseblecon de verso, en kiu la lingvo povas danci sen doloraj inversoj de vortsekvo kaj nenaturaj tordoj de frazoj. Kaj oni devis nur rompi la dogmon de la nepre pureco de rimoj (ne neglektante tamen la leĝojn de la fonetika kunsonoro) por ke la lingvo, per la parenkrimoj, akiru tiun riĉan eblon de rimado, kiu liveras rimotriojn sen adasismo kaj sen la tede oftá ripeto de samaj rimvortoj. Mi kredas, ke per la traduko de l' Infero mi sukcesis definitive legitimi ĉi tiujn nepre necesajn faciligojn: sen ili, mi estas konvinkita, ĉiu kaj ĉiam fiaskus pri la plenumo de tia tasko.

Krome, oni devis daŭrigi la zamenhofan tradicion de pliriĉigo, per la ekuzo de novaj vortoj (jam proponitaj, kun tre malmultaj esceptoj, en la Parnasa Gvidlibro). Apenaŭ mi povas kredi, ke iu povu serioze opinii, ke al la lingvo de la Dante-traduko oni devu apliki la samajn postulojn de praktika simpleco kaj vortmalriĉo kaj facileco je ĉiu kosto, kiuj validas (kaj nepre devas validi) en la vulgara lingvo. Kaj mi kredas, ke la vera zamenhofano estas ne tiu, kiu sklave sin tenas al la zamenhofa vortmaterialo, sed tiu, kiu obeas la zamenhofan postulon pri la serĉo kaj solvo de malfacilaj taskoj kaj kiu daŭrigas la pliriĉigon de la lingvo laŭ la zamenhofaj principoj kaj metodoj.

Cetere, la novaj vortoj estas klarigitaj en piednotoj, kaj, la ofte uzitaj, en aparta vortlisto ĉe la fino.

*

La Komedio prezentas malfacilaĵojn ne nur al la tradukanto, sed ankaŭ al la leganto. Dante mem diras: kiu volas lin kompreni, sidiĝu sur la benko kaj bone akrigu sian menson. Senkompara riĉo kaj koncizo, milflanka filozofia erudicio, kiun li tute enverŝas en sian Poemon kaj al kiu similan li supozas ankaŭ en la leganto; lia plena enkreĉiĝo al la okazaĵoj de lia epoko, lia lirikeco, kiu strikte ligas lian verkon al lia vivo kaj tempo; la profundeco de liaj pensoj kaj ankaŭ lia verkmaniero: la aludoj, la simboloj, la dura,

ofte strange aparta esprimo: ĉio ĉi faras lin ege malfacila poeto. Certe oni ne povas senpene legi post sescent jaroj tiun poeton, kiun oni devis komentarii jam dum lia vivo. Tamen, neniuj sentis ankoraŭ vane malŝparita la penon al li dediĉitan: la dura ŝelo kaŝas dolĉan kernon.

Estas inde kaj estas ankaŭ eble legi vere, kompreni tute Dante-n. La eblon por tio mi prezentas per komentarioj, tiel mallongaj kiel eble, sed, laŭ mia opinio, plene sufiĉaj.

Tiaj komentarioj ekzistas en fantazia abundo: eĉ grandega biblioteko ne povus ampleksi ĉion, kion oni verkis pri la Komedio. Lia unua komentariano estis lia filo *Pietro*, poste sekvis *Benvenuto Imolai*, *Francesco Buti*, *Boccaccio*, kaj de tiam sennombraj danteistoj: la itala *Scartazzini*, la germanaj *Witte*, *Philaletes* (saksa reĝo), *Notter*, *Steckfuss*, *Kannegiesser*, *Wegele*, *Delph*, la francaj *Oznan*, *Artaud de Montor*, *Ratisbonne*, la angla *Longfellow* ktp. ktp. Elektinte el tia riĉo, mi nek povis, nek volis esti originala. Sed aliflanke mi ne volis tropezigi la tradukon, kaj malhelpi la plezuron per klarigoj tro multaj, ofte harfendantaj kaj pedantaj. Kaj ĉi rilate mia modelo estis *Mihály Babits*, kiu en siaj klarigoj kun mirinde delikata takto trafis la ĝustan mezuron inter »neceso kaj sufiĉo«. Lin mi sekvas ankaŭ en la metodo: mi donas Biografion ĝeneralan kaj enkondukon apartan antaŭ ĉiu kanto, kun resendoj al la Biografio. Kaj mi ne povas prisilenti, ke plurfoje, ĉe trafe belaj esprimoj kaj turnoj de *Babits*, mi ne povis rezisti la tenton: traduki ilin laŭvorte.

*

Mi prezentas kelkajn konsilojn al la leganto pri la lego de la verko.

Dante devas esti konkerita, kiel bela, profunda, komplikita, polifonia muzikpeco, kiu des pli nin ravas, ju pli ofte ni ĝin aŭdas, ju pli plene ni al ĝi amikiĝas. Tial la unuan legon oni dediĉu al la alproprigo de l' verko. Oni legu atente la Biografion. Poste, antaŭ ĉiu kanto oni legu la Enkondukon kaj ree tiujn (numeritajn) partojn de l' Biografio, al kiu la Enkonduko resendas. Poste oni legu la kanton mem, kaj helpe de la notoj kaj la fina vortklariga listo, oni ĝin konkeru ankaŭ lingve. (Ĉi-koncerne oni vidu ankaŭ *Neologismoj* en la *Notoj de l' tradukinto*.) Kaj tiel tralaborinte la tutan verkon, fine oni legu ĝin flue: tiam malfermiĝos plene ĝia tuta grandioza beleco.

*

Fine, mi havas la agrablan devon de dankoj kaj mencioj.

La unuan mencion mi ŝuldas al sinjoro *Eugen Wüster*, kiu la unua atakis ĉi tiun grandan taskon, kvazaŭ manifestante per tio, ke ĝi estas atakebla per nia lingvo. En lia

traduko aperis la unua kanto de l' Infero, en la Germana Esperantisto (1918. numeroj 2—6).

Post la apero de la unuaj kantoj en la *Rivista Italiana di Esperanto* mi ricevis plurajn leterojn kun rimarkoj, el kiuj mi danke utiligis kelkajn de *Alessandro Mazzolini*.

Grandan dankon mi ŝuldas al sinjoroj *Stefano La Colla* kaj *Bruno Migliorini*, kiuj bonvolis tralegi la tradukon el la vidpunkto de lingva fideleco por forigi eventualajn lingvajn miskomprenojn. Dank' al ilia grava kaj neanstataŭigebla helpo mi sukcesis elsarki plurajn malĝustaĵojn, precipe el la unuaj ok kantoj, dum kies traduko mia itala lingvoscio estis ankoraŭ tro freŝbakita. Ilia kortuŝa fervoro, kun kiu ili surprenis la lacigan taskon de tekstokomparado, devigas min je danko apenaŭ esprimebla en vortoj.

Kun la plej granda danko mi mencias la sagacajn konsilojn kaj bonajn sugestojn de mia amiko *G. Waringhien*, kiu per ili tre multe kontribuis al la glateco kaj klareco de la traduko.

Kaj speciale mi devas danki sinjoron *Gino Catarzi*, kies instigo kaj materiala helpo iniciatis la tradukon kaj ebligis ĝian glatan eldonon. Vere nur per horaca odo oni povus inde honori lian noblan mecenatan spiriton.

Budapest, je la Pentekosto de 1933.

K. Kalocsay

Dante

La vivo kaj verko de Dante, fandante en sin la tutan sentan kaj pensan trezoron de la Mezepoko, estas tiom implikiĝinta en la mondhistorion kaj speciale en la historion de lia naskurbo Florenco, ke por serĉi ĝiajn radikojn, oni devas reiri longe antaŭ lian naskiĝon.

Epokskizo

1. Florencon, laŭ la tradicio, fondis Julio Cezaro, detruinte la pramalnovan etruskan urbon Fiesole, iaman bivakurbon de Sulla kaj Catilina, kaj konstruigante en ĝia proksimo la urbon Florentia, kiu, en ĉi tiu belega valo, vere estis inda al la nomo Florurbo. La praloĝantaro de la nova urbo konsistis parte el romanoj, parte el ekxfiesolanoj. Laŭ la kroniko de Villani, en ĉi tiu miksiĝo oni devas serĉi la kaŭzon de la senĉesaj parti-kvereloj, kiuj karakterizas la historion de la urbo.

2. Florentia kristaniĝis. La gardodion *Mars* ĝi forlasis por la gardsanktulo Johano Baptisto. La militdio venĝas: alportas senĉesajn militojn, alvenigas Attilon, kiu cindrigas la tutan urbon. Kaj — laŭ la onidiro — la militdio toleris la postan refondon de la urbo eble nur pro la Mars-statuo, restinta sur la ponto de l' Arno. Ĉi tiu Mars-statuo estas simbola: en Florenco ĉiam estis ne malmulta Roma spirito, gardata precipe de la batalema nobelaro. Kaj la restarigantoj de la Roma Imperio speciale favoris la urbon, Karlo la Granda ĝin rekonstruigis, faris Toskanion markizlando kaj Florencon ĝia ĉefurbo.

3. La restarigo de la Roma Imperio signifus, ke la kristanaro havas du kapojn: religian kaj mondan, la imperiestron kaj la papon. Sed ĉi tiuj du potencoj baldaŭ ne plu

subtenis, male, akre atakis unu la alian. La batalo eksplodis pri la *investituro* (investado en ekleziajn oficojn) inter Gregoro VII. kaj Henriko IV. Papo Gregoro VII. parte por plifortigi la papan potencon, sed ĉefe por ekstermi la *simonion* (efektivan vendadon de ekleziaj postenoj) malpermesis, sub minaco de ekskomuniko, al ĉiuj ekleziuloj: akcepti eklezian oficon el la manoj de laikulo. Henriko IV. rezistis, sed fine li estis ekskomunikita, izolita, la aŭtoritato kaj morala kuraĝo de Gregoro VII. venkis, la imperiestro devis sin subigi. La granda humiliĝo, la penta pardonpeto okazis en Toskanio, en *Canossa*, en la fortikaĵo de la »granda grafino« Matilda, fidela helpantino de la papo. Laŭ la nomo de ŝia edzo *Welf*, oni nomis *gelfoj* la papanojn, dum la kontraŭpartion oni nomis *gibelinoj* laŭ la nomo de la Hohenstaŭfa fortikaĵo *Waibling*.

4. En Florenco la komercista burĝaro pli simpatiis al la papa politiko, kiu bridis la koruptitajn kaj perfortajn ekleziajn potenculojn kaj malhelpis la fremdan influon en Italio; tamen la reganta nobelaro faris Florencon gibelina urbo. Sed, dum la akraj bataloj inter la papo kaj imperiestro, Florenco pli kaj pli sendependigis sin same de la papa, kiel de la imperiestra potenco. *Henriko VI.* devis rekoni ĉi tiun sendependecon.

5. Sed en 1215 okazis grava fendigo inter la florenca nobelaro. Ĝi havis privatan kaŭzon. Eminent a nobelo, *Buondelmonte de Buondelmonti*, fianĉigis al knabino el la potenca *Amidei*-familio, sed en la lasta momento li forlasis ŝin kaj edzinigis knabinon el la *Donati*-familio. La amikoj de la *Amidei*-familio (*Uberti*-, *Fifanti*-, *Lamberti*-familioj) sange venĝis, mortigis Buondelmonte-n surstrate. Post tio la tuta parencaro kaj amikaro de l' mortigito transiris al la gelfa partio kaj akraj, ofte sangaj kvereloj haltigis la prosperan floradon de Florenco. Nobeloj gelfaj kaj gibelinaj batalas inter si kun alterna sukceso.

6. Pliakriĝas la situacio, kiam *Frederiko II.* komencas favori kaj helpi la *Amidei*-familion, por akiri en ili federulojn kontraŭ la papo. *Frederiko II.* estis vera pioniro de l' renesanco: pagano, epikurano, plena de grandaj mondimperiaj revoj, ĝenata de neniam religiaj konsideroj. Inter siaj konstantaj bataloj li kreas grandiozan kortegon en Sicilio, ekflorigas la poezion, ankaŭ li mem estas trubaduro.

Dum en Sicilio lia granda subteno estas la genia kanceliero *Piero della Vigna*, en Lombardio lin helpas kontraŭ

la sendependaj urboj lia bofilo *Ezzelino*, la sinjoro de Verona. Kaj li fortikigas en Toskanio la gibelinan potencon, el Florenco li ekziligas la gelfajn nobelojn.

Post ĉi tiu brila vivo sekvas granda falo: ekskomuniko, ribeloj, rompiĝo de l' potenco. En 1250, kiam venas la famo pri lia morto, la gelfoj en Florenco venkas la gibelinojn, la gelfaj ekzilitoj triumfe revenas, inter ili eble ankaŭ Bellincione, la avo de Dante.

7. Sekvas la granda senregeco; la imperiestra potenco ekstreme malfortiĝis. Italio montras tre varian aspekton. Norde *Ezzelino*, en Sicilio *Manfredo*, la neleĝa filo de Frederiko, ankoraŭ gardas la gibelinan potencon, sed en Toskanio plene floras la gelfa regado, Florenco vivas sian flortempon, tempon de komerca prospero.

La gibelina nobelaro provas federigi kun gibelinaj urboj kontraŭ la gelfa regado; oni malkovras la konspiron kaj ekzilas ilin, inter ili la ĉefan aristokraton *Farinata degli Uberti*. La ekzilitoj daŭrigas la agitadon, kaj nun Florenco faras eraran paŝon: la senditon de la papo, suspektatan pri perfido, ĝi ekzekutigas. La papo ekskomunikas la urbon kaj Florenco restas tute izolita.

8. *Farinata* sin turnas al *Manfredo*. La unuan helpotrupon de *Manfredo* Florenco venkas. *Manfredo* sendas novan pli grandan armeon; la sienano *Provenzano Salvani* kaj *Farinata* logas Florencon ruze en batalon. Florenco, malgraŭ la konsilo de la saĝa *Tegghiaio* akceptas la batalon ĉe *Montaperti*, »pro kiu ruĝe la Arbio fluis«. Florenco estas venkita, la gelfa potenco finita (1260). La venkintoj interkonsilas ĉe Empoli: ĉu ne ruinigi tute la urbon? Ĝin savas *Farinata*: en la lasta momento venkas en li la partianon la patrioto.

En Florenco do komenciĝas gibelina periodo: regas *Guido Novello* kun dung-armeo. La gelfoj estas ekzilitaj, inter ili verŝajne ankaŭ la *Alighieri*-familio; Dante mem diras, ke liaj parencoj estis dufoje ekzilitaj.

9. En tiu tempo (1265) naskiĝas Dante. Kiam li estas unujara, la gibelina reĝimo jam eksanceliĝas. La papo per kruc-armeo venkis *Ezzelinon*, kaj proponis la tronon de *Nieŝlo*, kontraŭ *Manfredo*, al la franca reĝo. La proponon akceptis, anstataŭ la reĝo, lia frato *Karlo Anĵua*. Li venkis *Manfredon* apud Benevento, *Manfredo* falis en la batalo.

Guido Novello volis, inter la novaj cirkonstancoj, certigi sian regadon per kompromiso: li donis lokon en la registaro ankaŭ al gelfoj, kaj la ĉefpotencon li dividigis inter du

monaĥoj-kavaliroj, *Catalano* kaj *Loderingo*, alvokitaj el Bologno. La supozo estis, ke ili, unu gelfo, alia gibelino, reciproke sin kontrolos. Sed ilia diboĉa sinteno (pro kiu oni ilin nomis *gajaj fratoj*) baldaŭ ribeligis la gelfojn, oni forpelis ilin. Nun enmarŝis Guido di Monforte, la vikario de Karlo Anĵua, ekzilis la gibelinojn. Florenco ree estas gelfa urbo.

La ekzilitoj sin turnas al *Konradino*, nepo de Frederiko. Li venas en Italion kun armeo, sed Karlo Anĵua lin venkas ĉe Tagliacozzo; la kaptitan Konradinon oni senkapigas en Neapolo. Poste Florenco definitive venkas super Guido Novello, kiu federigis kun la sienanoj; falas ankaŭ Provenzan Salvani. La triumfo de la gelfoj estas plena. (1268—1269.)

10. La gelfa reĝimo nun tenas sin en Florenco daŭre kaj fortike. La nova papo, *Nikolao III.* volas pacigi inter gelfoj kaj gibelinoj; vere, la ekzilitoj povas reveni, sed post la »kvartaga paco« ili estas ree ekzilitaj. Kaj nun la reĝimo en Florenco iĝas plene demokratia. Oni dividas la burĝaron en dekdu gildojn, la nobelaron oni pli kaj pli elpremas el ĉiuj politikaj rajtoj. En 1282 oni faras novan konstitucion, laŭ kiu el la nobeloj (t. n. *grandi*) neniuj plu povas fariĝi *prioro*, kiu ofico estis la plej alta en la Florenca respubliko. Tiel la potenco iom post iom venas tute en la manojn de la *signori* (gildestroj), ĉar publikan oficon povas akiri nur komercisto kaj metiisto.

11. Dume ĉirkaŭe armiloj tintas ĉie. Florenco defendas la gelfojn forpelitajn el Pisa, helpas al venko ilian ĉefon, grafon *Ugolino della Gherardesca* kaj restarigas en Pisa la gelfan reĝimon (1276). En Sicilio la anĵua gelfa reĝimo fariĝas pli kaj pli netolerebla: oni buĉas la anĵuanojn dum la fama sicilia vesperpreĝo (1282) kaj la tronon okupas *Petro Aragonia*, la bofrato de Manfredo; lia admiralo neniigas la ŝiparon anĵuan en la plej granda mara batalo de la Mezepoko; *Karlo la Lama*, la filo de Karlo Anĵua, devas retiriĝi al Neapolo.

En 1289 *Arezzo* gibeliniĝas (en 1287 ĝi ankoraŭ venkis apud *Toppo* la gibelinan *Siena*): eksplodas milito inter ĝi kaj Florenco: en la batalo ĉe *Campaldino* partoprenas ankaŭ Dante. Poste sekvas milito kontraŭ *Pisa*; la gibelinoj tieaj akuzis Ugolinon pri perfida transdono de fortikaĵoj al Florenco, lin arestis, kaj kun liaj filoj lin mortigis per malsato — *Pisa* gibeliniĝas ree, sub la gvido de *Guido di Montefeltro*. La juna Dante batalas kontraŭ *Pisa* ĉe la sieĝo de *Caprona*.

12. En ĉiuj ĉi militoj Florenco venkas. Kaj dume la demokratia evoluo daŭras plu. Ĝi kulminas en la reformo de *Giano della Bella*, laŭ kiu nobelo ne plu povas partopreni en la regado de la urbo, sed en la registaro ricevas lokon nur la plebanoj. Ĉi tiu reformo donis mortigan frapon al la gibelinoj, de nun Florenco estas regata sole de la gelfoj. (1293.)

Sed ankaŭ inter la gelfoj mem baldaŭ estiĝis grava skismo. Post la »granda rezigno« de *Celestino V.* sekvis sur la papa trono *Bonifaco VIII.*, kiu volis akiri al si gravan mondan potencon kaj klopodis akceptigi de Florenco sian superecon. Liajn klopodojn unu parto de la gelfoj subtenis, sed la alia parto akre ĝin kontraŭstaris. Baldaŭ la du partioj ekhavis ankaŭ nomon: la kontraŭpapan, kvazaŭ gibelinecan partion oni nomis *partio sovaĝa* aŭ *Blankuloj*, la papan partion oni nomis *Nigruloj*, laŭ la samaj partioj en Pistoja. La Blankulojn gvidis la *Cerchi*-familio, la Nigrulojn la *Donati*-familio. Dante, kvankam boparenco al la Donati-familio, aliĝis al la Blankuloj, kies tre fervora ano estis lia intima amiko *Guido Cavalcanti*.

La politika lukto baldaŭ estigis ardan personan malamon inter la du partioj. La gvidanto de la Nigruloj, *Corso Donati* foje surstrate atakis kaj volis mortigi *Guidon Cavalcanti* kaj pro ĉi tio la urbon obsedis tia maltrankvilo kaj ekscito, ke oni povis ĉiumomente atendi la eksplodon de la interna milito. Alifoje, dum enteriga ceremonio, iu Cerchi starigis por ordigi sian ĉifitan mantelon, post kio ĉiuj Donati terurite saltleviĝis, opiniante ke tio estas signalo por ilia mortigo.

La papo, sciante, ke la Blankuloj estas kontraŭaj al li, volis ilin fleksi per timigo kaj tial li venigis al Romo *Vieri de Cerchi*, la ĉefon de la familio, sed ĉe la spita florencano nenion li povis atingi. Nun li sendis al Florenco kardinalon *Matteo d'Acquasparta*, kiel paciganton inter la du partioj, kiu komencis per tio, ke li postulis por si plenan potencon. Ĉi tiun postulon oni akre rifuzis. Ree akraj, ofte sangaj kvereloj sekvis unu la alian. Kaj tiam la *Signoria*, en kiu Dante tiam havis la oficon de prioro, kunvokis kunsidon, kaj, ĉar la kverelon komencis la Nigruloj, oni ekzilis el ili la plej danĝerajn elementojn. Sed, parte favore al la papo, parte por ne havi partiajn, oni ekzilis ankaŭ kelkajn plej maltrankvilajn blankulojn, inter ili ankaŭ *Guido Cavalcanti*.

13. La papo nun, kolere pro la kontraŭstaro, kaj kun

la intenco: fari Toskanion papa provinco, vokis en la landon la fraton de l' franca reĝo: *Karlon de Valois*. La florencaj Nigruloj akceptis ties famon kun granda ĝojo, kaj tuj irigis senditon al la papo, petante, ke li sendu Karlon al Florenco por fari tie pacon. La franca armeo alvenis kaj okupis la urbon sen batalo (1301).

La Blankuloj estis rompitaĵ kaj la Nigruloj atendis nur la signalon por tute neniigi siajn kontraŭulojn. La signalo estis la reveno de la ekzilita *Corso Donati*: samnokte eksplodis la persekuto de l' Blankuloj. Ses tagojn fluus sango, flagris la domoj de Blankuloj, kaj ili mem, inter ili ankaŭ Dante, rifugis el la urbo. La nova *Signoria*, el nuraj Nigruloj, ekzilis la Blankulojn kaj konfiskis ilian havaĵon.

14. La ekzilitoj komence konkordis kaj klopodis helpe de sampartiaj urboj, reveni al Florenco. Sed ili ne sukcesis: la nigra reĝimo tie restis neŝancelebla. Nur en 1309 vekigis, en ili nova espero, kiam en Aŭgsburgo oni kronis la germanan imperiestron *Henriko VII*.

Cetere, ankaŭ la potenc-klopodoj de papo Bonifaco ne prosperis. La sankta Seĝo, kiu volis sin apogi sur la influo de la plej kristana franca reĝo, mem venis sub ĉi tiun influon. La franca reĝo *Filipo la Bela*, por akiri monon por siaj militoj, metis imposton sur la papajn bienojn. La protestoj de la papo tiel akrigis la situacion, ke la reĝo kunvokis koncilion, deklaris la papon simoniulo kaj herezulo, lin detronigis kaj eĉ atakis kaj arestis en *Anagni*. Kvankam la loĝantoj, ribelinte, lin baldaŭ liberigis, la papo, pro la ekscitigoj, baldaŭ mortis (1303). Post la mallonga papeco de Benedikto XI, papigis la episkopo de *Bordeaux* (Klemento V.) kiu baldaŭ transmetis sian sidlokon al la franclanda *Avignon* (1309).

Filipo la Bela certe aspiris la imperiestrecon; tial li sendis sian fraton *Karlo de Valois* al Italio, ĉar li esperis ke per tio li akiros tie decidan influon. Sed li ne sukcesis, oni elektis *Henrikon de Luxemburg*.

15. Ĉi tiu elekto donis grandan esperon al la ekzilitaj Blankuloj. Sed la esperoj ne plenumigis. *Henriko VII*. iris al Italio, metigis sur sian kapon la lombardan ferkronon (1312), sed, malgraŭ ĉiuj klopodoj de la ekzilitoj, li ĉesigis la sieĝon de Florenco post unu monato kaj retiriĝis al *Pisa*. De tie li volis ekiri al milito kontraŭ la neapola reĝo *Roberto*, sed li malsaniĝis kaj mortis en *Buonconvento* (1313).

Kun la morto de *Henriko VII*. disfumiĝis ĉiuj esperoj

de la Blankuloj, kaj ĉiuj esperoj de Dante por reiri en sian urbon patran. Lia vivo de nun apenaŭ estas plu influata de politikaj okazaĵoj; la epokskizo ĉi tie povas finiĝi.

La vivo kaj verkoj de Dante

16. La unua praulo de Dante, pri kiu ni ion scias, estis *Cacciaguida* (filius Adami). Dante renkontas lin en la Paradizo kaj tie li rakontas, ke li servis en la krucarmeo de Konrado III. (de kiu li ricevis la kavalirecon) kaj falis en la Sankta Lando. Li edziĝis al *Alighieri*-knabino, de kiu naskiĝis Alighiero I., kies filo estis *Bellincione*, kiu generis *Alighiero*-n II., la patron de Dante.

La patrino de Dante estis *Donna Bella*, la unua edzino de Alighiero. Pri siaj gepatroj Dante ne parolas: lia patro estis eble juristo.

La poeto naskiĝis inter la 18. kaj 31. de Majo 1265 en Florenco, estis baptita en »sia bela San Giovanni-navo« je la nomo *Durante*, kies mallongigo estas la nomo Dante.

Pri lia infanaĝo nenion ni scias. Certe li estis frumatura knabo, kies burĝonanta intelekto soife sorbis ĉion eksceblan, kies fantazion jam frue ekscitis la historio kaj la haosa kaj tumulta nuntempo. La famo rakontis ĉie pri sangaj kaj abomenaj agoj, pri grandaj kulpoj, flamaĵoj, teruraj venĝoj; en la grandaj homoj de la epoko mirige miksiĝis grandaj kulpoj kun grandaj virtoj. Ĉio ĉi certe forte impresis la malfermiĝantan animon de l' knabo. Sed pli ol ĉio lin impresis, kiel li mem rakontas en sia »Nova Vivo«, ke en sia naŭa jaro li ekvidis okjaran knabineton, kiu vekis en lia animo pasian, neniam plu estingiĝantan amon.

17. Kiu estis ĉi tiu knabino, kiun Dante nomas *Beatrice* (Datrice di Beatitudine: Beato-dona), pri tio oni verkis jam tutan bibliotekon. *Boccaccio* diras, ke ŝi estis filino de nobela civitano *Folco Portinari* kaj edziniĝis al kavallero *Simone de' Bardi*. Sed li bazas tion nur sur »aserto de fidinda persono«, do jam en 1373 ĉi tiu tradicio estis tute ne ĝenerale konata. Verŝajne la mistero de Beatrice restas por ĉiam nesolvebla. Certo estas nur, ke ŝi estis vere vivanta, deveninta el eminenta florenca familio, kaj ke ŝia parenco (eble frato) estis bona amiko de Dante. Ĉion ĉi mem Dante skribas en la Nova Vivo, sed pliajn detalojn li neniam malkaŝas.

La trosentema kaj enfermiĝema knabo apenaŭ konis sian idealon, kiel li mem skribas. Nur tie kaj tie ĉi li povis ŝteli kuran rigardon de la amata estaĵo, kaj el ĉi tiuj ŝtelitaj trezoroj li konstruis por si novan, tute propran Beatrice, kiu anstataŭ karno kaj sango, konsistis el blindiga lumo kaj dolĉa harmonio. Ĉi tiu lumo kaj harmonio iĝis por li la simbolo de nova vivo, de luma, interna vivo, al kiu la animo de l' knabo kroĉiĝis kun la tuta kunfandiĝinta ekstazo de amo kaj religio, sentis en ĝi la saman superteran konsolon kaj grandiozan misteron, kian en la transtombaj promesoj de la religia kredo. Beatrice kaj la Religio fandiĝis en luman kaj misteran unuecon.

18. Tiun ĉi senton cetere la knabo certe sorbis en sin ankaŭ el la trubadura poezio de l' epoko. En la melodia kaj kulturita provenca lingvo aŭ lingvo de *oc* (provenca *jes*) kaj en la agrabla kaj fleksebla lingvo de *oil* (tiam franca *jes*) liro de grandaj trubaduroj prikantis, laŭdis, glorigis, levis al ĉielo senmakulajn, anĝelajn sinjorinojn. Kaj la sama ekstaza amliriko ekfloris jam ankaŭ en la itala lingvo (lingvo de *si*); komenciĝinte en la sicilia kortego de Frederiko II. ĝi iom post iom disvastiĝis en la tuta duon-insulo kaj precipe en Bolonjo ĝi ekradikiĝis. Tie vivis *Guido Guinicelli*, kiun Dante nomas patro de ĉiuj italaj poetoj.

19. Kiuj estis la majstroj de Dante, pri tio ni scias preskaŭ nenion. *Boccaccio*, kiu unua verkis vastan biografion pri Dante, diras nur, ke li tre diligente lernis, kaj al ĉiuj mondaj amuzoj li preferis la sciencojn. Sed certe havis al li tre grandan influon la eminenta *Brunetto Latini*, kiu eĉ en la infero nomas lin *filo*. Li devenis el nobela florenca familio, estis sekretario de l' komunumo; post la batalo ĉe Montaperti (vd. 8.) li estis ekzilita, iris al Francando, poste, kun la ekzilitaj gelfoj, li revenis en Florencon, iĝis la kanceliero de *Guido di Monforte*. Li estis eminenta verkisto, en sia ekzilo li verkis francelingve sian *Livre du Trésor* (Libro de Trezoro) grandan enciklopedion de sciencoj; itale li verkis sian *Tesoretto*: alegorian poemon en italaj versoj. La poeto diras en ĝi, ke post la malvenko ĉe Montaperti, melankolie vagante li vojeraras en la densa arbaro. Tie li renkontas unue la *Naturon*, kiu donas al li gravajn sciencajn informojn. Poste li renkontas la *Virton*, kiu donas al li bonajn konsilojn pri vivo. Fine li venas al Amoro, kiu lin malliberigas kaj de kiu lin savas la latina poeto *Ovidius*. Nun lin kaptas religia konscienciproĉo, li konfesas siajn kulpojn —

poste li reiras en la arbaron, kie li renkontas scienculon *Ptolemeo*, kiu donas al li lecionojn el ĉiuj branĉoj de l' filozofio. Certe la ideo de ĉi tiu poemo iom memorigas pri la Komedio de Dante (densa arbaro, savanta poeto, personigo de kulpoj kaj virtoj, rifuĝo for de l' mondo en filozofion), sed ĉio ĉi estas nur etaj ĝermetoj apud la grandioza arbo de l' Komedio.

Estas tre verŝajne, ke Brunetto Latino direktis unue la atenton de Dante al la sciencoj kaj filozofio, li montris al li, ke ekzistas, krom la politika, ankaŭ alia, pli daŭra gloro. Kiel Dante mem diras, Brunetto lin instruis »kiel sin eternigas homo tera«.

La kulpo de sodomio, pro kiu la senindulga justeco de Dante, malgraŭ la granda respekto al li sentata, lokas lin en la sepa rondo de l' infero, certe estis al li propra, li ankaŭ konfesas ĝin en sia *Tesoretto*, nomante ĝin, tute facile, »monduma plezuro.«

20. La juna Dante lernis kaj partoprenis ankaŭ en bataloj (ĉe *Campaldino* kaj *Caprona*), sed ĉien li portis kun si la dolĉan bildon de Beatrice. Kaj li komencis esprimi siajn revojn kaj sentojn ankaŭ en versoj. La junan poeton baldaŭ akceptis en sian amikecon liaj poetokunuloj: *Guido Cavalcanti*, epikura filozofo (kiel ankaŭ lia patro), kaj filozofa poeto, pri kiu oni diris (laŭ *Boccaccio*), ke li volas pruvi, ke Dio eble eĉ ne ekzistas; *Cino da Pistoja*, posta fidelela ekzilkunulo de Dante; *Lapo Gianni*; la facilmora *Forese Donati*, nuraj steloj de l' »dolĉa stilo nova«; *Casella*, la muzikisto, kiun kun tia amo li salutos en la Purgatorio.

Dante proksimiĝis jam al sia dudekkvina jaro, multe li vidis kaj lernis, sed ŝia idealo restis antaŭ li ŝvebanta en ne-tutebla pureco. Kelkaj rigardoj, kelkaj ridetoj, ŝiaj larmoj kaj funebro, kiam ŝia patro mortis, malfeliĉo, kiam Beatrice lin ne salutis: jen kiom donis al li ĉi tiu amo, jen el kiom lin nutris tiu luma kaj harmonia amomondo, kiun li kreis en sia koro, gardante ĝin de ĉio tera, reala, ĝena, malpuriga.

21. Kaj Beatrice, je la 19. de Junio 1290 mortas subite, neatendite. En Dante estingiĝas la lumo-mondo de l' animo, Florenco iĝas por li vidva, senigita de ĉiu belo, super kiu li ploras ĝis la laciĝo de siaj okuloj kiel Jeremio super Jerusalemo.

Sed post longa priploro kaj funebrado lia sango kaj juneco tamen ekbolas, eĉ ribelas malespere kaj impete. Li volas forgesi, kaj la forgeson li serĉas en mondaj plezuroj.

Liaj amikoj estis gajaj poetoj kaj artistoj kaj kun ili Dante sin ĵetas en la ĝojojn de l' vivo. Li vete skribas sonetojn kun la petola kaj facilmora *Forese Donati* kaj ili vivas kune vivon, pri kiu kun grandaj konscienciproĉoj li devos rememori en la Purgatorio. Tamen ĉi tiu reago de l' malespero ne daŭras longe; Dante ekabomenas la malplenajn plezurojn, li volas ligi la Volupton, la buntan Panteron, kiu lin atakis en la arbaro de l' vivo. Kaj por tio li prenas la ŝnuron de Sankta Francisko: verŝajne ĉitempe li aliĝas por iom da tempo al la tria, laika ordeno de l' franciskanoj.

22. Reveninte de tie en la vivon, li pli kaj pli enfermiĝas kaj serĉas en la sciencoj tiun balzamon, kiun vane li serĉis en la plezuroj. La animan vivon, kiun iam por li reprezentis Beatrice, li volas atingi per la scio de la teraj aĵoj. Tiutempe (1293) estiĝas la reformo, ke ĉiu florencano devas sin registrigi en unu el la sep metioj. Dante aliĝas al la gildo de la kuracistoj, al kiuj apartenis ankaŭ la pentristoj.

Kaj tiutempe li ekvidas virinon en fenestro, rigardantan al ŝi kun tiel dolĉa kompatato, ke tio lin tute kortuŝas. Kaj pro ĉi tiu virino li forgesas iomtempe pri Beatrice.

Ne estas sciata, kiu estis ĉi tiu virino, ĉu eble *Gemma Donati*, kiun Dante al ŝi edzinigis? Ankaŭ la tempon de l' geedzigo ni ne scias. Same necertaj estas la informoj pri ilia familia vivo: *Boccaccio* klaĉas pri malfeliĉa geedzeco, sed ankaŭ li mem poste diras, ke li scias nenion certan pri tio. Dante mem neniam parolas pri sia edza vivo. El aliaj fontoj ni scias, ke al li naskiĝis kvar infanoj: *Pietro*, *Jacopo*, *Antonia* kaj *Beatrice*.

Sed ĉirkaŭ Dante ĉie ni renkontas simbolojn: ĉu eble tiu afabla virino estis la Filozofio, kiu forgesigis al li Beatrice-n, la Religian Ekstazon?

Dante pli kaj pli enprofundiĝas en la Filozofio. Evidente li staras nun sub la influo de *Guido Cavalcanti*, kaj *Brunetto Latini*: spiritoj skeptikaj, epikuranaj, eĉ ateistaj. Tamen Dante neniam estis ateisto, nek eĉ skeptikulo, li ĉiam respektas haltas antaŭ la dogmoj, pri kies absoluta vereco li neniam permesas al si dubon.

Sed antaŭ ol droni en la Filozofio, li ankoraŭ revenas al Beatrice, kvazaŭ por ĝisrevida adiaŭo. Li verkas pri ŝi libron, kies titolo estas »*Nova Vivo*«. En ĝi li rakontas en poemoj kaj komentarioj sian amon al Beatrice, sian funebbron pri ŝi, sian malfidelon al ŝi kaj fine li rakontas, ke li vidis

mirindan vizion, kio lin devigas ne plu paroli pri Beatrice antaŭ ol li povos paroli pri ŝi inde, kiam li »povos pri ŝi diri tion, kio pri neniŭ estis iam dirita«. Li verkas per tiu ĉi libro la unuan lirikan romanon de la mondliteraturo.

23. Dume li pli kaj pli partoprenas ankaŭ en la politiko. En la decembro de 1296 li estis ano de la »Konsilo de l' Cento«, post du jaroj li reprezentis sian urbon en *San Gemignano* kiel sendito; poste oni konfidis al li la kontrolon pri la reguligaj laboroj en la *San Procolo*-strato: ĉi tiu ofico donis poste okazon por lin kalumnii pri mondefraŭdo. Fine, en 1300, lia gildo lin elektis prioro kaj tiel dum unu monato li apartenis al la ĉefa registaro de la urbo.

Ĉi tiu ofico estis la fato de Dante. Florenco estis en bolanta stato dum lia prioreco. Jam en la deka tago de lia oficporto estiĝis sanga kverelo inter Blankuloj kaj Nigruloj. Pro tio, papo Bonifaco sendis al Florenco kardinalon *d' Acquasparta* kiel »paciganton«. Dante tiam plej decide kontraŭstaris al la enmiksiĝo de l' papo kaj ĉiun fremdan intervenon li rigardis atenco kontraŭ la libereco kaj sendependeco de l' urbo. Tion li esprimis per senkaŝaj vortoj post unu jaro, kiam en la Konsilo li proponis: »*de servitio faciendo domino Papae nihil fiat*«, tio estas: la urbo rekonu per nenia servo la papan potencon super Florenco.

Kompreneble, kiam la Blankuloj, helpe de *Karlo de Valois*, estriĝis en Florenco, ankaŭ Dante estis inter tiuj, kiujn plej grave batis la partia venĝo. Je la 27. de Januaro 1302 estas datumita la juĝo, kiu punas Dante-n per ekzilo. Krom la ĉefa kaj vera kaŭzo (malamiko de l' Nigruloj) en la motivado troviĝas ankaŭ malplenaj kalumnioj pri korupto, defraŭdo de mono ktp. La puno estas: 5000 florenoj da monpuno kaj redono de l' senrajte alproprigitaj (?) objektoj; se la punon en tri tagoj li ne plenumas, lia tuta havo estos konfiskita, sed ĉiuokaze li estas ekzilita por du jaroj kaj neniam plu rajtos porti oficon.

Dante ĉe ne provis sin defendi, li ne revenis al Florenco. Laŭ malamikoj ĝoje eluzis ĉi tiun »spitan obstinecon« kaj en la sama jaro ili punis lin per eterna ekzilo, aldonante, ke, veninta al Florenco, li estu tuj bruligata sur ŝtiparo.

24. Kiel »tipo sen velo kaj direktilo« ekiris nun la eksilita poeto, senhejme kaj senhave. Komence li aliĝis al aliaj kunsortuloj, kiuj, per la helpo de la toskanaj gibelinoj klopodis reveni al Florenco. Sed ĉiu provo malsukcesis. Dante lometempe klopodis kun ili, sed poste indigne kaj

naŭzite li disiĝis de ili; ĉiam kun la plej fortaj esprimoj li parolas poste pri la »malico kaj stulto« de siaj kunuloj. Li »faris por si partion el si mem«.

Kaj li iras de urbo al urbo, lernas »kiel sala estas la fremda pano« kaj »kiel dolore estas iri supren kaj malsupren sur fremdaj ŝtuparoj«.

25. En 1304 li trovas azilon ĉe la sinjoro de Verona, ĉe la »Granda Lombardo«: *Bartolomeo della Scala*. Tiu ĉi mortis baldaŭ, sed lia filo, la talenta, tiam ankoraŭ tute juna *Can Grande* vekis en Dante la plej brilajn politikajn esperojn: eble li estos la granda Estro, kiu savos la mondon. La mondo estas plena de kulpoj: la pantero de l' volupto, la leono de l' orgojlo, la lupino de l' avareco minacas ĉie la liberan animon. Kaj Florenco, la mola, artama urbo ŝajnas kvazaŭ tiu pantero, kun siaj multaj partioj ĝi estas tiel multkolora, kiel ties felo. La franca reĝpotenco ŝajnas la leono de l' orgojlo, la avida potenccmalsata Papa Seĝo ŝajnas esti tiu malgrasa lupino. Sed *Can Grande* signifas Granda Hundo! Ĉu ne estos eble li la Vertrago, kiu ilin forpelos fine?

Ĝis tiam la poeto sin konsolas per la scienco, per la sumo de l' sciencoj: la filozofio, kiu pli kaj pli okupas lian animon. Li studas latinajn aŭtorojn kaj latinajn tradukojn de grekaj verkistoj: lin konsolas la »Konsoloj« de Boëthius kaj la filozofiaj libroj de Cicero. Kaj la poeto *Vergilius*, kies nobla versarto kaj delikata lingvo, apud kiu la vulgara lingvo de si ŝajnas kruda kaj barbara, lin ĉarmas kaj ravas, kaj kies granda scio kaj legenda figuro vekas en li respekton kaj admiron.

Ĉar en la Mezepoko, apud la historia figuro de Vergilius estiĝis ankaŭ la figuro de alia, legenda Vergilius, tiu de sorĉisto kaj profeto. Vergilius estis speciale estimata kun preskaŭ religia respekto. Tion li dankis al la versoj de sia kvara Eklogo:

Venas jam la Virgin' kaj revenos la Ora Epoko,
El la altega ĉiel' descendos nova jam Ido.

Ĉi tiuj versoj, skribitaj nelonge antaŭ la naskiĝo de Kristo, ŝajnis profeti la alvenon de Mesio. Pro tio Vergilius dum la tuta Mezepoko estis honorata kiel profeto: lian epopeon oni uzis por aŭgurado, enpikante pinglon, oni konkludis la estontaĵojn el la vorto tuŝita de l' pinglopinto (*sortes virgilianae*). Oni rakontis la legendon, ke apostolo Paŭlo starante super la tombo de Vergilius en Neapolo, esprimis sian bedaŭron pri tio, ke ĉi tiu kristananima pagano

mortis tro frue kaj tiel li ne povis lin konverti al Kristo.

Sed krome *Vergilius* en sia *Aeneis* prikantis ja la fondon de Romo, li rakontas en ĝi, kiel *Aeneas*, filo de *Anchises*, rifuĝis el la brulanta Trojo kaj venis post longa vagado en Italion por fondi tie Romon kaj iĝi praulo de *Romulus* kaj de *Caesar Augustus*. Kaj Dante, kiu la mondpotencon volis dividi en du partojn: en spiritan, sub la papo, kaj mondan, sub la imperiestro, kun rezidloko por ambaŭ en Romo, kaj laŭ kiu ĉi tiu doktrino signifas la unuecon de Italio kaj la savon de l' mondo, sentis vere sia estro *Vergilion*, kiu prikantis la gloron de l' mondimperio, kaj kiu, trarompinte la barilojn de sia paganeco per kristana spirito, fariĝis la profeto de la Imperio Universala.

Dante, proksimiĝanta al la gibelinismo, pli kaj pli sentas, ke li devenis el la sango de l' romanoj kaj ke li havas nenion komunan kun la hordo veninta el Fiesole.

26. Kaj dronante en la filozofio, studante *Aristoteles*, la komentariojn de *Avicenna* kaj *Averroës*, la skolastikan scienccon de *Tomaso de Aquino*, li komencas sian novan verkon, kiun li titolas *Agapo*. Kaj kiel en sia simboloplena animo iam kunfandiĝis *Beatrice* kaj la Kredo, tiel nun kunfandiĝas la Filozofio, pro kiu li forlasis la simplecon de l' Kredo, kun la Sinjorino, pro kiu li iĝis malfidela al la memoro de *Beatrice*. Li skribas amajn poemojn, malfacilajn, profundajn kanzonojn, sed per vastaj komentarioj li eksplikas la simbolismon, kiu sub ili kaŝiĝas. En ĉi tiuj komentarioj li volas densigi la tutan filozofion, la tutan scienccon de l' mondo, kiel iam *Brunetto Latini* en sia *Trezo-ro*. Kaj la komentariojn li skribas en la vulgara lingvo de si, ĉar ankaŭ la kanzonoj estas tiel skribitaj, kaj la komentarioj devas helpi al ilia kompreno.

27. Dume pli kaj pli li eksentas la belecon de la vulgara lingvo. Pli kaj pli li meditas pri la lingva demando kaj li komencis verki sian libron »*De vulgari eloquio*« (Pri la vulgara lingvo). En ĉi tiu latina verko li pritraktas la devenon de la lingvoj, la tri »filinojn« de la latina lingvo (lat., ital. kaj si-lingvoj), ilian poezion, eĉ la italiajn dialektojn. Ĝi estas la unua lingvohistoria, literaturhistoria kaj poetika verko: vere epokfara, scienca laboro, preskaŭ sensange akceptita de la nunaj dialektologoj.

28. Dante ne longe restis en Verona, lin ĝenis resti almoza gasto de fremdaj sinjoroj. Eble al *Padova* li iris, poste al *Bologna*, laŭ *Scartazzini* li perlaboris tie sian vivon

per instruado. Sed el *Bologna* en 1305 oni ekzilis la Blankulojn. En 1306 li estas en *Lunigiana*: komisiite de la potenco sinjoro *Francesco Malaspina*, li intertraktas kun la episkopo de *Luni*. Poste, ŝajne, li iris al *Casentino*, poste al *Forli*, poste ree al *Lunigiana*. Liaj postsignoj jen aperas, jen forviŝiĝas. En 1309 eble li estis ankaŭ en Parizo.

Nun atingas lin la famo pri la imperiestriĝo de *Henriko VII.* kiun la Blankuloj, la gibelinoj, ĉiuj en kiuj brulis la entuziasmo pri la tradicioj de l' Roma Imperio kaj la kolero kontraŭ la eksceso de l' franca reĝeco kaj papa seĝo, atendis kiel novan Mozeon. Li rapidas al la imperiestro, por saluti lin persone kiel la liberiganton de l' popolo. Li esperas reveni al Florenco. Li skribas epistolon al ĉiuj regantoj kaj senatoroj de Italio, admonante ilin por oboe kaj submetiĝo.

Kaj eble tiam li verkis sian latinan libron »*De Monarchia*« en kiu filozofie li pravigas la di-devenajn rajtojn de la Imperiestro. Ĝi estas potenco politika utopio, revo pri la unueco kaj frateco de l' mondo. Unu estro en animaj, unu estro en mondaj aferoj devas esti: la papo kaj la imperiestro. Ili ambaŭ havas diajn rajtojn, kiujn klare pravas la mond-historio. Neniu rajtas enmiksiĝi en la sferon de la alia, neniu rajtas ataki la alian. Tiel alvenos la Eterna Paco.

29. Sed en *Casentino* Dante aŭdas, ke la florencanoj, anstataŭ sin submeti, preparas impetan kontraŭstaron. Li vojaĝas nun al la limregiono de Toskanio, al la fontoj de l' Arno kaj de tie sendas pasian leteron al la civitanoj de sia naskurbo, arde riproĉante ilin pro ilia ribelo kontraŭ la di-donita rajto de l' imperiestro. La florencanoj respondas per la reformo de *Baldo d' Aguglione*: ili elfermas Dante-n el la amnestio kaj konfirmas lian kondamnon. Dume la imperiestro hezitas ataki la potencon Florencon, sieĝas aliajn lombardajn urbojn. Dante do nun turnas sin al li mem, pravas, ke la ĉefa nesto de l' ribelo estas Florenco, petas, ke li sin turnu kontraŭ ĝi. Sed Henriko iras al Romo, post sia reveno sieĝas Florencon nur dum unu monato, poste sin turnas al aliaj entreprenoj. Kaj la sekvantan jaron li mortas.

Ĉi tiu neatendita katastrofo neniigis ĉiujn esperojn de la senhejma poeto, ĉiujn ŝancojn de hejmeniro al sia amata-malamata Florenco. Italio falis nesaveble en la teruran kaoson de partiaj kvereloj kaj internaj militoj, la morala forto de l' Eklezio rompiĝis, ĝian Sanktan Veturilon trenis la franca Giganto al *Avignon*, kie ree komenciĝis la Babilona mallibero, la idealo de l' roman-germana Imperio estis tretita en koton,

anstataŭ la sankta religio de l' amo ĉie skuis la animojn la senbridaj eksplodoj de l' malamo pasia, ĉie perfido, perforto, pereco. El ĉio ĉi estis sola elirvojo por la soleca animo: rezigno pri ĉiu monda vanto, plena abnegacio, leviĝo for de l' teraj aferoj al la konsolo de l' interna anima vivo donita de l' Kredo.

30. Ĉi tiun elirvojon ekpaŝis Dante: post la morto de Henriko VII. li turnis sian dorson al la aktuala politiko kaj ekiris por serĉi la »perdiĝintan vojon veran« al la luma monto de l' eterna beata trankvilo »al la komenc' kaj kaŭz' de ĉiu ĝojo«. Kaj li sentis, ke ĉi tiu vojo estas trovebla nur per ĉiela helpo: li devas reveni al la forlasita Beatrice, ne al la tera, enkorpiĝinta virino, sed al la alegoria estaĵo, al la idealo de l' pura, profunda Kredo, al la personiĝo de l' Ĉiela Scienco, al la mistika lumradio de l' transtera ekstazo. Li sentis, ke lia tuta vivo estis nur granda Devio, sed tamen, ne superflua, li devis ja ekkoni ĉiujn malbonojn, »por ke l' trovita Bono estu klara.« Li devis transiri la tutan Inferon, puriĝi en la tuta Purgatorio, por reveni hejmen al la Paradizo de sia animo. Tra ĉi tiuj inferoj kaj purgatorioj la homa arto kaj scienco estis lia fidela gvidanto, sed al la Paradizo lin nur Beatrice povos enkonduki. Kaj eble ankaŭ Vergilion, en kiu li vidis enkorpiĝi la homan scion kaj arton, sendis al li Beatrice mem, por ke li gvidu lin tra la Devio, ĝis ŝi mem transprenos la gvidon.

Kaj tiam koncipiĝis definitive en Dante la grandioza koncepto de l' Komedio. De tiam li vivas jam nur por ĉi tiu granda verko.

31. En la »Komedio«, kiun la postepoko ornamis per la epiteto »Dia«, Dante pripentras sin mem, sed en si ankaŭ sian tutan nacion, sian tutan epokon, la tutan Homaron. Ĉi tiu grandioza vizio estas pentrita per tia plastikeco, per tiaj vivantaj koloroj de l' realo, ke eĉ momente ni ne dubas pri tio, ke ĉio en ĝi rakontita vere okazis, ne nur al li, sed ankaŭ al ni mem. Liajn suferojn ni trasuferas, liajn pentofarojn ni partoprenas, lian beaton ni dividas. En liaj opaj figuroj ni senpere rekonas nin mem, kaj eĉ se ni ne kredas objektive en la mezepoka aŭ Dante-a koncepto de l' Infero, ni sentas ekstreminian koron antaŭ tio, kio nin atendas. Nin kaptas, plenigas lia sopiro: fandiĝi en la Senfinon, kion atomo, ero, radio estas ankaŭ nia animo, kiel la lia.

En la Komedio Dante pripentras sin mem, sed en ĝia grandioza koncepto unuiĝas historio kaj legendo, teologio

kaj filozofio, realo kaj mito, en la servo de giganta celo: plibonigi la homaron, reformi la moralan kaj politikan mondordon. Ĉi tiu celo estas religia kaj samtempe politika: ĉesigi la mizeron de l' tera vivo kaj certigi la transteran feliĉon. La Komedio do estas duobla epopeo: tiu de l' savo de l' kulpa homo, kaj tiu de l' politika kaj morala renaskiĝo de l' popoloj.

En la plenumiĝo de ĉi tiu duobla celo la homon malhelpas la mondaj ĉefkulpoj: la voluptemo, orgojlo kaj monavido (la Pantero, la Leono kaj la Lupino) krome la partieco: pro ĉi tiuj kulpoj amasiĝas surtere la mizero kaj sufero kaj pro ili oni perdas ankaŭ la ĉielan feliĉon. Sed la dia indulgo donas helpon al la falema homo: sendas al li gvidanton (Vergilius), kiu lin gvidas, laŭ la instruoj de l' filozofio al la provizora tera feliĉo, kaj alian gvidanton (Beatrice), kiu lin kondukas, per la forto de l' Revelacio, al la vojo de l' feliĉo eterna.

32. Sed la poeto volas ne nur opan, sed ĝeneralan plibonigon: perfektecon, kiu certigu triumfon ne nur por la morala, sed ankaŭ por la politika Vero. Por la unua estas certa rodo la kristana religio, al kies dogmoj kaj hierarkio Dante havas la plej pian respekton, tiel ke li submetas al ĝi ofte ankaŭ la rajtojn de l' menso kaj libero. Sed la katolikismo de Dante akre distingas inter la Ideo kaj Individuo. li jetas sin vizaĝaltere antaŭ la Sankta Seĝo, sed per la buŝo de Sankta Petro li tondras la plej akran riproĉon al la individuo, kiu sur ĝi sidas. Papon Bonifaco, en kiu li vidas enkorpiĝinta la potencavidon kaj pekajn terajn klopodojn de l' Papa Kurio, per ĉiam ripetitaj mallaŭdoj li starigas sur pilorion.

Lia politika dogmo estas la mondpotenco de l' roman-germana Imperio, kiun Dio destinis por certigi la sendependecon de l' diversaj ŝtatoj, agordi iliajn interesojn, ĉesigi iliajn disputojn: validigi la ideon pri la unueco kaj kunaparteno de l' tuta gento homa.

Kiel la papo en la animaj, tiel la imperiestro en la mondaj aferoj estas la Anstataŭanto de Dio, neniuj devas esti submetita al la alia, ambaŭ, liberaj, sendependaj en la plenumo de sia devo, devas regi kune en Romo, kiun Dio destinis centro de l' kristana Mondimperio; ili devas konkorde funkcii, reciproke sin helpi en la justa plenumo de la eternaj leĝoj de l' Providenco. Ĉi tiu politika idealo donas al la Komedio tiun modernan, naciajn trajton, kiun longe oni ne

trovas post li en la literaturo de la disŝirita Italio, la tutitalian patriotecon. Sed samtempe la Komedio anoncas ankaŭ la grandan ideon de l' Universala Imperio, la sanktan utopion de l' Unueca Homaro, dolore aktualan ankaŭ en niaj tagoj.

Ĝi tiu morala kaj politika instruo estas fandita en la priskribon de vizia vojaĝo, de granda mistika aventurvojaĝo tra profundoj kaj altoj, kiuj tamen signifas profundojn kaj altojn de animo plena de ĉiuj voĉoj de l' tera vivo kaj de ĉiuj misteroj de l' ĉielo. Ĝi estas ununura lirika poemo, sed samtempe ankaŭ granda epopeo, en kiun Dante fandis ĉion, kion li vivis, sentis, lernis dum sia vivo. Mitologio, historio, filozofio, skolastiko, kaj krome subite eklumigitaj, fulme estingiĝintaj vidaĵoj de homaj figuroj en konsterna abundo plenigas la kadrojn de l' Poemo, kiu estas giganta konstruaĵo: ekstreme simetria, ĉio sur fiksita loko: enkonduka kanto, 33 kantoj de Infero, 33 de Purgatorio, 33 de Paradizo, kune 100. Kaj ĝi estas skribita *si*-lingve, por ke ĝin ĉiu komprenu, sed ĉi tiu ĵus naskiĝinta lingvo sonoras en ĝi kun la nobleco lernita de Vergilius, kun koncizo senkompara, kun esprimforto konsterna, tiel ke ĝi fariĝas per unu fojo kompleta, arta, nesuperebla, neŝanĝebla literatura lingvo. Kaj ĝi estas skribita kun la plej arta versmuziko, kun rimoj tiel implikitaj, ke nenie oni povas ĝin tranĉi. Grandega simetrio, matematika precizo, sed traardigita per la pasio de baraktanta animo, per la doloro de nova Korjolano, kies pensoj sin turnas konstante al Florenco, Florenco, ĉiam al Florenco. Al la amata urbo, kiu, eble, se la Poemo levos lian nomon apud Homeros kaj Vergilius, pente revokos la maljuste ekzilitan Poeton.

33. Kie vagis la ekzilito, dum la Komedio »por pluraj jaroj lin malgrasigis«? Laŭ la tradicio, li iris post la morto de Henriko VII. en la monaĥejon *Santa Croce di Fonte Avellana*, por serĉi tie pacon: apenaŭ li estus povinta elekti pli taŭgan lokon por meditado ol ĉi tiun lokon inter krudaj, timigaj montoj. En 1314 mortis papo Klemento V., tiam li skribis leteron al la kardinaloj, ke ili elektu italan papon, ke almenaŭ la papa trono revenu al Romo, se la alia granda lumo, la Imperio, jam estingiĝis. Sed ankaŭ la nova papo estis franco.

En junio, la fama kapitano *Ugccione della Faggiuola* okupis la urbon *Lucca* kaj preparis sin por milito kontraŭ Florenco. Tiam Dante iris al li. *Lucca* estis malbonfama urbo, sed Dante trovis en ĝi junan, noblan virinon, nomatan

Gentucca, pro kiu li ĝin ekamis. Ĉu tio estis amo? Ni ne scias. Dante jam estis trans sia junaĝo, kaj li estis ja fidela adoranto de la granda, simbola *Beatrice*.

Verŝajne li estis ankoraŭ en *Lucca*, kiam Florencon trafis bato; bato, kian, laŭ la poeto, ĝi meritis, kaj pri kiu li tiel kortuŝe skribas:

Eĉ tuja bat' ne estus frua bato,
kaj ĝi jam venu, se ĝi devas veni,
ĉar min pli premus ĝi en pli olda stato.

Uguccione en la aŭgusto de 1315 venkis liajn samurbanojn en sanga batalo, tiel ke preskaŭ ĉiu familio havis siajn mortintojn.

Sed la esperoj de l' reveno ne plenumiĝis: en la aprilo de 1316 *Uguccione* estis forpelita el *Lucca*, ankaŭ Dante devis fuĝi. Eble tiam li iris al *Bologna* por instrui. Certo estas, ke li pasigis siajn lastajn jarojn en *Ravenna*.

34. Tie lin gastigis *Guido Novello de Polenta*, nepo de tiu *Francesca da Rimini*, kiun tiel belege li prikantis en la kvina kanto de l' Infero. Eble li ankaŭ instruis tie, kiel supozas *Scartazzini*, sed certe li vivis precipe por sia granda verko. Li finis ĝin nelonge antaŭ sia vivo; liaj esperoj ne plenumiĝis, Florenco neniam malfermis antaŭ li sian pordon. Sed kelkaj partoj iĝis konataj jam dum lia vivo. *Giovanni de Vergilius*, la fama humanista profesoro en *Bologna*, adresis al li en 1319 latinan poemon, en kiu li invitis lin al *Bologna* kaj laŭdis la Komedion, riproĉante nur, ke ĝi ne estas latine verkita. Dante respondis per siaj Eklogoj, verkitaĵe latine, en la stilo de *Virgilius*. Kaj li skribis, ke li ne volas akiri laŭrojn en *Bologna*, nur en sia naskurbo Florenco.

35. El Florenco venis al li liaj dumtempe ekzilitaj filoj, *Pietro* kaj *Jacopo*, kiuj poste iĝis liaj unuaj komentantoj. Venis ankaŭ lia filino, *Beatrice*, kiu poste monaĥiniĝis. Liaj lastaj jaroj estis trankvilaj. Eble li vizitis ankaŭ *Can Grande*, al kiu li volis dediĉi la Paradizon kaj al kiu li skribis ĉi-koncerne longan leteron. En 1321 *Guido Novello* havis politikajn diferencojn kun la venecianoj, li sendis Dante-n por akiri interkonsenton. Reveninte, la kvindekse-jara poeto malsaniĝis kaj postnelonge mortis en la nokto inter 13. kaj 14. de septembro. La lastajn kantojn de la Paradizo oni trovis inter liaj manuskriptoj.

Oni enterigis lin en *Ravenna*. Pli ol 150 jarojn kuŝis liaj ostoj en nesignita tombo. En 1483 oni starigis super ĝi maŭzoleon, sed tiam liaj ostoj jam ne ripozis tie. La fran-

ciskanaj monaĥoj, timante ke Florenco forŝtelos la cindrojn de la granda florencano, kaŝis ilin en proksima ŝtonmuro. Tie oni retrovis ilin en 1865 kaj tiam *Ravenna* renovigis la etan preĝejon por la 600-a datreveno de l' poeto. Florenco plurfoje petis pri la teraj restaĵoj de sia granda filo, sed *Ravenna* rifuzis la peton, la tombo de Dante estas ankau nun unu el la ĉefaj vidindaĵoj de la trezor-riĉa urbo.

INFERO

UNUA KANTO
EN LA ARBARO OBSKURA

En la nokto de l' Sankta Jaŭdo de 1300* Dante vojeraras en la densa arbaro de l' vivo. Matene li volas ascendi la monton de l' Virto, sed sovaĝbestoj baras al li la vojon (vd. Biogr. 25.) Aperas la spirito de Virgilo (Vergilius), favorata poeto de Dante, kiu naskiĝis en la tempo de Julius Caesar kaj estis kortega poeto de la unua roma imperiestro, Caesar Augustus (Biogr. 25.). Virgilo profetas al Dante la Vertragon, kiu venkos la sovaĝbestojn, kaj promesas al li, ke li gvidos lin hejmen tra granda transtera Devio, tra la Infero kaj Purgatorio; en la Paradizo devas iu alia transpreni la gvidon, ĉar tien li ne povas eniri.

Feltro kaj Feltro, pli ĝuste Feltro kaj Montefeltro estas la limoj de la teritorio de Can Grande (vd. Bio. 25.).

Turnus (Turno) estas la kontraŭulo de Aeneas. Camilla, la amazono, Nisus kaj Eurialus, la du bonaj amikoj, estas herooj de Virgilo.

La Planedo glora estas la suno, kiun siatempe oni rigardis planedo. Simbole ĝi reprezentas Dion.

Iliono estas alia nomo de Trojo.

* La tempon fiksas la aĝo de Dante (vojomezo de l' vivo tera: 35 jaroj; Dante naskiĝis en 1265) kaj la versoj 37—40 (la steloj estis en sama konstelacio, kiel dum la unua mateno, dum la kreo de l' mondo, kiu, laŭ mezepoka opinio okazis en Sankta Vendredo, do la saman tagon, kiam plenumiĝis la elaceto de l' homaro). (Vd. ankoraŭ: Kanto XXI. versoj 112—114.)



La obskura arbaro

J e l' vojomez' de nia vivo tera	1.
mi trovis min en arbareg' obskura,	
ĉar perdiĝinta estis vojo vera.	
H o, ve eĉ diri, kia lok' terura	4.
estas ĉi kruda, pena dens' arbara,	
revakas timon eĉ memoro nura.	
E ĉ mort' apenaŭ estas pli amara.	7.
Sed traktos mi pri renkontita ĉio,	
por ke l' trovita Bono iĝu klara.	
K iel alvenis mi? Sen propra scio.	10.
Mi vagis tiam tiel songravede,	
de l' ĝusta voj' mi trafis al devio.	
S ed troviĝinte fine mont-piede,	13.
ĉe l' fin' de tiu valo, kiu sidis	
sur mia koro tiom tim-obsede:	
m i, ekrigarde, la montsupron vidis,	16.
radivestita de l' Planedo glora,	
kiu la homajn paŝojn ĉiam gvidis.	
N un iom cedis mia sent' angora,	19.
daŭrinta en la kor' tra l' nokto jena,	
pasinta inter tia zorg' dolora.	
K aĵ kiel iu, kun spirego pena,	22.
se el marŝtormo sin al bord' li ŝovis,	
sin turnas al la akvo danĝerplena:	
l' animo, kiu ĵus rifuĝon trovis,	25.
rigardon turnis al la vojo, kian	
neniam viva hom' transiri povis.	
M isoziginte lacan korpon mian,	28.
sur kalva mont' la vojon mi reprenis,	
pli suban gambon ekstreĉante ĉiam.	
N ed, kiam al pli kruta lok' mi venis,	31.
panter' facila, vigla tie staris	
kun felo, kiu de makuloj plenis,	
k aĵ ne foriris ĝi, sed tiel baris,	34.
tiel malhelpis min en vojo mia,	
ke mi prefere jam returnon faris.	

- Sed estis fruo de maten' radia: 37.
la Sun' ascendis, kun la bildoj stelaj
kun ĝi estintaj, kiam Amo Dia
unue movis tiujn aĵojn belajn: 40.
do, min plenigis per esper' de bono
kontraŭ la besto de buntaĵoj felaj
la dolĉo de la horo kaj sezono; 43.
sed ve, denove timo min katenis,
ĉar frapis min apero de leono,
kiu min ŝajne ĝuste kontraŭvenis, 46.
kun alta kapo kaj malsat' rabia,
tiel ke la aero kvazaŭ tremis.
Krome, lupino, kies korpo fia 49.
sub ŝarg' de ĉia fidezir' malgrasis,
kaj gentojn puŝis al mizero kria,
nun tiel ege min ekembarasis 52.
per tim', kiu el ĝia vido venas,
ke la esper' de l' alto min forlasis.
Kaj kiel iu, kiu gajni penas, 55.
sed venas temp' kaj perdon por li ŝutas,
tutpense pentas, plende sin ĉagrenas,
pro l' best' malpaca same mi kondutas, 58.
ĉar, kontraŭvene, ĝi min, grad' post grado,
repremas tien, kie suno mutas.
Post ĉi refal', dum profundloka vado, 61.
sin montris iu al la vid' vuala,
ŝajnante raŭka jam pro silentado.
Vidante lin en dezertego vala: 64.
»Kompatu min! — mi krie al li gestis —
ĉu ombro estas vi, ĉu hom' reala«.
Kaj li: »Ne homo, homo mi nur estis. 67.
Gepatroj miaj estis laŭ nacio
lombardoj, hejme en Mantovo nestis.
Naskite, jam malfrue, sub Julio, 70.
sub bona Aŭgusto vivis mi en Romo,
en tempo de l' falsdia religio.

- Kaj kantis mi, poet', pri l' pia homo, 73.
fil' de Anhizo, rifuĝint' el Trojo,
post brulo de l' fiera Iliono.
- Sed kial vi al tiom pena vojo 76.
reiras, kaj ne al ĉi bela monto,
al la komenc', kaj kaŭz' de ĉia ĝojo?»
- «Ho, ĉu Virgil' vi estas do? La fonto 79.
de l' larĝa kantriver' kun dolĉa zumo?»
mi kriis, dum la frunton kovris honto.
- «Vi, de ĉiuj poetoj glori kaj lumo! 82.
favoru min pro longa stud' fervora
kaj granda am' al via versvolumo!
- Ho, mia Majstro kaj mode'lo glori! 85
sola, de kiu mi heredon prenas
de l' dolĉa stilo: mia fam' honora,
vidu ĉi monstron, kiu min korpremas, 88.
Saĝulo fama, volu min protekti,
ĉar pro ĝi vejnoj ĉiuj en mi tremas».
- «Alian vojon devas vi elekti 91.
— respondis li, vidante ke mi ploras —
por vin de l' lok' sovaĝa fordirekti.
- La best', pro kiu krie vi angoras, 94.
neniun lasos ja tra vojo sia
kaj baras kaj ĝismurde ĝi rankoras,
kaj estas tiel krima, ke l' malpia 97.
dezir' neniam satas en ĝi sine,
post manĝo venas eĉ malsato plia.
- Al multaj bestoj ĝi sin donas ine, 100.
kaj al pli multaj donos, ĝis alvenos
Vertrago, kiu ĝin mortigos fine.
- Teron, metalon tiu ne manĝemos, 103.
manĝos el amo, saĝo, virto brila,
inter Feltro kaj Feltro li loktenos.
- Li estos sav' por Itali' humila, 106.
por kiu Turno, Niso, Eŭrialo
de vundoj mortis, kaj virgin' Kamila.

- Li pelos ĝin tra ĉiu urb' kaj valo, 109.
ĝis li ĝin puŝos al Infer', de kie
ĝin Pra-Envio sendis por fatalo.
- Do, bone por vi, miaopinie, 112.
min sekvi nun, ke tra l' Eterna Loko
mi savu vin, gvidante vin devie.
- Vi aŭdos tie ĝemojn sub sufoko, 115.
vidos antikvajn ombrojn en turmentoj,
ke duan morton petas ĉiu voko;
kaj poste — ombrojn, kun kontentaj sentoj 118.
en fajro, pro la fido pri l' eniro
pli-malpli-frua al beataj gentoj.
- Sed se pli alten levos vin deziro, 121.
anim' pli digna gvidos vin. Necesas
vin al ŝi lasi, post adiaŭdiro.
- Car la Regnestro, kiu supre penas, 124.
al mi, vivinta kontraŭ Lia leĝo,
al sia Urb' eniron ne permesas.
- Li estras ĉie, Li, ĉiela Reĝo! 127.
Feliĉaj, kiujn li elektas, iri
al lia Urb', al lia alta Seĝo!«
- Nun mi: »Poet'! Permesu peton diri 130.
al vi, je l' Dio, kiun vi ne konis:
ke nek ĉi ve' nek pli min povu ŝiri,
min gvidu, kiel vi promeson donis, 133.
ke l' pordon vidu mi de Petro sankta,
kaj tiujn, kiuj en la damno dronis!«
- Ekiris li, mi estis lin sekvanta. 136.

DUA KANTO
VIRGILO KAJ BEATRICE

Dante ne estas la unua vivanta vizitanto de l' Submondo. Antaŭ li iris jam tien patro de Silvius: Aeneas, kiu estis destinita kiel fondanto de l' eterna Romo; krome Sankta Paŭlo, kiun la Sankta Skribo nomas Elektita Vazo de l' Sinjoro.

La ĉielaj protektantoj de Dante estas: la Sankta Virgulino, la Indulgo mem; Sankta Lucia, la sanktulino de la Lumo, martiro, kiun oni blindigis; Dante speciale respektis ŝin kiel sian gardsanktulinon, al ŝi sin turnis dum sia okulmalsano; kaj fine Beatrice, kiu sidas apud Raĥela (simbolo de l' meditema vivo) kaj en kiu tiel brile lumas la Virto, per kiu la homraso superas ĉiun kreaĵon en la ĉieltavolo plej malgranda, senpere ĉirkaŭprenanta la Teron.

Beatrice descendas al Virgilo en la Limbon (infervestiblo), kie troviĝas la ŝvebantoj, la senpekaj paganoj, kaj petas lin pri helpo al Dante.

F ORIRIS tag'. Aero bruna, mola	1.
de sur animoj de l' terloĝantaro	
forprenis jam la lacon. Nur mi sola	
klopodis tie en militpreparo	4.
kontraŭ la vojo kaj kompat' sufera,	
kiujn la mens' nun pentros sen eraro.	
Ho, helpu do min, Muz', Geni' supera!	7.
Anim'! skribonta nun, kion mi vidis,	
jen estos prov' pri via noblo vera!	
Mi diris: »Majstro, kiu min ekgvidis,	10.
esploru min pri mia pov' kaj forto	
nun, antaŭ ol vi min al voj' konfidis.	
Silvio-patro ja, laŭ via vorto,	13.
penetris en mortema korpĉifono,	
en korp' sensebla, al la mond' sen morto.	
Do, se la Malamiko de l' Malbono	16.
favoris lin, pesante: kiu, kio,	
kaj kiom li efikos per ĉi kono:	
ne estas ignorinde por homscio,	19.
ĉar lin elektis la Ĉiela Sfero	
patro de Romo kaj de l' Imperio,	
kiuj du, por paroli laŭ la vero,	22.
per Dio firmas tie, kie tronas	
la Petro-posteul' sur sankta tero.	
Dum voj', pri kiu via Kanto sonas,	25.
li aŭdis aĵojn, per kies efekto	
lin kaj l' ornaton papan venko kronas.	
Poste ĝin iris Vazo de l' Elekto,	28.
ke en la Kred' firmiĝu li solide,	
kiu al Savo estas vojdirekto.	
Sed kiel mi? De kiu invitate?	31.
Nek Encas', nek Paŭl' mi min titolas,	
nek mi, nek iu min rigardas fide;	
do, se mi tian vojon riski volas,	34.
mi timas, tio estas stulta vano.	
Saĝul', vi scias pli ol mi parolas.»	

- Kiel iun malhelpas nova plano 37.
en plan' kaj li ne volas la volitan,
eĉ, tute ĵetas ĝin el mens' kaj mano:
jen, gapis mi la valon mallum-litan, 40.
kaj nova pens' konsumis la intencon
komence tiel viglan kaj subitan.
»Se de l' parol' komprenis mi la sencon 43.
— diris la ombro de l' poet' grandkora —
atakis malkuraĝo vian menson.
Gi multajn trafas tiel, ke l' valora 46.
intenc' al ili mortas en animo,
kiel trompvidon' timas best' angora.
Do, por ke ĉesu jam en vi la timo: 49.
jen, kion aŭdis mi, ke sent' kompata
venigis min, por helpi el proksimo.
Min, ĉe l' ŝvebantoj, sinjorin' beata 52.
vizitis, tiel bela, ke promesis
mi ĉion, estu kio ajn petata.
L' okuloj pli ol stelo brilimpresis, 55.
komencis ŝi per diro dolĉtrankvila,
en kies son' anĝela voĉ' karesis:
Ho vi spirit' mantova, plej ĝentila, 58.
vi kies fam' en mondo ja sen morto
plu daŭros kaj konstante restos brila!
Mia amik' sed ne de bona sorto, 61.
sur kalva monto malhelpite vagas,
sin preskaŭ turnas time kaj sen forto.
Mi timas, ke jam tiel lin atakas 64.
konfuz', laŭ ĵus aŭdita dir' ĉiela,
ke, por lin helpi, mi jam tarde agas.
Ho iru, helpi per parol' miela, 67.
kaj ĉiel eble el mizer' lin tiri,
konsolu min, estante sav-akcela.
Mi, Beatrice, petas vin, aliri. 70.
Mi venis, sopirante la revenon,
amo min sendis, igis peton diri.

- Ja mi, veninte antaŭ l' Suverenon 73.
ofte mencios vin kun laŭdparolo.«
Ŝi eksilentis, kaj mi diris jenon:
- »Ho dam' de l' virto, per kiu en solo 76.
superas la homraso la enhavon
kompletan de l' plej strikta ĉieltavolo,
ordono via donas tian raron, 79.
ke ĝin obei tuj, jam ŝajnus *tarde*.
Ne plu necesas pruvi ĝian gravon.
- Sed diru, kiel do vi sensingarde 82.
ne timis veni centron de la mondo
el Alt', kien vi resopiras arde?«
- »Car vi tiel fervore pri l' respondo 85.
scivolas, jen do — ŝi komencis diri —
kial sen tim' mi venis al ĉi rondo.
- Nur tiajn aĵojn, kiuj malutili 88.
kapablas, devas timi koro nia,
aliajn ne, ĉar ne danĝeras ili.
- Min Dio, dankon al li, fariĝ tia, 91.
ke min ne trafas via stat' mizera,
nek tuŝi povas fajro incendia.
- Ciela Damo, per kompat' tenera 94.
je la sufer', al kiu mi vin sendas,
rompis la juĝon de la Leĝ' severa.
- Ŝi diris, turne al Lucia: »Plendas, 97.
helpon bezonas via tre fidela
servanto: mi lin al vi rekomendas.«
- Kaj, malamik' de ĉio ajn kruela, 100.
Lucia venis diri tuj post tio
al lok', kie mi sidis kun Rahela:
- »Kial vi, Beatrice, fier' de Dio, 103.
ne helpas lin, kiu vin tiel amas,
ke por vi fuĝas li de l' pleb-medio?
- Cu vi ne vidas, ke lin larmoj banas, 106.
ke li batalas kun la mort' insida
sur ondoj, kiuj pli ol mar' titanas?«

- Neniu estas kuri pli rapida 109.
de perdo aŭ por gajno de monkvanto,
ol mi post ĉi parolo eldirita.
- Lasinte benkon de l' beata lando 112.
mi venis, ĉar mi viajn vortojn fidis,
al vi honorajn kaj al la aŭdanto.«
- Si diris okulleve kaj mi vidis 115.
en la okuloj lumaj larmobrilon,
jen, kial veni mi eĉ pli rapidis.
- Mi venis, fari al ŝi la deziron: 118.
al vi la monstron helpos mi eviti,
kiu al bela monto baras iron.
- Sed kio? Kial halti kaj heziti, 121.
kial ĉi malkuraĝ' en via koro,
kial ne arde, freŝe penojn spiti,
- dum tri benataj damoj kun fervoro 124.
zorgas pri vi en korto de l' ĉielo,
kaj mi promesas tiom da favoro?«
- Kiel floret', kiu de l' nokta gelo 127.
sin fermis kline, sed, de l' suno blanke,
sur tig' sin levas en senferma belo:
- la laca virt' freŝiĝis nun senmanke, 130.
kaj tia bona ard' en mi fortikis,
ke freŝkuraĝe mi komencis, danke:
- »Ho, kompatemaj, kiuj min ŝirmigis, 133.
ho vi, ĝentila, kiu tuj alvenis
je l' veraĵ vortoj, kiuj instigis!
- la koron tiel la sopir' ektrenis 136.
pluiri nun, post tiu ĉi parolo,
ke mi l' unuan planon jam reprenis.
- Ekiru, nin plenigu sama volo, 139.
ho mia Duko, Estro, Majstro kara!«
Mi diris, kaj ni, li en gvida rolo,
- ekiris sur la kruta voj' arbara. 142.

TRIA KANTO

LA PORDO DE L' INFERO

Ĉirkaŭ la pordego de l' Infero troviĝas la indiferentuloj, kiuj havas nek kulpon, nek virton. La ĉielo ne akceptis ilin, kaj ili estas ekzilitaj ankaŭ el la Infero, ĉar la tieaj pekuloj povus fieri vidante ĉi tiujn mizerulojn. Dante rekonas inter ili Celestinon V., kies »granda rezigno« venigis sur la papan seĝon Bonifacon VIII. la plej grandan malamikon de Dante. Laŭ la onidiro, Bonifaco tra kaŝita voĉtubo, kiel »ĉiela voĉo« timigis kaj persvadis Celestinon.

En la Inferon boatisto Ĥarono (el la greka mitologio) transportas la pekulojn sur la infera rivero Aĥerono.

Vortklarigoj: *cis* (*): maltrans; *poltrona* (*): malkuraĝa; *riveli* (b): revelacii.

- T**RA mi vi venas urbon de turmento, 1.
tra mi vi venas al dolor' ĉiama,
tra mi vi venas al damnita gento.
- Aŭtoron mian gvidis justo flama, 4.
la Dia Povo kreis min en kaŝo
kaj Ĉefa Saĝo kaj Praforto Ama.
- Ne estis antaŭ mi kreita aĵo 7.
krom la eternaj; mi eterne staras.
Ĉiun esperon lasu ĉe l' enpaŝo.
- Mallumlitere nun ĉi vortoj baras 10.
rigardon mian super volbo porda,
kaj mi: »Ho Duk', la senc' al mi malklaras.«
- Sed diris li, en pensdivenoj forta: 13.
»Nun ĉesi devas en vi ĉiu timo,
nun ĉiu malkuraĝo estu morta.
- De l' dolor-lok' dirita jen la limo, 16.
trans kiu vidos vi la vean bandon,
kiu la Bonon perdis de l' animo.«
- Kaj manpreninte min, li la komandon 19.
prenis kaj, gaje, min per freŝ' influis,
kaj gvidis min en la sekretan landon.
- Tie ĝemspiroj, plendoj, veoj bruis, 22.
resonadante tra l' aer' senstela,
tiel ke miaj larmoj tuj ekfluis.
- Cent lingvoj, vortoj de terur' kruela, 25.
doloraj veoj, kri' de furiozo,
voĉ' akra, raŭka, manoklak' ribela
- sin tordis kaj tumultis sen ripozo 28.
en la aer' sentempe noktkolora,
kiel la sablo dum turnventa krozo.
- »Majstro — mi kriis kun harar' horora —
kion mi aŭdas? Diru, kia aro
vidiĝas do sub tia prem' dolora?«
- Kaj li: »En ĉi mizero kaj amaro 34.
tenatas tie ĉi animoj ĝemaj,
vivintaj kaj sen krim' kaj sen bonfaro.

- Troviĝas inter ĉi malkuraĝemaj 37.
l' anĝeloj, kiuj volis nek ribeli,
nek fideli, estante nur pormemaj.
- Ekzilis la ĉiel' por ne malbeli, 40.
rifuzis ilin ankaŭ la infero,
por gloron de misuloj ne akceli.«
- »Ho Majstro, kia ŝiro de sufero 43.
veigas ilin do kun tia forto?»
»Mallonge, jen pri ili la afero:
- Al ili mankas eĉ esper' pri l' morto, 46.
iliaj tagoj rampas tiel blinde,
ke ili envias ĉiun ajn pri l' sorto.
- La mond' ignoras ilin, forgesinte, 49.
kompat' kaj just' malŝatas, laŭmerite.
Rigardu, iru! Trakti plu ne inde.«
- Kaj nun, standardon vidis mi subite 52.
girante flugi en senhalta paso,
por senripozoz kvazaŭ kondamnite.
- Post ĝi tumultis tia homamaso, 55.
ke mi neniam ja eĉ konjektetis,
ke l' mort' jam tiom sternis el homraso.
- Kelkajn rekonis mi, kaj jen vegetis 58.
ombro de tiu, kiu per abdiko
poltrona la Reznigon Grandan metis.
- Jen estis — min sciigis ĉi indiko — 61.
sekto poltrona, aĉa al okuloj
de Dio kaj de Lia malamiko.
- Ci neniam vivintaj mizeruloj 64.
estis nudkorpaj, ilin persekutis
venenaj vespoj, egaj muŝoj, kuloj,
- Iliaj vangoj sangon strie gutis, 67.
kun larm' la sango fluis sur la teron,
kie ĝin naŭzaj vermoj tuj englutis.
- Kaj plurigarde, vidis mi riveron, 70.
sur kies bordo homamaso ŝvelas.
»Majstro — mi petis — lasu ĉi misteron

- ekscii, kiujn, kia leĝo pelas 73.
 tiel klopodi al transborda zono,
 kiel ĉi surda lum' al mi rivelas?«
- Kaj li: »Vi scios tion laŭ bezono, 76.
 kiam ĉi vojon finos ni, venonte
 al la rivero trista, Aĥerono.«
- Nun la okulojn mi mallevis honte, 79.
 timante tedi lin, mi langon ligis
 kaj mute iris je l' river' renkonte.
- Kaj venis bark'; aĝul' en ĝi navigis, 82.
 blanka de oldaj haroj; kun kruelo:
 »Ve, misanimoj — krie li timigis —
- ne plu esperu vidon de l' ĉielo! 85.
 jen mi, kiu transborden vin ekspedas,
 al la eterna fajro, frost', malhelo!
- Sed jen, ĉu vivan korpon vi posedas? 88.
 For de ĉi tie! For de l' trup' de l' morto!«
 Sed kiam vidis li, ke mi ne cedas,
- li diris: »Tra aliaj voj' kaj bordo 91.
 eblas, ne tie ĉi, ke vi sukcesu.
 Pli milda ligno taŭgas por transporto.«
- Sed nun la Majstro: »Ne kolerekscesu, 94.
 Aĥerono! Jen la volo tie, kie
 la volo estas pov'! Demandoj ĉesu!«
- La lanaj vangoj tuj mildiĝis plie 97.
 al la ŝipisto de la akvoj palaj,
 nur ĉe l' okuloj cirkliis flamoj strie.
- Sed la animoj nudaj, lace falaj 100.
 perdis koloron, dentoklake tremis
 dum aŭdo de la vortoj krudbatalaj.
- Dion, gepatrojn ili ekblasfemis, 103.
 nasklokon, tempon, rason, familion,
 nasksemon sian, kaj kiu ĝin semis.
- Poste de l' barko ili fuĝis ĉiom 106.
 kaj vee kuris al la bordo nigra,
 atenda ĉiun, kiu spitas Dion.

- Demon' Harono, kun okulo tigra, 109.
la vojon baras, repelante puŝas
remile tiun, kiu estas pigra.
- Kiel folio, se l' aŭtun' ĝin tuŝas, 112.
unu post unu falas, ĝis ornamo
de l' tuta branĉo sur la tero kuŝas,
tiel la sem' malbona de Adamo 115.
de l' bord' po unu sin malsuprenlasas,
kiel la birdo laŭ logfajfa gamo.
- Kaj tra l' mallumaj ondoj ili pasas, 118.
kaj antaŭ ol la bark' al bord' alia
alvenis, cise novaj jam amasas.
- Nun la ĝentila Majstro: »Filo mia, 121.
el ĉiu land' alvenas post elspiro
ĉiu, mortinte en kolero Dia.
- Ĉi tie ili pretas je l' transiro, 124.
ĉar dia justo tiel ilin spronas,
ke ŝanĝas sin la timo je deziro.
- Animo ne transvenas, se ĝi bonas, 127.
do, se Haron' vin traktis iritite,
ties signifon nun vi jam rekonas.«
- Li finis. Kaj la morna kamp' subite 130.
ektremis tiel, ke eĉ nun, la pensa
imag' teruras min, banante ŝvite.
- De l' larma ter' naskiĝis vent' intensa, 133.
kaj el ĉi vento ruĝa fulmo flugis,
prirabis min de ĉiu povo sensa.
- Mi falis, kiel kiun sveno jugis. 136.



La infera barkisto.

1771. 1. 1. 1. 1. 1.

KVARA KANTO

LA LIMBO

Dante vekigas jam sur la transa bordo, Virgilo lin transportis dum lia sveno. Ĉi tie estas la Limbo, la unua rondo de l' Infero, de ĉi tiu grandega funelo, kiu deklivas al la centro de l' mondo, kaj kiun ĉirkaŭprenas unu subla alia balkonformaj, pli kaj pli malgrandaj rondoj.

En la limbo estas la ŝvebantoj, nebaptitaj senpekuloj. Ilia sola doloro estas la senespera deziro je l' nekonata supera sento-vivo de l' kristanismo.

Kristo, tuj post sia morto, descendis tien ĉi kaj kunportis en la ĉielon la grandulojn de l' Malnova Testamento; antaŭ Kristo neniu povis saviĝi.

En la malluma regiono la sola luma loko estas la »smeralda herbaro«: loko de l' antikvaj famuloj, inter ili estas ankaŭ la loko de Virgilo. Tie vidas Dante *Homeros*, la majstron de ĉiu poezio, *Horatius*, la satirverkiston, gloriganton de Augustus, *Ovidius*; kaj *Lucanus*, kiu prikantis la venkojn de Julius Caesar. Tie troviĝas ankaŭ la herooj de Virgilo: *Lavinia*, edzino de Aeneas, filino de reĝo *Latinus*, *Camilla*, la amazono. Poste *Elektra*, patrino de *Dardano*, fondinto de Trojo, *Hektor*, la troja heroo, *Brutus*, kiu mortigis la tiranan reĝon *Tarquinius Sextus*, *Lucretia*, kies perfortado age de *Tarquinius* estis la kaŭzo de tio, ke Brutus mortigis la reĝon. *Julia*, filino de Caesar, edzino de Pompeius, *Martia*, edzino de *Cato* de *Utica*, *Cornelia*, patrino de l' du *Gracchus*. Kaj la sola mohametano, la granda sultano *Saladino*.

La filozofojn gvidas la majstro de ĉiuj sciencoj: *Aristoteles*. En lia akompano troviĝas: *Sokrates*, *Plato*, *Demokritos*, laŭ kiu la mondo rezultas el la hazarda aglomeriĝo de l' atomoj, *Diogenes*, la granda cinikulo, *Anaxagoras* kaj *Thales*, du el la sep saĝuloj, *Dioskorides*, kiu verkis libron pri la kvalitoj de l' kreskaĵoj, *Empedokles* kaj *Heraklitos*, filozofoj naturalistaj, *Zeno* la stoikulo, *Orpheus*, la mita muzikisto kaj poeto, *Cicero* la granda oratoro, *Linos* la mita greka poeto, *Seneca* la roma etikisto, *Euklides*, majstro de l' geometrio, *Ptolomeus*, la astronomo, aŭtoro de l' ptolemea mondsistemo, *Hippokrates* la plej fama greka kuracisto, *Avicenna*, fama kuracisto araba, *Galenos*, la granda roma kuracisto, *Averroës*, araba filozofo, kiu skribis grandan komentarion pri Aristoteles.

LA svenan dormon tondro rompis brue, tiel ke mi vekite min ekmovis, kiel persono alarmita skue.	1.
L' okulojn ripozintajn nun mi provis irigi ronde, kun rigardo hasta, por ke mi vidu, kie mi min trovis.	4.
Mi estis rande de abismo vasta, kiu senfinajn veojn de la brula dolor' kolektis en ĉi tondro drasta.	7.
Malluma kaj profunda kaj nebula ĝi estis, tiel ke l' rigarda sondo distingis nulon, malgraŭ streĉ' okula.	10.
»Nun ni descendos al ĉi blinda mondo« — palvange la poeto ekparolis — »mi la unua kaj vi la sekvonto.«	13.
Kaj mi, dum lian palon mi esploris: »Kiel? se timas eĉ vi, ho animo, kiu en duboj sola min konsolis.«	16.
Kaj diris li: »En la vizaĝesprimio l' angoro pro l' malsupra gent' mienas, kaj ĉi kompato ŝajnas al vi timo.	19.
Ni iru, ĉar la longa voj' nin trenas!« Kaj li jam gvidis al la rond' unua, kiu l' abismon vean ringmargenas.	22.
Por aŭdi ne plu estis veo brua, nur de ĝemspiro jam en ĉi segmento tremis eterne la aero flua.	25.
Gi venis de doloro sen turmento, de granda multo, kiu jen sopiris: virinoj, viroj kaj infantaĉmento.	28.
»Ĉu ne demandas vi — la Majstro diris — kiajn spiritojn vidas vi sub tedo? Ja sciu, antaŭ ol ni plu ekiris:	31.
tiuj ne pekis, sed por savrimedo por ili ne sufiĉis la bonfaro, ĉar mankis bapto: pord' de via kredo.	34.

- Kaj antaŭ Kristo ili kun eraro 37.
adoris Dion kaj ne laŭ la Vero.
Kaj ankaŭ mem mi vivas en ĉi aro.
- Nur tiu manĉ', nenia krim-afero 40.
kondamnis nin kaj tenas nin katene,
ke en dezir' ni vivas sen espero.«
- Granda dolor' min premis ekkomprene, 43.
kiom da homoj, altaj laŭ valoro,
ŝvebadas en ĉi Limbo korĉagrene.
- »Diru, ho Majstro, diru, ho Sinjoro — 46.
— mi petis, por certigi per kred-forto
venkanta ĉiujn dubojn de la koro —
- ĉu beatigas iu el ĉi sorto 49.
per memmerit', aŭ fremda helpo-dono?«
Li, kun diveno de l' aluda vorto,
- diris: »Mi novis en ĉi regiono, 52.
kiam alvenis Potencul', sen baro,
kapornamite per triumfa krono.
- Li venis por la pragepatra paro, 55.
Habelon, ombron de Noah' altiris,
Mozeon, pian patron de l' Leĝaro.
- Kaj Abraham', Davido kun li iris, 58.
kaj Izrael' kun patro kaj infanoj,
Rahela, kiun longa serv' akiris,
- kaj multaj pluaj igis ĉielanoj. 61.
Kaj antaŭ ili, fiksu en la scio,
ne levis hom-animon savaj manoj.«
- Ne haltis ni dum diro de ĉi tio, 64.
l' arbaron iris ni sen korŝancelo,
l' arbaron, densan de anim-legio.
- Ne fore jam de la montpinta celo 67.
ni estis, kiam fajron mi ekvidis,
kiu segmenton venkis de l' malhelo.
- De l' lok' min iom longa voj' dividis, 70.
mi ne distingis ĝin en ĉiu parto,
sed vidis, ke ĝin digna gent' rezidis.

- »Ho vi, honoro de l' scienc' kaj arto,
kiujn esceptas tiom da honoro,
lokinde ilin tiel en aparto?«
- Kaj li: »Akiris ili per la gloro, 76.
ehanta el ilia temp' ĝis via,
ke ilin, jen, honoris ĉielfavoro.«
- Nun ekaŭdigis voĉo melodia: 79.
»Honoron al la alta vir' poeta!
Foriris, nun revenas ombro lia!«
- Post kiam iĝis tiu voĉ' kvieta, 82.
kvar grandajn ombrojn vidis mi alire,
kun trajto nek malĝoja, nek gajeta.
- La bona Majstro nun komencis, dire: 85
»Rigardu tiun, kun la glav' en mano,
kiu l' aliajn gvidas al ni sire.
- Estas Homer': plej alta Parnasano. 88.
Horac' satira kiel dua venas,
Ovid' la tria, kaj je l' fin': Lukano.
- Ĉar krom mi ja al ĉiuj ĉi konvenas 91.
la nom', dirita de la voĉo sola,
kaj ili min salutas kaj solenas.
- Jen estis do la bela grupo skola 94.
de l' majstro de l' plej alta, aglflugile
aliajn superanta kanto mola.
- Iom parolis inter si trankvile, 97.
poste salute ili al mi gestis,
ridetis mia Duk' al mi ĝentile.
- Honoron ili eĉ pli manifestis, 100.
min akceptante en ĉi kompanio,
ke inter tiaj mi la sesa estis.
- Nun al la lum' ni marŝis dum mencio 103.
de multo, kies mut' nun estas bela,
kiel pli belis tiam *dire* tio.
- Kaj venis ni al sub kastel' nobela, 106.
kiu sepoble havas ringon muran,
ĉirkaŭe: bela rivereto svela.

- Gin ni transiris, kvazaŭ teron duran, 109.
 kaj tra sep pordoj, kun la grup' saĝula,
 mi venis freŝan kampon verdveluran.
- Jen estis pezpalpebra, grav-okula 112.
 popolo digna, grand-aŭtoritata,
 kun rarparola voĉo dolĉmodula.
- Kaj pluirante venis ni al plata, 115.
 tute aperta luma loko alta,
 de kie ĉio estis nun vidata:
- la vasta kampo, kun herbar' smeralda. 118.
 Kaj oni montris ombrojn de granduloj;
 vidante plenis mi de ĝoj' ekzalta!
- Elektran vidis mi kun samlanduloj, 121.
 kaj Eneas', Hektoro jen rezidis,
 Cezar' armita kun la falk-okuloj.
- Pentesilean kaj Kamilan vidis 124.
 mi aliflanke; tie reĝ' Latino
 kun la filino Lavinia sidis.
- Kaj Bruto, forpelinto de Tarkvino, 127.
 Julia, Lukrecia, Kornelia,
 Marcia, kaj, aparte, Saladino.
- Kaj vidis mi, post okulstreĉo plia, 130.
 Majstron de tiuj, kiujn pov' destinis
 sidi ĉe la scienc' filozofia.
- Kaj ĉiuj *lin* admiris kaj estimis, 133.
 kaj apud li Sokrato kaj Platono
 staris, kaj pli ol ĉiuj lin proksimis.
- Jen Empedoklo, kaj, laŭ kies kono 136.
 la mond' estas hazardo — Demokrito;
 Diogeno, Talo, Heraklit', Zenono.
- La kvalitkolektisto Dioskorido, 139.
 Anaksagor' kaj Lino, kaj Orfeo,
 Cicero kaj Seneko de l' Etiko.
- Eŭklido geometra, Ptolemeo, 142.
 kaj Hipokrat', Galeno, Avicen',
 kaj komentariisto Avereo.

-
- Sed nomi ĉiujn — vana entrepren': 145.
 min urĝas longa tem', la interpreto
 devas postresti faktojn malgraŭ pen'.
Duiĝis la sesnombra societo, 148.
 la saĝa Majstro novan vojon prenis,
 kaj sekvis aertremo post kvieto,
regiono, kiu ĉiun lumon senis. 151.

KVINA KANTO

FRANCESCA DA RIMINI

En la dua rondo estas punataj la kulpuloj de l' amo.

Ce la eniro staras la diablo-juĝisto *Minos*. Laŭ la mito, li, filo de Zeus kaj Hera, estis reĝo kaj leĝdonanto de Kreto kaj pro lia granda severa justeco Zeus faris lin post lia morto juĝisto de l' submondo.

Semiramis: asira reĝino, fama pri sia malĉasta voluptemo. Sia leĝo estis: licas, kio plaĉas. *Dido*, reĝino de Kartago, vidvino de Sychaeus; laŭ la *Aeneis* de Virgilo ŝi enamiĝis al la traveturanta Aeneas kaj forlasite de li, ŝi bruligis sin mem sur ŝtiparo. *Cleopatra*: egipta reĝino, amatino unue de Julius Caesar, poste de Antonius, post la malvenko de ĉi lasta ŝi mortigis sin. *Achilles* estis venkita de sia amo al Polyxena, ĉe lia edziĝo lin trafis la mortiga sago de *Paris*. *Helena*, la kaŭzo de la Troja milito, estis mortigita de greka virino, kiu venĝis per tio sian edzon falintan sub Trojo. *Paris*: fuĝiginto de Helena, falis per la sago de Philoktetes. *Tristan*: amanto de Isolda, mortigita de ŝia edzo Marke.

Francesca (da Rimini), edzino de Gianciotto, enamiĝis al sia bofrato Paolo. La edzo surprizis kaj mortigis ilin: lin atendas pro tio la infera loko Kaina (vd. Kanto XXXIV.)

Lancelotto, kavaliro de la mita reĝo Arturo, amis Ginevran, edzinon de Arturo. *Galeotto* estis ilia amperanto kaj tentanto.

La »punkto«, kiu tentis tiel la geamantojn, ke ili »ne legis plu«, estis tiu loko de l' libro, kiu rakontas, ke Ginevra, laŭ la instigo de Galeotto, »prenis la mentonon de Lancelotto kaj lin, vidate nur de Galeotto, longe kisis.«

Iu (v. 81) estas Dio, kies nomo ne estas elparolata en la Infero.

Vortklarigoj: *lasciva* (*): malĉaste voluptema ; *libido* (*): seksimpulso.

NUN en la duan rondon ni descendis,	1.
ĝi malpli grandan lokon ĉirkaŭbaras,	
sed tie des pli da dolor' veplendis.	
Terure kaj dentgrince Minos staras	4.
ĉe la enir' kaj kulpojn ekzamenas	
kaj per vost-volvo regas, juĝon faras.	
Car se animo misnaskita venas	7.
kaj ĉiujn kulpojn antaŭ li recitas,	
li, kiu l' kulpojn konas kaj komprenas,	
pri l' lok' infera pese primeditas,	10.
kaj faras vosto-ringojn, tiel multe,	
kioman infer-gradon ĝi meritas.	
Senĉese venas la popol' tumulte,	13.
por juĝ' la kulpojn portas ĉia gento,	
rakontas, aŭdas, iras plor-singulte.	
»Vi alveninta Domon de l' Turmento!«	16.
— alkrias Minos, kiam min li vidas,	
• lasante la oficon por momento —	
»kiel eniros vi, kaj kiun fidas?	19.
Ne trompu vin la larĝo de la pordo!«	
Sed diras al li nun, kiu min gvidas:	
»Kial vi bruas? Li, laŭ fata ordo	22.
pluiros! Jen la volo tie, kie	
la volo estas pov'. Demandojn for do!«	
Eksonis nun doloraj voĉoj krie.	25.
Ni venis lokon, kie orkestro tuta	
de veoj, ĝemoj batis min furie.	
Jen estis lok' de ĉiuj lumoj muta.	28.
Ĝi muĝis, kiel mar' dum furioza	
batal' kun vento malamike bruta.	
Infera vent', eterne senripoza,	31.
spiritojn multajn tie ŝire trenis,	
flugige, bate, en turnado kroza.	
Kiam al la ruino ili venis,	34.
kun ploro kaj veado kaj lamento	
la Dian Forton ili ekblasfemis.	

- Eksciis nun mi, ke per ĉi turmento 37.
damniĝas, kiuj pekis per la karno,
submetis saĝon al libida sento.
- Kaj kiel sturnoj, tempe de malvarmo, 40.
en granda, plena grup' sin fluge tiras,
tiel en vent' la misspirita svarmo
- malsupren, supren, al kaj re flugiras, 43.
sciante, ke ne nur ripozon tie,
sed eĉ mildiĝon vane ĝi sopiras.
- Kaj kiel gruoj iras, kaj molkrie 46.
linion longan fluge el si ligas,
ĉi ombroj tiel veas letargie,
- dum la tempesta vent' ilin flugigas. 49.
Mi diris: »Majstro! Tiu nigra vento
kian popolon tiel vip-instigas?«
- Respondis li: »La estro de l' taĉmento, 52.
pri kiu nun scivolas via voĉo,
estis reĝino de multnombra gento.
- Si dronis en volupto kaj diboĉo, 55.
legigis: licas kio plaĉon vekas,
ke ne malhelpu ŝin mem la riproĉo.
- Jes: Semiramis; pri ŝi oni legas, 58.
ke ŝi heredis post la edzo Nino
la teron, kie la sultan' nun regas.
- Pro am' bruligis sin tiu virino, 61.
al ostoj de Siĥeo malfidele.
Jen Kleopatra, kun lasciva sino.«
- Helena venis, pro kiu kverele 64.
popoloj sangis, kaj la granda Aĥilo:
ĉar amo venkis fine lin kruele.
- Pariso kaj Tristan' kaj poste milo 67.
da ombroj, manmontritaj, kiuj fate
pro amo devis morti per armilo.
- Dum tie flugis, de l' Doktor' nomate, 70.
herooj, belulinoj inter ili,
mi konfuziĝis, larmis mi kompate,

- kaj diris: »Majstro, volus mi babili
kun la du ombroj, kiuj flugas pare
kaj al la vento ŝajnas pli facili.« 73.
- Kaj li: »Atendu, ĝis ili najbare
flugos, kaj petu ilin je l' amforto
ilin portanta: ili restos stare.« 76.
- Kiam alvenis ili per vent-porto,
mi kriis: »Ho, animoj turmentataj!
se Iu lasas, venu do por vorto.« 79.
- Kaj kiel la kolomboj am-malsataj
al dolĉa nesto flugas en rapido,
aerfrapante per flugiloj bataj,
simile ilin, el la grup' de Dido 82.
- altiris al ni tra l' aer' terura
la voĉ' kompata, kvazaŭ forta brido.
»Ho, korp-anim', bonvola, kara, pura!
veninta en ĉi nigron ĵus de l' Tero,
kiun per sango pentris ni purpura,
se tio plaĉus Reĝon de l' Etero, 85.
- ni preĝus pacon por vi, kiu sentas
kompaton kontraŭ ni en ĉi mizero.
Ĉu aŭdi, aŭ paroli vi pretendas? 88.
- Ni aŭdos, aŭ parolos, laŭordone,
dum la ventego, kiel nun, silentas.
Nin oni naskis tiuregione, 91.
- kie la Po la maron jam eniras,
por havi pacon, kun kunuloj, drone.
Am', kiu korojn flate rab-akiras, 94.
- lin pelis al mi, al ĉi korp' gracia,
murdita tiel, ke l' memor' min ŝiras.
Am', por amatoj forta trud' magia, 97.
- min pelis al li, kaj kun tia forto,
ke jen, eĉ nun ne ĉesis brulo ĝia.
Amo nin puŝis al komuna morto, 100.
- murdinton nian nun Kaina invitas.«
Jen ili plendis vorton post la vorto. 103.
- 106.

- Dum la dolora par' tiel recitas, 109.
la frunton klinis mi kaj kline tenis,
ĝis Majstro diris: »Kion vi meditas?«
- Kaj mi responde la parolon prenis: 112.
»Ve, al ĉi voj' dolora ilin kiom
da dolĉaj pensoj kaj deziroj trenis!«
- Nun, turne al ŝi, diris mi ĉi tion: 115.
»Francesca, ho, pri viaj dolorŝiroj
ĝislarme sentas mi melankolion.
- Sed, en la temp' de l' dolĉaj ĝemospiroj, 118.
ho diru, kiel logis vin Amoro
ekkoni duban vojon de l' deziroj?«
- Kaj ŝi: »Ne estas pli granda doloro, 121.
ol rememori pri feliĉ' en prema
mizero; scias ĝin via Doktoro.
- Sed se vi estas tiel scivolema 124.
pri l' amoĝermo, estos mi simila
al iu, jen parola, jen ekĝema.
- Ni, solaj, iun tagon legis pri la 127
kreskanta am' de Lancelot'. Suspektis
nenion ni en la duop' trankvila.
- Rigardon ni multfoje interplektis 130.
dum lego, kun vizaĝo paligita,
sed jen la punkto, kiu nin infektis:
- kiam ni legis pri l' ridet' ekscita 133.
de l' kisdezir', pri ĝia dolĉa vibro,
li, por eterne jam al mi ligita,
- buŝkisis min kun trem' en ĉiu fibro. 136.
Galeotto iĝis libro kaj aŭtoro,
ĉi-tage ni ne legis plu de l' libro.«
- Dum ŝi parolis, la kunul' kun ploro 139.
lamentis tiel, ke mi tute palis,
kaj sentis kvazaŭ morton ĉirkaŭ l' koro;
- kaj kvazaŭ morta korp', mi terenfalas. 142.

SESA KANTO

LA PLUMBE PEZA PLUVO

Dante vekigas el sia sveno jam en la tria rondo, verŝajne Virgilo lin transportis tien.

Tie kuŝas batate de malpura pluvo, kiuj estis malmoderaj en manĝo kaj drinko. Ilin mordadas Cerbero, la gardisto de l' submondo, pri kiu skribas ankaŭ Virgilo en sia epopeo.

Dante renkontas tie la unuan florencanon *Ciaccio* (laŭ unuj bankiero, laŭ aliaj *Ciaccio dell' Anguillara*, poeto), pri kies manĝegemo rakontas ankaŭ Boccaccio. Li demandas lin (ĉar la ombroj antaŭvidas) pri la futuro de Florenco. *Ciaccio* aŭguras la venkon de l' *partio sovaĝa* (Bio. 12.), sed ankaŭ la falon de l' Blankuloj (Bio. 13.) helpe de la papa potenco, kiu ĝis tiam »manovris ambaŭflanke«.

Kiuj estas tiuj du »veruloj« tion malfacile estus diri — diras Boccaccio.

Dante ankoraŭ demandas pri la grandaj viroj de sia urbo: *Farinata* (vd. Bio. 8. kaj Kanto X.), *Tegghiaio* (vd. Bio. 8. kaj Kanto XVI.), *Jacopo Rusticucci* (vd. Kanto XVI.) krome pri *Mosca de' Lamberti* (vd. Kanto XXVIII.) kaj *Arrigo Fifanti*, kiuj partoprenis en la murdo de *Buondelmonte* (Bio. 5.).

Ce la Lasta Juĝo ĉiuj ĉi animoj supreniros sur la teron, kaj revenos kun sia korpo.

La »Scienco« estas la Etiko de Aristoteles.



Viktimoj de l' karno kaj de l' viando.

POST reakir' de l' sensoj, kiujn svene	1.
fermis pri l' du parencoj la kompato,	
kies suferoj min konfuzis plene,	
nova turmento, nova turmentato	4.
ĉirkaŭas min laŭ ĉiu paŝ' atenta,	
laŭ ĉiu okulturno, ĉiu gvato.	
Jen, tria rondo, kie pluv' torenta,	7.
eterna, peza, malbenita, fata,	
falas egale, laŭ regul' identa.	
Frostinta akvo, neĝo, hajlo bata	10.
verŝiĝas tie tra l' aer' malhela,	
putrigas ĉion sur la ter' frapata.	
Cerbero, monstro stranga kaj kruela,	13.
trifaŭke bojas, kiel hund', senpaŭze,	
super dronintoj de la koto ŝvela.	
Kun grasa barb', okuloj ruĝaj, naŭze,	16.
kaj kun ungegaj manoj, vasta ventro,	
ĝi la animojn ŝiras tranĉe, taŭze.	
Hurligas ilin hunde pluvtorento,	19.
per unu flank' la duan ŝirmprotekte	
kovras, ruliĝas la mizera gento.	
Kiam Cerber', la granda verm', direkte	22.
al mi apertis buŝon kun rikano,	
ne havis membron mi por stari rekte.	
Sed mia Majstro, kun streĉita spano	25.
ekprenis teron, kaj ĝin ĵetis ŝute	
en la malsatajn faŭkojn el plenmano.	
Kiel la hund' malsata bojas brute,	28.
sed trankviliĝas per la manĝopeco,	
nur kun la ostoj luktas maĉe, glute,	
tiel, per faŭkoj el plej naŭza speco,	31.
Cerbero, kies blek' orel-ataka	
l' animojn sopirigas je surdeco.	
Ni marŝis sub la pluvo peze haka	34.
inter la ombroj; ofte trete tuŝis	
la pland' al homaspekta ŝajno vaka.	

- Amase ili sur la tero kuŝis. 37
 Sed unu, kiam iris mi pretere,
 ekvidis min, eksaltis, kaj elbuŝis:
- »Ho vi, iranta tiel trainfere, 40
 diru, ĉu vi min konas, aŭ konjektas?
 vi ĝermis, antaŭ ol mi ĉesis tere.«
- Kaj mi: »L' angoro, kiu vin enplektas, 43.
 vin ŝanĝis eble. Malgraŭ pen' rekona,
 ja tute nevidita vi aspektas.
- Kiu vi estas? Kia leĝ' ordona 46.
 kondamnas vin al tia puno pena,
 se ne plej peza, certe plej malbona?»
- Kaj li: »En via urbo, tiel plena 49.
 de la envi', ke fluas ĝi el sako,
 mi vivis iam, dum la viv' serena.
- Vi, samurbanoj, min nomadis Ciacco, 52.
 gorgemo damna ŝarĝis min ĉe l' kolo,
 tial vi vidas min sub pluv-atako.
- Mi trista ombro, estas ne en solo, 55.
 ĉiujn ĉi same trafas ĉi turmento
 pro l' sama kulp'.« Kaj ĉesis la parolo.
- Mi diris: »Ciacco, premas ĉi lamento 58.
 min tiel, ke ĝi larmin min ekscitas.
 Se povas vi, aŭguru pri la gento
- de l' urbo, kiun partiem' dissplitas. 61.
 Ĉu havas ĝi verulojn? Kaj kverelo
 kaj malkonkordo kial ĝin vizitas?»
- Li diris: »Longe daŭros la duelo, 64.
 ĝis la *parti' sovaĝa* venkos sange,
 kaj la alian punos per forpelo,
- Sed baldaŭ poste falos ĝi senrange. 67.
 Tri jaroj — kaj jam la alia ĉefos,
 dank' al kiu manovras ambaŭflanke.
- Longtempe ĝi la frunton altenlevos, 70.
 l' alian jugos per ŝarĝegoj ŝvitaj,
 tiel ke ĝi lamenti, honti devos.

- Veruloj estas du, ne aŭskultitaj. 73.
 Envio, fierego, avaremo:
 jen solaj tri fajreroj kor-incitaj!«
- La vortojn plendajn finis li kun ĝemo. 76.
 Mi petis: »Ho, instru plu per diroj,
 donacu vortojn plue pri ĉi temo:
- Farinata, Tegghiaio, noblaj viroj, 79.
 Arrigo, Mosca, Rusticucci, pene
 nur por la bon' strebantaj en aspiroj,
- kie nun? kio ilin gardas tene — 82.
 ekscii urĝas min deziro vigla —
 ĉielo, dolĉe? aŭ infer', venene?«
- »Ili estas inter animar' pli nigra, 85.
 premis diversa kulp' ilin sur fundon,
 vi vidos, se ĝisvenos vojo migra.
- Sed, se revidos vi la dolĉan mondon, 88.
 pri mi freŝigu la memoron tie.
 Plu ne atendu diron, nek respondon.«
- Okuloj liaj strabis jam ebrie; 91.
 iom rigardis, falis li kapkline
 inter kunulojn blindajn, letargie.
- Kaj diris mia Majstro: »Tiu ĉi ne 94.
 vekigos, ĝis anĝel' trumpeton blovos,
 kaj la Juĝist' rigora venos fine,
- kaj sian tombon ĉiuj ĉi retrovos, 97.
 revestos sin per karno kaj figuro,
 kaj etern-ĉhan juĝon aŭdi povos.«
- Tiel ni iris plu, tra l' miksmalpuro 100.
 de l' densa ombro kaj de l' pluv' glacia,
 iom traktante aĵojn de l' Futuro.
- Mi diris: »Majstro, ĉu turment' ilia 103.
 eĉ kreskos post la aŭdo de l' Sentenco,
 aŭ estos ĝi pli milda, aŭ samtia?«
- Respondis li: »Vin turnu al Scienco. 106.
 Instruas ĝi, ke plias en perfekto
 same la bon' kaj la dolorpotenco.

- Kyankam neniam ĉi damnita sekto
atingos ja ĝis la perfekto vera:
pli estos poste, ol nun, la efekto.«
Tiel rondiris ni sur voj' bordera,
dirante multon, kion kaŝu muto,
malsupren klinis sin la voj' infera,
jen estis granda malamiko, Pluto.

109.

112.

115.

SEPA KANTO
SENHARE KAJ PUGNOFERME

La kvaran rondon gardas Pluto, la antikva dio de l' riĉo. Li parolas nekompreneble, en diabla lingvo. Multe oni cerbumis pri la senco de liaj vortoj, la plej sprita (sed tre neverŝajna) solvo estas, ke li parolas france: »Pas paix, Satan, pas paix, Satan, à l' épée!« (For pacon, Satan', for pacon, Satan', al glavo!)

Garibaldi opiniis, ke la unuaj vortoj signifas: »Pap' è Satan, Pap' è Satan« (Papo estas Satano).

Sed estas tre dube, ĉu Dante entute volis doni ian sencon al ĉi tiuj vortoj.

La orgojla trupo, kies krimon arkangelo Mihaelo venĝis, estis la ribelintaj anĝeloj sub la gvido de Lucifero.

Ĉi tie du trupoj, avaruloj kaj malŝparuloj rulas grandajn pezojn unu kontraŭ la alia, ĉiu faras duoncirklan vojon, ĉe kies fino li kunpuŝiĝas kun la alia trupo, sin turnas, kaj ĉe la alia fino de l' duoncirklo ree kunpuŝiĝas. Ilia peno estas vana, same vana estas la trezorkolekto en la mondo. Dio, kiel li turnigas la ĉielojn per nevideblaj anĝeloj, same turnigas tien kaj tien ĉi la terajn bonaĵojn per Fortuno.

Ĉe la Lasta Juĝo unu trupo vekigis pugnoferme (signo de avareco), alia senhare (signo de malŝparo).

En la kvina rondo la koleruloj kaj melankoliuloj batalas kaj malgajas en la ŝlima lago Styx.

Sur la tero estas noktomezo post Sankta Vendredo (la astroj ĝis nun leviĝantaj komencas malleviĝi).

Vortklarigoj: *hamstri:* kolekti havaĵon kiel la hamstro;
uno: unu; *bobelo (r):* aerveziko; *fango (**):* marĉoalimo.

P*APE Satan, pape Satan aleppe!*« 1.
komencis diri Pluto raŭke, peze;
sed la Saĝul', scianta ĉion nepre,
por min konsoli, diris: »Ne necese 4
ektimi; al ni, kiel ajn grandpova,
descendon li ne baros malpermese.«
Kaj, rigardinte al la buŝ' plenblova, 7.
alkriis li: »Silentu, damna lupo!
konsumu vin mem per rabi' malnova.
Li ne senkaŭze venis al ĉi subo, 10.
jen vol' en Alto, kie glav' Mihela
venĝis la krimon de l' orgojla trupo.«
Kiel defalas velo vente ŝvela 13.
kiam la masto rompiĝinte krakas:
tuj falis al la ter' la best' kruela.
Tra l' kvara rond' ni iras jam; dehakas 16.
pli de l' dolora bord', kiu subtere
kulpojn de l' tuta univers' ensakas.
Ho, Dia Justo! Kiu aglomere 19.
kolektis tiom da do'or' kaj peno?
kaj kial mordas pek' tiel sufero?
Kiel la ond' per ond' en kontraŭveno 22.
ĉe la Karibdo rompas sin tumulte,
tiel ĉi gent' ringdancis sub malbeno.
Pli ol ajnlake ili estis multe, 25.
kaj de du flankoj hurladante aris
rulante grandajn pezojn bruste, ŝultre;
kaj kunpuŝiĝis ili, poste faris 28.
returnon, retroire kaj kriante:
»Kial vi hamstris? Kial vi malŝparis?«
Tiel, tra l' nigra rond', ili grandkvante 31.
de unu flank' al transa flank' sin ĵetis
kaj la hontkanton kantis plu konstante.
Kaj kiam vojo duoncirkla pretis, 34.
sin turnis ĉiu al kverel' alia.
Nun mi, dum ege mia kor' frapetis,

- demandis: »Majstro! diru, gento kia
ĝi estas? ĉu do estas pastroj nuraj
ĉi tonsuritoj ĉe maldekstro nia?« 37.
- Li diris: »Ĉiuj, strabaj kaj obskuraj
laŭ menso dum l' unua vivo-flu',
ne estis en elspezo bonmezuraj. 40.
- Sufiĉe bojas ja ilia bru'
pri tio ĉe l' du punktoj de la rondo,
kiuj dividas malajn kulpojn du. 43.
- Ĉi tiuj estis pastroj, kun la tondo
sur vert', kaj papoj, moŝtoj kardinalaj,
ege avaraj en la supra mondo.« 46.
- Kaj mi: »Ho Majstro, el ĉi ombroj galaj
ja rekonataj devus esti pluraj,
kiuj de tia peko estis falaj.« 49.
- Li diris: »Vanaj pensoj erar-kuraj!
Ili per viv' ignora, feĉa kerne,
nerekoneble igis sin malpuraj. 52.
- Al la du punktoj kuras nun eterne
kaj el la tomb' vekigos la duono
senhare, la duono pugnoferme. 55.
- La bela mond', pro misaj ten' kaj dono,
ekzilis ilin al ĉi kirlo bruta,
kiun plu pentri estas sen bezono. 58.
- Jen, filo, kia ĝemospir' minuta
estas la hav' donita de Fortuno,
kiun postkuras la homgento tuta! 61.
- Ĉar kiom estas oro sub la luno,
kaj estis jam: nun fari ja senfortas,
ke el ĉi lacaj ekripozunu uno.« 64.
- »Majstro — mi diris — pri Fortun' vi vortas? 67.
do kiu estas la Fortun' dirita,
ke l' terajn bonojn ŝi ungtene portas?«
- Kaj li al mi: »Ho, kreitar' malsprita! 70.
Kia senscio premas vin servute!
Aŭskultu pri l' sentenc' kun mens' medita:

- Li, kies saĝ' penetras ĉion tute, 73.
ĉielojn faris, ĉielestrojn nomis;
ke ĉiu part' al ĉiu part' lumŝute
brilu: egale lumojn Li disdonis. 76.
Same, por mondaj lumoj saĝo Lia
serviston, gvidan estron alordonis,
ke l' vantajn bonojn ŝi, laŭ temp' varia, 79.
ŝanĝu, trans pov' de l' hom-inteligento,
de trib' al trib', de gent' al gent' alia.
Leviĝas unu, falas dua gento, 82.
sekvante ŝian juĝon, kiu restas
kaŝita, kiel herbe la serpento.
Homscio kontraŭ ŝi senpova estas, 85.
ŝi juĝas, regas sian regnoparton,
kiel ceteraj dioj sian estras.
Neniam havas ŝiaj ŝanĝoj halton, 88.
kaj ŝin rapidi la Neceso urĝas,
se venas vico: ŝanĝi ies farton.
Jen, kiun multaj per insultoj skurĝas, 91.
de kiuj devus esti ŝi laŭdata,
malprave misan famon pri ŝi forĝas.
Sed tio estas de ŝi ne aŭdata, 94.
kun ĉefkreaĵoj gaje ŝi oficas,
la radon rulas: ĝoja kaj beata.
Descendos ni, pli grandaj veoj vicas. 97.
Ĉe l' ven' ascendis, nun, laŭ ĉielordo,
jam sinkas steloj, resti plu ne licas.«
Tra l' rond' ni tranĉis al la transa bordo, 100.
ĉe font' ŝprucanta kun bolad' murmura
en fos' farita de ĝi per elmordo.
La ond' estis pli nigra ol purpura, 103.
en akompan' de fluo plumbkolora
descendis ni sur voj' abrupte dura
Kaj marĉon faras la river' dolora 106.
nomatan Stikso, kiam ĝi alvenis
al sub la bord' grizmorna kaj horora.

- Kaj vidis mi, dum miro min katenis, 109.
popolon kotan en la kot' fluida,
nudulojn, kiujn furioz' venenis.
- Kaj ili, ne nur per la man' senbrida, 112.
sed batis sin piede, bruste, verte,
karnpecojn ŝiris per la dent' avida.
- La bona Majstro: »Filo, jen, mensperde, 115
animoj, kiujn venkis la kolero.
Vi povas ankaŭ tion kredi certe,
- ke multaj ĝemas sub la marĉniveło, 118.
ŝmacigas, kiel diras la okuloj,
la akvon, kie ringas kotbobelo.
- El ŝlimo sonas: »Estis ni tristuloj 121.
sub dolĉa lum', gajiga suna blanko,
kaj estis en ni pezaj fumnebuloj.
- Nun jam ni tristu en la nigra fango!« 124.
Ĉi psalmon ili gorĝgargare skandas,
ĉar plena dir' ne eblas al la lango.«
- Ni tiel plu la pezan koton plandas 127.
grandarke, inter marĉ' kaj seko randa,
gvatante tiujn, kiuj koton frandas.
- Ni venis fine al sub turo granda. 130.

OKA KANTO

DIABLA KONTRAŮSTARO

La du flametoj sur la turo signas la du alvenintajn spiritojn, la tria flamo, de fore, signas, ke oni trans la lago komprenis la signon kaj sendos barkon por la du spiritoj.

La kolera barkisto de l' Styx estas *Phlegias*, mitologia figuro: Apollo delogis lian filinon kaj generis kun ŝi Esku-lapon, dion de l' kuracarto; ribelinte pro tio li ekbruligis la preĝejon de Apollo en Delphos.

Pri Filippo Argenti de' Cavicciuli, kiu volas renversi la boaton, parolas Boccaccio en la Dekamerono; li estis tiel fierega, ke li hufumigis sian ĉevalon per arĝento: de tio oni lin nomis Argenti.

Trans la Styx estas la pordego de la urbo de l' submonda reĝo Dis (Plutono, Lucifero, Belzebubo). La pordogardaj diabloj (falintaj anĝeloj) ne volas enlasi Dante-n. Same ili kontraŭstaris ankaŭ al Kristo ĉe la supra pordego, sed tiam ĝiaj seruroj rompiĝis kaj nun ĝi staras neŝlosita. Virgilo fidis, ke ankaŭ nun venos ĉiela helpo.

MI diras plu, ke eĉ ne alveninte 1.
 sub la piedon de la alta turo,
 okulojn niajn fiksas ni turpinte
 sur du flametoj flagraj sur la muro; 4.
 de fore tria respondsignojn ĵetis
 apenaŭ rimarkeblajn por okulo.
 Fonton de mia tuta sci' mi petis: 7.
 »Kion ĉi flamoj en dir' kaj rediro
 parolas do, kaj kiu ilin metis?«
 Kaj li: »Tra l' kota ond' jam en aliro 10.
 vi vidus, kiun ili alatendas,
 se l' vidon ne dronigus marĉ-elspiro.«
 Ne pli rapide kordo sagon sendas 13.
 tra la aer' por flugo malproksima,
 ol, vidis mi, ke kontraŭvene fendas
 barko la ondojn de la akvo ŝlima. 16.
 Sola ŝipan' en ĝi remilon tiris
 kriante: »Jen vi do, animo krima!«
 »Flegias', Flegias' — la Majstro diris — 19.
 vi nun kriegas tute van-klopode,
 vi havas nin nur ĝis ni transen iris.«
 Kiel aŭskultas iu, jam trompote, 22.
 mensogon, sed rimarkas kun indigno:
 tiel nun Flegias', koler-eksplode.
 Sed, jam enbarkiginte, per mansigno 25.
 la Majstro postvenigis min invite
 (mi sola ŝajnis ŝarĝo por la ligno)
 kaj tuj, kun li kaj mi, la akvon glite 28.
 ekfendis la antikva pruo bore,
 pli ol kutime en la ond' mergite.
 Dum kuras ni tra l' morta flu', ne fore 31.
 de l' pruo ombro kota krie gestas:
 »He, kiu vi, veninta antaŭhore?«
 Kaj mi: »Ja venis mi, sed mi ne restas! 34.
 sed kiu vi, de koto tiel plena?«
 »Vi vidas — diris li — plorant' mi estas.«


- »Restu kun via plor' kaj pen' ĉagrena 37.
 por vi, anim' damnita! — mi ekvoĉis —
 vin konas mi eĉ sub koto abomena!«
- Nun ambaŭ manojn al la bark' li kroĉis, 40.
 sed mia Duk' lertmane lin reĵetis,
 »For, al aliaj hundoj!« — li riproĉis.
- Kaj brakumante min, li kison metis 43.
 al mia frunt': »Animo nobl-indigna,
 benita estas, kiu vin gravedis!
- Li estis hom' kun fiereg' maldigna, 46.
 nenia bon' memoron lian kronis,
 jen furiozas lia ombro nigra!
- Ho, kiom grandaj reĝoj supre tronis, 49.
 kiuj nun porke en ĉi kot' sin ŝmiras,
 herede nur terurajn damnojn donis!«
- »Ho Duk' — mi diris — ege mi deziras 52.
 lin vidi tute droni en ĉi kaĉo
 jam antaŭ ol ni trans la lagon iras.«
- Kaj li: »Jam antaŭ ol dum nia naĝo 55.
 vidiĝos bord', vi satos en kontento;
 ja indas plenumiĝi tia plaĉo.«
- Kaj vere, baldaŭ, de la kota gento 58.
 la honton al li vidis mi prezenti,
 eĉ nun mi laŭdas Dion kun danksento.
- Ekbruis: »Hura! al Filip' Argenti!« 61.
 kaj la bolema florencan' baraktis,
 komencis sin mem karno-ŝire denti.
- Ni pasis plu; sufiĉe mi lin traktis! 64.
 Nun dolorvoĉ' min frapis je l' aŭdilo,
 kaj mi l' obskuron streĉokule ŝaktis.
- La bona Majstro: »Jam emergas, filo, 67.
 la urbo, kiun diras *Dis* la fam',
 kun pezaj burĝoj, svarma ombro-milo.«
- Mi diris: »Majstro, jes, mi vidas jam 70.
 ĝiajn moskeojn en la val' enferma,
 kaj ĝi ruĝegas kvazaŭ ĵus el flam'

- veninte. »Li respondis: »Fajr' eterna,
 en ĝi brulanta farbas ĝin purpura,
 kiel vi vidos tra l' infer' interna.« 73.
- Ni ŝipis jam en foso, ĉirkaŭkura 76.
 je l' senkonsola tero de suspiro
 (la alta bordo ŝajnis fero dura)
- kaj, en ĉi foso, ne sen granda giro, 79.
 ni venis lokon, kie kriis forte
 la boatist': »Elpaŝu! Jen eniro!«
- Pli ol milnombre vidis mi ĉe-porde 82.
 ĉiel-falintojn, kun kolera krio:
 — »Kiu li estas, kiu antaŭmorte
 iradas tra l' mortgenta imperio?« 85.
- Sed nun mansignis mia Majstro saĝa,
 ke li parolus en sekret' pri io.
- Nun iom cedis la koler' sovaĝa: 88.
 »Do venu sola! Retro la gvidato,
 kiu alveni estis trokuraĝa!
- Ja li reiru tra l' freneza strato, 91.
 provu, ĉu eble! Restu vi, anim',
 kiu lin gvidis tra ĉi nigra ŝtato.«
- Leganto, pensu, kiel mia spin' 94.
 ekfrostis post la malbenitaj vortoj!
 Reveni ĉiu esper' forlasis min.
- Mi petis: »Kara Majstro, kies fortoj 97.
 pli ol sepfoje savis en sekuro
 kaj tiris min el plej danĝeraj sortoj,
 ne lasu min venkita de teruro, 100.
 kaj se pluiri ĉiuj ebloj ĉesis,
 do niajn spurojn trovu ni en kuro.«
- Sed diris, kiu gvidi min komplezis: 103.
 »Ne timu! Nin ja en la pas' libera
 neniŭ baros! Tia pov' permesis!
- Atendu min. Per nutro bonespera 106.
 firmigu la animon, se ĝi lacas,
 mi ne forlasos vin en land' infera.«

La dolĉa patro iras jam kaj lasas	109.
min sola, kaj mi en la Eble dronis,	
kaj Jes kaj Ne en mia kap' malpacas.	
Ne eblis aŭdi, kiaj vortoj sonis,	112.
sed li ne longe restis tie stare,	
ĉar kure sin post pordo bastionis	
la malamikoj, ĝin fermante bare	115.
ĉe l' brust' de l' Majstro, kaj li reste reas,	
al mi revenas, paŝadante rare.	
L' okuloj tere, ĉiu gaj' pereas	118.
de l' brovoj, kaj li ĝemas deprimate:	
»Ĉi dolordomon kiu al mi neas?«	
Kaj poste: »Se koleras mi ekscite,	121.
ne dubu, ke en lukt' mi venki povas,	
kiel ajn ili sin defendu spite;	
ĉi rezistad' obstina ja ne novas,	124.
okazis jam ĉe malpli kaŝa pordo,	
kiu de tiam sen serur' sin trovas.	
Sur ĝi vi vidis signon de la morto,	127.
sed jam de ĝi descendas kruton certe,	
paŝante tra la rondoj sen eskorto,	
kiu trabatos vojon pord-aperte.«	130.



Alta Helpo.



NAŨA KANTO

ANGELA HELPO

La Damo, kiu sentencis la permeson, estas Beatrice.

Virgilo, la loĝanto de la Limbo, jam estis foje en la urbo de Dis. Erikto, la tesalia sorĉistino sendis lin en la naŭan rondon, kie la perfiduloj estas punataj (Kanto XXXIV.) por ke li suprenportu de tie spiriton, kiu al ŝi helpas en aŭgurado al Sextus Pompeius pri la ŝancoj de la batalo ĉe Pharsalia. Ĉion ĉi rakontas la romana poeto Lucanus en sia *Pharsalia* (Kanto VI. v. 508 kaj sekv.)

La Furioj aŭ Erinoj (Erynnis) estas la servistinoj de Proserpina, edzino de l' submonda reĝo. Meduza, la Gorgo, ĉiun ŝtonigis per teruro, kiu ŝin alrigardis.

Theseus, atena reĝo foje descendis en la submondon, por reporti de tie Proserpinan, kiun rabis Dis perforte. Cerberos lin kontraŭstaris; Cerberon punis pro tio Heraklo, litrenis ĝin tra la infero ĉe ĝia kolĉeno, kaj li liberigis Theseus (Tezeon).

Ce Arli (Arles) en Provenco estis granda batalo inter la saracenoj kaj Karlo la Granda, pro tio la multaj tomboj. Ce Pola estis multaj antikvaj tomboj. Kvarnero (Quarnaro) estas golfo inter Italio kaj Kroatio.

Rodano: Rhône.

En la sesa rondo kuŝas en flamaj tomboj la herezuloj, kaj tiuj, kiuj ne kredis je la senmorteco de l' animo.

Vortklarigoj: *Acerba* (*) adstringanta la mukmembran-ojn; *as*: estas; *rekorpi* (v. 24.): reenkorpigi; *kreo* (v. 52.): kreaĵo.

K OLOR' de l' timo, min pentrinta pala,	1.
kiam la Majstro venis, senrezulta,	
lin tuj reigis al mieno mala.	
Li streĉatentis, kiel hom' aŭskulta,	4.
ĉar ne penetris lia pov' rigarda	
tra l' aernigro kaj nebulo multa.	
»Ni tamen venkos en ĉi lukto arda,	7.
se ne... — li diris — tia Dam' sentencis	
permeson...ho, la Helpo ŝajnas tarda!«	
Rimarkis mi, ke, kion li komencis,	10.
li kovris per la vort', kiu postvenis,	
ke de l' komenc' la fino diferencis,	
pro l' vortoj tamen timo min katenis,	13.
ĉar serĉis mi en fraz' duonparola	
malbonon plian eĉ ol ĝi entenis.	
»Ĉu al ĉi fund' de l' konko senkonsola	16.
jam iu venis de l' unua rando,	
kie la esper-mank' doloras sola?«	
mi diris. Li respondis je l' demando:	19.
»Maloŭte pasas iu ja el ni	
tra l' voj', kiun nun iras mia plando.	
Vere, ke mi jam estis tie ĉi,	22.
per sorĉ' devigis min Erikto kruda,	
kiu rekorpis ombrojn per magi'.	
La karn' ne longe estis de mi nuda,	25.
kiam ŝi tien sendis min transmure,	
preni spîriton el la rond' de Judas.	
Ĉi loko plej profunde, plej obskure,	28.
plej fore de l' ekstera ĉiel' sin trovas;	
vojon mi konas, fartu do sekure.	
Ĉi marĉ', kiu la egan stinkon blovas,	31.
ringumas ĉirkaŭ l' urbo de teruro,	
kien ni iri sen batal' ne povas.«	
Li diris pli, sed mankas memorspuro,	34.
ĉar la okulojn nun altiris tute	
la arda pinto de la alta turo.	

- Mi vidis: tri Furioj, tri sangŝute 37.
 farbitaj infermonstroj staris tie
 virinstature kaj virinkondute.
- Plej verdaj hidroĵoj ilin zonis fie; 40.
 anstataŭ haroj, ondis en volvklinoj
 serpentoj, kornvipuroj surtempie.
- Sciante bone pri ĉi servistinoj 43.
 de la Reĝino de l' Ploreg' Senĉesa,
 »Jen — diris li — la krudaj tri Erinoj.
- Maldekstre jen Megera la freneza, 46.
 ĉe l' dekstra flank' Alekto veas plende,
 Tizifone — li finis — as la meza.«
- Kaj ili pugnis, ungis sin brustfende, 49.
 kriante tiel, ke kun tim' kaj veo
 mi al la Duk' min premis, helpatende.
- »Meduza, venu! Iĝu ŝton' ĉi kreo! 52.
 — kriante ili gapis min rikane —
 ve, ni ne venĝis sturmon de Tezeo!«
- »Vin turnu, kovru la okulojn mane, 55.
 ĉar se la Gorgon foje vi ekvidis,
 tre dube, ĉu vi vin returnos sane!«
- diris la Majstro kaj li mem rapidis 58.
 okulojn miajn kovri per protektaj
 manoj, ĉar je la miaj li ne fidis.
- Ho vi, kun sanaj povoj intelektaj, 61.
 medite miru pri l' doktrin' intima
 sub la vual' de versoj strangefektaj.
- Kaj venis nun super la akvo ŝlima 64.
 bruego tiel plena de teruro,
 ke ambaŭ bordojn skuis tremo tima,
- simile, kiel, en impeta kuro 67.
 tra l' malamika ardo, la ventpovo
 sen brid' la boskon batas kun murmuro,
- la branĉojn ŝiras, portas for per blovo, 70.
 antaŭ ĝi polv', ĝi iras, fierulo,
 rifuĝon trudas al paŝtist' kaj bovo.

- La Duk' nun, vid-redone: »Per okulo 73.
 celu l' antikvan ŝaŭmon kun atento,
 ĉe l' plej acerba denso de l' nebulo.«
- Kaj, kiel ranoj antaŭ la serpento 76.
 en akvon ĵetas sin per saltoj egaj,
 ĝis funde svarmas tuta rantaĉmento:
- mi vidis, pli ol mil animoj pekaj 79.
 rompите fuĝis Unun, kiu Stiksan
 vadejon vadis per piedoj sekaj.
- De l' vangoj, per maldekstro, nebulmiks 82.
 densan aeron pelis ĉi spirito
 kaj ŝajnis havi nur ĉi zorgon fiksan.
- Mi bone vidis tuj: ĉielsendito; 85.
 al Majstro turnis min, li signofaris:
 mi restu, klinu min laŭ respekt-rito.
- Kian indignon lia mien' deklaris! 88.
 li, per verget', irinte al la pordo,
 apertis ĝin; neniun kontraŭstaris.
- »Ĉielĵetitoj, malŝatata hordo! 91.
 — sur sojloj' terura sonis la parolo —
 de kie ĉi orgojloj' en via kor' do?
- Kial vi kontraŭstaras al la Volo, 94.
 kies celado regas sen ŝancelo
 kaj batas vin nur kun pli da malmolo.
- Ĉu eblas spiti al la Fata celo? 97.
 via Cerbero tion bone konas,
 la spurojn portas sur la kola felo.«
- Kaj — iras li tra l' pena voj', ne donas 100.
 parolon al ni; ŝajnis li dum paso
 hom', kiu en aliaj zorgoj dronas,
- ol, kiu lin ĉirkaŭas, la amaso. 103.
 Kaj la piedojn ni tra l' pordo metis,
 sekuraj, post kompren' de l' sankta frazo.
- Kaj sen batal' ĉi teron ni ektretis, 106.
 kaj mi, scivole: kion ĉi fortferma
 murego baras, tuj rigardon ĵetis

- post la enpaŝo tra l' pejzaĝ' interna; 109.
sterniĝis granda kamp' je ĉiu mano,
plena de veo kaj turment' konsterna.
- Ce Arli, kie stagnas la Rodano, 112.
ĉe Pola, kie limas la Kvarnero
l' italan teron kun subbraka bano,
- de l' multaj tomboj tute buntas tero; 115.
kaj en ĉi loko estis ne alie,
krom ke pli multe multis la sufero.
- Car el ĉi tomboj flamoj flagris ĉie, 118.
per kiuj ili iĝis tiel brulaj,
ke eĉ la fer' ne povas ardi plie.
- Apertaj estis la fermŝtonoj suraj, 121.
interne krudaj krioj de lamento
montris pri lezoj kaj mizeroj duraj.
- Demandis mi: »Ho Majstro, kia gento 124.
entombigita en ĉi kestoj flamaj
tranĉas per tia ĝemo de turmento?«
- Kaj li: »Jen estas herezuloj famaj, 127.
kaj sekvantar' ilia, ĉiu sekto,
pli ol vi kredus; en la tomboj samaj
- similaj kun similaj en kolekto; 130.
kaj pli, aŭ malpli la karcer' ardadas.«
Kaj nun al dekstra mano laŭ direkto,
sub alta mur' ni tra l' turmentoj vadas, 113.

DEKA KANTO

FARINATA

En la valo de Josafato estos la Lasta Juĝo (vd. Kanto VI.).

Pri *Farinata* vd. Bio. 8.

Pri la dufoja ekzilo de l' gelfoj, al kiuj apartenis la familio de Dante, vd. Bio. 6. kaj 8.

Pri *Guido Cavalcanti* kaj lia patro *Cavalcante Cavalcanti* vd. Bio. 20. Guido-n Dante mem nomas sia »plej-amiko« (amicissimo). Kial Guido malŝatis Virgilon, tio ne estas certe direbla: eble ĉar li, kiel filozofo, malŝatis la poezion, eble, ĉar li, kiel gelfo, malŝatis en Virgilo la gloriganton de la Mondimperio. Laŭ kelkaj komentoj la versoj 62—63 estas interpreteblaj jene:

tiun, al kiu eble transgehene

li gvidos min, malŝatis via Guido...

do Guido malŝatis ne Virgilon, sed tiun, al kiu li gvidos: Beatrice, simbolon de l' teologio (Guido Cavalcanti ne kredis je la senmorteco de l' animo).

Pri la ekzilo de la familio de Dante vd. Bio. 13.

La Damo, kiu regas la sferon de l' Infero, estas la luno, simbolo de Proserpina, reĝino de l' submondo. La senco de la versoj 79—80 estas: sed ne pasos plene 50 monatoj...

La *pordo de l' Futuro* fermiĝos ĉe la Lasta Juĝo.

Pri Frederiko II. vd. Bio. 6.

La Kardinalo estis Ottaviano degli Ubaldini, senkreda gibelina pastro en la kortego de Frederiko.

Tiu, kies okuloj belaj ĉion vidas, estas Beatrice.

- P**OSTE, tra l' voj' malvasta postrempare, 1.
 laŭ mur' de l' urbo, tra l' doloroj kriaĵ,
 mi kaj la Majstro iris plue, pare.
- »Ho, pleja Pov', gvidanta tra l' malpiaj 4.
 rondoj — mi petis — diru, se vi volas,
 donu plenumon al deziroj miaj:
- Ĉu l' gento, kiu l' tombojn plenpopolas, 7.
 videblos? Jen, senfermaj la granitaj
 tombkovroj kaj nenia gard' patrolas.«
- Kaj li: Ja estos ĉiuj ĉi ŝlositaj, 10.
 kiam el Josafat' ili revenas
 kun siaj korpoj, supre nun lasitaj.
- Tiu tombaro Epikuron tenas, 13.
 kaj lian adeptaron, kiu kredis,
 ke la anim' kun korp' en morton svenas.
- Ĉiuj demandoj, kiujn ĵus vi metis, 16.
 tie respondon trovos post momento,
 eĉ la dezir', kiun vi prisekretis.«
- »Ho Majstro, al vi ne kaŝiĝas sento 19.
 en mia kor', sed volis mi vortŝpari
 laŭ via, ne nur nuna, rekomendo.«
- »Toskan', povanta vojon vive fari 22.
 tra l' fajra urb' kun tiel dec-konvena
 parolo, volu iom reste stari.
- Via parolo montras vin devena 25.
 el tiu kara, nobla patrolando,
 al kiu eble estis mi tre ĝena.«
- Subite sonis ĉi parol' ĉe rando 28.
 de tombo, kaj mi, time, iom pli
 min proksimigis nun al la Gvidanto.
- Sed li: »Turniĝu! Kion faras vi? 31.
 Kiu parolis, estas Farinata;
 ĝiszone el la tomb' elstaras li.«
- Mi fiksrigardis lin. Li kun levata 34.
 brusto kaj frunt' emergis, kvazaŭ mokis
 pri la infer' kun granda spit' malŝata.

- Nun rapidmane apud lin min lokis 37.
 la Majstro, inter tomboj traŝovante,
 kaj »Sparu pri la vortoj!« — li ekvokis.
- Kaj tiu min, dum staris mi tomb-rande, 40.
 rigardis, poste, kvazaŭ kun defio:
 »Prauĵoj viaj?« — kriis li demande.
- Pri ĉio dezirata nun laŭ scio 43.
 respondis mi, nenion mi vualis;
 la brovojn iom levis li post tio:
- »Kun mi, kun avoj, ili ja batalis, 46.
 kaj kun partio mia, krud-malame.
 Dufoje en ekzilon ili falis.«
- »Ekzilaj, ili ja revenis tamen — 49.
 respondis mi — je l' unu foj' kaj dua;
 viaj ĉi arton ne ellernis same.«
- Nun, el senferma buŝ' de tombo plua 52.
 apud li ombro ĝis menton' ascendis.
 Mi kredas, li nur kaŭris, surgenua.
- Rigardis post min, kvazaŭ li pretendis 55.
 ekvidi iun, kiu venis kune,
 sed, ĉar vaniĝis ĉi sopir', li plendis:
- »Ho, se l' karceron blindan vi imune 58.
 trairas per la alto de l' spirito,
 kie la fil'? Kial ne kun vi nune?«
- Kaj mi: »Ne mem mi venis. Jen la Gvido. 61.
 Kaj lin, kiu min gvidos transgehene,
 eble malŝatis via filo, Guido.«
- El lia puno kaj parol', divene, 64.
 mi havis tuj pri lia nomo scion,
 jen, kial mi respondis tiel plene.
- Subite kriis li sinstreĉe: »Kion? 67.
 Malŝatis — diris vi? Ne vivas plu?
 Ne ĝuas li la dolĉan sunradion?«
- Kaj, rimarkinte iom da malfru', 70.
 kiun mi faris en la reparolo,
 li dronis, ne plu venis el la tru'.

- Sed tiu grandanima ombr' en solo 73.
plu restis kun mien' senŝanĝe spita,
sen mov' de l' koksoj kaj sen klin' de l' kolo.
- »Se — li daŭrigis pri la ĵus dirita — 76.
malbone lernis tiun arton ili,
ĝi pli turmentas ol ĉi fajro lita.
- Sed ne revenos kvindekfoje brili 79.
vizaĝ' de l' Dam' reganta nian sferon,
kaj vidos vi ĉi arton malfacili.
- Sed, se revidu vi la dolĉan teron, 82.
parolu, kial montras kontraŭ l' miaj
en ĉiuj leĝoj la popol' koleron?»
- »Pro l' granda lukto, buĉoj plej rabiaj, 85.
de kiuj ruĝe la Arbio fluis,
sonas en nia templo preĝoj tiaj.«
- Li eksuspiris kaj la kapon skuis: 88.
»Ne sola estis tie mi kaj, certe,
kuniri min ne eta kaŭz' influis.
- Sed sola ja, dum ĉiuj senaverte 91.
por la detruo de Florenco pretis,
mi pledis tiam por la urb' aperte.«
- »Se via sem' ripozu — mi lin petis — 94.
solvu la dubon, kiu nun vuale
sur mian intelekton sin surmetis.
- Vi scias ĉion, se mi aŭdis klare, 97.
kion kunportos tempo la postnuna,
ĉu pri l' nuntempo do vi statas male?»
- Kaj li: »Ni vidas, kiel hom' maljuna, 100.
nur aĵojn malproksimajn per okulo,
Jen, kiom lasas al ni l' Estro puna.
- Nun scias vi, ke mortos ĉiu spuro 103.
de nia sci-kapablo ĉe l' momento,
kiam fermiĝos pordo de l' Futuro.«
- Tiam mi diris kun subita pento: 106.
»Al ĉi falinto diru do konsole,
ke l' fil' sin trovas inter viva gento.

- Kaj se mi ĵus restadis senparole, 109.
tio okazis nur, ĉar pri la dubo
mi pensis, kiun solvis vi bonvole.«
- La Majstro vokis jam al plua ŝtupo, 112.
do urĝis mi la ombron, diri plie,
kiuj restadas kun li en ĉi grupo.
- Kaj li: »Ni kuŝas pli ol mil ĉi tie, 115.
kun Dua Frederik', la Kardinalo,
kaj pluraj, kiuj restu senmencie.«
- Li dronis. Mi rapidis laŭ signalo 118.
de la poet' antikva, memorante
pri l' dir' ŝajnanta vortoj de Fatalo.
- Ekiris li, kaj diris plu irante: 121.
»Kion vi pensas, kial vi ekrevis?«
Kaj mi respondis al li laŭdemande.
- »Konservu, kion vi nun aŭdi devis 124.
por vi malbonan — diris mia Saĝo —
sed ja atendu — kaj li fingro-levis —
- ĝis vi, ĉe l' dolĉa brilo de l' Vizago, 127.
kies okuloj belaj ĉion vidas,
scios pri via tuta viv-vojaĝo.«
- Nun la piedojn li maldekstren gvidas, 130.
ni iras for de l' mur', al parto meza,
sur voj', kiu al val' malsuprenglitas
- sentebla jam per putroodoro peza. 133.

DEKUNUA KANTO

INSTRUO PRI L' INFERO

Photinus (Fotino), diakono en Thessaloniki, sekvis la herezon de Acatius, laŭ kiu Kristo havis nur homan naturon. Dante (erare) opiniis, ke li konvertis ankaŭ papon *Anasthasius II.* al ĉi tiu herezo.

La sepa rondo estas la loko de l' perfortuloj: ĝi dividiĝas en tri subrondojn. En la unua damniĝas la sangverŝintoj kaj rabistoj (kulpaj kontraŭ homfratoj), en la dua la sinmortigintoj kaj malutilantoj al la propraj bonoj (kulpaj kontraŭ si mem) kaj en la tria la blasfemintoj, kontraŭnaturaj voluptemuloj kaj uzuristoj (kulpaj kontraŭ Dio). La blasfemantoj ofendas Dion senpere, la sodomuloj ofendas la Naturon, filinon de Dio, kaj la uzuristoj ofendas la artojn kaj metiojn, filinojn de l' Naturo, do nepojn de Dio, ĉar sian porvivon ili prenas nek el la Naturo, nek el la artoj kaj metioj, sed el alia, nenatura fonto; kvankam la Biblio (en la Genezo, unua libro de Mozeo) tion ordonas.

Caorsa (Cahors) estis konata nesto de uzuristoj, la nomo *cahorsano* signifis uzuriston. La kulpo de Sodomo estas konata.

Ĉe la pruvoj la poeto aludas la Etikon de Aristoteles.

Supre, sur la tero estas tagiĝo: la Ĉiela Caro, la Granda Urso troviĝas nordokcidente kaj la Fiŝoj kuŝas sur la horizonto.

Vortklarigoj: *rimorso* (b): konscienciproĉo; *simonio*: vendado de ekleziaj oficoj; *simuli* (gr): ŝajnigi.

La rondoj de l' Infero

Indiferentuloj ĉe la pordego.

- I. rondo: nebaptitaj senpekuloj (Limbo).
 II. rondo: en amo
 III. rondo: en manĝo kaj drinko
 IV. rondo: en mono
 V. rondo: en emocio
- } malmoderaj.
- (Pli mildaj pekoj: ekster la urbo de Dis.)

Urbo de Dis.


- VI. rondo: herezuloj, senkreduloj.
 VII. rondo: perfortuloj, kulpantaj:
- | | |
|---------------------|-----------------------------|
| kontraŭ proksimuloj | je persono: tiranoj; |
| (1. ringo) | je havo: rabistoj; |
| kontraŭ si mem | je persono: sinmortigintoj; |
| (2. ringo) | je havo: disipuloj; |
| | je persono: blasfemantoj; |
| kontraŭ Dio | kontraŭ la Naturo: |
| (3. ringo) | sodomuloj; |
| | je havo: kontraŭ la metioj |
| | kaj artoj: uzuristoj. |

VIII. rondo: trompisto.

IX. rondo: perfiduloj (kiuj trompas fidantojn). Dis (Lucifero). Terocentro.

La rondoj almalsupre pli kaj pli malvastiĝas.

Vertikala profilo de l' Infero



La romaj ciferoj montras la rondojn.

a: Limbo; *b*: Aherono; *c*: Stikso; *d*: la muroj de Dis; *e*: la malpli granda Fendo (Kanto XII); *f*: Flegetono (Kanto XII); *g*: la sanganta Bosko (Kanto XIII); *h*: la arda sablo (Kantoj XIV—XVII); *i*: la granda Fendo (Kanto XVII); *j*: la misbursoj (Kantoj XVIII—XXX); *k*: la Puto (Kanto XXXI).

INSTRUO PRI L' INFERO

ĈE l' rand' de alta bordo, kiun faris	1.
rompaĵoj grandaj de rokar' en zono,	
super amas' pli monstra jam ni staris,	
kaj, de l' terura fiodor-ciklono,	4.
kiu el la profund' abisma venis,	
ni ŝirmis nin malantaŭ kovroŝtono,	
de granda tomb', kiu ĉi skribon tenis:	7.
»Mi gardas en mi papon Anastazo,	
kiun Fotin' al voĵ' erara trenis.«	
»Malrapidiĝi devas nia paso,	10.
ke kutimiĝu al fetor' la senso,	
ĝis poste eĉ ne sentos ĝin la nazo.«	
Tiel la Majstro. Kaj mi: »Pri kompenso	13.
do zorgu, ke ne pasu sen utilo	
la temp'.« Kaj li: »Jen ĝuste mia penso!«	
»Inter ĉi rokoj, ŝtup-al-ŝtupe, filo,	16.
— li diris poste plu — tri rondoj kavas,	
similaj, kiajn tuŝis ni dum iro.	
Spiritojn damnajn ĉiu plene havas,	19.
kaj ke sufiĉu al vi vid' por scio,	
aŭskultu, kio, kial ilin trafas.	
Ĉiu malic', kiun malamas Dio,	22.
celas ofendon, kiu nocas plure:	
aŭ per perforto, aŭ per trompmalpio.	
Sed ĉar la tromp' al homo propras nure,	25.
ĝi Dion pli malplaĉas, do Li puŝas	
trompistojn pli malsupren, pli torture.	
En rond' unua perfortuloj kuŝas,	28.
kaj eblas ja perfort' al tri personoj,	
do en ĉi rondo tri subringoj buŝas.	
Eblas al Di', al si, kaj al frathomoj	31.
perfort' en ili mem, en hav' ilia,	
kiel eksplikos klare ĉi lecionoj.	
Per murd', vundigo, per sangverŝo ĉia	34.
suferas proksimul'; kaj lia havo	
per krim' uzurpa, raba, incendia;	

- do hommortig', ĉiu misuz' de glavo, 37.
 kaj ŝtel' kaj rab' puniĝas per turmento
 en ring' unua, en aparta kavo.
- Kaj eblas peki per la violento 40.
 al propra bono; en la ringo dua
 tiu troviĝas do kun vana pento,
- kiu forĵetis vivon, vivenua, 43.
 fordistris, degeligis havon, monon,
 plendis, devunte esti vivo-ĝua.
- Eblas perforti mem la Di-personon, 46.
 neante, blasfemante Lin ribele,
 defiante la Naturon, Lian bonon.
- En ring' pli eta estas do sigele 49.
 stampitaj kaj Sodomo kaj Caorsa,
 kaj kiuj kriis kontraŭ Di' kverele.
- La tromp', ĉi tiu pek' ĉiam rimorsa, 52.
 uzeblas kontraŭ hom', kiu nin fidas,
 aŭ kies fido al ni estas torsa.
- Ĉi lasta tromp' mortige nur dividas 55.
 amĉenon, kiun faris la Naturo,
 kaj tial en la dua rondo sidas
- hipokritec', magio, amsimulo, 58.
 falsado, simonio, fraŭdo ŝtata,
 trompŝtelo kaj simila krim-makulo.
- Per tromp' antaŭa estas forgesata 61.
 la amo, kiun, krom natura sento,
 kreis la speciala lig' privata,
- do en pli strikta rondo, ĉe la centro 64.
 de l' Universo, kie Dis rezidas,
 perfidon punas eterna turmento.«
- Nun mi: Ho Duk', vi min klarege gvidas 67.
 per ĉi distingoj kaj klarig' eksplika
 pri ĉi funel' kaj kiuj en ĝi sidas,
- sed diru: tiuj en la marĉo dika, 70.
 kaj kiujn portas vent', aŭ pluvo batas,
 kiuj renkontas sin kun lango pika:

- kial ne en la ruĝa urb' tenatas 73.
do ili, se al ili Di' koleras;
se ne, do kial ili tiel statas?«
- Li diris: »Kial via cerb' sin pelas 76.
de l' ir' kutima al ĉi kapriolo?
ĉu l' menso ĉiam aliloken celas?
- Ĉu vi ne rememoras pri l' parolo, 79.
kiu difinas en Etiko via
la tri inklinojn kontraŭ Dia volo:
- malmoderec', malico kaj bestia 82.
brutec' ke Dion malmoder' ofendas
malplie, do ĝin sekvas pun' malplia?
- Se ĉi sentencon bone vi atentas, 85.
kaj rememoras: kiuj do ekstere
pentadas? tio tuj vin orientas,
- kial ne estas tiu greg' intere 88.
de ĉi misuloj, kial tiun trupon
martelas Dia venĝ' malpli kolere?«
- »Min vi, ho sun', venkanta ĉiun nubon, 91.
satigas tiel, ke aŭdante solvi,
pli ol la scion ĝuas mi la dubon;
- sed ĉu reirus iom en parol' vi? 94.
— mi diris. — Kial Dian Bonon ĝenas
uzur'? ĉi nodon volu nur disvolvi.«
- »Filozofi', por hom', kiu komprenas, 97.
— li diris — notas ja en pluraj partoj,
ke la Naturo sian kuron prenas
- el Dia saĝo kaj el Diaj artoj, 100.
kaj se Fizikon vian studos vi,
vi trovos post ne multaj paĝokartoj,
- ke l' Art' Naturon sekvas, laŭ la sci', 103.
kiel disĉiplo majstron, do, laŭ tio,
la Arto estas kvazaŭ nep' de Di'.
- Kaj — pensu pri l' komenco de l' Biblio — 106.
la homo deve el ĉi du havigas
porvivaĵon por si mem, por familio;

- sed uzuriston ne ĉi voj' instigas, 109.
Naturan kaj Disĉiplon li malŝatas,
ĉar li esperon al alio ligas.
Sed sekvu min, pluiri deziratas; 112.
la Fiŝoj vibras jam surhorizonte,
nordokcidente jam la Ĉaro statas,
la bordo fore klinas sin demonte.« 115.

DEKDUA KANTO

LA SANGRIVERO

La sepan rondon (tiun de l' perfortuloj) gardas la »honto de Kreto«, la Minotaŭro, simbolo de l' bruteco kaj de l' besta perforto. Laŭ la mito, la edzino de l' Kreta reĝo Minos perverse enamigis al bela taŭro (virbovo), farigis bovinfiguron kaj kaŝigis en ĝi por gajni la amon de l' taŭro. La frukto de ĉi tiu amo estis Minotaŭro: korpe homo, kape taŭro. Minos kaŝis la monstron en la Labirinto kaj nutris ĝin per virgulinoj, kiujn tributis al Kreto inter aliaj ankaŭ Ateno. Theseus, atena reĝo, ricevis de Ariadne, filino de Minos, fadenon, per kiu li povis orientiĝi en la Labirinto kaj tiel li mortigis la monstron.

Kiam Kristo descendis (vd. Kantoj IV. kaj VIII.) estigis granda tertremo; kvazaŭ la disiĝintaj atomoj sentus amon unu al la alia kaj la mondo volus ree aglomeriĝi en kaoson (doktrino de Empedokles, laŭ kiu tio jam plurfoje okazis). Tiam fendigis la ponto gvidanta al la sepa rondo; Virgilo ĉe sia unua descendo tion ankoraŭ ne vidis, ĉar li descendis antaŭ la morto de Kristo.

La »granda predo« (v. 38) estas la antikvaj animoj, kiujn Kristo liberigis.

La sangriverso estas Flegetono (vd. Kanto XIV.)

En ĝi sidas sangverŝintoj, tiranoj, rabistoj. Ilin gardas la kentaŭroj: ĝisbruste homoj, brustalmalsupre ĉevaloj. Chiron (*Airono*) estas la plej saĝa kaj milda el ili (li volis pacigi inter Heraklo kaj la kentaŭroj), tial volas Virgilo kun li paroli. Nessos enamigis al Dejanira, edzino de Heraklo kaj volis ŝin perforti. Heraklo lin mortigis per venenita sago. Nessos, mortante, persvadis Dejaniran, ke ĉemizon trempitan en lian sangon venenitan li surmetu al Heraklo, tiel Heraklo restos ĉiam fidela al ŝi. Heraklo surmetis la ĉemizon kaj pro la veneno ekhavis tiel terurajn dolorojn, ke li frenezigis kaj sin mem bruligis sur ŝtiparo. *Pholos* estas unu el la plej sovaĝaj kentaŭroj.

Aleksandro estas la granda makedona reĝo, pri kiu estas sciate, ke li estis subitkolera, perfortema kaj kruela. *Dionizo* estis la fama tirano de Sicilio, kiu eĉ la interparolojn de la kaptitoj subaŭskultis tra la muro (dionizaj oreloj), por ilin prispioni kaj murdigi. *Ezzelino* da Romano, grafo de Onara, laŭ la samtempa kroniko de Villani, estis la plej kruela tirano en la mondo: foje li bruligis dekunu mil padovanojn, multajn blindigis, rabis ilian havaĵon (vd. Bio. 6. kaj 7.). Li mortis en karcero. *Obizzo d' Este*: grafo de Ferrara kaj

Ancona, furioza gelfo, kruela sovaĝulo. Laŭdire en lia lito lin sufokis lia propra neleĝa filo Azzo VIII.

Tiu, kies koron oni trapikis ĉe altaro, estis la angla princo Henriko. Lin mortigis Guido di Monforte, angla kavaliro, loktenanto de Karlo Anĵua en Toskanio, vengante per tio sian patron, Simon de Monfort, grafon de Leicester, kiun Henriko III. angla reĝo, onklo de l' murdito, igis mortigi pro ribelo. La murdo okazis, ĉe la reveno de l' princo el la Sankta Lando, en la preĝejo de Viterbo, dum meso. La angla reĝo Edvardo, frato de l' murdito, starigis en Londono statuon por la memoro de l' murdito: la statuo de l' princo tenas en komunua kaliko la glave trapikitan koron. Tion aludas v. 120.

Attilo, vipo de l' tero, estas la huna reĝo. *Pirho* (Pyrrhos) estas la reĝo de Epiro, laŭ aliaj la sangavida filo de Achilles, murdinto de Polyxena, *Seksto* (Sextus) estas la filo de l' granda Pompeius; li estis fama pirato.

Rinieri Pazzo kaj *Rinieri Corneto* estis du famaj vojrabistoj.

Vortklarigoj: *cis* (*): maltrans; *alpeska* (alp-eska **): alp-simila, krutega, abruptega (it.: alpestro); *taŭro* (b): virbovo; *stridi* (*): akre siblegi.

LA SANGRIVERO

L A loko de l' descend' estis ekstreme alpeska, kaj, kun iu ĉe l' vojflanko, tia, ke ĉiu vid' ĝin fuĝus treme.	1.
Kiel, cis Trento, kiam roklavango en la fluejon de l' Adige falas aŭ pro tertremo, aŭ pro subten-manko,	4.
kaj supre, kie ĝi ekiris, faras la fend' ravinon tian, ke descende ne trovas vojon, kiu supre staras:	7.
tia abism' oscedis nun vojfende; kaj sur la rokfendaĵoj, ĉe l' kulmino, kuŝis la hont' de Kreto sinetende,	10.
kiun koncipis la pseŭdo-bovino. Kaj ekvidinte nin, ĝi sin mem mordis, kiel venkita de koler' en sino.	13.
»Ĉu eble kredas vi — la Duk' ekvortis — ke venas nun la princo de Ateno, kiu la morton tere al vi portis?	16.
For, brut'! ne gvidas lin ĉi entrepreno, via fratin' ne helpis lin fadene, li venis vidi vin sub punĉagreno.»	19.
Kiel la taŭro ŝiras sin elĉene post morta bato, sed forkuri plu ĝi ne povas, nur saltadas duonsvene,	22.
tiel komencis Minotaŭro muĝi. Tiam la Duko: »Kuru, dum l' anima rabio daŭras, bone al vi fuĝi.«	25.
Ekiris ni por plua voj' pilgrima tra l' krutaj ŝtonoj, kiuj nun ekglitis sub mia pland', pro l' pezo nekutima.	28.
Cerbumis mi. Kaj li: »Vi ekmeditis eble pri l' fendo, kie gardpostenis la best' kolera, kiun ĵus mi bridis.	31.
Do sciu, foje, kiam mi alvenis por iri ĝis la funda fund' infera, ĉi loko tiajn fendojn ne entenis.	34.

- Nur poste, se ĉi kono estas vera, 37.
dum venis, kiu de la granda predo
senigis Dis-on en la rond' ekstera,
kaj tremis ĉi Misval' sub lia piedo 40.
tiel, ke pensis mi, ke amon sentis
la Univers', per kio jam, laŭ kredo,
plurfoje turno al kaos' eventis: 43.
nur tiam, kie la ravin' vojbaras,
kaj aliloke, sin la rokoj fendis.
Sed al la val' rigardu: jam najbaras 46.
la sangrivero, kie bolas meze,
kiu perforton al homfrato faras.«
Ho, volo blinda kaj koler', freneze 49.
pelantaj dum la kurta viv' per sprono,
punantaj tra l' eterna tiel peze!
Mi vidis vastan foston sub arkzono, 52.
kia la tutan valon ringterasis,
laŭ la klarig' dirita de l' Patrono.
Inter la fos' kaj rokoj vice pasis 55.
kentaŭroj kuraj, armaj arbaleste,
kiel surtere, kiam ili ĉasis.
Nin ekvidinte, ĉiuj haltis reste, 58.
kaj poste antaŭiris tri la hordon
kun sagoj pretigitaj, kaj proteste
de fore unu kriis: »Nian bordon 61.
al kia pun' irante vi ektretas?
Diru de tie, aŭ mi tiras kordon!«
Diris la Duk'. »Ni al Ĥirono pretas 64.
respondi, kiam estos ni apude;
jam nocis foje, ke vi tro impetas.«
»Jen Nesso — li nun tuŝis min kubute — 67.
mortinta pro la bela Dejanira
kaj mem venginta sian morton krude.
Al brust' kapklinas tie, meze ira, 70.
granda Ĥiron', vartisto de Aĥilo,
l' alia: Folo, la koler-delira.

- Kaj ĉirkaŭ l' foso estas mil' kaj milo, 73.
l' animojn, pli emergajn el ardvarmo
ol diktas pun', sagante per pafilo.«
- Ni venis jam al ĉi rapida svarmo; 76.
Ĥirono prenis sagon kaj per puŝo,
de l' plumo barbon viŝis de l' lipkarno,
kaj post malkovro de la granda buŝo: 79.
»Atentu! — diris li al la kunuloj —
la posta rulas ŝtonojn ĉe l' ektuŝo,
tion ne povas fari mortaj kruroj.« 82.
Sed nun jam mia bona Kondukisto
ĉe l' brust', kie kuniĝas du naturoj
diris: »Li vivas ja! Tra l' val' de tristo 85.
mi devas gvidi lin; al ĉi pilgrimo
neces' kondukas lin, ne vanta distro.
- De l' *haleluja* iris for l' animo, 88.
kiu konfidis min pri l' tasko nova,
li ne latronis, nek min premas krimo.
- Sed, je la Forto, kiu nun min movas 91.
iri ĉi vojon plenan de danĝero,
difinu iun, kiu helpi povas
- en voj', vadejon montros tra l' rivero 94.
kaj lin transportos dorse, ĉar li estas
ja ne spirit', por iri tra l' aero.«
- Kun flank' aldekstre, nun Ĥirono gestas 97.
al Nesso: »Turnu vin kaj iru gvide,
protektu, se alia trup' arestas.«
- Ekiris ni kun la eskorto fide 100.
laŭ bordo de la akvoj sangpurpuraj,
kie bolantoj kriis akre, stride.
- Mi vidis, ke ĝis brov' mergiĝis pluraj. 103.
Kaj la kentaŭro diris: »Jen tiranoj,
de sang' banitaj, kaj de rab' malpuraj.
- Nun ili pentas pro l' sangverŝaj manoj. 106.
Jen Aleksandro, Dioniz' kruela,
pro kiu jarojn veis sicilianoj.

- Jen — tiu frunto kun harar' malhela — 109.
 Ezzelino, kaj tiu, blondharara,
 Obizzo d' Este, kiun, fakto vera,
 la filo murdis, la bastardo kara. « 112.
 Mi al la Duk' min turnis; li admonis:
 »Nun lin rigardu ĉefa, min flankstara. «
 Post iom halton la Kentaŭr' proponis 115.
 super animoj, kiuj ĝis la kolo
 en la varmega sangriverso dronis.
 Li montris ombron ĉe angul' en solo: 118.
 »Tiu la koron pikis ĉe altaro
 ĝis nun kultatan de l' Tamiz-popolo. «
 Nun sekvis ombroj, kiuj el sangmaro 121.
 la kapon kun la tuta brust' elmetis,
 kaj plurajn mi rekonis el ĉi aro.
 Tiel la sangnivel' pli kaj pli cedis, 124.
 atingis fine nur ĝis pied-alto,
 jen estis la vadej'; ni transpiedis.
 »Kiel vi vidis nun, ke en ĉi parto 127.
 pli kaj pli cedas la riverprofundo,
 do kredu, — diris la kentaŭr' post halto, —
 ke aliparte tiu sanginundo 130.
 profundas pli kaj pli, ĝis ĝi enfermas
 tiranojn, kiuj ĝemas sur la fundo.
 La Dian Juston timi tie lernas 133.
 vipo de l' mond': Attilo la terura,
 Pirho kaj Seksto; tie ĉi eternas
 la larmoj, kiujn tordas bol' tortura 136.
 el Rinier da Corneto, Rinier Pazzo,
 farintaj ĉiun vojon malsekura. «
 Sin turnis, vadis li tra l' sangsurfaco. 139.

DEKTRIA KANTO

LA SANGANTA BOSKO

Inter la rivereto Cecina kaj urbeto Corneto situas densaj arbaroj de l' toskana marbordo. La sovaĝbestoj en ĝi loĝantaj evitas la terojn kulturitajn (v. 7—9).

La dua subbrondo de l' sepa rondo estas la vivanta bosko, kie loĝas la Harpioj, hombirdoj, simboloj del' konscienc-riproĉo, kiuj, laŭ la epopeo de Virgilo, forpelis per siaj malbonaj antaŭdiroj Aeneas kaj liajn rifuĝintajn trojanojn desur la Strofadaĵ insuloj.

Virgilo kantis en sia epopeo pri vivanta arbo; Dante tion kredis fabelo, tial Virgilo devis rompigi per li branĉon, por lin konvinki.

La konfidulo de Frederiko II. (Bio. 6.) estis *Piero della Vigna*. Lin pereigis la Korta Kulpo: la Envio. Oni akuzis lin, laŭ Dante kalumnio, pri perfido; Frederiko lin enkarcerigis, lin blindigis en la karcero kaj pro tio li, mal-esperiginte, sin mortigis.

Aŭgusto: imperiestra titolo (laŭ *Caesar Augustus*); do ĉi tie: Frederiko II.

Minos estas la submonda juĝisto (vd. Kanto V.)

La kuregantaj ombroj estas: *Lano* (Lano Maconi da Siena), kavaliro, ano de la fama diboĉa »brigado« (vd. Kanto XXIX.). Ĉion malŝparinte, li intence serĉis la morton en la batalo ĉe Toppo (vd. Bio. 11.); *Giacomo da Sant Andrea*: freneze malŝpara riĉulo el Padova: dum boatveturo plenmane li ŝutis la orojn en la akvon kaj foje li ekbruligis sian belan palacon por plezuri pri la fajro kaj amuzi siajn amikojn. Laŭdire lin murdigis Ezzelino en 1239.

La florencana ombro, sub kies arbusto Giacomo ekkaŭras, ŝajne pendigis sin sur la pordo de sia domo.

Pri la statuo de Mars sur la Arnoponto vd. Bio. 2.

Vortklarigoj: *meretrico* (*): publikulino; *rumoro* (*): konfuza bruoj; *sarmento* (v): volvkrampo de kreskaĵoj.

- NESSO eĉ ne ekbordis dum transvado, 1.
 kiam pluire, ni en boskon trafis.
 kie, por signo, mankis ĉia pado.
- L' arboj ne verdis, sed velkinte flavis, 4.
 ne glatajn branĉojn, sed tordojn, tuberojn,
 ne fruktojn, sed venenajn dornojn havis.
- Ne havas tiajn dornaĵ-aglomerojn 7.
 la sovaĝbestoj, malamantaj inter
 Cecina kaj Corneto kulturterojn.
- Harpioj brutaj nestis arbopinte, 10.
 kiaj trojanojn, per aŭguro morna,
 forpelis de l' Strofadoj terurinte.
- Kun flugilegoj, kun vizaĝ' homforma, 13.
 piedoj ungaj, granda, pluma ventro
 lamentis ili en la denso dorna.
- »Eksciu, antaŭ la pluir' al centro, 16.
 — parolis al mi mia Duk' afabla —
 vi iros nun tra l' dua rondsegmento,
- ĝis sekvos la terura valo sabla. 19.
 Atentu do, vi vidos aĵojn, kiajn
 kredigi vorto estus nekapabla.«
- De ĉiu flank' mi aŭdis veojn kriaajn, 22.
 sed mi ne vidis, kiuj ilin ĵetis;
 konfuze mi haltigis paŝojn miajn.
- Mi kredas, ke li kredis, ke mi kredis, 25.
 ke l' bruon inter branĉoj homoj faras,
 kiuj al nia vido sin sekretis.
- Car: »Se de l' arbo, kiu tie staras, 28.
 vi ŝiros branĉon — li nun al mi diris —
 vi vidos, kiel via pens' eraras.«
- La arbon man-etende mi aliris, 31.
 derompis branĉon; jen, kun ve' dolora,
 la trunk' ekkriis: »Kial vi min ŝiris?«
- De l' ŝira vund', kun sango brunkolora, 34.
 »Kial vi rompis?« — venis plu lamentoj. —
 »Ĉu tiel via Brust' estas senkora?

- Ni estis homoj, estas nun sarmentoj, 37.
la man' ja devus esti malpli dura,
se estus ni animoj de serpentoj. «
- Kiel se verdan vergon flamo kura 40.
ĉe l' fin' ekkaptas kaj l' alia flanko
eligas sukron kun ĝemad' susura,
- tiel elvenis kune vort' kaj sango 43.
de l' branĉ' rompita; lasis mi kun timo
ĝin fali, staris kun tremanta lango.
- »Se estus li kredinta, ho animo 46.
lezita — diris mia Majstro saĝa —
kion rakontas mi en mia Rimo,
- ne estus lia man' al vi sovaĝa, 49.
sed pro l' nekredo, mi lin igis agi
tiel, ke mi ĝin sentas mem domaĝa.
- Sed diru vian nomon, kaj, por pagi 52.
kompenson, li freŝigos vian famon
surtere, kien povos li revagi. «
- La trunk': »Vi verŝas per parol' balzamon, 55.
kiel silenti do? ne estu tede,
se mi tro longe dirus mian dramon.
- Al kor' de Frederiko firmposede 58.
pri ambaŭ ŝlosiletoj mi disponis,
malŝlosis, ŝlosis tiel lertprocede,
- ke hom' sekretojn liajn ne ekkonis, 61.
fidele al la glora oficporto,
tagojn kaj noktojn mi ofere donis.
- La meretric', kiu de l' reĝa korto 64.
l' okulojn fiajn for neniam klinis,
ĉi korta kulpo kaj komuna morto,
- flamige ĉiujn kontraŭ mi animis, 67.
flamigis flamigitoj mem Aŭguston,
kaj gajan dignon sort' funebra finis.
- La hont' indigne premis mian bruston, 70.
per mort' kredante fuĝi de l' hont-stigmo,
mi, justa, faris kontraŭ mi maljuston.

- Sed je l' radikoj strangaj de ĉi ligno 73.
mi ĵuras, ke mi trompis en nenio
la estron, indan je honor' kaj digno.
- Se iun el vi trafos sunradio, 76.
li repurigu do memoron mian
de l' kulpo surŝmirita de l' envio.«
- Post atendeto: »Jen silentas li jam, 79.
ne perdu tempon — la Poet' komandas —
demandu, se vi volas ion plian.«
- Sed mi: »Pli bone, se vi mem demandas, 82.
pri kio vi supozas min scivoli;
ne povus mi, kompat' min tiel fandas.«
- Kaj li komencis: »Por ke faru do li, 85.
pri kio lin instigis via peto,
anim' kaptita, volu plu paroli,
- kaj diri: kiel tia dorn-arbeto 88.
ligas animon, kaj, se eble, diri,
ĉu iam ĝi saviĝos el ĉi reto?«
- Komencis nun la trunko forte spiri, 91.
kaj ĝia spiro tiajn vortojn muĝas:
»Respondos mi, sen tion longe tiri.
- Tuj, kiam la anim' kruela fuĝas 94.
de l' korpo, kiun ĝi forĵetis mem,
ĝin Minos en la sepan rondon juĝas.
- En bosk' ĝi falas, ien ajn, sen skem', 97.
kie hazardo metas al ĝi neston,
kaj tuj ekĝermas, kiel spelto-sem'.
- Kreskigas mornan planton, dornokreston. 100.
Harpioj ŝiras ĝiajn frondojn beke,
faras doloron, al dolor' fenestron.
- Por korp' ja supreniros ni postveke, 103.
sed ne survestos ĝin; ne estus justo
rehavi, kion ni forĵetis peke.
- Post la altren' de nia korpo-krusto 106.
ni ĝin pendigos en la bosk' dolora,
ĉiu sur sia trista ombr-arbusto.«

- Ni plu aŭskultis pri la trunko plora,
kredante, ke ĝi volas diri pluon,
kiam surprizis nin rumoro fora,
kiel se iu aŭdas jam la bruon 109.
- de l' apro kaj de l' postpelanta bando,
kaj hundo-bojon, krakan branĉo-skuon. 112.
- Kaj jen, du ombroj, de l' sinistra rando,
nudaj, gratplenaj, en kureg' trastriis,
rompante ĉie branĉojn per la plando. 115.
- »Ho, venu, venu, morto!« — unu kriis. 118.
- L' alia, kiu l' fortojn jam malŝparis,
spiregis: »Lano! tiel vi ne sciis
kuri, dum vi ĉe l' Toppo-lukto staris. 121.
- Kaj li senspire nun ekkaŭris side,
el si kaj el arbit' arbiton faris.
- Post ili svarmis la arbar'; avide 124.
- pelantaj nigraj hundoj tie venis,
kiel vertragoj post eskap' elbride,
kaj mordis tiun, kiu lace svenis, 127.
- fibrope lin diskarnis murdrikane,
kaj la dolorajn membrojn kun si trenis.
- Nun mia Majstro min kondukis mane 130.
- al arbitaĵ', kies doloro trea
tra la ŝirvundoj sangaj plendis vane.
- Gi diris: »Ho, Giacomo Sant Andrea, 133.
- per mi vin ŝirmi kiom vin utilis?
ĉu kulpas mi pri via sorto vea?«
- La Majstro haltis super ĝi kaj diris: 136.
- »Kiu vi estas, kies densa vundo
kun sang' ĉi veajn vortojn el si spiris?«
- »Ho vi, animoj, — sonis la respondo — 139.
- vidintaj min sub plago senmerita,
kiu senigis min de ĉiu frondo,
- kolektu ilin ĉe l' trista trunko splita. 142.
- Min naskis urb', lasinta por Baptisto
la prapatronon; kiu, incitita,

per sia art' ĝin batas kun persisto;	145.
kaj se sur Arno-ponto nun ankore	
pri li ne restus signo de ekzisto,	
l' urbanoj, refondintaj ĝin fervore	148.
el cindroj, kiuj restis post Attilo,	
ja estus klopodintaj vanlabore.	
Mi faris mian pordon pendumilo.«	151.

DEKKVARA KANTO

LA FAJROPLUVO

Tria subbrondo de l' rondo sepa: pekuloj kulpaj kontraŭ Dio. Unue la blasfemuloj.

La sablo similas la sablon de Afriko, kie iradis *Cato de Utica* (Katono), kiam tra la libia dezerto li kondukis al reĝo Juba la restojn de l' armeo de Pompeius. Sur ĝin faladas fajropluvo, kian, laŭ la fabelo, vidis Aleksandro la Granda en Hindujo.

La grandulo estas Capaneus, unu el la sep reĝoj sieĝintaj Tebon, kiu aŭdace provokis la diojn, blasfemis kontraŭ Jovo (Jupitro, Zeus). Jovo ricevis fulmojn de Vulkano (kiu havis forĝejon en la interno de l' Etna) kaj lin sagis mortige, kiel iam ĉe Flegra la gigantojn ribelintajn kontraŭ li (vd. Kanto XXXI.).

La Bola Lago (Bulicame) estas apud Viterbo; ĝian akvon precipe publikulinoj uzis kontraŭ seksmalsanoj.

Kreto estas la tero de Saturno, kiu regis la mondon dum la orepoko. Oni antaŭdiris al li, ke lin faligos lia filo, tial li manĝis siajn infanojn. Sed lia edzino, Rhea (Kybele) kaŝis la plej malgrandan filon sur la monto Ida kaj ordonis al siaj pastroj (la koribantoj) kriadon, por ke la infanploro ne aŭdiĝu kaj ne perfidu la kaŝlokon de l' filo: la posta *Zeus* (Jupitro, Jovo).

La Maljunulo estas la homaro. Li turnas dorson al Damiata (Damiette en Egiptujo) kaj rigardas al Romo, signante per tio, ke la homaro forturniĝis de l' paganeco kaj sin direktas al la kristanismo. La metaloj (oro, argento ktp.) signas verŝajne la epokojn de l' homaro (orepoko ktp.) La feliĉa orepoko estas senlarma, ĉiuj aliaj partoj verŝas larmojn, kaj el la larmoj de l' homaro estiĝas la submondaj riveroj. Kial unu piedo estas el argilo, tion multmaniere oni provis klarigi, plej verŝajna estas la klarigo de Scartazzini: la ferpiedo signifas la roman imperion, la argila la papan potencon, ĉar la statuo apogas sin plie sur ĉi lasta, la sorto de l' homaro estas tre malfirma kaj danĝera.

Dante nun iras apud la rivero Flegetono, sed jam ankaŭ la sangrivero (Kanto XII.) estis Flegetono. Lethe estos videbla nur en la Purgatorio, ĉar ĝi, la Fonto de l' Forgeso, kompreneble, ne povas esti en la Infero.

Kocito (Kokytos) estas la glacia lago de la inferfundo (vd. Kanto XXXIV.)

Vortklarigoj: *aŭstera* (*): severmora, froste rigora; *trampli* (*): bati la teron per piedo.

ĈAR amo al patruj' min supersutis,	1.
la disajn branĉojn mi kun tristo pia	
kolektis sub la arb', kiu jam mutis.	
Kaj ni pluiris, tien, kie tria	4.
ringo la duan sekvas, por atesti	
terurajn artojn de l' justeco dia.	
Mi diras, por ĝin bone manifesti,	7.
ke ni atingis al ebena lando,	
kie eĉ eta herb' ne povus kreski.	
La vea bosk' ĝin limas en girlando,	10.
kiel la boskon trista foso-zono,	
ni haltis tie, strikte ĉe la rando.	
Dezerta, vasta, seka regiono	13.
ĝi estis, tia, kian sub la bruloj	
de l' suno tretis plandoj de Katono.	
Ho, veng' de Dio! kiel de l' Reguloj	16.
ja devas ĉiu timi, kiu legis,	
kio montriĝis nun al la okuloj!	
Animoj nudaj plurtaĉmente gregis	19.
ĉi tie, kaj lamentis plej mizere;	
ŝajne diversaj leĝoj ilin regis,	
ĉar kelkaj sin elsternis dors-al-tere,	22.
aliaj, side, tute sin kuntiris,	
aliaj ĉiam marŝis malespere.	
Multe pli multis, kiuj ĉirkaŭiris,	25.
kaj malpli multaj kuŝis subturmente,	
sed pliajn vegojn lang' ilia diris.	
Sur sablon, ne haltante eĉ momente	28.
grandflokaj flamoj pluvis tie sinke,	
kiel la neĝ' en Alpoj, ventsilente.	
Kaj kiel vidis Aleksandr' atinge	31.
al arda hinda ter', ke flamoj pluvaj	
tra l' trupoj falas teren senestinge,	
kaj trampli per piedoj rapidmovaj	34.
komandis li, por tuj ĉiun fajreron	
estingi, antaŭ la defal' de novaj:	

- tiel ĉi flam' eterna falis teron; 37.
 la sabl' ekbrulis, kiel per la ŝtalo
 la tindro, kaj duobligis la suferon.
 Senĉese daŭris la mizera balo 40.
 de l' mana danc', por tie, tie ĉi
 forskui flamon de plejfreŝa falo.
 Nun mi: »Ho Majstro, kies granda sci' 43.
 ja venkis ĉiujn, krom diablaro dura,
 kiu ĉe l' Pord' elvenis kontraŭ ni,
 nomu l' grandulon, kiu pri l' tortura 46.
 bruleg' ignoras, kaj spitegas forte,
 kvazaŭ de l' flamoj kuŝus li sekura.«
 Kaj tiu mem, aŭdante min ĉi-vorte 49.
 pri li demandi, ekkriegis jene:
 »Mi estis tia vive, kia morte!
 Lacigu Jov' sian forĝiston pene, 52.
 de kiu l' akran fulmon lia mano
 ricevis por min bati kolerplene,
 lacigu li Etnanon post Etnano 55.
 ĉe l' nigra forno per la fulmprodukto,
 kriante: »Helpu, helpu, bon Vulkano!« —
 kiel li faris en la Flegra-lukto, 58.
 per tuta fort' li frapu min sagjete,
 de l' venĝ' ne ĝermos ja por li ĝojfrukto!«
 Nun diris mia Duk' tiel impete, 61.
 kiel neniam ĝis la tempo nuna:
 »Ho Kapaneo, ke en vi sencede
 l' orgojlo daŭras — jen la plago puna! 64.
 pro l' furiozo ja nenio batis
 pli inde vin, ol ĉi rabi' konsumi.«
 Kaj poste, pli mildlipe, li konstatis: 67.
 »Jen unu el la Sep, farintaj sieĝon
 ĉe Tebo; Dion moke li malŝatis,
 eĉ nun de li ja ne atendu preĝon, 70.
 sed ĵus mi diris, ke l' frenezkolero
 de l' brust' ornamas inde ja ĉi reĝon.

- Nun, sekvu min; sed al la arda tero 73.
piedojn meti gardu vin atente,
paŝadu ĉiam laŭ la bosk-bordero.»
- Tiam al loko venis ni, silente, 76.
kie el bosko riveret' susuras,
pri kies ruĝ' memoras mi naŭzsente.
- Kiel de l' Bola Lag' river' elkuras, 79.
kiun dividas kulpulinaj bandoj,
tiel tra l' sablo tiu ĉi sin rulas.
- El roko estis ĝiaj fund' kaj randoj, 82.
la bordo largis, do mi tuj divenis,
ke certe ĝin laŭiros niaj plandoj.
- »El ĉio, kion mi primontri penis, 85.
de kiam mi tra l' pordo metis krurojn,
tra kies sojlo al ĉiu lico veni,
- sciu, ne trafis al vi la okulojn 88.
pli rimarkinda, ol ĉi tiu fluo,
kiu per tuŝ' mortigas ĉiujn brulojn.»
- Tiel la Duk' parolis por instruo, 91.
do mi lin petis, doni pli de l' frando,
ĉar la deziron vekis li por ĝuo.
- »Meze de l' maro kuŝas kalva lando 94.
— li diris — nome: Kreto. Or-epoko
estis en ĝi dum ĝia di-reĝanto.
- En ĝi montaro: Ida; gaja loko 97.
iam kun frondoj kaj kun ondbabilo;
nun — forlasita kiel olda stoko.
- Por Jov' elektis Rhea ĝin lulilo; 100.
por lin pli bone kaŝi, sur l' insulo
kriojn ordonis ŝi dum ploro de l' filo.
- Surmonte rektas granda Maljunulo, 103.
li turnas sian dorson al Damiata,
al Rom' rigardas, kiel al spegulo.
- La kap' estas el oro delikata, 106.
la brusto kaj brakoj: el arĝento pura,
la ventro, ĝis forkiĝ': el kupro glata,

- la pluo el bonega fer'; sed nura 109.
dekstra pied': el bruligita tero;
li staras pli sur ĝi, ol sur la dura.
- Kaj ĉiu parto, krom la ora sfero, 112.
fendiĝis, verŝas larmojn, kies falo
kuniĝas por trabor' de ĉi kratero,
torentas kure tra ĉi tiu valo, 115.
Stiks', Aĥeron', Flegeton' el ĝi fontas
kaj kuras suben tra ĉi rok-kanalo,
ĝis ĉesas sinka voj' kaj sin renkontas 118.
ili en Kocito; sed, kiel aŭsteras
ĉi marĉ': vi vidos, do mi ne rakontas.»
- Nun mi: »Sed se ĉi fluo sin liveras 121.
ĉimaniere el la supra mondo,
kial nur en ĉi rando ĝi aperas?»
- Kaj li: »Ĉi lok', vi scias, estas rondo, 124.
kaj, kvankam longe venis vi, kun giro
ĉiam maldekstra, pase al la fundo:
ne faris tutan cirklon via iro, 127.
do, se aperas dum la vojo-pluo
novaĵo, vin ne devas kapti miro.»
- Mi ree: »Majstro! Kie Lethe-fluo? 130.
Kaj Flegeton'? Pri l' unu vi silentas,
la duan diras pluvi de l' Statuo.»
- »Pri la demandoj plaĉe mi kontentas 133.
— li diris — sed ruĝbolo de l' torento
pri l' unu al vi solvon jam prezentas.
- Lethe-n vi vidos ja, sed trans ĉi Fendo, 136.
kien sinlavi iras la animo
skuante for la pekojn post la pento.»
- Kaj poste: »Tempas iri el proksimo 139.
de l' bosko, venu, kaj min sekvu jam.
Laŭiru bordon, tie la pavimo
ne ardas: mortas super ĝi la flam', 142.

DEKKVINA KANTO

BRUNETTO LATINI

Kontraŭ Dio oni kulpas ankaŭ per kontraŭnatura voluptado (peko de Sodomo, vd. Kanto XI.)

Pri *ser Brunetto* vd. Bio. 19.

(*Ser*: oficiala titolo por notarioj, kancelieroj, poste por pastroj kaj kleruloj.)

Pri Fiesole vd. Bio. 1.

La *Damo* (v. 90) estas Beatrice.

Prisciano estis gramatikisto en la VI. jarcento.

Francesco d' Accorso, filo de l' fama juristo Accursio, estis jura profesoro en la universitato de Bologna.

La nenomata »favulo« estis Andrea de' Mozzi, florenca episkopo, kiun la papo (*servisto de l' servistoj* laŭ la oficiala esprimo) pro liaj diboĉoj transmetis el Florenco (Arno-bordo) al Vicenza (Bacchiglione-bordo): li mortis en Vicenza.

En Verona oni aranĝis jare vetkuron por la memoro de triumfo; la premio de l' gajninto estis verda drapo.


Vortklarigoj: *acerba* (*): adstringa-gusta; *maligna* (gm): malbonvola; *objeti* (*): kontraŭdiri, kontraŭmeti rifuzan argumenton.

NI iris laŭ la kruda rando, kiun lavas 1.
rivero, kaj vaporas ĝi kun muĝo,
tiel ke l' akvojn, bordojn ĝi de l' fajro savas.
Kian remparon ĉe Wissant kaj Bruĝo, 4.
timante fluson, faras flandra gento,
pelante maron per ĝi al rifuĝo,
aŭ padovanoj faras laŭ la Brento, 7.
por ŝirmi domojn, antaŭ ol la lando
Karinta sentas varmon de l' sudvento,
tia la digo estis ĉe l' bordrando, 10.
nur malpli alta-larga tiun metis,
kiu ajn estis, ĝia konstruanto.
Jam tra l' arbar' ni longan vojon tretis, 13.
kaj, ĉar ne sciis mi, sur kia tero
mi estas, reen mi rigardon ĵetis;
jen, ombroj venis laŭ la digbordero, 16.
al ni gapantaj tra l' aero bruna,
kiel ni rigardegas dum vespero
unu l' alian ĉe l' ekkresko luna, 19.
okulstreĉantaj, kiel sur kudrilo
la truon serĉas la tajlor' maljuna.
Dum ili min okulis, unu viro 22.
rekonis min, kaj ĉe la bask' de l' jako
min kaptis, ekkriante: »Kia miro!«
Dum staris li kun etendita brako, 25.
l' okulojn fiksas mi al la aspekto
brulvunda, ke la trajtojn, malgraŭ bako,
rekoni povu mia intelekto. 28.
Kaj mi manklime palpis lin vizaĝe,
dirante: »Jen vi estas, ser Brunetto?«
Nun li: »Ho fil', akceptu senmalplaĉe, 31.
se Brunetto Latino nun iomete
de l' trup' foriros, sekvos vin vojaĝe.«
»Venu, se eble — mi parolis pete — 34.
aŭ sidu ni, se plaĉas, se l' najbaro
gvidanta min konsentos senobjete.«

- »Ho fil', se iu haltas el ĉi aro 37.
momenton: sen manŝirmo li, sinsterna,
en flampluvego kuŝos dum centjaro.
- Vi iru supre, mi sub rand' interna, 40.
poste aliĝos mi al mia sekto
iranta plende pri la plag' eterna.»
- Al lia flank' descendi de l' vojrekto 43.
ne riskis mi, sed iris kun kapklin'
kiel la hom' iranta kun respekto.
- Li diris: »Kia ŝanco aŭ destin' 46.
vin sendis, antaŭ l' mort', al vojo jena,
kaj kiu estas, kiu gvidas vin?«
- »Supre — respondis mi — en viv' serena, 49.
en valo vojon perdis mi dum vago,
antaŭ ol mia aĝo estis plena.
- Nur hieraŭ mi ĝin dorsis, ĉe l' ektago; 52.
ĉi tiu aperis, turnis mian celon,
min rekondukos tra ĉi vojzigzago.
- Li diris: »Se vi sekvos vian stelon, 55.
en gloran rodon portos vin la sorto,
se bone mi vin konis, dum la belon
- de l' viv' mi ĝuis; kaj, sen frua morto, 58.
vidante vin sub ĉielo tre bonsigna,
pri l' verk' mi mem inspirus vin por forto.
- Sed la sendanka popolaĉ' maligna, 61.
veninta el Fiesole laŭ radiko,
kaj ja ĝis nun de mont' kaj rokoj stigma,
- al vi, bonfara, estos malamiko; 64.
kaj ĝuste, ĉar ĉu eble, ke maturas
inter acerbaj sorpoj dolĉa figo?
- Blindaj, pri ili fam' malnova kuras, 67.
avara gent', orgojla kaj envia,
timu, ke mor' ilia vin saturas!
- La sort' vin dotos per honoro tia, 70
ke l' du partioj vin malsatos same,
sed for de l' herbo restos bek' ilia.

- Fiesolaj bestoj ĵetu por si ĉiame 73.
subpajlon el si mem, sen la molesto
de l' planto, kiu el ĉi sterko tamen
- elkreskas, ke en ĝi revivu resto 76.
de l' sanktaj Romaj semoj, dumkonstrue
lasitaj en ĉi tiu kulpo-nesto. «
- »Se ĉio estus — mi respondis plue — 79.
laŭ mia plaĉ', ne estus vi ankore
venkita de l' hom-fato tiel frue.
- Fiksiĝis en mi, tuŝas min dolore 82.
la patra frunto kara kaj tenera,
kiam vi min instruis hor-post-hore,
- kiel sin eternigas homo tera, 85.
kaj, laŭ la povo, ĝis la mort' min prenos,
anoncu tion mia lang' sincera.
- Ĉion diritan en memor' mi tenos, 88.
kun la ceteraj, ke mi ĝin transdonu
al Damo, por klarig', se mi alvenos.
- Mi volas nur, ke klare vi ekkonu, 91.
ke mi ne sentas konscienc-riproĉon,
mi pretas, kiel ajn Fortun' disponu!
- Mi ne unue aŭdis tian voĉon 94.
aŭguran; turnu do Fortun' laŭplaĉe
la radon kaj kampulo la pioĉon! «
- Kaj tiam mia Duk' dekstravizaĝe 97.
alturnis sin, rigardis min kaj diris:
»Aŭskultas bone, kiu notas saĝe! «
- Tamen, kun ser Brunetto mi pluiris, 100.
kaj el kunuloj liaj per demando
pli ĉefajn, famajn koni mi deziris.
- Kaj li: »Konindas kelkaj el ĉi bando, 103.
sed la ceteraj restu nur sen nomo,
ĉar mankas temp' por tiel longa kanto.
- Sciu, ke ĉiu estis pastra homo, 106.
aŭ scienculo granda, fame-grava,
malpura de la peko de Sodom».

- Jen Priscian', kun trista vango kava, 109.
Francesc' Accorso; vidu en ĉi svarmo,
se vin ne naŭzas io tiel fava,
kiun servist' de l' servistar' de l' Arno 112.
transmetis al la Bacchiglione-bordo,
kie restis lia misuzita karno.
Mi dirus pli; sed iri plu, laŭ Ordo, 115.
ne povas mi; leviĝas kun impeto
el sablo novaj fumoj, venas hordo:
al mi malpermesita societo. 118.
Mi rekomendas al vi la Trezoron,
en kiu vivas mi; jen ĉiu peto.«
Sin turnis, tiel kuris li en foron, 121.
kiel en kampa kur' por drapo verda,
apud Verona, kiu gajnos gloron,
ne kiel tiu, kiu estos perda. 124.



Kiujn Minotauro gardas.

DEKSESA KANTO
GRANDULOJ SUB FAJROPLUVO

Gualdrada estis nobela sinjorino, multe laŭdata de la kronikistoj pro virteco.

Guido Guerra estis ŝia nepo, kuraĝa militisto, estro de l' florencaj gelfoj, li gvidis ilin en la batalo ĉe Benevento, al li povis danki Karlo Anĵua la triumfon super Manfredo (vd. Bio. 9.)

Tegghiaio Aldobrandi (kp. Kanto VI.) estis eminenta gelfo, saĝa politikisto. Pri lia »pesa konsilo« vd. Bio. 8.

Jacopo Rusticucci: plej eminenta politikisto dum la flortempo de Florenco; lia edzino estis tiel netolerebla, ke li naŭziĝis pri la tuta virina sekso kaj falis en la kulpon de sodomio.

Guiglielmo Borsiere: eminenta, klera kaj riĉa florenca nobelo; Boccaccio rakontas interesan anekdoton pri lia spriteco kaj nobla pensado (Dekamerono I. 8.).

La *Acquacheta* estas la unua rivero en la maldekstra Appennino, kiu havas ĝisfine propran fluejon, ne enfluante alian riveron. Ekde Forlì oni ĝin nomas *Montone*. Ĝia akvofalo estas apud la monaĥejo *Badia di San Benedetto*, kiu estis tre granda konstruaĵo, povanta doni rifuĝejon al miloj, sed en ĝi loĝis nur kelkaj monaĥoj.

Veso-monto: nun Monte Viso aŭ, pli ĝenerale: Monviso.

Pri la *pantero* kaj la *ŝnuro* vd. Bio. 21.

Tio, ke Dante ĉi tie demetas la ŝirmantan ŝnuron de Sankta Francisko, ŝajnas havi simbolan signifon: eble Dante sentas ankaŭ sin mem pli-malpli peka aŭ tentata de la ĝis nun renkontitaj kulpoj, sed de la kulpoj nun sekvantaj (trompo kaj perfido) li juĝas sin tute libera kaj sekura.

Ni iris, kie akvoj, en kaskado 1.
 al rond' alia, eĥas jam murmure,
 simile, kiel abelar-zumado,
 kiam tri ombroj apartiĝis kure 4.
 de unu trup' marŝanta tra l' furia
 flampluvo, kiu batis ĝin torture.
 Kaj ĉiu kriis en proksimo nia: 7.
 »He, haltu, kiu ŝajne ja devenis,
 laŭ vestmanier', el nia urb' malpia!«
 Ve, kiom vundojn korp' ilia tenis, 10.
 freŝajn, malnovajn, pro l' brulig' de flamo!
 Eĉ nun, la rememor' min reĉagrenis.
 Sed la Doktor', atente pri la klamo, 13.
 sin al mi turnis: »Nun atendu halte,
 ĉi tiujn traktu kun ĝentil' kaj amo.
 Kaj se ne estus flamoj ĉiuparte 16.
 sagataj de ĉi loko, dirus mi,
 ke mem vi iru antaŭ ilin salte.«
 Ni haltis; rekomencis tiuj ĉi 19.
 l' antikvan kanton, kaj, al ni apude,
 el si unu radon faris ĉiuj tri,
 kiel ĉampionoj, oleite, nude, 22.
 antaŭ ol lukti, pugni, avantaĝon
 kaj taŭgan kapton provas antaŭstude;
 jene girante, ĉiu la vizaĝon 25.
 al mi etendis, tiel, ke l' piedo
 kaj kolo male faris la vojaĝon.
 Nun unu: »Se l' mizer' de l' sablo-bedo, 28.
 kaj nia vango kalva kaj ulcera
 vin naŭzas kontraŭ ni kaj nia pledo,
 moligu do vin nia famo tera, 31.
 por diri, kiu as vi, ke vi metas
 infere vivajn piedojn, sendanĝera.
 Ĉi tiu, kies spurojn mi surtretas, 34.
 kvankam li nude kaj senhaŭte vadas,
 estis pli granda range, ol vi kredas.

- Li estis nepo de l' bona Gualdrada, 37.
 Guido Guerra, grandpova per spirita
 kapablo kaj per sia klingo spada.
- Jen, post mi plandas sur la sablo glita 40.
 Tegghiaio Aldobrandi, kies pesa
 konsil' ja devus esti obeita.
- Kun ili, mi, sub sama pun' senĉesa, 43.
 Jacopo Rusticucci: pli ol ĉio
 min nocis certe la virin' besteca.«
- Havunte ŝirmon kontraŭ l' incendio, 46.
 mi estus alsaltinta am-atake,
 certe la Duk' ne tenus min de tio,
- sed tuj mi estus bruligita bake 49.
 de l' fajropluvo; venkis do hororo
 la bonan volon: fermi ilin brake.
- Komencis mi: »Ne naŭzo, sed doloro 52.
 pri via stato tiel min katenis,
 ke longe daŭras la konfuz' de l' koro,
- tuj, kiam el la vortoj mi divenis 55.
 kiuj de l' buŝ' de mia Majstro laŭtis,
 ke tiaj homoj, kiaj vi, alvenis.
- El via urb' mi estas, ofte aŭdis 58
 pri via nom' ŝatata, verko bela,
 kaj ĝoje mi memoris vin kaj laŭdis.
- De l' gal' mi iras for, al frukt' miela, 61.
 kiun promesis mia Duk' verama,
 sed nur post iro al la centro tera.«
- »Se longe gvidu en ĉi korpo sama 64.
 vin la anim' — li nun respondis jene —
 kaj post vi brilu via nomo fama,
- diru, ĉu virto kaj justeco, bene, 67.
 en nia urbo, kiel iam, floras?
 aŭ jam forpasis ili senrevene?
- Guiglielm' Borsiere, kiu ĉe ni ploras 70.
 ne longe (jen li iras en taĉmento!)
 ja diras multon, kio nin doloras.«

- »La gajn' subita kaj la nova gento 73.
naskis en vi orgojlon, malmoderon,
Florenc', vi mem priplendas kun lamento —
fruntleve nun mi kriis en aeron. 76.
La tri, preninte ĝin respondo trafa,
sin gvatis, kiel oni gvatas veron
kaj kriis: Se al vi respondo prava 79.
tiel malmulte kostas ĉiufoje,
feliĉa vi, pro l' sincereco brava.
Sed se ĉi nigran lokon vi revoje 82.
forlasos por revidi stelo-brilojn,
kaj »Tie *estis* mi« — vi diros ĝoje,
pri ni rakontu al la tero-filoj!« 85.
La radon ili rompis, ĉesis giri,
kuris — la gamboj ŝajnis nun flugiloj.
Oni ne povus unu *amen* diri 88.
pli tuje, ol foriĝis tiu trio,
do ankaŭ l' Duko volis plu ekiri.
Mi sekvis; post nelonga vojlinio 91.
la akvoj bruis tiel en proksimo:
apenaŭ jam aŭdiĝis eĉ la krio.
Kiel la torent' fluanta, ĝis la fino, 94.
de Veso-mont' al orient' unue
memvoje en maldekstra Apenino,
nomata Acquacheta supraflue, 97.
sed en la basa lito de la valo
ŝanĝanta nomon ekde Forli plue,
ĉe l' Alpa Sankta Benedikt' en falo 100.
tondranta kuras tien alprofunde,
kie por miloj eblus loĝ-instalo:
tiel, sub bord' abrupta, falis funde 103.
la nigra akvo tiel tondro-sone,
ke ĝi l' orelojn preskaŭ fendis vunde.
Mi havis sur mi ŝnuron ĉirkaŭzone, 106.
kiun mi iufoje ja bezonis
por la panteron buntan ligi bone.

- Kaj tiam, kiel mia Duk' ordonis, 109.
ĝin de la zono tute mi demetis,
kaj, nodan kaj volvitan, al li donis.
- Nun duonturne dekstren li paŝetis, 112.
ne fore de la rand', sub kiu pendas
l' abisma krut', li ĝin malsupren ĵetis.
- »Strangaĵon stranga signo ja pretendas 115.
— mi al mi diris — devas ĝi ne tardi,
tian rigardon mia Duk' postsendas.«
- Ho, kiel ni antaŭ l' hom' nin devas gardi, 118.
kiu nin vidas ne nur laŭ konduto,
sed povas mense pensojn trarigardi!
- Lí diris: »Tuj vi vidos ĉe la kruto, 121.
kion atendas mi kaj vi konjektas,
ĝi devas montri sin jam post minuto.«
- Ĉiam, se l' vero laŭ mensog' aspektas, 124.
laŭpove buŝon fermi diktas saĝo,
male senkulpe honton ni kolektas,
- sed — muti nun? Legant', je ĉiu paĝo 127.
de l' Komedio jen atesto ĵura:
ĝi restu sen favoro kaj sen plaĉo,
- se mi ne vidis, ke tra l' dens' obskura 130.
figuro nun ŝvebante suprenvenis,
mirindege por ĉiu kor' sekura,
- kiel emergas, kiu solvi penis 133.
sub mar' la ankron, kiun tie fendo
de roko aŭ alio ekkatenis:
- piedkunŝove kaj kun braketendo. 136.

DEKSEPA KANTO
SUR LA DORSO DE L' MONSTRO

La monstro, kiu gardas la okan rondon, estas *Geryon*, la simbolo de l' trompo, laŭ Dante. Li estis, laŭ la mito, giganta reĝo, kiu per afablaj vortoj allogis gastojn kaj poste ĵetigis ilin antaŭ siajn sovaĝajn virbovojn. Lin mortigis Heraklo.

Arachne aŭdacis konkuri pri virina manlaboro kun diino Minerva. La diino pro tio ŝin transformis en araneon.

Oni kredis en la mezepoko ke la kastoro tiel ĉasas fiŝojn, ke ĝi ŝovas sian voston en la akvon, uzante ĝin kiel logilon.

Kontraŭ Dio kulpas ankaŭ la uzuristoj, popolo de Caorsa (vd. Kanto XI.). Sur sia burso ili portas sian blazonon:

Blua leono en flava kampo estas la blazono de la Gianfigliuzzi-familio: famaj uzuristoj en Florenco, gelfoj.

Blanka ansero en ruĝa kampo: Ubriachi-familio, gibelinoj. Kiel oni vidas, Dante ne konas partiajn diferencojn en la Infero.

La padovano (sola inter florencanoj!) estas Reginaldo degli Scrovegni, lia blazono: *blua porko en blanka kampo*.

La »ĉefkavaliro« estas *Giovanni Buiamonti*, florencano, unu el la plej fifamaj uzuristoj tiamaj. Lia blazono estas *tri bekoj* (laŭ aliaj: tri virkapoj).

Fetono (Phaeton) elpetis de sia patro, la sun-dio, unufojan veturadon sur la sunveturilo, sed li ne povis teni la bridojn, la sun-ĉevaloj senbridiĝis, kaj la misvojiĝinta suno ekbruligis la ĉielon; ĝis nun oni vidas la postsignojn de l' brulo, la laktovojn.


Ikaro estis la filo de Dedalo (Daedalos), konstruinto de la Labirinto (vd. Kanto XII.), kaj volis kun li fuĝi el Kreto per flugiloj faritaj de l' patro. Sed li flugis tro proksimen al la suno, la vakso kunteninta la plumojn fandigis pro la varmo, li falis en la maron kaj dronis.

La falkon oni kelkfoje logis en la aeron per birdforma logilo.

Vortklarigoj: *benigna* (*): bonvola; *kvarmana* (febrego): *malario* estiganta frostotremojn ĉiun kvaran tagon; *frida* (*): *malvarma*; *ekfridi*: eksenti malvarmon.



La pintvosta besta.



- J**EN la pintvosta besto, kiu boras 1.
tra montoj, rompas glavojn kaj bastionon,
jen ĝi, pro kiu l' tuta mond' fetoras. «
- Tiel paroli mi aŭdis la Patronon, 4.
kaj li sur bordon ĝin ellogi penis,
ĝisrande trairinte la rok-zonon.
- La naŭza bildo de la Tromp' elvenis, 7.
eligis sin la kap', la parto brusta,
sed ĝi la voston borden ne eltrenis.
- Vizaĝon havis ĝi de homo justa, 10.
tiel benignis ĝia haŭt' ekstere,
sed ĉio kroma estis serpent-krusta.
- Membranoj vilaj pendis ĉeaksele; 13.
sur brust' kaj dorso kaj du flankoj aris
nodoj kaj cirkloj, surpentritaj fele.
- Nek turko, nek tatar' iam preparis 16.
tapiŝojn pli buntegaj, vari-skemaj,
nek mem Arahne tian tolon faris.
- Kiel kelkfoje pru' de barkoj remaj 19.
surteras, poŭpo en la akv' internas,
kaj kiel, ĉe l' germanoj manĝegemaj,
- por kapti fiŝojn la kastor' sin sternas, 22.
tiel ĉi besto malicega bordis
rande de l' roko, kiu l' sablon fermas.
- Ĝi levis en la vak' la voston, tordis 25.
la forkon, kiun la vostfin', skorpie,
kiel armilon venenozan portis.
- La Duk': Ni devas iri nun devie 28.
al tiu besto de plej fia famo,
kiu atendas nin kaŭrante tie. «
- Do, ni descendis nun laŭ dekstra mammo, 31.
dek paŝojn faris, sur ekstrema limo,
gardante nin de l' sablo kaj de flamo.
- Kiam ni estis al ĝi en proksimo, 34.
mi vidis, iom fore, ombrojn sidi
ĉe la abismo, sur la arda ŝlimo.

- Nun diris, kiu min bonvolis gvidi: 37.
»Ke ĉion en ĉi rondo vi ekkonu,
aliru, por ilian staton vidi.
- Sed en interparol' ne longe dronu! 40.
Dume parolos mi kun besto jena,
ke ĝi la fortajn ŝultrojn pruntedonu.«
- Do plu ankoraŭ ĉe l' ekstrem' margena 43.
de l' sepa rondo, iris mi, solulo,
al loko, kie sidis gent' ĉagrena.
- Dolor' al ili gutis tra l' okulo, 46.
kaptadis manoj, jen pro l' arda tuŝo
de l' grundo, jen pro l' surpluvanta brulo.
- Samtiel, dum somero, per la buŝo 49.
aŭ per pied', la hundoj faras grate,
dum ilin mordas kul' aŭ pul' aŭ muŝo.
- Kelkajn vizagojn rigardinte gvate, 52.
neniun sub ĉi morda flamatako
rekonis mi, sed vidis tuj konstate,
- ke ĉiukole pendas bursa pako, 55.
ĉiu kun certa farbo kaj blazono,
l' okulojn ili paŝtis sur ĉi sako.
- Kaj pliproksimiĝinte, sur persono 58.
mi vidis flavan burson kun lazura
vizaĝo kaj figuro de leono.
- Kaj plu gvatante per rigardo kura, 61.
mi vidis: sur sangruĝa sako staras
anser' pli blanka ol butero pura.
- Kaj unu nun, sur kies burso flaras 64.
porkino dika, blua, en neĝblanko,
ekkriis: »Kion en ĉi fos' vi faras?«
- Foriru! Sed, ĉar vivas vi sen manko, 67.
sciu, najbaro mia, Vitaliano,
apud mi sidos ĉe l' maldekstra flanko.
- Mi, inter florencanoj padovano, 70.
ofte surdiĝas pro horkanto bleka:
— Alvenos ja ĉefkavalir' Johano

- portante burson kun blazon' tribeka. — « 73.
Grimace, langon li laŭ tuta vasto
elmetis, kiel bovo nazo-leka.
- Timante, ke koleros pro l' prokrasto, 76.
kiu ĵus urĝis min, la Majstro saĝa,
mi nun foriris de ĉi trista kasto.
- Kaj jen, la dorson de la best' sovaĝa 79.
surgrimpis jam la Duk' kaj min atendas.
dirante: »Estu forta kaj kuraĝa!
- Jam sur ŝtuparo tia ni descendas. 82.
Antaŭen grimpu kaj mi meze sidas,
tiel de ĝia vost' mi vin defendas.«
- Kiel se de l' kvartana iu ekfridas 85.
kun bluaj ungoj kaj kun vango kava,
kaj tremas, se li ombron eĉ ekvidas,
- pro ĉi parol' mi iĝis tiel flava, 88.
sed tuj min kaptis hont', per kiu fine
servisto de bravul' mem iĝos brava.
- Inter skapoloj sidis mi surspine, 91.
kaj volis diri, sed la voĉ' ne venis
kiel mi kredis: »Min brakumu sine.«
- Sed tiu, kiu en danĝer' subtenis 94.
plurfoje min, per brakoj min eĉ l' zono
tuj post la sursidiĝo ĉirkaŭprenis
- kaj diris: »Nun moviĝu jam, Geriono, 97.
larĝgire, milde sinku tra l' aero,
la novan ŝarĝon tenu en rekono.«
- Kiel barketo glitas for de l' tero 100.
kun poŭp' antaŭen, tiel ĝi ekvelis,
kaj, sin sentante tute en libero,
- al lok' de l' brusto ĝi la voston pelis, 103.
kaj ĝin, streĉitan, ĝi angile rulis,
l' aeron per naĝil' sub sin ŝovelis.
- Pli granda tim' Fetonon ne teruris, 106.
kiam li lasis bridajn kaj rezulte
la firmament', ĝis nun videble, brulis,

- nek la Ikaron povran, kiam ŝultre 109.
disfalis plumoj pro la vaks-degelo,
kaj patro veis: »Vi deviis multe!«
- ol min, kiam mi vidis, ke aero 112.
ĉirkaŭas ĉie, vidis, ke prezentas
la vid' nenion krom ĉi best-himero.
- Gi lante lante giras kaj descendas, 115.
sed tion sciis mi per tio sole,
ke alvizaĝe kaj desube ventas.
- Mi aŭdis jam, ke dekstre sub ni bole 118.
falantaj akvoj muĝas plej terure,
la kapon do elŝovis mi scivole,
- sed tuj min kroĉis eĉ pli timsature, 121.
ĉar jen, aŭdiĝis veoj, fulmis bruloj,
do treme tute kaŭris mi fermkrure.
- Kio kaŝiĝis ĝis nun al okuloj, 124.
mi vidis nun, ke ni descendas, ringas
al ve' svarmanta el ĉiuj anguloj.
- Kiel la falk', se ĝi sin longe svingas, 127.
kaj ĝi nek birdon, nek logilon vidas,
dirigas per falkisto: »Ve, vi sinkas!«
- kie ĝi vikle startis, malrapidas 130.
tien descendi kaj post giroj cent
fore de l' mastro honte, grumble eksidas,
- tiel Geriono al la fundament' 133.
nin metis sube de la rok' breĉita,
kaj, de ni malsargite, post moment'
- forflugis, kiel sag' el ark' streĉita. 136.

DEKOKA KANTO

MISBURSARO

Misbursaro (Malebolge) estas la oka rondo de la Infero, ne balkonforma kiel la ĝisnunaj, sed multe pli larĝa, konsistanta el dek, ringe sinsekvaj valoj (misbursoj); en la mezo de la rondo estas profunda aperturo (la Puto). Vd. Kantoj XXXI. kaj XXXII.

Super la valoj de Misbursaro, en kiuj damniĝas diversmanieraj trompisto, kondukas pontoj, irantaj radie, de la ekstera, subravina rando de la oka rondo, ĝis ĝia rando interna, kie ili finiĝas ĉe la Puto, kondukanta al la naŭa rondo. Ĉiuj ĉi pontoj estas rompitaĵoj super la sesa burso, tie Dante kaj Virgilo devas pene trarimpi la burson (vd. Kanto XXIV). Cetere ili pasas sur ponto kaj de tie rigardas la damnitajn, nur en la tria burso malsuprenportas Virgilo Dante-n, por ke li parolu kun papo Nikolao III. (vd. Kanto (XIX.).

(Por orientiĝo vd. ankaŭ la skemon de Misbursaro sur pĝ. 144.)

En 1300, dum la *jubilea jaro*, la papo aranĝis grandajn festojn religiajn en Romo. La pilgrimantoj tiam iris trans la Teveron al la preĝejo de Sankta Petro tra la Anĝela Ponto, kiu troviĝas inter la Anĝelfortikaĵo kaj la Monto Giordano.

En la unua burso troviĝas la prostituistoj kaj la delogantoj, ili marŝas en du grupoj, kontraŭdirekte unu al la alia.

Venedico Caccianemico, peris la korpon de sia propra fratino Ghisolabella al Obizzo d' Este, grafo de Ferrara (vd. Kanto XII. v. 111.)

En la regiono de Bologna, inter la riveroj Reno kaj Savena, anstataŭ si (jes) oni diras *sipa*.

Jasono, kiu portis la or-lanon el *Kolchis*, dumvoje delogis sur la insulo *Lemnos* reĝidinon *Hypsiphyle*. Ne longe antaŭ lia alveno tien, la tieaj virinoj, laŭ la instigo de *Venus*, murdis ĉiujn virojn sur la insulo, sed *Hypsiphyle*, filino de reĝo *Thoas*, lerte kaŝis sian patron (do ŝi trompis siajn kunulinojn).

Poste, en *Kolchis*, Jasono delogis reĝidinon *Medea* kaj nur per la helpo de ŝia sorĉarto li povis akiri la orlanon. Sed post sia hejmenveno li forlasis ankaŭ *Medean*, enamiginte al *Kreusa*, filino de reĝo *Kreon*.


La *dua burso* estas la loko de l' flatuloj.

Alessio Intermini estis la ĉefo de l' gibelinoj en Lucca, samtempulo de Dante.

Thais estas publikulino en komedio de Terentius; ŝia amanto, kiun ŝi tute elpumpis per siaj flatoj kaj mensogoj, estas soldato Thrasus. Dante personigas en la figuro de *Thais* la amon mensogan, vendatan por mono.

Vortklarigoj: *drudo* (f. **): amato; *fereska* (fer-eska **): fersimila, ferkolora (ferrigno); *latrino* (z): (publika) necesejo; *putino* (f. *): publikulino; *snufi* (s): (kromsenco) spiregi brue tra la nazo; *sordida* (*): malpurega; *suo loco* (lat.): sialoke, siatampe.

**Horizontala (meze) kaj vertikala (ekstere) profiloj
de la oka rondo (Misbursaro)**



En la meza skemo (horizontala profilo) oni vidas la ringformajn valetojn, super kiuj radie kuras pontoj al la meza Puto. La sesa ponto estas rompita.

En la ekstera skemo (vertikala profilo) same oni vidas la opajn bursojn, kun la supre arkanta ponto. La sesa ponto kuŝas rompiĝinte sur la fundo (vd. Kanto XXI).

M I S B U R S A R O

INFERE estas loko: Misbursaro, 1.
 farita tute el fereska roko,
 kiel la ringa mur' de l' ĉirkaŭbaro.
 Sur kamp' malica, ĝuste en mezloko, 4.
 oscedas larĝa Puto al profundo,
 pri kiu mi parolos *suo loco*.
 La tuta ronda spaco, kies grundo 7.
 de l' Put' dividas la alt-krutan bordon,
 dekon da valoj havas sur la fundo.
 Kiel, por gardi fortikaĵan pordon, 10.
 sub muroj fos' post foso baron plektas,
 farinte ringe paralelan ordon,
 tiel ĉi fosoj tie ĉi aspektas; 13.
 kaj kiel de la sojlo de l' bastiono
 al bord' ekstera ponto sin direktas,
 tiel, de l' subo de l' rokmura zono, 16.
 tra l' firstoj, fosoj tranĉas pontoj kure
 kaj kolektiĝas en la Put' por drono.
 Kiam de l' ŝultroj skuis nin submure 19.
 Gerion', ni estis tie ĉi; sin tenis
 la Duk' maldekstren; sekvis mi laŭspure.
 Dekstre suferoj novaj al ni scenis: 22.
 novaj turmentoj, novaj skurĝo-draŝoj,
 de kiuj la unua burso plenis.
 Sur fund' pekuloj estis, sen vestaĵoj, 25.
 kaj parte venis kontraŭ ni ĉi multo,
 parte kun ni, sed kun pli grandaj paŝoj:
 kiel en Romo oni, dum la kulto 28.
 de l' jubilea jaro, sur la ponto
 rimedon trovis kontraŭ la tumulto
 tiel, ke unu flanko, kun la fronto 31.
 al la kastel', en Sanktan Petron pasis,
 l' alia flanko iris al la Monto.
 Ĉi tie, tie, sur la rok' grimacis 34.
 diabloj kornaj kun grandega skurĝo,
 dedorse ilin kruelbate ĉasis.

- Ho, kiel levis kruron ĉiu burĝo 37.
post unu bat'! Neniu ja volontis
atendi ĝis la dua, tria urĝo!
- Dum iris mi, al mia vid' sin montris 40.
pekulo, kiu tuj min interesis.
Mi diris: »Tiun ĉi mi jam renkontis!«
- Por lin rekoni, mi pluiri ĉesis 43.
kaj haltis ankaŭ mia Duk' tenera,
kaj eĉ, ke mi reiru, li permesis.
- Okulmallevis la skurĝit' mizera 46.
por kaŝi sin, sed vane jam! Mi vokis:
»Vi, vin kaŝanta per rigard' al-tera,
- se viaj vangoj al mi ne mensogis, 49.
Venedico as vi, Caccianimico;
sed en ĉi sala val' vin kio lokis?«
- Kaj li: Mi ne parolus, sen instigo 52.
de via lingvo, kies klara stilo
pri l' mond' malnova estas memorigo.
- Ghisolabellan al la amdeziro 55.
de l' grafo mi devigis, sin transdoni,
kiel ajn klaĉu stulta onidiro.
- Ne sola bolonjan' mi devis droni, 58.
ĉi lok' de ili estas tiel plena,
ke vi ne aŭdas tiom langojn soni
- per *sipa* inter Reno kaj Savena; 61.
se, tion kredi, pruvojn vi pretendas,
pensu pri nia mens' avar-katena.«
- Nun lian haŭton per skurĝbato fendas 64.
demono: »For! prostituisto fia!
ĉi tie inojn oni ja ne vendas!«
- Nun mi reiris kun Eskorto mia 67.
kaj poste, post kelk paŝoj ni alvenis
al pont' iranta al la first' alia.
- Ni ĝin ascendis sen ke ni tre penis, 70.
sur ĝia supro dekstren ni paŝadis
kaj de l' eternaj cirkloj vojon prenis.

- Ĉe l' loko, kie vake ĝi arkadis 73.
 por doni vojon al skurĝita gento,
 »Nun ekrigardu — min la Duk' persvadis —
 l' aliajn misnaskitojn kun atento, 76.
 kiuj vizaĝe estis nevidataj,
 ĉar laŭ ni marŝis ĝis nun ĉi taĉmento.«
 De l' praa pont' mi per okuloj gvataj 79.
 rigardis pri l' alia bando svarma,
 kiun simile pelis vipoj bataj.
 Nun diris, sen demand', la Duko ĉarma: 82.
 »Vidu ĉi grandan, kiu ĵus alvenis,
 kaj iras tra l' dolor' sen guto larma!
 Kian aspekton reĝan li retenis: 85.
 Jasono, kiu ruze kaj kuraĝe
 de la kolhanoj la orlanon prenis.
 Li pasis preter Lemno marvojaĝe, 88.
 kie la virojn en koler-eksceso
 mortigis la virinoj ĵus sovaĝe.
 Kaj li per elokvento kaj promeso 91.
 la junan Hipsifile trompis flate,
 kiu ĵus ĉiujn trompis kun sukcesoj.
 Li ŝin forlasis sola gravedstate. 94.
 Ĉi punon al li tia kulp' mezuras,
 kaj pro Medea pentas li punate.
 Ĉiuj simile kulpaj kun li kuras. 97.
 Sed jam sufiĉe pri la val' unua
 kaj pri l' pekuloj, kiujn ĝi torturas!
 Ni venis tien, kie al la dua 100.
 bordfirsto jam la streta voj' sin kroĉis,
 formante ŝultron kun ĝi al arko plua.
 Ni aŭdis ombrojn, kiuj plende voĉis 103.
 en la alia burso kaj snufegis,
 kaj sian haŭton per la ung' pioĉis.
 La tutan bordon densa ŝimo tegis 106.
 per la haladz', kiun la sub' elblovis
 kaj kiu nazon kaj okulojn segis.

- Gis nigra fund' penetri vid' ne povis 109.
antaŭe, ol ni estis ĉe l' kulmino
de l' arko, kiu super ĝi sin trovis.
- Ni ĝin ascendis; kaj en foso-sino 112.
mi vidis ombrojn en la akumululo
de sterko, kia venas el latrino.
- Kaj vidis mi, serĉante per okulo, 115.
homkapon tiel merdan, ke, explore,
ne sciis mi, ĉu pastr' aŭ laikulo.
- Li kriis: »Kial vi rigardas bore 118.
plie pri mi, ol pri l' aliaj fekaj?«
Kaj mi: »Ĉar se mi pravas rememore,
mi vin ja vidis jam kun haroj sekaj; 121.
tial, Alessio Interminei el Lucca
mi pleje vin rigardas el ĉi pekaj.«
- Nun li, batante sin ĉe l' osto nuka: 124.
»Ĉi tien devis mi pro l' lango sinki
neniam sata je flatado muka.«
- Tiam la Majstro: »Volu iom svingi 127.
rigardon pli antaŭen, por ke vide
vi povu la vizaĝon ĝisatingi
- de l' ino, kiu hirte kaj sordide 130.
gratadas sin per merda ungo pinta
jen starigante, jen kaŭrante side.
- Jen Thais, la putino, respondinta 133.
al sia drud' je l' vortoj: Ĉu sincere
vi min tre amas? — Ho, kun am' mirinda!
- Sed tiom vidi jam sufiĉas vere!« 136.

DEKNAŬA KANTO

LA BRULANTAJ PLANDOJ

Mago Simon, laŭ la Biblio, volis aĉeti de Sankta Petro dian favoron por mono; pri li oni nomis *simonio* la pekon: fari komercon pri sanktaj aferoj.

La preĝejo de Sankta Johano (San Giovanni) estas la baptokapelo de l' florenca Katedralo. Ĝia bapto-puto havis plurajn aperturojn (baptolokoj). Dante, kiel prioro, foje devis unu el ili frakasi per hakilo, ĉar alie oni ne povis liberigi knabeton enpremiĝintan; pro tio multaj lin akuzis per sakrilegio.

La ombro, kiun la Granda (Papa) Mantelo dekoris, estis papo Nikolao III. (1277—1280), deveninta el la familio Orsini (Ursidoj). Laŭ la historiisto: »li estis la unua papo, en kies kortego la simonio estis tute senkaŝe farata por riĉigi la parencojn de la papo per bienoj, kasteloj kaj oro« Pro ricevita mono li subtenis la atakon de Petro Aragonia kontraŭ Karlo Anĵua (vd. Bio. 10 kaj 11.)

Pri papo *Bonifaco* vd. Bio. 12, 13, 14, 23, 31. Li papis de 1294 ĝis 1303. Pri lia »trompakiro« (abdikigo de Celestino) vd. Kanto III. Bonifaco estis grandscienca, tre kapabla homo, sed fierega, perfortema kaj senskrupula.

La sekvanta simonia papo estas Klemento V. (1305—1314), kiu tute sin submetis al la franca reĝo, eĉ la sidejon transmetis al *Avignon*. Vd. Bio. 14. kaj 29.

En la libro de la Makabeoj oni povas legi pri la misuzoj de la juda ĉefpastro *Jazon*, kiu la ĉefpastrecon aĉetis de reĝo Antiochus.

Mateo: apostolo elektita anstataŭ Judas, la »anim' malbona.«

En la Apokalipso skribas Sankta Johano pri la Virino sidanta super akvoj; Dante komparas la Eklezion al tiu virino: ŝiaj sep kapoj estas la sep sakramentoj, ŝiaj dek kornoj estas la Dek Ordonoj; ŝia edzo estas la papo. La sep kapojn kelkaj klarigas per la sep montetoj de Romo.

Laŭ malnovaj florencaj leĝoj la murdinton oni enterigis viva.

Vortklarigoj: *antifono* (s): psalmaĵo; *dekor* (s): dekoracii, ornam.

HO, Simon mag', ho aĉa sekvantaro, 1.
 ŝakristoj, kiuj Aĵojn de l' Sinjoro,
 fianĉinojn de l' Bonec', por akaparo
 prostituadas per arg'ent' kaj oro, 4.
 pri vi mi nun trumpetas, ĉar profundo
 de l' tria burs' vin tenas en doloro.
 Ĉe l' sekva tombo jam ni estas nun do 7.
 kaj sur la ponto al la punkt' almontas
 supera ĝuste al la mez' de l' fundo.
 Ho Pleja Saĝ', vi kian povon montras 10.
 ĉiele, tere kaj en la mislando
 kaj kia just' el via Forto fontas!
 Mi vidis, ke sur fundo kaj sur rando 13.
 la brunan rokon truas kav' ĉe kavo,
 ĉiuj rondformaj kaj de sama grando.
 Ne estis pli la larĝo kaj enhavo 16.
 ol kiajn havas vazoj ~~hapto~~kultaj
 en mia bela San Giovanni-navo.
 El ili, antaŭ jaroj ne tre multaj, 19.
 mi rompis unu por droninta bubo:
 jen la respond' pri ĉiuj klaĉoj stultaj.
 Ĉiu pekulo tra la buŝa tubo 22.
 piedojn, gambojn ĝis la kruro-diko
 elŝovis; restis la ceter' en subo.
 Kaj flamis ĉiu pland' kaj ĉe l' artiklo 25.
 ili ĝin skuis tiel energie,
 kvazaŭ ĝi estus fasko el saliko.
 Kiel la flamoj nur surface, strie 28.
 la oleitajn aĵojn ĉirkaŭbordas,
 ĉiuj kalkanoj tiel brulis tie.
 »Ho Majstro, kiu estas, kiu tordas 31.
 pli skue sin ol ĉiuj sub ĉi sorto
 — mi diris — kaj lin flam' pli ruĝa mordas?«
 »Volante, ke mi metu vin per porto 34.
 al bord' pli infra: scion vi akiros
 pri li kaj lia pek' el lia vorto.«

- Nun mi: »Min plaĉas, kion vi deziras,
vi estras, scias min senkontraŭstara
al vi, vi scias, kion mi ne diras.« 37.
- Tiam ekiris ni sur firsto kvara,
nin turnis kaj sinistren ni descendis
al fund' truita, strikte ĉirkaŭbara. 40.
- La bona Duk', ĉe kies flank' mi pendis
min ne delasis nun, ĝis li min lokis
ĉe tiu, kiu per la gamboj plendis. 43.
- »Animo trista, kiun oni blokis
por stari, kiel tere la pilastro,
se eble, diru, kiu vi?« — mi vokis. 46.
- Mi staris kiel konfesprena pastro,
kiun murdisto, jam enterigato,
al si venigas por morto-prokrasto. 49.
- Li diris: »Ĉu vi venis al ĉi ŝtato,
ho Bonifaco, ĉu vi jam alvenis?
Kelk jarojn mi eraris do pri l' fato. 52.
- Ĉu tiel baldaŭ vi de sato plenis
pri l' bela Dam', kiun per tromp-akiro
vi alproprigis kaj mistrakte ĝenis?« 55.
- Mi estis, kiel staras hom' kun miro,
kiam respond' nekomprenebla sonis,
konfuze, nekapable por rediro. 58.
- »Diru: ne estas mi — Virgil' admonis —
ne estas tiu, kiu vi min kredis!«
kaj mi respondis kiel li proponis. 61.
- Nun la spirit' la gambojn torde knedis
kaj ĝeme, plende lia voĉo ploris
dum diris li: »Do kial vi min tedis? 64.
- Sed se ekkoni min al vi valoris
ĝis ĉi profund' la riskon de l' ekskurso,
sciu: Mantelo Granda min dekoris. 67.
- Altigi mi deziris, fil' de l' Urso,
l' ursidojn, tial lokis mi subsune
la monon, tie ĉi min mem, en burso. 70.

- Sub mia kapo kuŝas ĉiuj kune, 73.
kiuj antaŭis min en simonio,
rokfendoj ilin nun platigas pune.
- Mi mem subglitos al ĉi kompanio, 76.
post ven' de tiu, kiu erarkrede
mi vin supozis ĉe l' demand' pri tio.
- Sed tiel longe, kiel mi ĉi-bede 79.
elŝovas krurojn en renverso jena,
ne estos li plantita ruĝpiede,
- ĉar post li venos eĉ pli kulpoplana 82.
pastro senleĝa el la Okcidento,
por kovri min, li estos tre konvena.
- Jen nova Jazon: tiu de l' legendo 85.
de l' Makabeoj; tiun reĝ' karesis,
ĉi tiun same, reĝ' de l' franca gento.»
- Cu eble trokuraĝe mi frenezis, 88.
ke respondante tiel mi ekbolis:
»Ej, diru, kiom da trezor' enspezis
- de Petro la Sinjor'? Li kiom volis 91.
por la ŝlosiloj? Certe, ĉe l' transdona
momento nur: »Min sekvu!« — li parolis.
- Kaj ĉu Mateon post eltordo mona 94.
do Petro kaj l' aliaj alvenigis
al lok', perdita de l' anim' malbona?
- Do kuŝu! Justa pun' vin tie ligis! 97.
kaj gardu bone pri la mon' malbena,
kiu vin kontraŭ Karlo ekinstigis.
- Kaj se en mia kor' ne estus plena 100.
la respektig' al la ŝlosiloj savaj,
kiujn vi tenis en la viv' serena,
- parolus mi per vortoj eĉ pli gravaj, 103.
ĉar mondon via avarec' infektis
per prem' de l' bonaj, levo de l' malpravaj.
- L' evangelist', ho papoj, vin konjektis, 106.
kiam virinon super akvoj sidi,
kun reĝoj putinadi li perceptis.

- Sep kapojn oni povis sur ŝi vidi, 109.
dek kornoj donis al ŝi la defendon,
dum lasis sin de virt' la edzo gvidi.
- Vi faris Dio oron kaj arĝenton, 112.
pli ol paganoj vi idolaniĝis,
tiuj adoras unu kaj vi centon.
- Oj, Konstantino, kiom malfeliĉis, 115.
ne via konvertiĝ', sed via dono,
per kiu unuafoje papo riĉis.«
- Kaj dum mi kantis kun ĉi antifono, 118.
ĉu l' konscienco aŭ koler' lin maĉis:
la krurojn forte skuis ĉi persono.
- Mi kredas, ke la Dukon tio plaĉis, 121.
ĉar kun kontentaj lipoj li atentis,
kion tre klare diri mi kuraĝis.
- Kaj poste ambaŭ brakojn li etendis 124.
kaj, min preminte al la brust', li prenis
la vojon, kiun ĵuse li descendis.
- Kaj ne lacigis lin, ke li min tenis, 127.
li portis min sur arkon, kiu kile
la kvaran firston al la kvina ĉenis.
- Ĉi tie li demetis min ĝentile 130.
sur vojo kruta, krude malegala,
kie eĉ kapro irus malfacile.
- Montriĝis nun alia fundo vala. 133.

DUDEKA KANTO

LA TORDITAJ KOLOJ

Oka rondo, kvara burso: aŭguristoj kaj sorĉistoj.

Amphiaraos (Amfiarao), unu el la sep reĝoj sieĝintaj Tebon. Kiel divenisto, li antaŭvidis sian pereon kaj ne volis tien iri kaj sin kaŝis. Oni malkovris lian kaŝejon kaj devigis lin kuniri. Ĉe Tebo sub li fendiĝis kaj lin englutis la tero.

Tiresias estis aŭguristo en Tebo, urbo de Bakho (mezepoke: Baco). Laŭ la superstiĉo, kiu disigas seksumantan serpentoparon, tiu ŝanĝas sian sekson. Tiresias, laŭ la mito, estis sep jarojn virino. *Aruns*: etruska divenisto, kiu aŭguris al Julius Caesar la venkon ĉe Pharsalia (Lucanus: Pharsalia I. v. 586 k. s.).

La filino de Tiresias estis *Manto*, fondintino de *Mantova*, naskurbo de Virgilo.

La *Benaco* (Benacus) alie nomiĝas Garda-lago.

La punkto, kie tri episkopoj povas doni benon, estas la tuŝpunkto de l' tri eparkioj.

En Mantova estris la *Casalodi*-familio, helpe de gelfoj, sed en la urbo estis granda malkontento. *Pinamonte de' Bonacolti*, persvadis grafon Alberto de' Casalodi, ke li ekzilu parton de l' gelfaj nobeloj; tiel malfortiĝis la potenco de Casalodi kaj Pinamonte facile lin venkis, kaj parte ekzilis parte mortigis la gelfajn nobelojn.

Kiam la grekoj ekiris kontraŭ Trojo, ili devis longe restadi en *Aŭlido*, ĉar la dioj ne donis venton; por akiri la favoron de la dioj, ili devis oferi Ifigenian. *Kalthas* kaj *Eurypilos* aŭguris la tempon de l' ekveturo kaj donis signon por tranĉi la tenan ŝnuregon de l' ŝipoj. Tion rakontas Virgilo en sia *Aeneis*.

Mihelo Skoto estis fama kuracisto kaj astrologo en la kortego de Frederiko II.

Guido Bonatti: fama astrologo en Forlì, mortis ĉirkaŭ 1290. *Asdente*: ŝuisto en Parma, kiu fariĝis astrologo.

La sorĉistinoj faras vaks-pupon kaj ĝin pikadas per pinglo aŭ fandas sur malrapida fajro: la pikojn kaj bruldolorojn sentas tiu, kiun ili volas misŝorĉi.

La itala kampulo vidas en la luno Kainon kun dorn-fasko.

La luno okcidente, inter la du hemisferoj, tuŝas la ondojn de l' maro: estas matene je la sepa horo, Sankta Sabato.

Vortklarigoj: *kopuli* (*): seksumi; *temerara* (gm): trokuraĝa.

P RI nova pun' mi devas skribi strofojn, kaj en kanzon' unua, pri l' Infero, al la dudeka kanto doni ŝtofojn.	1.
Mi prete staris jam ĉe l' rokbordero, rigardi ĝis la nekovrita fundo, bananta sin en larmoj de sufero,	4.
kaj vidis ombrojn tra la vala rondo venantajn, mute, larme, en patrolo, kiel litaniantoj en ĉi mondo.	7.
Pli infren mi rigardis pri l' popolo. kaj ilin ĉiujn, mirindege, trovis torditaj inter la menton' kaj kolo.	10.
La frunto frontis dorsen kaj sin movis retroirante tiu trup' funebra, ĉar antaŭenrigardi ĝi ne povis.	13.
Laŭdire paraliz' per tord' vertebra jam povis homon tiel turn-kateni, sed mi nek vidis ĝin, nek kredas ebla.	16.
Legant'! se Dio lasas vin frukt-preni el via leciono, pensu sente, ĉu sekaj povis mi l' okulojn teni	19.
ĉe l' vid', ke tiel tordis sin turmente la homfigur', ke l' larmoj de l' okuloj fluis tra l' fendo de la pug' torente.	22.
Ja ploris mi, al duraj rokanguloj min apogante, sed la Duk' ekvortis: »Ĉu do vi agas laŭ malprudentuloj?	25.
Bonec' tie ĉi vivas, se ĝi mortis; ja kio pli malpia, ol pasie prijuĝi, kion dia just' alportis?	28.
Levu la kapon, vidu, iras tie, sub kiu fendis sin la ter' murmure antaŭ l' Tebanoj, kiuj vokis krie:	31.
»Kien vi, Amfiarao, fuĝas kure el la batal'?» — kaj li ne haltis, falis ĝis Minos, kiu kaptas ĉiun dure.	34.


- Vidu, el sia brust' li dorson faris, 37.
retrorigarde iras dorsdirekte,
ĉar li tro antaŭvidi temeraris.
- Jen Tiresias, kiu tutaspekte 40.
virformon sian al virina cedis,
kaj ĉiun membron ŝanĝis li perfekte,
- kaj nur post ol vergbate li dismetis 43.
serpentoparon, kopulantan glue,
li siajn virajn plumojn reposedis.
- Post lia ventro Aruns dorsas plue, 46.
kiu sur Luni, kie gent' Carrara,
loĝanta sube, hakas arbdetrue,
- en blankmarmora grot' de l' mont' arbara 49.
ekloĝis, por observi stelo-flamojn
kaj maron, — lia vid' estis senbara.
- Vidu virinon, kiu kovras mamojn 52.
nun forturnitajn, per la hartorento,
portante transe ĉiujn harornamojn:
- jen Manto! Serĉis ŝi laŭ ĉiu vento, 55.
ĝis haltis ŝi en mia naskpejzaĝo.
Sed nun aŭskultu pri mi kun atento.
- Post kiam ŝia patr' en maljunaĝo 58.
jam mortis kaj sklaviĝis urb' de Bako,
tre longe migris ŝi en vagvojaĝo.
- En bela Italio kuŝas lago 61.
sub Alpoj, kiuj Germanion zonas
super Tirol'; la nom' estas Benaco.
- Mil fontoj, aŭ eĉ pli, la akvon donas 64.
inter la Garda kaj Val Cammonica
al alp-riveroj, kiuj en ĝi dronas.
- Lok' estas meze: el ĉi punkt' unika 67.
por episkop' de Brescia kaj Verona
kaj Trento same eblus ben' publika.
- Peschiera, bela fortikaĵ' impona 70.
frontas al Brescia kaj Bergamo fiere,
kie descendas jam la bordo ŝtona.


- Tie verŝiĝas l' akvo transbordere, 73.
per kiu la Benaco plenus tro,
tra l' verda kamp' ekfluas ĝi rivere:
- Ekde l' ekkur' ĝi ne nomiĝas do 76.
Benaco plu, sed Mincio, ĝis ĝi falas
apud Governo al la sin' de l' Po.
- Post kur' nelonga, ĉi river' alvalas, 79.
sin sternas, kaj estiĝas marĉ' apuda,
kiu pro febro dum somer' fatalas.
- Veninte tien, la virgino kruda 82.
marĉmeze vidis teron, kiu estis
sen kulturad', kaj de loĝantoj nuda.
- Por fuĝi homkunulojn, jen ŝi nestis 85.
kun servistar', praktikis sian arton,
kaj ŝia korp', mortinte, tie restis.
- Cirkaŭaj, disaj homoj en ĉi parton 88.
kuniĝis poste, ĉar ĝin marĉo baris
de ĉiu flank', donante fortan gardon.
- Sur ŝiaj ostoj ili urbon faris, 91.
kaj, pri l' lok-elektinto, senkonsulte
je l' sort', Mantova ili ĝin deklaris.
- Popolo ĝia densis jam pli multe, 94.
antaŭe, ol de l' ruza Pinamonte
trompita estis Casalodi stulte.
- Do, konsideru, se ali-rakonte 97.
vi aŭdos pri l' deven' de mia tero:
mensog' ne kovru veron, vin tromponte.»
- Nun mi: »Ho Majstro, certas mi pri l' vero 100.
de via vorto, mi ĝin tiel kredas,
ke ĉio kroma estas nur cindrero.
- Sed, ĉu de l' svarmo, kiu sin ekspedas, 103.
vi trovas iun inda je mencio,
ĉar ĝi la menson ĉiam reobsedas.»
- Li diris: »Tiu, kies barbostrio 106.
sur brunan dorson fluas el sub lipo,
kiam ekmankis viroj en Grekio

(apenaŭ restis en lulil' el tribo),	109.
kun Kalhas en Aŭlido signon donis	
tranĉi la ŝnuron de l' unua ŝipo.	
Li estis Eŭripilo; ke kanzonis	112.
lin mia alta kanto tragedia,	
vi scias, kiu l' tutan ja ekkonis.	
Jen, tiu tre malgrasa vir' alia	115.
estis Mihelo Skoto: eminente	
li lertis en la trompa art' magia.	
Guido Bonatti sekvas; jen Asdente.	118.
Ke li ne restis ĉe l' ŝuist-okupo,	
malfrue tion li bedaŭras pente.	
Jen tristulinoj, kiuj de la stupo,	121.
boben', kudrilo fuĝis kaj estonton	
divenis, sorĉis per herbar' kaj pupo.	
Sed venu, ĉar atingis la renkonton	124.
de l' hemisferoj, kaj jam sub Sevil	
Kaino kaj la dornoj tuŝas ondon,	
kaj jam hieraŭ plenis la lunbrilo;	127.
memoru: ke en dens' arbara foje	
aperis ĝi, ne estis malutilo!«	
Li diris, kaj ni tuj pluiris voje.	130.




Mago Simon kaj aliaj magoj.





La regiono de Mantova



DUDEKUNUA KANTO

LA MISUNGOJ

Oka rondo, kvina burso: trompisto; ilin gardas la Misungoj (Malebranche): diablo-regimento.

La urbo de Zita estas *Lucca*. Sankta Zita estis servistino en Lucca, ŝi vivis tiel sankte, ke, laŭ la legendo, dum ŝi preĝis, ŝian laboron faris anĝeloj. Ŝi mortis en 1272.

La estraranoj de Lucca estis misfamaj pri sia subaĉetebleco. *Bonturo Dati* estis la plej malbona el ili.

La *Serchio* estas rivereto apud Lucca.

La »*Sankta Bildo*« estas miraklofara Kristo-figuro, kultata en Lucca. Laŭ la legendo la vizaĝon de l' statuo ĉizis ĉiela mano, dum la skulptisto dormis.

Caprona kapitulacis al la kuniĝintaj armeoj de Florenco kaj Lucca (vd. Bio, 111.)

La sesa ponto rompiĝis, kiam Kristo descendis al la Limbo (vd. Kanto IV. v. 53; K. VIII. v. 124; K. XII. v. 37.). Tio okazis tuj post lia morto, laŭ la tradicio en la Sankta Vendredo de la jaro 34. posttagmeze je la tria. El la versoj 112—114 do oni povas elkalkuli, ke nun estas Sankta Sabato, antaŭtagmeze je la deka.

La diabloj cetere trompis Virgilon, ĉar ne ekzistas sendifekta ponto tie (vd. Kanto XXIII. v. 140.)

Vortklarigoj: *moroza* (*): grumbleme malbonhumora; *pakto* (*): reciproke deviga interkonsento; *pugo* (f. *): postaĵo.

Diablonomoj: *Malacoda* (Misvosto), *Scarmiglione* (Skrapilio), *Alichino* (Vespertego), *Calcabrina* (Prujnotreto), *Cagnazzo* (Rabimordo), *Barbariccia* (Barboriĉjo), *Libicocco* (Mis-kuiro), *Draghinazzo* (Drakonazo), *Ciriatto* (Gruntulo), *Graf-fiacane* (Hundungo), *Farfarello* (Hufhufo), *Rubicante* (Hirudo).

T IEL de pont' al pont', dirante aĵojn,	1.
kiujn ne kantos Komedio mia,	
ni iris, kaj haltigis niajn paŝojn	
sur kulmo por rigardi pri alia	4.
misburs', alia multa plendo vana	
en la obskur' mirinde emocia.	
Kiel en Arsenal' veneciana	7.
la peĉ' tenaca bolas por riparo	
dumvintra de l' ŝiparo ne plu sana,	
dum navigad' ne eblas: unu aro	10.
konstruas novan ŝipon, dua gluon	
ŝmiras al rip' irinta jam sur maro;	
tiu martelas poŭpon, tiu pruan,	13.
tiu remilojn ĉizas, aŭ por hardo	
gudrumas ŝnuron, flikas velotruon:	
jen, ne per fajro, sed per Dia arto	16.
boladis tie densa peĉ' senĉese,	
la bordojn gudris ĝi en ĉiu parto.	
Mi vidis ĝin, nenion vidis meze	19.
krom ringoj, kiujn la bolad' gargaris,	
dum ĝi jen ruktis, jen glatiĝis peze.	
Dum mi gapadis, mia Majstro faris	22.
averton, krie: »Jen, ĉu vi ne vidas?«	
kaj trenis min de l' lok', kie mi staris.	
Mi turnis min, laŭ hom', kiu avidas	25.
rigardi, kion li bezonus fuĝi,	
kaj kiu de subita tim' rigidas,	
samtempe penas vidi kaj rifuĝi:	28.
mi vidis post ni laŭ la klif' obskura	
diablon nigran kure pretermuĝi.	
Ho, kiel estis li sovaĝfigura!	31.
kiel min kaptis tim' kaj abomeno	
pro li, flugilaperta, facilkrura.	
Pekulon portis li en rajda teno	34.
sur sia akra, alta ŝultr' ekspede,	
kroĉtenis unge lin ĉe l' krurtendeno.	

- De l' pont' li kriis: »Jen, Misungoj, prede 37.
el urb' de Zita ano de l' estraro!
Enpuŝu! Mi rekuras rapidpiede
al tiu ter' abunda je ĉi varo; 40.
ja trompas ĉiu tie krom Bonturo,
kaj faras *jes* el *ne* por la denaro.«
Li ĵetis lin, kaj sur la klifa muro 43.
sin turnis; ne rapidas ja pli haste
eĉ la ŝafhund' en ŝtelispela kuro.
Kaj tiu dronis, la postaĵo laste. 46.
Demonoj svarmis sub la pont' kun bruoj,
kaj »Mankas Sankta Bildo« — mokis draste.
»Jen ban' alia, ol en Serchio-fluo! 49.
Se vi de l' forkoj volas resti pace,
ne levu vian kapon el la gluo!«
Pli ol cent forkoj pikis nun minace: 52.
»Okazu nun en kaŝo la marĉando!
se eble, trompu sube fisagace!«
Kuirbuboj laŭ la kuirist-komando 55.
tiel puŝadas forkojn en kaldrono,
por ke sub suko restu la viando.
La bona Majstro nun: »Por ke demono 58.
vin ne ekvidu, kaŭru apudvoje,
kaj ŝirmu vin malantaŭ granda ŝtono.
Kaj kiel ajn ĉi hord' insultos boje, 61.
ni konas ĝin, ne timu de l' renkonto,
mi vidis tian lukton alifoje.«
Kaj li ekiris al la kap' de l' ponto. 64.
Sed dum la sesan bordon li ektretas,
necesis el kuraĝ' ja riĉa fonto!
Kun kia sturmo kaj koler sin ĵetas 67.
la hundoj al la almozul' ĉifona,
kiu, haltinte tuj almozon petas:
jen saltis hord' el sub la ponto ŝtona, 70.
al li turniĝis ĉiu fork' sovaĝe,
sed »Min ne tuŝu!« — sonis vort' ordona.

- »Ja antaŭ ol min piki, estus saĝe,
se iu venus, ke mi ion diru,
surrostiligu poste min, laŭplaĉe.« 73.
- Ekkriis ĉiuj nun: »Misvosto iru!« 76.
kaj unu, dum postrestis la diablaro,
elpaŝis, diris: »Kiom ĝi utilu?«
- »Misvosto! ĉu vi kredas kun eraro, 79.
— la Majstro diris — ke mi nun sekura
alvenus, malgraŭ ĉiu via baro,
sen dia vol' kaj fato bonaŭgura? 82.
Translasu min, ĉar la ĉiel' ordonis,
ke iun gvidu mi tra l' voj' terura.«
- Ties orgojlo post ĉi vortoj ĉronis, 85.
al la piedoj falis lia hoko.
»Do iru senofende!« — li disponis.
- La Majstr' al mi: »Ho vi, kiu post roko 88.
de l' ponto, por vin ŝirmi, ĵus eksidis,
elvenu jam sekure del' kaŝloko.
- Kaj mi min movis kaj al li rapidis, 91.
sed la demonoj svarmis jam proksime,
ke ili tenos pakton: mi ne fidis.
- Tiel mi vidis la soldatojn time 94.
elmarŝi post la pakto el Caprona,
dum malamikoj staris ĉirkaŭlime.
- Mi min alpremis al la flank' Patrona, 97.
okuloj miaj ne plu povis vagi
for de aspekt' ilia, ja ne bona.
- Svingiĝis forkoj, kaj: »Ĉu lin ekhaki 100.
— l' unu al dua kriis — ĉe l' talio?«
»Jes! — li rekriis — kaj ĝi devas kraki!«
- Sed la demon' de l' ĵusa konvencio 103.
kun mia Majstro, turnis sin subite,
dirante: »Haltu, haltu, Skrapilio!«
- Poste al ni: »Ĉi tie malhelpite 106.
estas pluiri, vojon fendo ŝiras;
la sesa arko funde kuŝas splite.

- Sed se antaŭen iri vi deziras, 109.
do marŝu nur laŭ ĉi abrupta kruto:
tra l' pont' proksima transen vojo iras.
- Hieraŭ, horojn kvin post ĉi minuto 112.
kaj antaŭ mil ducent sesdek ses jaroj
rompiĝis ja ĉi tiu voj' en tuto.
- Mi ĝuste sendos kelkajn el ĉi aroj, 115.
gardi, ke ne emerĝu kulpa beko;
kuniru do, ne trafos vin misfaroj.
- Antaŭen, Prujnotreto, Vespertego, 118.
komandis li — kaj Rabimord' moroza!
Kaj Barboriĉjo estru pri la deko.
- Kaj marŝu Miskuiro kaj dentoza 121.
Gruntulo, Drakonazo kaj Hundungo,
Hufhufo kaj Hirudo furioza.
- Kaj ilin ĉirkaŭ l' bola peĉinundo 124.
sekure gvidu sur la transan bordon,
al first' kompleta super la profundo.«
- »Ve, Majstro, kio do? — mi ĝemis vorton. — 127.
Prefere solaj iru ni, sen gvido,
se eble. Mi ne petas ĉi eskorton.
- Se laŭ kutim' vi saĝas kun klarvido, 130
ĉu vi ne vidas, ke nin grinca dento,
malica brov' minacas per insido?»
- Lí diris: »Ĉesu via tima sento, 133.
ili grincigu dentojn, ĉi rikano
koncernas nur je l' kuirata gento.«
- Ni iris borde laŭ maldekstra mano, 136.
sed antaŭ tio langon ili elmetis
kaj dentojn, signe, al la kapitano,
kaj tiu per la pugo ektrumpetis. 139.

DUDEKDUK KANTO

INFERA FARSO

Gverilbatalon en Arezzo Dante vidis en la batalo ĉe Campaldino (vd. Bio. 11.)

La vigla saltado de la delfenoj antaŭdiras tempeston.

La ombro, kiu trompas la diablojn, estas *Ciampolo* el Navara, konfidulo de l' reĝo de Navara: *Tibaldo V.*

Frato (monaĥo) *Gomita* estis konfidulo kaj kanceliero de Nino Visconti, estro de l' provinco *Gallura* en Sardinio. Visconti blinde fidis la trompulon, ĝis Gomita, subaĉetite, liberigis liajn plej akrajn malamikojn; tiam li igis lin pendigi.

Michel Zanche, juĝisto de la sardinia provinco Logodoro, delogis la edzinon de sia kaptita sinjoro reĝo Enzio kaj post la morto de l' reĝo ŝin al si edzinigis kaj per tio akiris la estrecon super la provinco. Lin mortigis lia bofilo Branca d' Oria (vd. Kanto XXIII. v. 140.)

La sardinianoj en eksterlando ege emas paroli pri sia patrujo (Philaites).

Vortklarigoj: *gverilo* (*): surprizmilito; *plongi* (*): salti en akvon; *tosko*: toskano.

VIDIS mi skadrojn el tendar' ekiri, 1.
 komenci sturmon, fari rajdparadon,
 kaj por rifuĝo kure sin retiri,
 sur via ter' mi vidis la invadon, 4.
 Arezzo, vidis trupojn de gveriloj
 fari turnirojn, kuri lancrompadon,
 laŭ signo de trumpetoj, sonoriloj, 7.
 tamburoj, fajroj sur la citadelo,
 laŭ iloj de enlanda, fremda stiloj,
 sed ja laŭ tiel stranga flut' el felo 10.
 sin movis nek piedrotoj, nek skadronoj,
 nek ŝipo, kiun gvidas ter' aŭ stelo.
 Ni iris, iris kun la dek demonoj. 13.
 Ve, kruda kompani'! sed kun sanktuloj
 en templo, kun drinkuloj en drinkdomoj!
 Mi nur la peĉon fiksis per okuloj 16.
 por vidi ĉion en ĉi ve-baseno
 kaj tiujn, kiuj sidis en la bruloj.
 Kaj, kiel se delfeno post delfeno 19.
 dorsmontre donas signon al ŝipmastro,
 ke tempas porti ŝipon al haveno:
 jen, por mildigi brulon pro la pasto, 22.
 pekuloj montris dorson por momento,
 redronis tuj en fulmrapida hasto.
 Kaj, kiel ĉe marĉ-rand' la ran-taĉmento 25.
 elŝovas sin el akvo nur ĝis kolo,
 dum kaŝas sin piedoj, dika ventro,
 tiel elstaris la pekul-popolo, 28.
 sed kiam Barboriĉjo en proksimo
 jam venis, ili dronis en la bolo.
 Mi vidis, eĉ nun tremas la animo, 31.
 ke unu tardis, kiel ran' el grupo
 plu restas, dum l' aliaj jam sub ŝlimo.
 Hundungo, plej proksima el la trupo, 34.
 ĉe l' peĉa har' lin kaptis hok-bastone,
 kaj, kiel lutron, levis el la supo.

- Ilian nomon mi jam konis bone, 37.
 notinte ĉe l' elekto de la svarmo
 kaj kiam ili sin vokadis nome.
- »Hirudo! ŝiru! ungon al dorskarno! 40.
 el lia haŭto ŝiru vastajn flikojn!«
 La malbenitoj kriis kun alarmo.
- Kaj mi: »Ĉu, Majstro, povus vi sciigojn 43.
 de li ricevi, kiun sort' amara
 venigis inter liajn malamikojn?«
- Kaj paŝis al li mia Duk'o kara, 46.
 pri li demandis; la respondo sonis:
 »Naskiĝis mi en region' Navara;
 patrin' en servon de sinjor' min donis, 49.
 ĉar patro estis malpiul' kun hardo,
 li, lia havo, en disipoj dronis.
- Kaj konfidul' de l' bona reĝ' Tibaldo 52.
 mi iĝis, donis min al tromp' kaj fuŝo,
 la konton nun mi pagas en ĉi ardo.«
- Tiam Gruntulo, kiu en la buŝo 55.
 duflanke denton, kian porko, tenis,
 sentigis ĝin al li per ega puŝo.
- La muso inter misajn katojn venis; 58.
 sed Barboriĉjo nun lin ĉirkaŭbrakis
 kriante: »Lasu nun, mi lin katenis!«
- Kaj, sin turninte al la Duk', li grakis: 61.
 »Demandu, kion ĵus vi scii volis,
 nun, antaŭ ol ĉi tiuj lin dishakis.«
- La Majstro: »Do, kun kiuj ĵus vi bolis 64.
 en peĉo, inter tiuj ĉu latino
 troviĝas?« »Certe, jes! — li reparaolis —
- ĵus estis iu al mi en proksimo; 67.
 ho, ke kun li mi sidus nun kaŝate,
 pro l' ungoj, forkoj min ne premus timo!«
- Nun Miskuiro: »Ni toleris sate!« 70.
 kaj lin ĉe l' brak' per forko ekmartelis,
 karnpecon el ĝi li elŝiris grate.

- Jam ankaŭ Drakonazo pinĉi celis 73.
la gambon, sed la estro de l' komando
kun brov' kolera ilin tuj repelis.
- Kiam paciĝis iom jam la bando, 76.
al li, gapanta al la vund' malpura,
la Majstro tuj sin turnis kun demando:
- »De kies flank' por sorto misaŭgura, 79.
kiel vi diris, al la bord' vi venis?«
»Li estis frat' Gomita el Gallura,
la vaz' de ĉiu fraŭdo. Li jam tenis 82.
malamikojn de sia sir' subpiede,
kaj faris, ke lin ili laŭde benis.
- Li prenis monon, lasis ilin »kvieta«, 85.
kiel li diris; ankaŭ aliflanke
trompadis li, kaj grande, ja ne ete!
- Kaj li kompanas nun kun Michel Zanche 88.
el Logodoro; ili ja, se temas
pri Sardinio, ne laciĝas lange.
- Sed ve, jen tiu kun rikan' mordemas! 91.
mi dirus pli, sed ke ĉe l' haŭt' ĉifona
la favon gratos li, mi time tremas.«
- Tiam Hufhufon la prepost' demonas 94.
(ĉar tiu strabis jam por draŝi haŭte)
alkriis: »Huŝ de li, vi bird' malbona!«
- »Se volas vi renkonti vide, aŭde 97.
lombardon, toskon: logos mi per voko.«
La terurito diris nun mallaŭte.
- »Se la Misungoj kaŝos sin post roko, 100.
ne timos ili de la puno dura,
kaj mi, sidante en ĉi sama loko,
- venigos sep ja, por mi, ununura, 103.
per fajfo, kiel signas ni laŭ ordo,
ke la elveno estas jam sekura.«
- Ekleviis sian nazon Rabimordo, 106.
kapskue kriis: »Ho, malica blago!
tiel li volus plonĝi de la bordo!«

- Kaj li, lertega en ruztrompa ago, 109.
 respondis: »Vere, mi malicas grande,
 kaŭzante al la miaj pli da plago.«
- Avide Vespertego, kontraŭante 112.
 l' aliajn, diris: »Se vi fuĝi provos,
 mi certe post vi ne galopos plande,
 sed super peĉ' mi la flugilojn movos. 115.
 Ni iru! Kaŝu nin la bordo kruta!
 Ni vidos ja, ĉu vi nin venki povos!«
- Leganto, aŭdu: nova farso luda! 118.
 Forturnis sin la demon-karavano,
 unue mem la rezistint' plej kruda.
- Ci tempon uzis ja la navarano. 121.
 Li streĉis plandojn kaj per salt' sin savis,
 tiel eskapis de ilia plano.
- Ciuj, sed pleje kulpkonscion havis, 124.
 kiu por ĉi fiask' ilin konvinkis,
 postsaltis li, kriante: »Mi vin trafis!«
- Sed vane, la flugiloj ne atingis 127.
 la timon. Kaj ĉi tiu dronis glite,
 kaj tiu sin, brustleve, suprensvingis.
- Tiel sin mergas la anas' subite 130.
 pro l' falko, kiu, post la persekuto
 returnas sin kolere, lacigite.
- Prujnотреto, tedita de la tuto, 133.
 postflugis lin, ĝojante, ke prosperis
 la fuĝo: estas kaŭzo por disputo.
- Li, kiam la trompisto malaperis, 136.
 atakis la kunulon kun sovaĝo,
 super la peĉ' sin ili aglomeris.
- Sed akra nizo estis ĉi birdaĉo, 139.
 li havis ungojn por la ŝir' de karno,
 kaj ambaŭ falis al la bola kaĉo.
- Disigis ilin tuj la ega varmo, 142.
 sed levi sin ja estis vana peno,
 sur la flugiloj pezis peĉa garno.

-
- Flugigis Barboriĉjo en ĉagreno 145.
tuj kvar diablojn al la transa rando,
kun forkoj. Kuris ĉiuj al posteno
ĉi tien, tien, kaj la tuta bando 148.
forkĉasis pri l' gudritaj du kolegoj,
en krust' bakitaj jam de kap' ĝis plando.
Ni iris for dum tiuj klopodegoj. 151.

DUDEKTRIA KANTO

EN PLUMBOVESTO

La muso petis la ranon, ke ĝi transportu ĝin trans la riveron. La rano ruze ligis la piedon de l' muso al sia piedo, por ke ĝi, dronante, ĝin sufoku. Sed venis nizo, kaptis la muson, kaj la alligita rano ne povis rifuĝi. Kiel la malbonvolo de l' rano, tiel nun estis punita la malbonvolo de l' diabloj.

Oka rondo, sesa burso: hipokrituloj en plumbtalaroj, kvazaŭ monaĥa kolegio.

Frederiko II. la majest-ofendintojn vestigis per plumba talaro, kaj la talaron fandigis per fajro.

Pri la »gajaj fratoj« vd. Bio. 9.

Gardingo estas urboparto en Florenco; tie estis la domo de la gibelina Uberti-familio, kiun oni bruligis dum la malordoj estigitaj de la regado de l' gajaj fratoj.

La krucumito estas ĉefpastro Kaifas, kiu motivis la krucumon de Kristo jene: »prefere mortu unu homo, ol pereu la popolo«. Lia bopatro estis ĉefpastro Annas. Virgilo, de sia unu descendo, ne vidis Kaifaŝ-on, ĉar tiu ankoraŭ vivis tiam.

En Bologna instruis famaj teologoj.

Pri la trompo de la diabloj vd. Kanto XXI.


- S**ILENTAJ, solaj kaj senakompanaj, 1.
antaŭe li, kaj post li mi, ni iris,
kiel survoje fratoj franciskanaj.
- Kaj fablo de Ezopo al mi giris 4.
tra l' kapo pro la stranga katastrofo,
fabel', kiun pri mus' kaj ran' li diris.
- Car ja ne pli similas ov' al ovo, 7.
ol ĉi rakontoj inter si, se l' menso
komparas ilin kun atenta provo.
- Kaj kiel pens' burĝonas el la penso, 10.
el tiu ĉi nun tia pens' naskiĝis,
ke l' timo duobligis en intenso.
- »Pro ni ja ili honte malfeliĉis 13.
per ruza tromp' — mi pensis kun angoro —
mi kredas: tio por koler' sufiĉis.
- Se al malic' pariĝos ĉi rankoro, 16.
ili postkuros nin pli sangavide,
ol hundo dum la pelo de leporo.«
- Stariĝis miaj haroj nun rigide 19.
de l' timo kaj, dum halte mi atentas,
mi diris: »Majstro, ĉu ne plej rapide
- ni kaŝu nin? Timego min turmentas, 22.
ke la Misungoj estas jam proksime,
mi imagas tiom, ke mi ĝin jam sentas.«
- Li: »Se spegul' mi estus, pli intime 25.
mi vin ne montrus korpe, ol nun montras
l' animo, kion kaŝas vi anime.
- Car mian penson via pens' renkontas 28.
simila laŭ mien' kaj laŭ konduto,
tiel ke sama plan' el ili fontas.
- Se estas eble sur la dekstra kruto 31.
descendi kaj en pluan burson veni,
mi fuĝos de l' timata persekuto.«
- Sed tiu plano eĉ ne povis pleni, 34.
jen, ili venis jam, flugil-agite,
ne malproksime, nin volante preni.

- Nun mia Majstro prenis min subite, 37.
kiel patrin', kiu vekita estas
de bruo, jam de flamoj ĉirkaŭite,
la filon kaptas, kuras, en ŝi nestas 40.
nur pri la fil', ne pri ŝi mem la zorgo,
tiel, ke ŝin ĉemizo sola vestas.
Kaj nun, ĉe l' kolo de la kruda bordo 43.
li grimpis infren sur la vertikalo,
kiu al plua burso estas pordo.
Ne kuras tiel akvo tra l' kanalo 46.
por turni radon de la muelilo,
eĉ en proksim' de l' turbo, antaŭ falo,
kiel la Majstro, rande de l' montkilo, 49.
subglitis, dum li min surbruste tenis,
kvazaŭ mi estus ne kunul', sed filo.
Apenaŭ l' fundon de l' ravin' ni venis, 52.
ili aperis jam ĉe l' supra rando,
tuj super ni, sed tio lin ne ĝenis,
Car l' alta providenc', kies komando 55.
servigas ilin en la foso kvina,
forlasi ĝin malhelpas al ĉi bando.
Malsupre gent' farbita kaj kapklina 58.
kun pigra paŝ' rondire teron tretas,
lamentas, ŝajnas laca kaj ruina.
Sur kap' kapuĉoj basaj siluetas, 61.
tiritaj sur okulojn, tiatajlaj,
kiajn monakoj en Kolonjo metas.
Ekstere oraj, brile okulfajlaj, 64.
sed ene plumbaj, laŭ la pez' ekstremaj,
tiel ke l' Frederikaj ŝajnus pajlaj.
Ho ve, manteloj por eterne premaj! 67.
kun ili iris ni, sinistren anke
ĉifoje, dum aŭskult' al plendoj ĝemaj,
Sed ĉi laculoj iris tiel kankre 70.
sub pezo, ke sufiĉis gambon movi,
por societon novan havi flanke.

- Kaj al la Majstro mi: »Ĉu eblus trovi 73.
konatan ĉu laŭ faroj, ĉu laŭnome,
l' okulojn ĉirkaŭturnu do, por provi.«
- Ke mi parolas toskanidiome, 76.
ekaŭdis iu, kriis: »Haltu, viro,
kuranta tra ĉi nigra lok' tiome.
Per mi pleniĝos eble ĉi deziro.« 79.
Tiam »Atendu — diris mia Mastro —
mezuru paŝojn do laŭ lia iro.«
- Mi vidis, ke montriĝis granda hasto 82.
anima sur du mienoj, por kuniri,
sed ja malhelpis ŝarg' kaj vojmalvast.
- Aliris mi, kaj strabokule miri 85.
komencis ili min, sen ekparolo,
interkliniĝis poste, por ekdiri:
»Li vivas ja, moviĝas lia kolo! 88.
Aŭ mortis? Kia do privilegio
lin lasas tie ĉi sen peza stolo?«
- Poste: »Toskan', kiu al kolegio 91.
de l' tristaj uloj hipokritaj venis,
vin nomu al ni, sen antipatio.«
- Kaj mi: »Ĉe l' bela Arno mi devenis 94.
kaj kreskis, en la granda urb' civita,
en korp' ĉi sama, kiun mi kunprenis.
- Sed kiuj vi, sur kies vango ŝvita 97.
gutante fluas da doloroj milo?
kia la puno, sur vi brilskribita?«
- Nun unu: »Ho, ĉi ĉapoj kun orbrilo, 100.
el tiel dika plumb', ke sub balasto
tro granda grincas tiel la pesilo.
- Ni, gajaj fratoj el Bolonj' laŭ nasko, 103.
mi Catalan', li estis Loderingo,
kaj via ter' invitis nin por tasko,
al kia homon sen parti-konvinko 106.
oni venigas: por pacig' de disoj;
kiel ni agis — vidu en Gardingo.«

- Komencis mi: »Ho fratoj, viaj misoj...« 1109.
 sed ĉesis: homon mi sur ter' ekvidis,
 fiksitan en krucum' per tri palisoj.
- Vidante min, en spasmoj li trepidis,
 la barbon flirtigante per ĝemspiró;
 lin rimarkinte, Catalan' eksplikis:
- »Ĉi torturat', frapanta vin per miro,
 konsilis fariseojn, ke konvenas
 por bon' popola, mort' al unu viro. 1115.
- Sur voj' transverse, nun li nude jenas,
 kaj devas senti ĉiujn de l' taĉmento
 kun peza treto, dum sin ili trenas. 1118.
- Kaj same trafas tiu ĉi turmento
 bopatron lian, ĉiujn el Konsilo
 seminta lolon inter juda gento.« 121.
- Kaj vidis mi, ke miras nun Virgilo
 pri li, sternita en ĉi turpa stato
 krucume en la Eterna Ekzilo. 124.
- Post tio li sin turnis al la frato:
 »Se licas, ne rifuzu al ni diri,
 ĉu estas dekstramane elirstrato,
 tra kiu eblas de ĉi tie iri, 130.
 sen ke de misanĝeloj mi pretendas,
 ke ili volu el ĉi fund' nin tiri.«
- Tiu respondis: »Pli, ol vi atendas,
 proksimas pont': ĝi ekde l' rondo granda
 tra ĉiuj bursoj tranĉe sin etendas,
 sed tie ĉi rompiĝis, nekovranta;
 vi eble povos pasi tra l' ruino
 kuŝanta funde kaj sur flanko randa.« 133.
- La Majstro iom staris kun kapklino,
 poste: »Malpravis do, kun trompa logo,
 kiu l' pekulojn traktas per forkfino?« 136.
- La frat': »Mi multe aŭdis pri l' arogo
 diabla en Bolonjo, oni emfazis:
 trompist' li estas, patro de mensogo.« 142.

Grandpaŝe mia Majstro nun ekpasis, 145.
l' aspekto montris pri koleraj tedoj,
kaj tiel la ŝarĝitojn mi forlasis,
post li, sur spuroj de la karaj piedoj. 148.



DUDEKKVARA KANTO

LA HOMFENIKSO

Oka rondo, sepa burso: ŝtelistoj.

Vanni Fucci: neleĝa infano (mulo) de l' nobelo Fuccio de' Lazzeri. Li prirabis la sakristion de la Katedralo de Pistoja. Oni akuzis per la krimo Rampino di Ranuccio Foresi, kiu jam sidis en karcero, kiam la vera kulpulo malkovriĝis.

La aŭgurado de Vanni Fucci, kiel ofte en la Komedio, estas intence malklara. El Pistoja oni elpelis la Nigrulojn en 1301, baldaŭ la samo okazis ankaŭ en Florenco. Sed la aferoj ŝanĝiĝis post la alveno de Karlo Anĵua. Tiam grafo Malaspina (el Lunigiana, valo de Magra) kolektis la Nigrulojn el Pistoja kaj definitive venkis la Blankulojn en la Campo Piceno apud Pistoja.

EN tiu parto de la jaro juna,
 kiam samlongas tag' kaj noktmallumo,
 kaj ĉe l' Verŝist' sin lavas buklo suna,
 kiam la prujno pentras sur la humo
 de sia blanka franjo la vizaĝon,
 sed elsekiĝas baldaŭ ĝia plumo:
 kampulo, ne havanta plu furaĝon,
 leviĝas, elrigardas, kokson batas,
 vidante tute blanka la pejzaĝon,
 reiras domon, plende demandadas,
 kiel plagulo: kiel nun aranĝi?
 reelrigardas kaj esper' lin flatas,
 ĉar li dum horoj vidas mienŝanĝi
 la mondon, kaj li prenas la bastonon,
 elpelas gregon, ke paŝtiĝu jam ĝi;
 tiel mi timrigardis la Patronon,
 vidante nubon sur la kara frunto,
 sed tuj li plastron metis sur malbonon,
 ĉar, alveninte al la stumpa ponto
 sin turnis al mi same dolĉaspekte,
 kiel unue, ĉe l' pied' de l' monto.
 Apertis brakojn li, konsil-elekte
 pririgardinte la ruinojn bone,
 kaj poste li ekprenis min protekte,
 kaj kiel kiu dum labor' rezone
 la eblojn antaŭ l' far' elprovas ĉiam,
 tiel, al ŝton' li levis min helpdone,
 kaj tuj avizis rokon jam alian,
 dum: »Ĝin surgrimpu! — vokis li kun gesto —
 sed provu, ĉu ĝi eltenas pezon vian.«
 Ne estis voj' por hom' en kapuĉvesto,
 ja li, malpeza, kaj mi, kun subteno,
 grandpene grimpis nur de krest' al kresto;
 kaj se ne estus tiu bordmargeno
 pli kurta, ol la descendantita pluo,
 lin, mi ne scias, sed min — venkus peno;

1.

4.

7.

10.

13.

16.

19.

22.

25.

28.

31.

34.

- sed ĉar ja Misbursaro ĝis la truo 37
de l' plej profunda put' deklivas pende,
kaj dig' de ĉiu val' pro ĉi situo
pli kurta estas supren ol descende, 40.
ni tamen venis fine al la loko,
kie la lasta ŝton' rompiĝis fende.
Ĉe l' pint' el miaj pulmoj ĝis sufoko 43.
mankis la spiro, mankis pov' pluporta,
sidiĝis mi sur la unua roko.
»Ja nun necesas al vi streĉo forta — 46.
diris la Majstro — ĉar dum sid' en plumo
la Fam' ne venas, nek en lit' komforta;
kaj sen ĝi lasas post la vivkonsumo 49.
ne pli da spuroj tere la animo,
ol akve ŝaŭmo, aŭ aere fumo.
Leviĝu do kaj venku pri l' deprimio 52.
per la spirit', venkanta ĉiulukte,
se l' peza korp' ne tiras ĝin al ŝlimo.
Ŝtupar' pli longa sekvos, pli abrupte; 55.
ja ne sufiĉas voj' ĝis nun irita,
se vi komprenis, uzu tion frukte!«
Do mi leviĝis, montris min penspita, 58.
pli ol mi spiron sentis, kaj emfazis:
»Iru, mi estas forta, hardspirita.«
Nun sur la rok' la vojon ni plu pasis, 61.
ĝi estis ruba, streta, ege pena,
pli kruta eĉ ol kiun ni postlasis.
Mi eĉ parolis por ne ŝajni svena. 64.
Tiam el fos' alia voĉ' eliris
senorde, kun parolo konfuzplena.
Mi ne komprenis ĝin, dum ni nin tiris 67.
sur dorso de la supra arko klifa,
sed ŝajne tre koleris, kiu diris.
Mi enrigardis, sed okulo viva 70.
ĝis fundo ne penetris la obskuron,
mi diris: »Majstro, iru tra l' dekliva

- alia bordo, ni descendu l' muron, 73.
ĉar aŭdas, ne komprenas mi ĉi tie
kaj mi rigardas, sed mi vidas nulon. «
»Mi ne respondos — diris li — alie, 76.
ol fare; decas per plenumo muta
obei tiun, kiu petas pie. «
De l' pont' descendis ni ĉe l' kapo kruta, 79.
kiu kroĉiĝis al la firsto oka,
montriĝis al mi nun la burso tuta.
Kaj tie, en amaso animŝoka 82.
serpentoj svarmis tiel diverstipaj,
ke l' sang' ekfrosta pro l' memor' revoka.
Ne fanfaronu la dezertoj libaj, 85.
ke ili flugajn, saltajn, punktajn, striajn
produktas kun flamvomaj, tintaj, ĝibaj:
serpentojn tiel pestajn, tiel fiajn 88.
ne havas kune tuta Etiopio,
nek super Ruĝa Mar' ni trovas tiajn.
Kaj tra ĉi turpa, kruda vermlegio 91.
kuradis homoj, nude, timofroste,
sen la esper' de sav' aŭ ŝtonmagio.
Serpentoj ligis manojn dorsoposte, 94.
sin ligis ĉe la brust' kun noda tordo,
trapikis la pekulojn kape, veste.
Iun starantan ĝuste sub la bordo 97.
serpent' atakis, vundis lin avide
inter la kol' kaj ŝultro per ekmordo.
Nek o nek i skribiĝas pli rapide, 100.
ol li ekbrulis, ardis, discindreris
kaj falis sur la teron disŝufite,
kaj poste, kiam dise li surteris, 103.
jen, kolektiĝis la polveroj sponte,
kaj tuj el ili li mem reaperis.
Saĝuloj grandaj diras samrakonte, 106.
ke mortas la Feniks' kaj reakuŝas
sin mem, kvincentan jaron pasigonte:

- dumvive herbon, semojn ĝi ne tuŝas, 109.
 per incenslarm', amomo sin regalas,
 en morta lit' sur nard' kaj mirho kuŝas.
- Kaj kiel hom', senscie kiel, falas, 112.
 ĉar forto de demon' lin teren tiras,
 aŭ vivobstrukco menson senvualas,
 kaj kiel post leviĝ' li ĉirkaŭmiras, 115.
 tute konfuze de la angorego
 pro la sufer', kaj gapas kaj suspiras,
 tia leviĝis tiu hom' de peko. 118.
 Potenc' de Dio, granda en severo,
 ke l' kulpojn tiel venĝas via rego!
- Demandis lin pri l' nomo kaj cetero 121.
 la Duk', Li diris: »Al ĉi faŭko blinda
 ne longe falis mi de l' toska tero.
- Beste, ne home estis mi vivinta, 124.
 mi, mul', kiu mi estis, Vanni Fucci,
 best' el Pistoja: kavo al mi inda.«
- Mi al la Duko: »Lin ne lasu fuĝi, 127.
 pri l' kulp' demandu. Mi lin ja rigardis
 nur hom' kverela, ema kolermuĝi.«
- Kaj la pekul', aŭdinte min, ne tardis, 130.
 l' animon kaj vizaĝon al mi levis,
 dum trista ruĝo de la hont' lin farbis,
 kaj diris: »Pli doloras, ke mi devis 133.
 min al vi montri en mizero tia,
 ol ke mi frapon de la mort' ricevis.
- Kaj tion nei je demando via 136.
 ne povas mi: ĉi punon mi ekhavis
 pro l' rab' de l' sankta vazo sakristia,
 kies akuz' alian homon trafis. 139.
 Sed ke vi ne priĝoju ĉi turmenton,
 kiam vi el ĉi nigra lok' vin savis,
 orelaperte donu nun atenton: 142.
 Nigrulojn trafos en Pistoja falo,
 poste Florenco ŝanĝos modon, genton.

-
- Mars' la vaporon de la Magra-valo 145.
 en pezajn nigrajn nubojn al si tiros,
 kaj kun impeta, akra ventbatalo
super Campo Piceno muĝe iros, 148.
 kaj fendos tia fulm' la nubvaporon,
 ke ĉiuj Blankaj vundon ja akiros.
Mi diris por aflikti vian koron.« 151.



Inferna farso.

DUDEKKVINA KANTO
LA SERPENTHOMOJ

La *semo* de Pistoja estis, laŭ la tradicio, la restaĵoj de de la armeo de Catilina, kiuj ĉi tie loksidiĝis.

Tiu, kiu falis sub la muroj de Tebo, estas Kapaneo (vd. Kanto XIV.)

Cacus (Kako) estis, laŭ la mito, filo de Vulkano, li loĝis en groto de l' monto Aventino. Ruze li ŝtelis brutojn el la grego de Heraklo, ilin trenis en la groton ĉe ilia vosto, por ŝajnigi, ke ili estis *elirantaj* de tie. Heraklo tamen rimarkis la ŝtelon kaj lin mortigis. Pro la ŝtelo li estas ĉi tie, ne en la sepa rondo (vd. Kanto XII.)

Maremma estas marborda regiono apud Pisa, iam nelog-ebla pro la multaj serpentoj.

La kvin pekuloj: *Cianfa dei Donati*, la *sespieda serpento*: florenca ŝtelisto fama: li ĵetas sin al *Agnello de' Brunelleschi*: alia ŝtelisto, kiu jam en sia infanaĝo priŝtelis siajn gepatrojn, poste li tiel povis kaŝi siajn manovrojn, ke li akiris eminentan lokon en la registaro de l' urbo dum la nigra reĝimo, kompreneble li tion bone elprofitis; la nigre bruna serpento estas *Francesco Guercio Cavalcanti*, florenca nobelo, kiun, dum lia rab-aventuro oni mortigis en *Gaville*; la Cavalcanti-familio, por lin venĝi, detruis preskaŭ la tutan vilaĝon; tial ĝemas pro li *Gaville*; la ombro, kiun li ek-mordas, estis *Buoso degli Abati*, florenca nobelo, kunkulpulo de Cavalcanti, ambaŭ blankuloj; *Puccio de' Galigai*, nomita *Sciancato* (lamulo), ido de eminenta florenca familio, ŝtelisto.

Lucanus rakontas en sia epopeo (*Pharsalia* IX. v. 761 kaj sekv.) ke du soldatojn el la armeo de Cato mordis serpentoj en Libio. La unu, *Sabellus*, tuj cindriĝis pro la mordo, la alia, *Nassidius*, tiel ŝvelis, ke lia kiraso krevis.

Ovidius belege rakontas en siaj »*Metamorfozoj*«, kiel transformiĝis *Kadmos* en serpenton kaj *Arethusa* en fonton. (IV. v. 563. kaj sekv.)

Vortklarigoj: *heĝo* (s): arbitrajbarilo; *insolenta* (gm): arogante, ofende malrespekta; *separi* (s): apartigi; *klam* (gm): plurvoĉe kii.


POST la parol' du manojn la latrono 1.
 fig-montre levis kaj kun insolento
 ekkriis: »Prenu, Di', jen mia dono!«
 De tiam mi amikas al serpento, 4.
 ĉar unu lin ĉe l' kolo ĉirkaŭĉenis,
 kvazaŭ dirante: »Estu tuj silento!«
 Alia liajn brakojn ekkatenis 7.
 sin ringfermante, metis tian premon,
 ke ili eĉ ektiki vane penis.
 Pistoja! ve, ke vi decidi emon 10.
 ne havas: mem ekstermi vin per brulo,
 ĉar vi en krim' superas vian semon!
 Tra ĉiuj rondoj de l' infer-obskuro 13.
 ne estis hom' blasfema pli malpie,
 eĉ kiu falis sur la Teba muro!
 Li kuris for ne parolante plie. 16.
 Kaj nun Kentaŭr', kiun koler' obsedas,
 alkuris: »Kie la mizera, kie?«
 Serpentoj en Maremma, mi ne kredas, 19.
 ke estas pli, ol ties sakron kuŝis,
 ĝis kie la ĉeval' al homo cedas.
 Sur ŝultroj, kie ili kolon tuŝis, 22.
 flugilaperte sidis naŭza drako
 kaj kontraŭ ĉiuj fajron ĝi elbuŝis.
 La Majstro diris: »Tiu estas Kako, 25.
 kiu sub monto Aventino faris
 la teron multajn fojojn sanga lago.
 De liaj fratoj oni lin separis, 28.
 ĉar trompe ŝtelis li la grandan gregon
 de l' paŝtokampo, kiu lin najbaris;
 sed finis ĉiun lian straban pekon 31.
 klab' de Heraklo, kiu sur lin gvidis
 eĉ batojn cent, sed li ne sentis dekon.«
 Dum ĉi parolo tiu forrapidis, 34.
 kaj sub nin venis nun spiritoj tri,
 sed nek mi, nek la Majstro ilin vidis,

- ĝis ili kriis: »Kiu estas vi?« 37.
tiam parolo nia intermitis,
post nun atentis ni nur tiujn ĉi.
- Ilin ne konis mi, sed ni profitis 40.
el la kelkfoje okazanta kazo,
ke unu la alian nome citis,
- kaj: »Kie restis Cianfa?« — sonis frazo. 43.
Car al la Majstro por atent' mi pledas,
tiam mi metis fingron al sub nazo.
- Se vi, leganto, malfacile kredas, 46.
kion mi diros, estas ne mirinde,
mi eĉ post vid', apenaŭ ĝin koncedas.
- Car vidis mi, l' okulojn allevinte, 49.
ke sespieda serpenteg' sin lanĉis
sur unun kaj al li sin gluis vinde.
- Per mezpiedoj ventron ĝi ungtranĉis, 52.
per la antaŭaj liajn brakojn stringis,
jen unu, jen alian vangon manĝis,
- per postpiedoj la femurojn ringis, 55.
la voston inter ili ĉeingvene
trapuŝis, ĝis la sakron ĝi atingis.
- Hedera barb' neniam kovris jene 58.
la arbon, kiel tiu monstro vestis
per siaj membroj liajn abomene.
- Kaj mikse, kvazaŭ varma vaks', kunkreskis 61.
kaj la kolorojn ŝanĝis tiuj du,
nek li, nek ĝi plu estis, kia estis,
- kiele sur papero sub influ' 64.
de l' ardo kuras bruno antaŭflame,
ne nigra ankoraŭ kaj ne blanka plu.
- La du aliaj lin rigardis, klame: 67.
»Ho, ve, Agnel', vin kia ŝanĝ' fasonas!
jen, estas vi nek du, nek unu jame.«
- Jam la du kapoj unu kapon donas, 70.
el du figuroj kunmiksitaĵ ĝermas
unu vizaĝ', en kiu du fordronas.

- Kvar brakoj en du brakojn sin kunfermas, 73.
la gamboj, brustoj, ventroj kunamasas,
homneviditaj membroj ekalternas;
ĉiujn devenajn formojn disfrakasas 76.
la bild' perversa, jam nek du, nek nulo
ĝi ŝajnas; tiel, lante, ĝi forpasas.
Kiel, ŝanĝante heĝon, sub la brulo 79.
de l' hundsezono, la lacerto vibra
ekŝajnas fulm' en vojtransversa kuro,
tiel alsaltis nun kun kuro sibla 82.
la du aliajn vigla serpenteto,
nigrete bruna kiel grajno pipra
kaj kie la unuan nutron feto 85.
ricevas, tie ĝi al unu pikis,
kaj antaŭ li sterniĝis kun sinĵeto.
Tiu rigardis, vorton ne eligis, 88.
kiel sub sonĝ' aŭ febro li turnkapis
oscede, la piedoj ekradikis.
Li la serpenton, tiu lin algapis, 91.
kaj ĝia buŝ' kaj lia vundo-pordo
ekfumis dense kaj la fum' kunfrapis.
Silentu nun Lukan' pri l' serpentmordo 94.
de l' mizera Sabelo, Nasidio,
atentu li pri *mia* streĉ' de kordo.
Silentu nun pri Kadmo Ovidio, 97.
ke li serpente, Aretuza fonte
transformis sin; min lasas sen envio,
ĉar du estaĵoj tiel front-al-fronte 100.
ja ne transformis sin, ke ambaŭ ŝanĝis
substancon, reciproke alprenonte.
Kaj tiu ŝanĝo tiel sin aranĝis, 103.
ke l' gamboj de l' vundito ekunuis,
kaj la serpent' la voston forke tranĉis.
Femuroj, kruroj tiel sin kungluis, 106.
ke baldaŭ ili eĉ ne montris spuron
de tio, ke antaŭe ili duis.

- La vost' fendita prenis la figuron 109.
 kiu perdiĝis tie, kaj akiris
 bestfelo molon kaj homhaŭto duron.
- Mi vidis: brakoj ĉe l' aksel' eniris, 112.
 la du bestpiedoj, kurtaj, sin rapide
 longigis, kiom tiuj sin kuntiris.
- Nun la postpiedoj gluis sin solide, 115.
 kaj iĝis membro, kiun kaŝas viro,
 tiu de l' hom' duiĝis sindivide.
- Koloron novan faras la fumspiro 118.
 al ambaŭ, kaj ĉi tie harborderon
 ĝi kreas, tie velkas ĉiu vilo.
- Unu leviĝis, dua falis teron, 121.
 sin plu fiksante per okul' malpia,
 sub kiu ambaŭ ŝanĝas la eksteron.
- Kaj la staranto al tempio sia 124.
 tiras la troan karnon kaj elvenas
 oreloj sur la kalva lok' tempia,
- kaj kiom el la troo sin retenas, 127.
 tio la nazon formas per karnmeto,
 dikigas lipojn, kiom ĝi konvenas;
- l' alia buŝon per karn-antaŭĵeto 130.
 pintigas, kaj orelojn per reŝovo
 forkaŝas, kiel kornojn limaketo;
- la lang', ĵus unu, kun parola povo, 133.
 fendiĝas, kaj la lang', fendita forke,
 kunfermas sin, kaj ĉesas la fumblovo.
- La bestiginta hom' eksiblis forte 136.
 kaj fuĝis tuj, tra l' valo ekkurante,
 kaj la alia post lin sputis vorte.
- Kaj li, la novajn ŝultrojn, ektirante, 139.
 al la alia turnis kaj deklaris:
 »Nun kuru Buoso, kiel ĵus mi, rampe.«
- Ke tiajn ŝanĝojn kaj transŝanĝojn faris 142.
 kloako sepa: vidis la okuloj,
 novec' ekskuzu, se la plum' eraris.

- Kvankam mi vidis kvazaŭ tra nebuloj, 145.
(l' animo estis konfuza stato)
ne povis tiel kuri ĉi pekuloj,
ke restu sen rekon' Puccio Sciancato, 148.
(pri l' sola el la tri unuaj temas
kiu ne ŝanĝis sin), kaj la kunfrato
estis, pro kiu vi, Gaville, ĝemas. 151.



DUDEKSESA KANTO

LA LASTA VOJAÇO DE ODISEO

Prato estis urbo najbara al Florenco, kaj sub ĝia potenco, kontraŭ kiu ĝi konstante ribeladis.

Kiam profeto Elizeo estis mokata de buboj, du ursoj venis el la arbaro kaj disŝiris la mokantojn.

Profeto Elio, vide de Elizeo, iris viva en la ĉielon sur fajra veturilo.

Eteokles kaj Polynikes, fratoj, filoj de Oedipos kaj Jokaste, mortigis unu la alian en duelo sub Tebo. Iliajn korpojn oni bruligis sur la sama ŝtiparo, sed eĉ la flamo de l' ŝtiparo disdugis, montrante la nerepacigeblan kverelon de l' fratoj.

Oka rondo, oka burso: malicaj konsilantoj.

Ulysses kaj Diomedes konsilis al la grekoj, ke ili ruze enŝtelu al Trojo grekajn soldatojn en la ventro de ligna ĉevalo. Ili estis ankaŭ la kaŭzo de la morto de Achilles. Deidamia, la edzino de Ahilo, kaŝis sian edzon en virinaj vestoj, por ke li ne iru al la troja milito. Ulysses kaj Diomedes, kiel komercistoj, portis al Ahilo diversajn varojn, inter ili ankaŭ glavon. Ahilo kaptis la glavon, per tio sin perfidis, devis iri al Trojo, kie li falis. Deidamia mortis pro la doloro. Ili rabis ankaŭ la *Palladion*, statuon de diino Pallas, kiu mirakle gardis Trojon. Ili vestis sin kiel almozuloj por ĝin ŝteli.

Ulysses (Odysseus), reveninte post dekjara erarvado el la troja milito, laŭ la tradicio ne povis hejme resti, ree ekiris mare kaj ne revenis plu.

Kirke, la sorĉistino, enamiginta al la hejmenveturanta Ulysses, longe lin retenis sur sia insulo, kiun poste Aeneas nomis Caëta.

La kolonoj de Heraklo signis la finon de l' mondo ĉe la nuna Gibraltar (unuflanke la hispana Sevilla, aliflanke la afrika Septa).

La granda monto, kiu leviĝas el la Oceano antaŭ Ulysses, estas verŝajne la Purgatorio, tien ne povis iri vivanta homo (vd. Kanto XXXIV.)

Vortklarigoj: *finto* (c): ruzaĵo; *gazono* (gr) herbo-kovro; *prizono* (*): speco de karcero; *prizoni*: teni kaptita.

ĜOJU, Florenc', vi havas tian grandon, x.
 ke vi tra l' mar' kaj tero flugilbatas,
 atingas via nom' la inferlandon.
 Jen, tie el vi burĝoj kvin restadas, 4.
 latronoj tiaj, ke mi hontis ĝene,
 eĉ vi de ili ne tro honoratas.
 Sed, se ni veron songas frumatene, 7.
 vi baldaŭ sentos, kion al vi Prato,
 kaj ne nur ĝi, deziras sopirplene;
 eĉ tuja bat' ne estus frua bato, 10.
 kaj ĝi jam venu, se ĝi devas veni,
 ĉar min pli premus ĝi en pli olda stato.
 Nun ni foriris, por revojon preni 13.
 tra l' rokŝtupar', kiun ni ĵus descendis,
 la Duk' min gvidis kaj bonvolis treni;
 soleca voj' sin antaŭ ni etendis, 16.
 ĝi inter ŝtonoj, rokoj krute iras,
 sen ĉes' manhelpon la pied' pretendis.
 Dolor' min ŝiris, ankaŭ nun min ŝiras, 19.
 dum mi memoras pri l' tiea vido,
 bridon de l' mens' mi, pli ol kutime, tiras.
 malvasta: ĝi ne kuru sen virtgvido, 22.
 se l' Bonon bona stel' aŭ Aĵ' pli bona
 donacis: ne per mi pereu ĝi do.
 Kampul' kuŝanta sur montet' gazona, 25.
 kiam la mondheliga lumvizaĝo
 por malplej longa tempo estas drona
 kaj cedas muŝ' al kulo en pejzaĝo, 28.
 vidas tiom da lumoj val-ebene
 ĉe l' vin- kaj grenrikolto de l' vilaĝo,
 kiom da flamoj nun mi vidis, ene 31.
 de l' oka burs', veninte al situ,
 ke ĝia fund' montriĝis al mi plene;
 kaj tiu, kiun venĝis ursoj du, 34.
 vidis Elian ĉaron en forrulo,
 dum ĝin ĉevaloj levis al la Blu',

- kaj ĝin ne povis sekvi per okulo, 37.
 nur solan flamon la rigard' atingis,
 flugantan supren kiel nubmakulo:
- mi vidis same: ĉiu flam' sin svingis 40.
 sen montr'o de la pred' en la fos-buŝo,
 kaj ĉiu flam' pekulon ĉirkaŭvidis.
- De l' pont' mi klinis min en duonkuŝo 43.
 por vidi pli; sen kapto de ŝtonkresto
 falinta estus mi eĉ sen ekpuŝo.
- Ci scivolegon vidis mia Estro 46.
 kaj diris: »Ombr' en ĉiu flamo nestas,
 la propra brulo estas por li vesto.«
- Kaj mi: »Ho Majstro, nun, ĉar vi atestas, 49.
 pli certas mi, sed mi jam antaŭvidis
 ĉi tion; nun do diru, kiu estas
- en tiu flamo, kiu sin dividis 52.
 de l' supro, kiel flamo de l' ŝtiparo,
 kiu Eteoklon kun la frat' bruligis?«
- Nun li: »Suferas en ĝi hero-paro: 55.
 Uliso kaj Diomedo, kunirantaj
 al puno, kiel iam al batalo.
- Kaj en ĉi flam' pripentas ĝemoj vantaj 58.
 la ruzon de l' ĉeval', farinta pordon
 eliran por la Romaj senoj sanktaj,
- finton, pro kiu Deidamia morton 61.
 suferis, eĉ nun larma pro Aĥil',
 kaj de la Palladio la forporton.«
- »Majstro, se eblas en ĉi flamkovril' 64.
 paroli — mi nun diris — mi vin petas
 kaj petas kaj ĉi pet' valoru mil,
- lasu atendi min, ĝis sin ekspedas 67.
 al ni ĉi korna flamo, vi ja vidas,
 kia dezir' pri ili min obsedas.«
- Li diris: »Multan laŭdon ja meritas 70.
 ĉi tiu peto, do mi ĝin akceptas,
 sed bone, se vi langon vian bridas.

- Lasu paroli min, min ja konjektas 73.
intencon vian, kaj ja eble ili,
ĉar grekoj, vian diron malrespektas. «
- Kiam la flamon vidis ni aliri 76.
kaj temp' kaj loko taŭgi ŝajnis jam,
mi la Poeton aŭdis jenon diri:
- »Ho vi, estantaj du en unu flam', 79.
se mi meritis de vi, dum mi vivis,
se mi meritis nur iom da am',
dum supre mi la altajn versojn skribis, 82.
haltu, kaj volu unu el vi reciti,
kien, perdiĝe, li en morton drivis. «
- De l' flam' antikva ekis sin agiti 85.
la korn' pli granda, vibris ĝi murmure,
kvazaŭ ventspir' komencus ĝin inciti;
la pinto ŝanceliĝis ĉirkaŭkure, 88.
kiel la lango dum parol', kaj donis
ĉi voĉon: »Foririnte ŝipveture
de Kirke, kiu ame min prizonis 91.
dum pli ol jar', proksime al Kaeta,
antaŭ ol Eneas' ĝin tiel nomis:
- nek ĉarm' de l' filo, nek kompat' pieta 94.
al olda patro, nek la am' deviga
al la edzin' por ŝia ĝoj' kvieta,
ja venkis en mi super ard' instiga: 97.
iĝi pri homaj pekoj, virtoj sperta,
vidi la mondon per vagad' naviga.
- Ekiris mi al alta mar' aperta 100.
kun sola ŝip', kun eta kompani',
kiu ne iĝis ĝis ĉi temp' dizerta.
- Kaj ambaŭ bordojn jam ĝis Hispani', 103.
Marokko, bordojn de sardinianoj,
insulojn marbanatajn vidis ni.
- Maljune lacis mi kaj la kompanoj, 106.
veninte al la streta mara kolo,
signita iam de Heraklaj manoj,

- por ke trans ĝin ne strebu homa volo; 109.
postrestis jam de dekstra man' Sevalo,
sinistre Septon lasis nia tolo.
- »Fratoj — mi diris — kiuj tra centmilo 112.
da dangeregoj ja al okcidento
alvenis: al la eta flamobrillo,
kiu ankoraŭ restis el vivsento, 115.
ne volu do rifuzi spert-esperon,
laŭ voj' de l' suno, pri la mond' sen gento!
Pri via semo havu konsideron! 118.
vi ne naskiĝis ja por brutvegeto,
sed gajni scion, bravan karieron!«
- La miajn mi, per ĉi oracieto, 121.
tiel akriĝis por vojaĝdeziro:
apenaŭ reteneblis la impeto.
- La poŭp' orienten; iĝis nun flugilo 124.
de flug' freneza ĉiu remilparo,
ĉiam maldekstren strebis ni dum iro.
- Nokte vidiĝis al ni jam stelaro 127.
alipolusa; tute subĉielis
la nia, ne emergis plu el maro.
- Kvin fojojn jam malkreskis kaj reŝvelis 130.
supre la subo de l' vizaĝo luna,
post ol sur voj' dangera ni ekvelis,
kiam aperis al ni monto, bruna 133.
pro l' malproksimo, kiu tiel altis,
ke tian ja ne vidis hom' ĝisnuna.
- Ni ĝojis, sed la ĝoj' en ĝemo haltis: 136.
de l' nova ter' naskite tromb' ekiris,
kaj bate sur la ŝipantaŭon saltis.
- Tri fojojn per ĝi ŝip' kun akvo giris, 139.
la poŭpo iris supren je la kvara,
la pruo infren. Iu ĝin deziris;
kaj super ni fermiĝis ondo mara. 142.

DUDEKSEPA KANTO

S-TA FRANCISKO KAJ LA DIABLO

La sicilian bovon la atena skulptisto Perillos faris por la sicilia tirano Phalaris, kiel torturilon. La ekzekutoton oni metis en ĝian ventron kaj poste la kupran bovon oni ardigis sur fajro. La vekrio de l' torturato ŝajnis muĝo del' bovo. La tirano, por elprovi la torturilon, metigis en ĝin unue la skulptiston mem.

Virgilo, naskiĝinte en Lombardio, parolas kun lombarda prononco.


La flamvestita ombro estas Guido da Montefeltro, naskiĝinta en urbeto Montefeltro inter Urbino kaj la fontregiono de la Tevero (Tibero), en Romagna. Fama militisto, tre sagaca kaj ruza politikisto, Gibelino. Dufoje li militis kontraŭ la papo, dufoje li estis ekskomunikita; fine, en 1296, li retiriĝis de la mondo, iĝis franciskana monaĥo (zonŝnurulo), kaj kiel tia li mortis en 1298.

Dante, demandita de li, jene klarigas al li la situacion en Romagna (v. 40—54):


En *Ravenna* regas Guido Novello (vd. Bio. 34.) el la familio *Polenta* (blazono: purpura aglo), ĝi etendas sian potencon ankaŭ sur la urbeton *Cervia*. En *Forli*, kie ĝuste Guido da Montefeltro venkis sange la francan armeon, regas la familio *Ordellaffi* (blazono: verda leono). En *Verrucchio* (kastelo apud Rimini) regas la du »ŝafhundoj« *Malatesta* kaj lia filo *Malatestino**, kiuj ankaŭ nun rabas kaj perfortas la popolon. (Foje jam, la gibelinaj nobeloj, malkontente pri ilia regado, vokis kontraŭ ili Guidon da Montefeltro por helpo, inter la malkontentuloj estis ankaŭ *Montagna de' Partiti*, bofilo de Malatesta. Malatesta lin kaptis kaj lian gardadon konfidis al Malatestino, insistante, ke okaze de lia fuĝo, li enkarcerigos Malatestinon mem anstataŭ li. Malatestino, por ŝpari penojn, lin simple murdigis.) En la *Santerno*-borda *Imola* kaj *Lamone*-borda *Faenza* regas *Mamminardo Pagani* da *Susiana* (blazono: blua leono en blanka kampo), kiu estas jen gelfo, jen gibelino, laŭ sia intereso. La *Savio*-borda *Cesena* estas ŝajne libera komunumo, sed ĝia libereco estas tre limita de ĝia estro, *Galasso* da Montefeltro.

La Granda Pastro, la princo de la novaj fariseoj, estas papo Bonifaco VIII., li estis en malpaco kun la familio *Colonna*, kies loĝejo estis apud la *Laterano*. *Penestrino* estis la fortikaĵo de la familio *Colonna*, Bonifaco ĝin vane sieĝis.

* Aliaj du filoj de Malatesta estis *Gianciotto* (edzo de *Francesca* da Rimini) kaj *Paolo* (ŝia amato). Vd. Kanto V.



La lasta vojo de Odiseo.



kaj fine, laŭ la konsilo de Montefeltro li akiris ĝin per la promeso, ke la familon Colonna li absolvos el la ekskomuniko kaj redonos al ĝi la antaŭan rangon. Sed siajn promesojn li ne plenumis kaj Penestrinon li ĝisfunde detruigis.

La antaŭulo de Bonifaco estis Celestino (vd. Kanto III.)

La fortikaĵon de Acri (en Sirio) sieĝis la saracenoj en 1291 dum krucmilito.

Imperiestro *Konstantino*, laŭ la legendo, suferante je lepro, venigis al si de l' monto Sorakte la ekzilitan papon Sankta Silvestro, kiu lin baptis kaj per tio sanigis. Tiam li, laŭ la tradicio, donacis al la papo provincon, fondante per tio la papan mondan potencon (vd. Kanto XIX. v. 115—117.)

Por preni la animon de Montefeltro venis *Sankta Francisko de Assisi*, al kies ordeno li aliĝis kiel maljunulo.

Pri *Minos* vd. Kanto V.

Vortklarigoj: *febla* (*): malforta; *humida* (gr): malseka; *magra* (*): malgrasa; *pulpo* (s): ĉi tie: karno; *quare* (lat.): kial; per kio; *skoldi* (gm): riproĉadmoni; *francaro solda*: francaj soldatoj.

SANKTA FRANCISKO KAJ LA DIABLO

REKTIGIS supren jam la flam' kaj ĉesis 1.
 paroli plu kaj de ni jam foriris,
 ĉar la Poeto dolĉa ĝin permesis,
 kiam, post ni, alia flamo tiris 4.
 al sia pint' okulojn niajn brue,
 per son' konfuza, kiun ĝi elspiris.
 Kiel la bov' de Sicili', unue 7.
 muĝinta, kaj tre juste, per lamento
 de tiu, kiu ĉizis ĝin konstrue,
 muĝis per voĉ' de l' mizerul' en ventro, 10.
 tiel ke, kvankam estis kupro nura,
 ĝi ŝajnis mem ŝirata de turmento,
 same, komence, ĉar voj' apertura 13.
 tra l' flam' ne estis, sian ploron ŝanĝis
 la lang' en lingvon de la flam' susura,
 sed poste, kiam vojon ĝi tratranĉis 16.
 ĉe l' pint', la flamo saman vibron prenas,
 kian per sia mov' la lango lanĉis.
 Mi aŭdis nun: »Ho vi, al kiu venas 19.
 ĉi voĉ', kaj kiu diris ĵus lombarde:
 »Nun iru do, mi jam plu vin ne ĝenas!«
 kvankam mi venis eble iom tarde, 22.
 parolon ne damaĝu kelkminutan,
 kiel mi ne damaĝas, kvankam arde.
 Diru, se ĵus vi en ĉi mondon brutan 25.
 falegis de l' itala dolĉa tero,
 de kie portis mi la kulpon tutan,
 ĉu loĝas paco, aŭ militmizero 28.
 Romagna-n? mi naskiĝis ĉe Urbino,
 ĉe l' rok', el kiu fontas la Tevero.«
 Atentis mi ankoraŭ kun kapklino, 31.
 kiam la Duk' ĉe l' flanko min tuŝetis
 kaj diris: »Vi parolu, jen latino!«
 Kaj mi, ĉar la respond' en mi jam pretis, 34.
 komencis senprokraste per ĉi diro:
 »Animo, kiun flamoj ĉirkaŭretis!

- Romagna-n ja milit' en kordeziro 37.
 de l' tiranar' ne ŝparis kaj ne ŝparas,
 sed lukt' malkaŝa paŭzis ĉe l' foriro.
- Ravenna, kiel de mult jaroj, staras, 40.
 Polenta aglo tenas ĝin subkove,
 al Cervia per flugiloj ŝirmon faras.
- La urb' farinta grandan provon pove 43.
 kaj sangan monton el francaro solda,
 sub verdaj ungoj sidas nun senmove.
- Ŝafhundoj de Verrucchio, juna, olda, 46
 kiuj Montagna-n traktis tre malbone,
 minacas ofte per dentaro morda.
- La urboj de Santerno kaj Lamone 49.
 en blanka kamp' la leonidon gvidas,
 kiu partion ŝanĝas laŭsezzone.
- Kaj tiu urbo, kies flank' humidas 52.
 de l' Savio, kiel inter plat' kaj monto:
 inter liber' kaj tiraneco sidas.
- Sed kiu vi? mi petas pri l' rakonto, 55.
 ne estu pli avara ol alia,
 volante resti fama en estonto.»
- Ekmuĝis nun laŭ maniero sia 58.
 kaj skuis al kaj re la flamkolono
 la pinton; poste sekvis diro tia:
- »Se kredus mi paroli al persono, 61.
 kiu reiros iam al la mondo,
 ĉi flamo ne skuiĝus plu por sono.
- Sed, ĉar neniam vive el ĉi rondo 64.
 reiros hom', se vera la Regulo,
 sen tim' de hont' mi pretas por respondo.
- Soldat' mi estis, poste zonŝnurulo; 67.
 absolvon mi esperis per ŝnurpreno,
 kaj certe ne erarus ĉi kalkulo,
- se l' granda pastro — trafu lin malbeno! — 70.
 min ne retirus al unua kulpo,
 kiel kaj *quare*: aŭdu por kompreno!

- De kiam estis al mi ost' kaj pulpo 73.
donitaj de l' patrin', mi ĉiam agis
ne kiel la leon', sed kiel vulpo.
- Ĉiam sur kaŝaj vojoj mi zigzakis, 76.
kaj ruzon uzis mi kun tia saĝo,
ke ĝis mondfino mia famo vagis.
- Sed kiam venis mi al tiu aĝo, 79.
kiam necesas jam kunvolvi ŝnuron,
malhisi velon, kiam per malplaĉo
jam naŭzas, kio donis vivplezuron: 82.
mi pentis kaj konfesis, kaj — mil veoj! —
mi kiel frat' esperis savsekuron.
- Sed jen la princ' de l' novaj fariseoj 85.
(kiu militis ĉirkaŭ Laterano,
kaj ne kun saracenoj aŭ hebreoj,
sed ĉiu malamik' estis kristano: 88.
nek en sieĝ' de Acri partoprenis,
nek ŝakris sur la tero de l' sultano):
- lin nek ofico sankta ja retenis, 91.
nek mia ŝnuro, kiu laŭ kutimo
magrigas tiun, kiun ĝi katenis.
- Kiel Silvestron vokis Konstantino 94.
de l' Sorakte', por savi sin de l' lepro,
tiel li min, ke mi per medicino
- lin liberigu de l' orgojla febro; 97.
li min konsultis, kaj mi staris mute;
ke li ebrias: ŝajnis sola eblo.
- Tiam li diris: »Mi vin absolute 100.
absolvos, do, konsilu, sen skrupulo:
kiel detrui Penestrinon tute?
- La du ŝlosilojn de l' ĉielseruro, 103.
por ŝlosi kaj malŝlosi, mi ja havas,
kiujn ne zorgis mia antaŭulo.«
- Kredante, ke ĉi argumentoj gravas, 106.
kaj pli mi pekos, se mi kontraŭstaros,
mi diris: »Patro, ĉar vi de mi lavas

- la pekon, kiun mi post nun enfalos: 109.
promesu longe, kaj plenumu kurte:
la Alta Seg' triumfon perbatalos.»
- Francisko venis por mi tuj postmorte, 112.
sed jen, kerubo nigra tie henis:
»Ne portu lin! Ne justus vi forportel!
- Ce miaj sklavoj lokon li obtenis, 115.
ĉar li konsilis false: ĉimomente
ĉe l' har' mi kaptis kaj ĝis nun lin tenis.
- Absolvo ne validas ja senpente, 118.
penti kaj voli kune: aj' neebila:
la kontraŭdir' nuligas evidente.»
- Ho ve, kun kia frosto travertebrata 121.
mi tremis, dum li kaptis min kaj skoldis:
»Ĉu en logiko vi min kredis febla?»
- Li portis min al Minos, kiu tordis 124.
ok vosto-ringojn ĉirkaŭ l' dorso dura
kaj kriis, dum rabie li ĝin mordis:
- »Flamveston portu la anim' malpura!« 127.
kaj, kie min vi vidas, mi, damnito,
nun iras plende en talar' tortura.»
- Kiam paroli ĉesis la spirito, 130.
la flam' dolora iris, l' akran kreston
svingante supren-infren kun agito.
- Mi pasis plu, sekvante mian Estron 133.
tra l' roka vojo sur alian ponton,
kiu traarkas pluan punan neston,
- kie kverelsemintoj pagas konton. 136.

DUDEKOKA KANTO

LA STUMPA SVARMO

Oka rondo, naŭa burso: estigantoj de kvereloj kaj skismoj.

En Apulio okazis multaj sangaj bataloj. Tie batalis la rifuĝintaj *trojanoj* sub la gvido de Aeneas por fondi Romon. Tie okazis granda parto de l' punika milito, tie estis la batalo ĉe *Cannae*, en kiu Hanibalo venkis la romanojn, kaj en kiu falis tiel multaj homoj, ke eĉ la ringoj de la mortintoj donis riĉegan kaptaĵon (Titus Livius, XXII. 6.). Tie batalis kontraŭ la saracenoj la normana *Roberto Guiscardo* por konkeri Apulion. Tie estis la Anĵua milito (vd. Bio. 9.); la batalon ĉe Benevento Manfredo laŭdire venkis pro la perfido de l' apulianoj, kiuj tra la intermonto ĉe *Ceperano* translasis la armeon de Karlo Anĵua. En Apulio, apud *Tagliacozzo*, venkis Karlo Anĵua Konradinon (vd. Bio. 9.); laŭdire Konradino komence venkis, sed Karlo, laŭ la konsilo de la franca *Alardo* de Valéry, kaŝis sian ĉefarmeon malantaŭ monto, kaj poste, ĝin surprize antaŭenĵetante, konfuzis Konradinon kaj gajnis la batalon. Alardo do venkis ne glave, sed per ruzo.

Ali estis la bofilo de *Mohamedo*, unu el liaj unuaj sekvantoj, kromnome: la Leono de l' Triumfa Dio (597—660). Ankaŭ li mem fondis novan sekton, eble tion volas simboli Dante per tio, ke li estas fendita en tiu korpoparto, kiu ĉe Mohamedo estas sendifekta.

Fra (frato, monaĥo) *Dolcino* transprenis de la fondinto Gerardo Segarelli la gvidon de la sekto »Apostolaj Fratoj« kiuj anoncis posedaĵkomunecon. Li deklaris militon kontraŭ la papo, kiun li nomis Antikristo. Laŭ la instigo de l' papo, Novara kondukis kontraŭ li krucmiliton; sed Dolcino kun kelkaj miloj da homoj sin bastionis sur la monto Zebello apud Vercelli, kaj oni povis lin venki nur per blokado dum tre rigora vintro. Kapitulacinta pro malsato, li estis vive bruligita en 1307.

Piero da Medicina estis fama kuracisto en Romagna, kun tre akra lango, li estis estiganto de multaj kvereloj kaj skandaloj.

La ravaj ebenoj inter *Vercelli* kaj kastelo *Marcabó* estas la lombarda ebenaĵo. Marcabo estis ĉe la almarigo de l' Po.

Du nobelojn el Fano, *Guido del Cassero* kaj *Angiolello da Cagnano*, venigis al *Cattolica* la unuokula Malatestino (vd. Kanto XXVII. Noto; alineo 5.) kaj dumvoje sur la ŝipo li ĵetigis ilin en sako en la maron ĉirkaŭ la jaro 1312.

La afero okazis proksime al la monto *Focara*. De ĉi tiu monto ofte venis subitaj tromboj, timataj de l' ŝipanoj.

Malatestino regis en Verrucchio apud Rimini, sur la regiono, kie Julius Caesar transpasis la Rubikonon. Tie, laŭ Lucanus, instigis lin, por komenci la internan militon, *Curius*, per la vortoj: »semper nocuit differe paratis« (ĉiam malutilis prokrasto al tiuj, kiuj staras prete). Pro ĉi tiu miskonsilo li puniĝas nun terure, tial li bedaŭras, ke li ekvidis tiun teron.

Neptuno: dio de l' maro.

Inter Cipro kaj Maiolica (insulo Majorca) kuŝas preskaŭ la tuta Meza Maro (Mediterraneo). La gento greka (atika) estis fama pri siaj piratoj.

Mosca dei Lamberti konsilis la murdon de Buondelmonte (vd. Bio. 5.) per la famaj vortoj: »faro havas kapon« (cosa fatta capo ha), t. e.: farita faro havas finon, do la mortigo solvos ĉion definitive. Per la murdo de Buondelmonte komenciĝis la akraj kvereloj en Florenco, kies viktimo iĝis ankaŭ la Lamberti-familio.

Bertran de Born, fama trubaduro, kuraĝa batalanto, instigis Henrikon, la unuenaskitan filon de la angla reĝo Henriko II. ribeli kontraŭ la patro.

Ahitofelo, konsilanto de l' juda reĝo *David*, kaŝe ribeligis reĝidon *Absolono* kaj lin instigis, ke li mortigu sian patron.

Vortklarigoj: atika: greka; pui (f. sonimito): fari kiel en Kanto XXI. v. 139.; toska: toskana; citi (v. 46; kromsenko): venigi antaŭ instancon.

L A S T U M P A S V A R M O

E C en parolo glata kiu povus	1.
viditajn plagojn, sangon diri pene,	
eĉ kiom ajn multfoje li reprovus!	
Pri tio ĉiu lang' fiaskus plene,	4.
ĉar homa lingvo kaj inteligento	
ne povas tiom mensi plenkomprene.	7.
Se unuigus eĉ la tuta gento	
veinta vunde sur la ter' amara	
de Apulio, pro l' bataltaĉmento	10.
trojana, kaj en la milit' multjara,	
kiam el ringoj kreskis riĉa predo,	
kiel Livio skribas, senerara,	13.
kun tiuj, kiuj pentis pro l' procedo	
de kontraŭstaro al Robert' Guiscardo,	
kaj, kies ostojn tuŝas la piedo	16.
ĉe Ceperan, pro l' apula tromp-arto,	
kaj, kiuj falis Tagliacozzo-vale,	
kie sen glavo venkis olda Alardo:	19.
ja ĉiuj truaj membroj kaj batale	
vunditaj korpoj estus bagatelo	
ĉe l' naŭa burs' vidita aktuale.	22.
Perdinte daŭbon, ne pli la barelo	
oscedas, ol al unu, per tratranĉo	
de l' kol' ĝis puo-truo, krevis ŝelo.	25.
Inter la gamboj pendis intest-franĝo,	
vidiĝis pulmoj, kor', la naŭza sako,	
en kiu iĝas merdo el la manĝo.	28.
Li, dum mi gapis lin sub mir-atako,	
rigardis min, brust-malfermante diris:	
»Jen, kiel mi distiras min ĉe l' hako,	31.
kian stumpigon Mohamed' akiris!	
Lamente iras antaŭ mi Ali',	
lin de menton' ĝis verto hak' disŝiris.	34.
Ĉiuj aliaj, kiujn vidas vi,	
dum viv' skandalon, skismon semis peke,	
tial fendiĝis jene tie ĉi.	

- Diablo staras dorse, kruelege 37.
 mistraktas nin, al tranĉ' de sia spado
 submetas ĉiujn, kiam ili grege
- rondiris jam tra la turmenta pado, 40.
 ĉar ĉiuj vundoj refermiĝi devas,
 ĝis ni revenas al li en irado.
- Sed kiu vi, ke tie vi nazlevas, 43.
 kaj kvazaŭ iri al la pun' hezitas,
 kaj kian punon via pek' ricevas?«
- »Ne mortis li ankoraŭ, lin ne citas 46.
 — la Majstro diris — kulpo por sufero,
 sed iĝi spertoplena li vokitas.
- Mi, kiu mortis, devas tra l' infero 49.
 ĝisfunde gvidi lin, de gir' al giro,
 jen, same kiel vi min aŭdas, vero.«
- Kaj pli ol cent, post aŭdo de ĉi diro, 52.
 haltis en fos' rigardi nin rigide,
 dolorojn forgesinte pro la miro.
- »Al fra Dolcino diru do revide, 55.
 se baldaŭ venus vi al ter' sunbrila,
 ke, ne volante sekvi min rapide,
- ja li sin armu per proviz' nutrila, 58.
 ke lin ne venku Novara pervintre;
 la venk' alie estos ne facila.«
- Ĉi tion diris Mohamed' levinte 61.
 piedon kaj, finante, por la plua
 rondiro teron tuŝis piedpinte.
- Alia, kies gorgo estis trua, 64.
 al kiu mankis ĝis sub brov' eksterme
 la trunk' de nazo, kaj l' orelo dua,
- haltinte, rigardante mirkonsterne 67.
 kun multaj, por ĉi dir' la buŝon uzis
 ruĝantan kaj ekstere kaj interne:
- »Vi, kiun kulpo damne ne akuzis, 70.
 kaj kiun vidis mi sur ter' latina,
 se l' troa similec' min ne konfuzis.

- memoru pri Pier de Medicina 73.
 ĉe la revido de l' ebenoj ravaj
 de Vercelli ĝis Marcabo' sinklinaj.
- Diru al Guido, Angiolello bravaj: 76.
 ĉi du plej bonaj el la urbo Fano,
 ke, se aŭguroj miaj estas pravaj,
en sako ilin ĵetos murda mano 79.
 el ŝip' en maron apud Cattolica
 per la perfido fia de tirano.
- Videblis al Neptun', de Maiolica 82.
 ĝis Cipro, tia krima ag' malinda
 nek de piratoj, nek de l' gent' atika.
- Ĉi perfidul' unuokule blinda, 85.
 reganta teron, kiun ĉe ni viro
 bedaŭras, ke li estis ekvidinta,
venigos ilin por interkonsilo; 88.
 kaj poste, kontraŭ l' vento de Focara
 promesoj, preĝoj estos sen utilo.«
- Nun mi: »Elmontru, igu al mi klara, 91.
 se per mi famon volas vi akiri,
 al kiu estis tiu vid' amara?«
- Makzelon de kunul' por ĝin distiri 94.
 li kaptis nun kaj kriis, buŝaperte:
 »Jen li! Ne plu li povas ion diri!
- Ĉi ekzilit' instigis misaverte 97.
 Cezaron duban, ke ĉe l' stato preta
 l' atendo portas malutilon certe.«
- Ho, kiel tremis, kun la stumpo eta 100.
 de sia trunke detranĉita lango,
 Kurio, iam tiel dir-impeta.
- Unu, sen manoj, per la stumpa stango 103.
 de l' brakoj gestis en la nigre frosta
 aer', kaj dum survangen ŝprucis sango,
- kriis: »Memoru ankaŭ min! Mi, Mosca, 106.
 ve, diris: »Kapon havas far'!« — ĉi tento
 semis malbonon en popolo toska.«

- Nun mi: »Kaj morton, eĉ, al via gento!« 109.
 Versante nun doloron al doloro,
 li iris for, rompite, kun lamento.
- Mi haltis, rigardante pri l' popolo, 112.
 kaj vidis tian, ke sen pruvo plura
 min tim' retenus de la priparolo.
- Sed konscienco igas min sekura, 115.
 kunulo bona, kiu min egidas
 per certa ŝirmo de l' konscio pura.
- Mi vidis, ŝajnas, ke eĉ nun mi vidas 118.
 senkapan buston, kiu al ni venis
 tra l' trista greg', kiu al pun' rapidas.
- La trunk' la kapon ĉe l' hararo tenis, 121.
 kaj kiel la lanterno ĝi pendolis
 rigardis nin kaj »Ve al mi« — ĝi ĝemis.
- Mem kiel lampo por si mem li rolis, 124.
 unu en du kaj du en unu nestis,
 kiele? — scias nur Kiu ĝin volis.
- Al pontpied' veninte, li haltrestis, 127.
 la kapon levis alten per la brako,
 ke aŭdu ni la vortojn, kiuj estis:
- »Rigardu pri l' terura punrepago, 130.
 vi, kiu iras tra l' mortuloj spire,
 ĉu vidis vi pli grandan ol ĉi plago?
- Ĉar pri mi famon portos vi forire, 133.
 sciu, Bertran de Born mi estis, staris
 apud la juna reĝo miskonsile:
- ribelon inter fil' kaj patro faris; 136.
 ne igis inter Absolon', Davido
 pli eĉ Ahitofel' ol mi preparis.
- Ĉar ligon tian rompis ĉi insido, 139.
 la cerbon, ve, de l' trunko, kie sidas
 ĝia radik', mi portas en divido.
- Okulon por okul' — vi en mi vidas.« 142.

DUDEKNAŬA KANTO

LA SKABIULOJ

Geri del Bello estis proksima parenco de Dante. Li estis kverelema, perfortema homo, entute malbela karaktero, lin mortigis certa Sacchetti. La familio de Dante tiam ankoraŭ ne venĝis sian morton, kvankam tiutempe tia venĝo estis morala devo. Nur post 30 jaroj faris la venĝon Bellincione degli Alighieri, mortigante unu anon de l' Sacchetti-familio.

La *posedinto de Altaforto* (Altaforte, Hautefort) estis Bertran de Born.

Sardinio, Maremma kaj *Valdichiana* estis tre malsanigaj regionoj, saturitaj de malario.

Ovidius rakontas (Metamorfozoj VII. 518. kaj sekv.) ke Juno, koleriginte pro tio, ke Jupitero ŝin trompis kun nimfo Aegina loĝanta sur la samnoma insulo (*Egino*), sendis tian peston al la insulo, ke ĉiuj homoj kaj bestoj pereis. Aeacus, la reĝo de l' insulo, restinte viva sola, elpetis de Jupitero, ke la insulo estu popolita per formikoj transformitaj en homojn. Tial la insulanojn poste oni nomis mirmidonoj (myrme: formiko). Krom Ovidius prikantis ĉi tion ankaŭ Apollodoros kaj aliaj.

Oka rondo, deka burso: falsistoj.

Griffolino d' Arezzo estis fama alhemiisto. Lin bruligis la episkopo de Siena, pro sorĉisteco, laŭ la instigo de la zorgato-filo de l' episkopo: *Albero da Siena*. Laŭ kelkaj komentariistoj la afero ne okazis tute tiel, kiel ĝin rakontas Griffolino en la versoj 112—117, sed li eltrompis multan monon per la promeso, ke li instruos Alberon flugi.

Pri *Dedalo* (Daedalos) vd. Kanto XVII. Noto; alineo 10.

Stricca (de' Salimbeni) kaj *Niccoló* estis fratoj, disipuloj kaj diboĉuloj, la lasta estis ano de l' fama »brigado« (vd. sube). Li hejmgis en Florenco la kariofilon, spicon tiam tre multekostan. Pri li oni rakontas, ke li manĝis ormonerojn kun saŭco: la saŭcon lekis de la oro kaj la oron ĵetis tra la fenestro kvazaŭ oston.

Dekdu junuloj en Siena fondis rondon, la faman »brigadon«, por kune diboĉi kaj amuziĝi. Dum dudek monatoj ĉiuj anoj de l' brigado iĝis bankrotaj. Anoj de l' brigado estis inter aliaj *Caccia d' Asciano* kaj *Abbagliato*: Bartolomeo de Folcacchieri. Krome *Niccolo* (vd. supre) kaj ankaŭ *Lano* (vd. Kanto XIII. verso 120.)

Capocchio da Siena estis alhemiisto, pro kio oni lin bruligis en Florenco en 1293. Dante lin bone konis; laŭ



Sankta Francisko kaj la diablo.

kelkaj komentantoj ili estis lernejkunuloj, kaj Dante povis memori, ke Capocchio, kiel knabo, tre bone povis imiti bestosonojn.

La tempo estas Sankta Sabato, posttagmeze je la unua kaj duono: la Luno estas subpiede (v. 10.)

Vortklarigoj: *asisti* (z): helpi; *klostro* (*): monaĥejo; *krisolo* (s): fandvazo; *langvora* (gm): malstreĉita anime kaj korpe; *pranci* (s): ĉi tie: fanfaroni; *sinistra* (*): maldekstra, *tenajlo* (s): fera tenilo aŭ tirilo.

LA SKABIULOJ

PRO l' multaj plagoj, pro l' vundita svarmo 1.
 okuloj miaj tiel ekebriis,
 ili ripozi volis nur ĉe larmo.
 Sed: »Kial gvatas vi — Virgilo kriis — 4.
 kial de l' trupo stumpa kaj sufera
 l' okulojn preni vi ĝis nun ne sciis?
 Tion ne faris vi en burs' cetera: 7.
 pripensu, se vi ĉiujn nombri kredas,
 dudekdu mejlojn de ĉi val' infera,
 kaj, ke la lun' jam al ni subpiedas. 10.
 Multo konenda estas sen ekkono,
 plu resti temp' malmulta ne koncedas.«
 »Se scius vi — mi diris je l' admono — 13.
 la kaŭzon: kial mi rigardis tree,
 vi eble lasus plu min en ĉi zono.«
 Sed iris li. Mi sekvis lin obee, 16.
 kaj lin, respondi pretan jam sen dubo,
 mi alparolis: »Kredas mi, ke vee
 tra l' kav', kie mi gapis pri ĉi grupo, 19.
 plendas anim' el familio mia
 pri l' kulpo tiom kosta en ĉi subo.«
 Respondis mia Majstro: »Penso plia 22.
 vin ĉesu okupadi pri ĉi homo,
 li restu jam, rigardu pri alia.
 Ĉar mi lin vidis sub la pontkolono 25.
 minaci fingre vin, kaj oni diris:
 Geri del Bello estas lia nomo.
 Sed vian vidon tute al si tiris 28.
 tiam la posedint' de Altaforto,
 do vi lin ne rimarkis, li foriris.«
 »Ho Majstro, lia violenta morto 31.
 — mi diris — kiu restis nevenĝata
 de l' dividantoj de ĉi honta sorto,
 lin indignigis; kun silent' malŝata 34.
 li preteriris do, kaj min ĉi fakto
 eĉ pli agordas al pardon' kompata.«

- Al lok' ni venis dum ĉi intertrakto, 37.
 de kie, se pli lume, de la bordo
 ĝis fund' montriĝus jam la sekva ŝakto.
- Ni venis al la lasta klostro-pordo 40.
 de Misbursar', kaj sube, en la fendo,
 vidiĝis ĝia monaĥar' en hordo.
- Arkpafis tie min multega plendo 43.
 per feraj sagoj de kompato vana;
 l' orelojn mi manfermis por defendo.
- Se ĉiu mizerul' hospitalana, 46.
 trovebla de Julio ĝis Septembro
 en Sardini', Maremma, Valdichiana,
- en sama fos' tordiĝus de la febro: 49.
 simile estus; tia stink' flugpendis,
 kia eliras el putranta membro.
- Kaj nun sur lasta bordo ni descendis 52.
 de l' longa ponto, ĉiam al sinistro,
 kaj antaŭ mi pli klare sin etendis
- la fundo, kie punas la servisto 55.
 de l' alta Sir': la Justo senerara,
 pri l' falsistar' tenata en registro.
- Ne kredas mi, ke la mizer' amara 58.
 de l' gent' Egina estis pli impeta, —
 dum tiel estis la aer' pestfara,
- ke ĉiuj bestoj, ĝis la verm' plej eta, 61.
 pereis tiam, kaj l' antikva raso
 kiel asertas tradici' poeta,
- sin renovigis el formik-amaso — 64.
 ol • tie ĉi, kie tra l' val' obskura
 langvoris ombroj grupe en rampa paso.
- Korpo sur korpo, kuŝis grup' malpura, 67.
 surdorse aŭ surventre, kelkaj ŝovis
 sin man-piede sur la voj' tortura.
- Senvorte, ni de paŝ' al paŝ' nin movis, 70.
 gvatante, aŭskultante pri l' mizere
 malsanaj, kiuj levi sin ne povis.

- Du ombroj sidis sinapoge tere 73.
 kiel sur flam' krisolo ĉe krisolo,
 de kap' ĝis pland' makulaj fav-ulcere.
 Neniam striglas kun pli da malmolo 76.
 stalbubo, kiun jam atendas mastro,
 aŭ, kiu viglas jam tre malgraŭ volo,
 ol ili unge skrapis sin, kun hasto 79.
 ŝirante sian haŭton pro l' rabia
 jukado, kies ne mildiĝas drasto.
 Laboris ungoj sur la haŭt' skabia 82.
 kiel tranĉil' sur karmo skvamdetire
 aŭ sur eĉ pli grand-skvama fiŝ' alia.
 »Vi, kiuj vin grategas tiel ŝire, 85.
 tenajlon faras el la fingro-finoj —
 la Majstro turnis sin al unu dire —
 ĉu do troviĝas inter vi latinoj? 88.
 Respondu, se la ungoj por eterne
 sufiĉu al vi por ĉi labor-rutinoj.«
 »Ni mem latinoj estas ja, ĝiskerne 91.
 putrantaj — respondante l' unu plendis —
 sed kiu vi, scivola ĉi-koncerne?«
 La Duk': »Mi estas, kiu ekdescendis 94.
 kun ĉi vivul', de ŝtup' al ŝtup' ĝisbaze.
 Lin gvidi tra l' infer' min Oni sendis.«
 Cesinte sin apogi, embarase 97.
 kaj treme ili nun sin al ni rulis
 kun pluraj, kiuj aŭdis nin okaze.
 La Duk' min alpaŝinte min stimulis: 100.
 »Demandu do, laŭ la dezir' de l' koro.«
 Kaj mi komencis, kiel li postulis:
 »Ke via fam' ne ĉesu laŭ vaporo 103.
 en homaj mensoj sub la firmamento,
 sed longajn jarojn vivu en memoro,
 parolu, kiuj vi, el kia gento? 106.
 vin via puno honta, abomena
 ne retimigu de la nom-prezento.«

- »Arezzo naskis, Albero da Siena 109.
 min igis bruli, sed, kial mi mortis,
 ne tial trafis min la puno jena.
- Sercante foje mi al li raportis, 112.
 ke flugi povas mi; lin ege estris
 scivolo, sed li mense ne tre fortis
- kaj volis pruvon kaj, ĉar mi ne estis 115.
 Dedalo, min puŝigis al ŝtiparo
 per tiu, kies fil' li sin atestis.
- Sed al ĉi lasta deka burs' pro faro 118.
 de alhemio damnis min instanco
 de Minos, kiu juĝas sen eraro.«
- »Ĉu estas gento kun pli vanta pranco — 121.
 mi diris al la Duk' — ol la sienanoj?
 Ja malsuperas ilin eĉ la franco.«
- L' alia de la lepraj du kompanoj 124.
 respondis: »Nur krom Stricca: li preferis
 elspezi ĉiam per moderaj manoj;
- krom Niccoló, kiu transplante peris 127.
 multkoston kariofilon en elitan
 ĝardenon, kie *tia* sem' prosperis,
- krom la *brigad'*, en kiu grundon vitan, 130.
 boskegon Caccia de Ascian fordistris,
 kaj Abbagliato ŝutis menson spritan.
- Sed ke vi sciu, kiu nun asistis 133.
 vin kontraŭ Siena, okulstreĉu bone,
 mia vizaĝ' respondos. Mi falsistis
- pri la metaloj, estis mi laŭnome 136.
 Capocchio, kiu trompe alhemiis.
 Vi scias ja, se pravas mi rekone,
- Naturon kiel bone mi simiis.« 139.

TRIDEKA KANTO

LA ŜVELVENTRA MAJSTRO ADAMO

Semele, filino de Kadmos, fondinto de Tebo, estis amatino de Jupitro, tial Juno, edzino de Jupitro persekutis la tebanojn. Unue, sub la formo de maljunulino ŝi persvadis Semele-n, ke ŝi petu Jupitron aperi antaŭ ŝi en sia tuta dia brilo: Semele cindriĝis pro tio. Poste ŝi disŝirigis Akteonon, nevon de Semele, per hundoj; ŝi faris, ke Agave, fratino de Semele, mortigis sian solan filon, kiun ŝi opiniis esti apro; ŝi pereigis ankaŭ la trian fratinon de Semele, Ino-n (vd. poste). Kaj reĝon Kadmos tiel longe ŝi turmentis, ke ĉi tiun fine Jupitro, laŭ lia propra peto, transformis en serpenton.

Athamas estis la edzo de *Ino*, fratino de Semele; li estis reĝo de Tebo.

Ce la falo de Trojo falis ankaŭ ĝia reĝo Priamos. *Hekuba* estis edzino de Priamos; *Polyxena*, kiun oni oferis sur la tombo de Achilles (Aĥilo) kaj *Polydoros*, kiun mortigis Polynestor, estis ŝiaj infanoj.

Gianni Schicchi el la florenca Cavalcanti-familio, estis facilanima homo, preta je ĉio. Kiam *Buoso Donati* volis fari testamenton antaŭ sia morto, lin lia frato Simone traktis per parolo, ĝis li mortis. Gianni Schicchi, kiu bone povis imiti la voĉon de l' mortinto, kuŝiĝis anstataŭ li en la liton, kaj diktis testamenton por la favoro de Simone, sed li skribigis en la testamenton ankaŭ la promeson de Simone, ke li mem ricevu la plej belan ĉevalinon (la Damon de l' ĉevalarmento) el la ĉevalaro de Buoso. Kaj li finis la testamenton per tio, ke, se Simone ne disdonos ĉion al la aliaj pridonacitoj en du semajnoj, la tutan heredon ricevu la franciskanaj monaĥoj.

Mirrha, filino de l' Kypra reĝo Kinyras, enamiĝis al sia patro kaj sin ŝajnigis alia virino, por gajni lian amon. La frukto de l' peka nokto estis *Adonis*.

En la regiono de Casentino (fontregiono de l' Arno) estas la fortikaĵo Romena, kie rezidis grafoj *Guido*, *Alessandro* kaj *Aghinolfo*. Laŭ ilia instigo falsis majstro Adamo el Brescia la florencan florenon, sur kiu estis la bildo de Johano-Baptisto, gardsanktulo de l' urbo (vd. Kanto XIII. v. 143.) La falsiston oni bruligis en Florenco.

La florenca floreno estis el 24-karata oro; majstro Adamo ĝin falsis per tio, ke la metalo enhavis 21 karatojn de oro kaj 3 da alojo.

La *Branda fonto* estis tre riĉakva fonto en Romena.

La greko *Sinon* persvadis per mensogoj la trojanojn, ke ili entrenu en la urbon la fatalan lignoĉevalon, en kies ventro estis grekaj militistoj.

Jozefon volis delogi la edzinon de Putifaro; ĉar ŝi ne sukcesis, ŝi kalumniis lin, ke li volis ŝin perforti.

Narciso, la belega junulo rigardis sin en la spegulo de l' akvo kaj kredante la bildon alia persono, li enamiĝis al ĝi.

Vortklarigoj: *armento* (**): aro de grandaj bestoj; *enorma* (c): supermezure granda; *hidropso* (z): akvomalsano akvoŝvelo; *incesti* (*): sangadulti; *kuspi* (s): faldi aŭ fleksi kontraŭ la ĝusta direkto (*kuspe*: v. 57.: suprenfaldite); *leĝera* (*): malpeza; *miraĝo* (b) trompvidaĵo; *teorbo* (b): speco de liuto; *vertiĝi* (*): havi kapturnon.

LA SVELVENTRA MAJSTRO ADAMO

KIAM koleron egan sentis Juno 1.
 pro Semele' al la popol' tebana,
 kiel ŝi montris ĝin per ofta puno,
 Athamas iĝis tiel mensmalsana, 4.
 ke li, vidinte, ke l' du filojn etajn
 alportas la edzin' kun teno mana,
 ekkriis: »Donu la kaptilojn retajn, 7.
 jen leonin' kun leonidoj venis,
 kaj elstreĉinte manojn krud-impetajn,
 Learkon, unu filon li ekprenis, 10.
 eksvingis kaj frakasis lin sur ŝtono;
 ŝi kun la dua en la maron svenis.
 Kaj kiam turnis la Fortun-dispono 13.
 l' orgojlon de Iliono ĉiospita
 kaj kune falis reĝo, regno, trono:
 Hekuba, trista, povra kaj kaptita, 16.
 vidinte Poliksenan en la morto
 kaj sian Polidoron difektita
 de vund' terura sur la mara bordo, 19.
 freneze kiel hundo hurlis boje,
 tiel la menson rompis dolortordo.
 Sed ne frenezis Tebe ja, nek Troje 22.
 kun tiel ege furioza krudo,
 ne homo, sed eĉ best', kiel ĉifoje
 du ombroj palaj kaj en plena nudo, 25.
 kiuj mordante kuris, similstate
 al porko, eskapinta el porkbudo.
 L' unu Capocchion kaptis senkompate 28.
 ĉe l' kol' per dentoj, tiel lin tirante,
 ke l' fundon li per ventro erpis grate.
 Tremegis nun la Arezzan', dirante: 31.
 »Jen Gianni Schicchi, kiu mensobskure,
 rabie iras, ĉiujn dentŝirante.«
 »Ho — diris mi — se vin ne mordu dure 34.
 ĉe l' dors' la dua, diru, kiaspeca
 ŝi estas, antaŭ ol ŝi pasis kure.«

- Kaj li: »Si estas la anim' praeca 37.
de tiu kulpa Mirha, kiu estis
amanta patron trans la amo deca;
- Kaj kun la patro tiel ŝi incestis, 40.
ke ŝi alia falsis sin dum tento,
kiel la dua, tie, sur sin vestis,
- por gajni damon de l' ĉeval-armento, 43.
la ŝajnan formon de Buoso Donati
dum falsa far' de lia testamento.«
- Forkuris tiuj por plu mordi, bati. 46.
L' okulojn alfiksitajn en absorbo
mi turnis por damnitojn pluajn gvati.
- Kaj vidis mi similan al teorbo, 49.
sed dividiĝis lia ventr' enorma
sub lok' kie forkiĝas la homkorpo.
- Hidropso, kiu membrojn mise formas, 52.
ĉar tiel ĝi la suk-dividon fuŝis,
ke plu vizaĝ' al ventro ne konformas,
- al li la lipojn per soif' dispuŝis; 55.
el ili, kiel ĉe ftizul', sek-sente,
la infra pendis, supra kuspe kuŝis.
- »Ho vi, venintaj tute senturmente, 58.
kial, ne scias mi, ĉi nigran teron,
— li diris nun — rigardu do atente
- majstron Adamon kaj lian mizeron; 61.
laŭplaĉe ĉion ĝuis mi dum vivo,
kaj ve, mi sopiregas nun akveron.
- Fluetoj, de sur verda montdeklivo 64.
de Casentin' kurantaj en la Arnon,
ĝin freŝigante, ja ne sen motivo
- bildigas al mi ĉiam sian ĉarmon, 67.
ĉar ĉi imag' pli tranĉe min traplugas,
ol la malsan' maĉanta vizaĝkarnon.
- Min la rigida Just', kiu min jugas, 70.
allogas per la lok' de l' pekofaro,
do eĉ pli arde miaj ĝemoj flugas.

- Mi tie, en Romena, sur denaro 73.
falsita markis la Baptisto-bildon,
tial mi l' korpon lasis sur ŝtiparo.
- Sed se mi vidus ĉe ni tristi Guidon 76.
kun Alessandro kaj kun frat' ilia,
por Branda font' ne donus mi la vidon.
- Unu jam venis, se l' ombrar' rabia, 79.
ĉirkaŭkuranta, min sciigis vere,
sed kiom taŭgas sub kateno tia?!
- Se mi nur tiom sentus min leĝere, 82.
ke mi nur spanon rampus dum jarcento,
mi ekrapinta estus jam surtere,
- por serĉi lin tra la damnita gento, 85.
kvankam dekunu mejlojn cirklas, plion
ol duonmejlon larĝas ĉi segmento.
- Pro ili venis mi ĉi kompanion, 88.
mi metis en florenon laŭ influo
ilia trikarate la skorion.«
- Nun mi: »Parolu pri l' mizera duo, 91.
fumantaj kiel vintre man' post lavo,
strikte kuŝantaj, dekstre laŭ situo.«
- »Mi tiel trovis ilin en ĉi kavo, 94.
senmovaj ili restis; miascie
el ĉi senmov' neniam estos savo.
- Jozefon unu akuzis kalumnio, 97.
dua: Sinon' de Trojo, grek' malvera,
pro febro li fetoras tiel fie.«
- Tiam la grek', ĉar iĝis li kolera, 100.
ke tiel malrespekte li lin nomis,
ekbatis lin je lia ventro ŝvela,
- ke kiel la tamburo ĝi eksonis. 103.
Kaj majstr' Adam' al li, per brako certe
ne malpli dura, tuj vangfrapon donis,
- dirante: »Kvankam kuŝas ja inerte 106.
l' aliaj membroj en ĉi peza ligo,
por tia mov' la brak' uzeblas lerte!«

- L' alia nun: »Irante al bruligo
vi malpli rapidegis dum la vojo,
sed ja pli ĉe l' monfalsa artifiko!« 109.
- La hidropsul': »Vi pravas je ĉi fojo,
sed vi eligis malpli verajn sonojn,
dum oni vin demandis apud Trojo.«
- »Se mi mensogis, vi ja falsis monojn,
— diris la grek' — min unu kulpo boras,
vin tiom, ke superas vi demonojn!« 115.
- »Ho, ĵurrompinto, ĉu vi ne memoras
pri la ĉevalo? — kriis la Ventrulo, —
vin mordas, ke tutmonde vi notoras.« 118.
- »Vin mordas langsekigaj soif-bruloj,
kaj putra akvo — kriis re la greko —
kiu rondigas ventron ĝis okuloj.« 121.
- La monfalsisto: »Bruu nur kun bleko
malica, laŭ kutim'; sed se invadas
min akvo kaj turmentas soif-seko,
vi havas kapdoloron kaj ardadas,
spegulon de Narciso ja singulte
vi lekus, sen ke oni vin persvadas.« 124.
- Dum mi rigardis ilin streĉaŭskulte,
la Duko diris: »Ho, ĉu ne sufiĉas?
ke mi kondamnu vin, ne mankas multe.« 127.
- Tuj mi, aŭdinte ke li koleriĝas,
min turnis, tiel ruĝe sur vizaĝo,
ke pro l' memoro mi eĉ nun vertiĝas. 130.
- Kaj kiel iu songis pri domaĝo
kaj, ke li songu, songe li deziris,
ĉar la realon kredis li miraĝo: 133.
- tia mi estis, dum mi mute iris,
ekskuzi volis min kaj la ekskuzon
mi, eĉ mem ne sciante, jam akiris. 136.
- »Malpli da honto lavas ja misuzon
pli grandan — diris mia Duk' pardone —
do lasu ĉiun triston kaj konfuzon. 139.
- 142.

Sed, ke ĉeestas *mi*, memoru bone,
veninte tien, kie kun vort-kraĉa
kverelo oni bruas simil-tone;
ĝin aŭdi voli estas volo aĉa.«

145.

148.


911

211

111



La soifa majstro Adamo.



TRIDEKUNUA KANTO

EN LA MANOJ DE L' GIGANTO

La *lanko de Ahilo*, kiun li ricevis de sia patro Peleus, povis per tuŝo sanigi la vundon, kiun ĝi faris.

La armeon de *Karlo la Granda* neniigis la saracenoj ĉe Roncévalo. Rolando, la granda heroo, donis malesperajn dangesignalojn per sia korno, sed vane.

Pri la Puto vd. Kanto XVIII.

La Gigantoj (Filoj de l' tero: Ephialtes, Tiphous, Titiŭs, Briareus) ribelis kontraŭ Jovo (Jupitro). Li mortbatis ilin per fulmo en la batalo de Flegra (vd. Kanto XIV. v. 58.)

Nimrodo, konstruinto de l' Babela Turo, kaŭzis la lingvan konfuzon de l' mondo.

Scipio Africanus venkis *Hanibalon* en la valo de l' Bagrada, en Afriko. Tie vivis *Anteus* (ne vivinta ankoraŭ dum la batalo de Flegra). Li nutris sin per leonviando. Heraklo lin mortigis en la fama lukto, levinte lin en la aeron, por ke lin ne povu refortigi la tuŝo de lia patrino, la Tero.

La bronza *pinfrukto* en Romo estas pli alta ol homo; ĝi estas videbla en la Vatikano.

La frisoj estis famaj pri sia alteco.

Garisenda estas la oblikva turo de Bologna.

Kocito (Kokytos) estas la kolektiĝinta kaj glaciiginta akvo de la infera rivero funde de l' Puto, en la centro de l' Tero (vd. Kanto XIV. v. 118.)

Vortklarigoj: *bizara* (*): strangege; *latenta* (s): kaŝiganta; *perisomo* (laŭ la originalo): ĉirkaŭkorpaĵo; *torako* (s): brusto; *reduto* (z): fortikaĵo.

LA sama lango min antaŭe mordis;
 ke ambaŭ vangojn pentris honthumilo;
 kaj poste al la vund' balzamon portis;
 tiel mi aŭdis: lanco de Ahilo 4.
 kaj de la patro estis en batalo
 kaŭzo de ve' kaj poste sanigilo.
 Ni turnis dorson al la naŭza valo 7.
 kaj, sur la bord' interna, ringoforma,
 sen vort' ascendis laŭ diagonalo.
 Nek tag' nek nokto estis nun, nur morna 10.
 malhel', por vidi ja apenaŭ taŭga,
 sed aŭdis mi, ke hurlas sono korna,
 kiu eĉ mem la tondron igus raŭka; 13.
 l' okulojn tiris tra l' aer' nigranta
 tute al si ĉi voĉo ege laŭta.
 Post lukt' funebra, kiam Karlo Granda 16.
 l' armeon sanktan perdis, ne sonoris
 tiel terure eĉ la korn' Rolanda.
 Ne longe kapalturme mi scivolis, 19.
 kiam ekŝajnis multaj altaj turoj,
 do: »Majstro, kia urbo?« — mi parolis.
 Kaj li respondis: »Ĉar tra la obskuroj 22.
 el malproksim' rigardas vi explore,
 ne miru, ke eraras la okuloj.
 Kiel la senso trompas sin de fore: 25.
 vi, post alveno, vidos tion klare,
 do, urĝu viajn paŝojn pli fervore.«
 Poste ĉe l' mano li min prenis kare, 28.
 kaj diris: »Antaŭ ol ni pli najbaras,
 ke l' fakt' efiku vin malpli bizare,
 sciu, ne turoj, sed gigantoj aras: 31.
 de l' Puto-rand' interna sin etendas
 la korpoj kaj ĝis umbilik' elstaras.«
 Kaj kiel, se l' nebulo jam ascendas, 34.
 rigard' iom post iom iĝas pura
 por vidi, kio sub vapor' latentas,

- nun, dum borante tra la dens' obskura 37.
 mi proksimiĝis al la borda kruto,
 ĉesis erar' kaj kreskis tim' terura.
- Car, kiel sur ringmuroj de l' reduto 40.
 Montereccione sin per turoj kronas,
 tiel la bordmarĝenon ĉirkaŭ l' Puto
- terura gigantar' duonkorpe zonas, 43.
 kiujn ankoraŭ nun per fulmohako
 minacas Jovo, kiam tondro sonas.
- Ies vizaĝo, ŝultroj kaj torako 46.
 vidiĝis jam, kaj granda part' el ventro,
 kaj, ĉe la kokso, ambaŭflanke, brako.
- De la Naturo estas ja prudento, 49.
 ke ĝi tielajn bestojn ne plu kovas
 por ekzekutistad' en Mars-taĉmento.
- Ke ĝi balenojn, elefantojn provas 52.
 ne pripentante, se ni konsideras,
 ni pli modera, ĝusta tion trovas.
- Car se kun intelekto sin federas 55.
 potenca forto kaj misvol' malpia,
 ĉiu sinŝirmo tie malprosperas.
- Grandega estis la vizaĝo: kia 58.
 la pino-frukt' en Sankta Petr' en Romo,
 kaj ĉiu ost' estis ĉiproporcia.
- El bordo, kiu estis perisomo 61.
 de l' mez' al infre, turis tia ŝvelo
 de formoj, ke tri frisoj, hom' sur homo,
- ja ne atingus ĝis la kap-nivelo, 64.
 kaj nombri tridek spanojn eblis al mi
 de l' zono ĝis kroĉloko de l' mantelo.
- »Rafél mai améh zabi et almi« 67.
 ekkriis lia buŝ' sovaĝigita,
 kiu ne taŭgas por pli milde psalmi.
- Kaj nun la Duk' al li: »Anim' malsprita, 70.
 uzu la kornon, por enblovi ĝenan
 koleron, bolon de l' pasi ekscita;

- serĉu ĉe l' kolo, trovos vi la tenan 73.
rimenon tie, ho anim' konfuza,
ĝi daŭbas vian bruston volumenan.«
- Al mi post tio: »Jen, sin mem akuzas 76.
Nimrod', el kies kulpo konsekvenca,
ke l' mondo ne la saman lingvon uzas.
- Ni lasu, vane kun li ni intencas 79.
paroli, por li lingvo ĉialanda,
kiel por ni la lia, nur sensencas.«
- Sinistren iris ni laŭ roko randa, 82.
kaj sekvis nun, je pafo arbalesta,
alia, eĉ pli monstra kaj pli granda.
- Kiu lin ligi estis majstro ekstra, 85.
ne scias mi, sed sin sub ĉeno tenis
ĉebruste man' maldekstra, dorse dekstra;
- de l' kol' malsupren tiu ĉen' katenis 88.
lin tiel, ke la nekaŝitan parton
ĝi en kvinobla volvo ĉirkaŭprenis.
- »Ĉi orgojlulo volis sian forton 91.
elprovi kontraŭ la plejaltan Jovon,
— diris la Duk' — nun havas li ĉi sorton.
- Efialto! Faris li la grandan provon, 94.
kiam timigis diojn grandeguloj,
la brak' levita ne plu faros movon!«
- Nun mi al li: »Se licas laŭ Reguloj, 97.
pri tiu senmezura Briareo
mi volus nun spertiĝi per okuloj.«
- Kaj li: Montriĝos al vi tuj Anteo; 100.
proksimas li, senĉene, kaj parolas;
li metos nin sur fundon de l' Kulpejo.
- Tre foras, kiun vi ekvidi volas; 103.
ligita, li aspektas ne alie,
nur li eĉ pli sovaĝmiene bolas.«
- Ne estas tertremego, kiu plie 106.
ekskuus turon, ol post tiu vorto
Efialto sin skuegis nun rabie.

- Neniam tiel timis mi de morto, 109.
 kaj certe mi venkitus de teruro
 sen vid' ke li senpovas pro l' ĉenporto.
- Post plua ir' ni trovis ĉe l' putmuro 112.
 Anteon; li, eĉ sen la kap-detalo,
 kvin ulnojn altis el la aperturo.
- »Vi, kies man' en la fortuna valo, 115.
 doninta al Scipio glorheredon,
 kiam kun trupoj fuĝis Hanibalo,
 mortigis mil leonojn kiel predon, 118.
 kaj se estintus vi ĉe l' Granda Spito
 de viaj fratoj, multaj havas kredon:
 venkintus la Ter-filoj en milito, 121.
 ne ŝparu penon meti nin tra l' klifo
 sur fundon, kie frostas la Kocito.
- Nin ne irigu al Ticio, Tifo, 124.
 ĉi tiu farus, kion vi deziros,
 kliniĝu, ne grimacu per nazĉifo.
- Li famon en la mond' por vi akiros, 127.
 li vivas, longa vivo por li ĝermas,
 se Voko antaŭ temp' lin ne altiros.»
- Tiel la Duk'; kaj tiu tuj dissternas 130.
 la manon, kies egan premon konas
 Heraklo, kaj la Dukon en ĝin fermas.
- Sin en la man' sentante, min admonas 133.
 Virgil': »Mi tenos vin, al mia sino
 premiĝu, ĝis ni *unu* faskon donas.»
- Kaj kiel Garisendon, el sub klino 136.
 vidante, kiam nub' ĝin ekpreteris,
 alsinki kredas ni ĉe l' supra fino,
 tiel Anteo nun al mi aperis 139.
 sin alklinante, kaj mi, angorsenta,
 aljan vojon tiam ja preferis.
- Sed milde li al fundo: lok' turmenta 142.
 por Lucifer' kaj Judas, metis nin,
 tamen, kliniĝis nur por temp' momenta,
 kaj kiel mast' en ŝipo levis sin. 145.

TRIDEKDUK KANTO

LA FUNDO DE L' INFERO

En la naŭa rondo damniĝas la perfiduloj. Ĝi dividiĝas en kvar subrondojn: Kaina, Antenora, Ptolemea (rondoj) kaj Judeko.

Amphion, laŭ la mito, ekmovis la ŝtonojn per sia kanto, tiel li konstruis la fortikaĵon de Tebo.

Tambernĉ kaj Pietrapana estas grandaj montoj.

Unua subrondo: *Kaina*: perfiduloj kontraŭ parencoj.

La filoj de *Alberto de' Alberti*, sinjoro de l' valo de *Bisenzio*, post la morto de l' patro, ekkverelinte pro la heredaĵo, mortigis sin reciproke en duelo.

La filo de reĝo *Arturo*, *Mordrĉ*, atakis sian patron. La reĝo tiel lin trapikis, ke la sunbrilo pasis tra lia korpo.

Focaccia dei Cancellieri, nobelo el Pistoja, Blankulo, mortigis sian kuzon, laŭ aliaj sian patron.

Sassol Mascheroni, florencano, mortigis sian kuzon, kies kuratoro li estis, por akiri la heredaĵon. Kiam la krimo malkaŝiĝis, oni rulis lin tra Florenco en barelo interne najlumita kaj senkapigis. Pri la afero oni multe parolis tiutempe en la tuta Toskanio.

Alberto Camiscion de' Pazzi, murdis sian kuzon, *Ubertinon*.

Carlino de' Pazzi, Blankulo, vendis la fortikaĵon al li konfiditan al la *Nigruloj*. Ĉi tiuj, okupinte la urbon, mortigis en ĝi ankaŭ la parencojn de *Carlino*. Tial diras *Camiscion*, ke *Carlino* per sia pli granda krimo kvazaŭ ekskuzas la lian.

Dua subrondo: *Antenora*: perfidintoj de l' patrujo.

(Antenoro: trojano, perfidulo, per kies helpo sukcesis *Ulysses* ŝteli la *Palladion*. Vd. Kanto XXVI.)

En la batalo ĉe *Montaperti* (vd. Bio. 8.) *Bocca (degli Abati)*, gelfo, sed en sekreta interkonsento kun la gibelinoj, detranĉis la brakon de la gelfa standardisto. La standardo falis, la gelfaj trupoj konfuziĝis.

Buoso di Duera, gibelino el Cremona. La lombardaj gibelinoj sendis lin kun armeo kontraŭ *Karlo Anĵua*, sed li, subaĉetite de la francoj, stariĝis flanken el ilia vojo, helpante al venko la anĵuanojn (vd. Bio. 9.)

Abato Beccheria, sendito de papo *Aleksandro IV.*, estis senkapigita en Florenco (1258), sub la akuzo, ke li komplotis kun la ekzilitaj gibelinoj. La papo pro tio ekskomunikis la urbon (vd. Bio. 7.)

Gianni Soldanier, gibelino; kiam post la forpelo de l' »gajaj fratoj« (vd. Bio. 9.) Florenco gelfiĝis, li transiris

en la gelfan partion kaj volis partopreni en la regado, sed li malsukcesis.

Ganellone (Gano): fama perfidulo en la rondo de Karlo la Granda. Lia perfido kaŭzis ankaŭ la teruran malvenkon en Roncevalo (vd. Kanto XXXI. v. 16.)

Tebaldello (de' Zambrasi), faënzano, perfidis sian naskurbon; por franca mono li nokte malfermis ĝian pordegon al la sieĝanta armeo. Poste li fuĝis al Bologna.

Tydeus (*Tideo*): unu el la sep reĝoj sieĝintaj Tebon. *Menalippos* lin vundis mortige; sed li sukcesis mortigi ankoraŭ Menalippon kaj ĝismorte li mordis furioze lian kranion.

Vortklarigoj: *bavi* (f. gm.): salivi; *hurti* (gm): alpuŝiĝi; *samventraj* (v. 58.): sam-uteraj, sam-patrinaj; *stampfi* (s): piedbati; *stridi* (*); akre siblegi.

LA FUNDO DE L' INFERO

H AVUNTE rimojn, kiuj raspe stridas,	1.
al la malica, morna kav' konvene,	
sur kiu ĉiuj rokoj ponte sidas:	
sukon de mia menso mi pli plene	4.
elpremus, sed, ĉar tiajn mi ne havas,	
mi ne sen tim' komencas, parolprene;	
ĉar ja ne povas, kiu pepkartavas,	7.
priskribi fundon de la Universo,	
nek lango, kiu paĉjon, panjon bavas;	
sed min la Damoj helpu en ĉi verso,	10.
kiuj Amfionon en la fond' de Tebo,	
ke l' dir' respondu faktojn, sen diverso.	
Ho, super ĉiuj miskreita plebo,	13.
en lok', pri kiu l' diro estas dura!	
Prefere iĝi bruto, kapr' en stepo!	
Kiam ni subis en la put' obskura,	16.
etaĵ, sub la pied' de l' ega viro,	
kaj mi gapadis pri la alto mura,	
»Atentu pri la paŝoj! — sonis diro —	19.
ke vi al iu via frat' mizera	
la kapon ne plandbatu dum la iro.«	
Mi turnis min kaj antaŭ l' mur' bordera	22.
mi vidis sub mi lagon: per la gelo	
ne akvo ŝajnis ĝi, sed vitro vera.	
Sin en Aŭstrio per la vintra ŝelo	25.
ne kovras la Danub' kun tia dik',	
ne eĉ la Don, sub sia frosta ĉielo,	
kiel ĉi tie, kaj se Tambernik'	28.
falegus sur ĝin, aŭ Pietrapana,	
tiu glacio ja ne dirus: krik.	
Kaj kiel, kvake, sidas trupo rana	31.
ĝis naz' en akvo, kiam songas ĉie	
pri spikkolekto la knabin' kampana,	
jen, blue, damnaj ombroj, subglacie	34.
ĝis kie honto ruĝas, tie nestis	
kaj per la dentoj klakis cikonie.	

- Infren-turnitaj la vizaĝoj estis, 37.
pri l' frosto buŝoj, kaj pri l' kor-amaro
ĉiuj okuloj kun larmad' atestis.
- Post rigardad' pri kelkaj, sub mi paro 40.
montriĝis, kunpremita tiel tute,
ke la harar' miksiĝis al hararo.
- »Ho, vi, stringantaj brustojn tiel brute, 43.
kiuj vi estas?« — diris mi konsternes.
Ili kolfleksis, levis fruntojn mute.
- L' okuloj, ĵus malsekaj nur interne, 46.
ekgutis; frosto pelis al ekstero
tra ili larmojn, kovris ilin ferme.
- Lignon al ligno premas bolt' el fero 49.
ne pli; kaj ili nun kunhurtis frape,
kiel du kaproj; tia la kolero.
- Unu, perdinta pro l' frosteg' dekape 52.
l' orelojn, kun al-infra fruntsituo
diris: »Vi kial nin spegulas gape?
- Se vi scivolas ilin, do ĉi du 55.
kun patr' Alberto havis valon kune
ĉe la descendo de l' Bisenzo-fluo:
- samventraj; en Kaina tuta nune 58.
vi povas serĉi: ne troviĝos ombro
metita en glacien pli indpune;
- nek tiu, kies bruston, kun la ombro 61.
samfrape truis la Artura mano,
nek Focaccia, nek, kiu el ĉi tombo
- rigardi min manhelpas per kap-lano, 64.
kaj havis nomon: Sassol Mascheroni,
vi konas lin, se estas vi toskano.
- Ke ne demandu plu, min nomis oni 67.
Camiscion Pazzi: kaj mi nun atendas
Carlino-n, venu li ekskuzon doni.«
- Poste mi vidis, ke mil kapoj plendas 70.
frostblue, tiel, ke pro l' vid' konsterna
eĉ nun mi naŭzon sur glacio sentas.

- Kaj dum ni iris al la mez' interna, 73.
kien kuniĝas ĉiu peza maso
kaj mi tremadis de la frost' eterna;
ne scias mi, ĉu estis vol', okazo, 76.
aŭ fato: dum mi inter kapoj estis,
vizaĝon mi piedbatis dum trapaso.
»Kial vi stampas? — plende li protestis — 79.
se ne pro Montaperti vengaspiro
alportis vin, vi kial min molestis?«
Kaj mi: »Ho Majstro, haltu, ke ĉi viro 82.
solvu la dubon, kiu en mi loĝas,
mi ja rapidos poste laŭ deziro.«
La Duko haltis, kaj mi nun ekvoĉas 85.
al tiu ombro dure blasfemanta:
»He, kiu vi, ke tiel vi riproĉas?«
»Kaj kiu vi, ke kun batado planda 88.
de l' kapoj iras vi tra Antenora?
eĉ de vivul' ĝi estus frap' tro granda!«
»Vivul' mi estas, eble eĉ valora 91.
por vi — mi diris — se vi volas famon,
mi, inter multaj, faros vin notora.«
Kaj li: »Mi volas ĝuste la malsamon. 94.
Foriru do, ne plu min ĝenu, ĉar
ĉi flato en ĉi marĉ' ne gajnos amon.«
Tiam mi kaptis lin ĉe la harar' 97.
kaj diris: »Tamen vi vin nomi devas,
aŭ ja ne restos al vi sola har'!«
»Elŝiru ĉiujn, tamen mi ne levas 100.
la vangojn, nek min nomos, eĉ se draŝis
milfoje vi la kapon, ĝis ĝi krevas!«
Mi liajn harojn sur la manon maŝis, 103.
elŝiris plurajn buklojn, dum li kuŝis
bojante, kaj la vangojn spasme kaŝis.
»Kio do, Bocca, — iu nun elbuŝis — 106.
ĉu ne sufiĉas al vi klaki dente,
eĉ bojas vi? vin kia diablo tuŝis?«

- »Ha, — diris mi — nun restu jam silente, 109.
malpia perfidulo! pri vi, honte,
ja veran famon portos mi prezente!«
- Li kriis: »Iru, laŭ la plaĉ' klaĉonte, 112.
sed ne silentu pri ĉi tiu poste,
kiu la langon uzis tiel sponte.
- Por franca mon' repagas li multkoste. 115.
Diru: mi vidis Duera sub tavolo
glacia, kie ombroj freŝas froste.
- Kaj demandite plu pri ĉi popolo, 118.
diru: mi vidis tiun Beccheria,
kiun Florenc' dissegis ĉe la kolo.
- Gianni de Soldanier estas alia, 121.
jen Ganellone, poste Tribaldelo:
Faenzan apertis li dum dormo ĝia.«
- Ni iris plu. Nun en glacifunelo 124.
en tia stat' mi du kuŝantojn vidis,
ke l' kapo sur la kap' estis ĉapelo.
- Malsat' neniam panon pli avidis, 127.
ol la suprulo sub si la kranion
ĉe l' loko, kie ĝi sur nuko sidis.
- Tideo ja ne maĉis la tempion 130.
de Menalippo pli sovaĝkolere,
ol tiu ties kapon kaj alion.
- »Ho vi, montranta ĉi bestmaniere 133.
malamon kun tiela sangsoifo,
diru la kaŭzon, — diris mi — ĉar, vere,
- se vi lin ne turmentas sen motivo, 136.
kaj scios mi pri vi kaj lia peko,
mi vin rezervos en la supra vivo,
- se ne ŝrumpigos mian langon seko.« 139.

TRIDEKTRIA KANTO

UGOLINO. VIVANTAJ DAMNITOJ

Pri *grafo Ugolino* (vd. Bio. II.)

En Pisa estis du gelfaj partioj, la unu estis gvidata de Nino Visconti, bofilo de Ugolino, la dua de Ugolino mem. Ugolino, por venki sian bofilon, federigis kun *ĉefepiskopo Ruggieri* (degli Ubaldini), kiu ŝajnigis al li amikecon. Sed post la ekzilo de Nino Visconti, la ĉefepiskopo, kun la helpo de la familioj *Sismondi*, *Lanfranchi* kaj *Gualandi*, atakis Ugolinon, kaptis lin kaj akuzis pri perfido (vendo de fortikaĵoj al Florenco kaj Lucca). Post unu jaro (en 1288) Ugolinon kun liaj filoj *Gaddo* kaj *Uguccione* kaj kun liaj nepoj *Brigata* kaj *Anselmo* oni mortigis per malsato en la turo de *Gualandi*, nomata poste *Turo de Malsato*. Ankaŭ aliajn oni malsatmortigis poste en tiu turo.

Caprara kaj *Gorgona* estas du insuloj ĉe la almarigo de l' Arno.

Pri la teruraĵoj en *Tebo* vidu la komencon de Kanto XXX.

Pri la lingvo de si vd. Bio. 18. La lando *si-sona* estas la tuta Italio.

Tria subrondo: *Ptolemaea*. Perfiduloj kontraŭ siaj gastoj.

(Ptolemeo, reganto de Jeriko, mortigis ĉe manĝotablo sian boparton kaj ties filojn, por rabi iliajn trezorojn.)


Monaĥo *Alberigo* estis ofendita de *Manfredo Manfredi* kaj de ties filo *Alberghetto*. Por venĝi, li ŝajnigis amikecon, invitis ilin por tagmanĝo kaj ĉe l' tablo murdigis la sensuspektajn viktimojn. La devizo, je kiu la kaŝitaj murdistoj alkuris, estis: »Venu la frukto«. La »frukto de Alberigo« longe restis proverba.

Atropos estas tiu Parco, kiu tondas la fadenon de l' vivo.

Ser (sinjoro) *Branca d' Oria* mortigis ĉe manĝotablo sian boparton *Michel Zanche* (vd. Kanto XXII.), por akiri la potencon super Logodoro. Ili ambaŭ estis genovanoj.

La *misa romanjano* estas Alberigo; li loĝis en Faenza.

Vortklarigoj: *burgo* (*): fortikigita urbo; *horto* (**): fruktĝardeno; *magra* (*): malgrasa; *prompta* (gm): tujaga, rapidfara, fervora; *torpori* (gm): sensentigi.



La Gigantoj kaj la Fundo.


LA buŝon levis de l' festen' terura 1.
 tiu pekulo, kaj ĝin ĉe l' hararo
 de l' kap', mordita nuke, viŝis pura.
 »Ho, ĉu mi renovigu kun amaro 4.
 doloron, kiu min korpremas nune
 jam pense, eĉ, dum priparol' de l' faro?
 Sed se ĉi vortoj honton semos pune 7.
 al ĉi perfida, kiun nun mi dentas,
 do vidu min paroli, plori, kune.
 Kiu vi estas, kiel vi descendas, 10.
 ne scias mi, sed vi l' impreson faras
 de florencan', se l' vortojn mi atentas.
 Graf' Ugolino estas mi, jen staras 13.
 ĉefepiskop' Ruggieri; aŭdu bone,
 pro kio nun mi *tiel* lin najbaras.
 Kiel, per ruz' malica, li, fripone, 16.
 min, la fideman kaptis en karceron
 kaj murdis: diri estas senbezzone.
 Sed, kion vi ne scias, la aferon 19.
 rakontos mi pri mia morto dura,
 kaj juĝu, ĉu mi rajtas ĉi koleron.
 Breĉet' lumigas nur tra l' kaĝo mura, 22.
 nomata nun pro mi Malsato-Turo,
 fermonta multajn en la sin' obskura.
 Jam plurajn lunojn tra ĉi aperturo 25.
 mi vidis, kiam song' malbon-aviza
 levis al mi vualon de l' Futuro.
 Songe, ĉi tiu, ĉef' de ĉas' markiza, 28.
 lupon, lupidojn pelis sur la monto,
 pro kiu ne videblas Lucca el Pisa,
 kun magraj hundoj de ĉaslerta prompto. 31.
 Gualandi kun Sismondi kaj Lafranchi
 vetkure kun li rajdis ĉe la fronto.
 Al patro kaj al filoj baldaŭ manki 34.
 ŝajnis la forto kaj de akraj ŝiroj
 la flankojn vidis mi fendite sangi.

- Matene, ĉe l' unuaj tagobriloj 37.
mi aŭdis, ke en duonsong' angoras,
ĝemante panon petas miaj filoj.
- Vi estas ŝtono, se vin ne doloras 40.
la penso: kiel tio min ĉagrenis,
ja kiam plorus, kiu nun ne ploras?
- Ili vekigis; jam la horo venis, 43.
kiam kutime manĝon oni donis.
Malbonon ili el la song' divenis.
- Mi aŭdis ŝlosnajladon, kiu sonis 46.
sub la terura tur'; la filojn longe
mi fiksrigardis kaj en mut' mi dronis.
- Ne ploris mi: ŝtonigis mi ĝissange; 49.
ili ploretis, Anselmoĉjo kriis:
»Patreto, kio? vi rigardas strange.«
- Sed mi ne ploris, nek respondi sciis 52.
dum tuta tag' kaj tuta nokto posta,
ĝis nova suno al la mond' radiis.
- Kaj kiam venis eta lum' tra l' frosta 55.
karcer' kaj vidis mi, ke kvarvizage
spegulas sin aspekto mia osta,
- la manojn mordis mi dolorsovaĝe. 58.
Kredante, ke mi faras tion pro
malsato, ili levis sin kuraĝe:
- »Ho patro, ne doloros tiel tro, 61.
se manĝos vi el ni; ja vi nin vestis
per karn' mizera, ĝin reprenu do.«
- Por ne aflikti, mi senmova restis, 64.
du tagoj pasis nun en mut' amara,
ho ter'! kial krevanta vi ne estis!
- Kaj poste, kiam venis tago kvara, 67.
sin ĵetis Gaddo antaŭ min, ŝtertore:
»Ho kial vi ne helpas, patro kara?«
- kaj mortis. Kiel min vi mem ĉi-hore, 70.
mi vidis nun, ke mortis frat' post frato
je l' kvina, sesa tago, kaj, angore,

- pri ili palpis mi en blinda stato; 73.
du tagojn vokis ilin, kuŝajn morte,
ĝis ol dolor' pli povis la malsato.«
- Fininte, li ekmordis okultorde 76.
tiun mizeran kapon tuj, per dento
fortega, kiel hunda dent', ostmorde.
- Oj, Pisa, vi, hontego por la gento 79.
loĝanta en la bela land' si-sona!
Sed, se l' najbaroj pro indiferento
- ne punos vin, Caprara kaj Gorgona 82.
moviĝu, faru antaŭ l' Arno digojn,
ke ĉiu viva en vi mortu drona.
- Ĉu, eĉ se faris Ugolin' perfidojn 85.
kaj viajn burgojn laŭ la dir' transdonis,
tiel krucumi liciis liajn idojn?
- Junagaj, ili kulpon ja ne konis. 88.
Ho, nova Tebo: Uguccion', Brigata,
kaj du, kiujn la kanto supre nomis.
- Ni iris plu. Kaj la glaci' malglata 91.
nun novan grupon kovris kun rigoro,
ne dorsalsupre, sed kun frunt' montrata.
- Tie ne lasas plori mem la ploro; 94.
l' okul' malhelpas al dolor' senpova,
refluas ĝi, por kresko de l' angoro.
- Car solidiĝas larmo pli malnova, 97.
kaj tute, kvazaŭ vizier' kristala
kovras la kavojn sub la arko brova.
- Kaj, kvankam, kvazaŭ de krustaĵo kala, 100.
de l' gelo ĉesis al mi ĉiu sento
en la vizaĝ' torpora, froste pala:
- mi kvazaŭ sentis nun iom da vento, 103.
kaj diris: »Majstro, kio do ĝin movas?
Ne dormas ĉiu blov' en ĉi segmento?«
- Kaj li: »Tuj sekvos loko, kie povas 106.
l' okuloj mem respondi vin sen dubo,
ĉe l' vid' de l' kaŭzo, kiu l' spiron blovas.«

- El frosta krusto, el la trista grupo 109.
 nun sonis voĉ': »Animoj plej malpuraj,
 tiel, ke punos vin la lasta ŝtupo,
 savu ĉi vangojn de l' vualoj duraj, 112.
 ke l' dolorsaturita kor' malplenu
 iome, ĝis refrostos larmoj suraj!«
- Nun mi: Volante, ke mi ĝin deprenu, 115.
 vin nomu, kaj se vin mi per forigo
 ne helpas: fundon de l' glaci' mi venu.»
- Li diris: »Jen mi, frato Alberigo, 118.
 tiu de l' frukto de l' malbona horto;
 daktilojn nun ricevas mi por figo.«
- »Ho — diris mi — ĉu vin jam prenis morto?« 121.
 Kaj li: »Pri l' korpo en la supra mondo:
 nenion scias mi pri ĝia sorto.
- Jen l' avantaĝ' de l' Ptolema rondo: 124.
 ĉi tien ofte la anim' falegas
 jam antaŭ eĉ la Atroposa tondo.
- Sed' ke l' maljunajn larmojn, kiuj tegas 127.
 l' okulojn, vi forprenu pli kompleze,
 mi diros: se l' anim' perfidon pekas,
- kiel mi faris, tuj la korpon meze 130.
 diabl' okupas, regas en interno,
 ĝis la vivtemp' forpasos laŭnecese.
- L' animon dume mordas ĉi cisterno, 133.
 kaj eble vivas korpe sur la tero
 ĉi ombro apud mi en frosta fermo.
- Sed, ĵus veninte el la supra sfero, 136.
 vi konas lin: ser Branca d' Oria; estas
 de pluraj jaroj li en ĉi karcero.»
- »Sajnas, — mi diris —, ke vi ne honestas. 139.
 Ĉi Branca d' Oria vivas ja senmanke
 kaj mangas, trinkas, dormas kaj sin vestas.«
- Li diris: »Ce l' Misungoj, kie ronke 142.
 la peĉ tenaca bolas, eĉ ne povis
 ankoraŭ ja alveni Michel Zanche,

- kiam la korpon jam diablo movis 145.
anstataŭ tiu ĉi kaj nepo lia,
kun kiu la perfidon li elkovis.
Sed jam la vidon de ĉi krust' glacia 148.
savu, malfermu!« kaj mi ne malfermis,
kaj lin mistrakti estis ago pia.
Oj, genovanoj, kiaj kulpoj ĝermis 151.
ĉe vi! Malbonaj moroj, krima plano!
Kial el mond' vin oni ne ekstermis!
Ĉar, kun ĉi tiu misa romanjano 154.
mi vidis iun el vi, kiun lavas
tie anime jam Kocita bano,
dum li vivantan korpon supre havas. 157.



TRIDEKKVARA KANTO

LA CENTRO DE L' TERO

»*Vexilla regis prodeunt* ... «: komenco de religia kanto: »Standardoj de l' reĝo venas.« Virgilo aldonas »*inferni*«: »Standardoj de l' reĝo de l' infero venas.«

Naŭa rondo, kvara subrondo: *Judeko* (rondo de Judas); en ĝi damniĝas la perfiduloj de l' plej altaj aferoj.

Ci tie troviĝas *Dis* (Lucifero, Belzebubo), iam la plej bela anĝelo, kiu ribelis kontraŭ Dio, nun li estas la plej malbela diablo. Liaj tri vizaĝoj verŝajne simbolas la tri homrasojn.

Brutus kaj *Cassius* estis la murdintoj de Julio Cezaro; laŭ Dante, ili, perfidintoj de l' Mondimperio, estas preskaŭ tiaj kulpuloj, kia Judas, perfidinto de Kristo (vd. Bio. 31.)

Lucifero estas fermita inter glacio, sed li estas tiel grandega (ĉirkaŭ 500 metroj laŭ la kalkuloj baze de l' informoj en versoj 30—31.), ke liaj haroj rezervas homkorpe larĝan fendon inter la glacio kaj lia korpo. En la mezo de lia korpo estas la centro de la Tero; pri ĝi kaj pri la gravitado Dante havas tre klarajn konceptojn. Nia hemisfero konsistas el la granda Kontinento (Granda Seko): tio estas Eŭropo, Azio kaj Afriko, la mondo tiam konata; ĝia centra loko estas la Golgoto, kie Kristo mortis. La transa hemisfero estas oceano, en kies mezo estas insulo: la monto de l' Puriĝo: la Purgatorio (vd. Kanto XXVI.)

Antaŭ Luciferon venis Dante je la vespero de Sankta Sabato. La stelojn li revidis en la mateno de Paska Dimanĉo (la suno, leviĝinta je la sesa, jam iras meze en la tria horo, do estas la oka kaj duono).

Vortklarigoj: *agresi* (*): ataki; *gloto* (s): voĉestiga organo en la laringo; *graviti* (s): celi, pezi al centra punkto; *oferti* (s): proponi.

V*EXILLA regis prodeunt Inferni* 1.
 al ni; por vidi — diris mia Siro —
 antaŭen peno do okulmalfermi.«

Kaj kiel ĉe densega nebulspiro 4.
 aŭ ennoktiĝ' de hemisfero nia
 vidiĝas fore muelil' dum giro,
 montriĝis al mi konstruaĵo tia; 7.
 nun mi post mian Majstron vent-evite
 min kaŝis, ĉar ne estis ŝirm' alia.

Tie — priversi timas mi hezite, — 10.
 la ombroj en glacio jam transklaris
 kiel la pajl' en vitro, tutkovrite.

Kaj unuj kuŝis, unuj rekte staris 13.
 aŭ sur la plandoj, aŭ sur kapopinto,
 aliaj, pied-al-kape, arkon faris.

Veninte tien tra l' eterna vintro, 16.
 kie la Majstro montris tiun al mi,
 kiun plej bela faris la Kreinto,
 flankpaŝe, vidon lasis li nun al mi, 19.
 »Jen Dis — li ekparolis — jen la loko,
 kie per forto vi vin devas armi.«

Kiel ekfrostis mi sub timsufoko: 22.
 ho, ne demandu, mi ne diros skribe,
 sufiĉus ja nenia vortostoko.

Nek mortis mi, nek vivis efektive, 25.
 povante bildi, bildu nun, leganto,
 kia mi iĝis do sen mort' senvive.


L' imperiestro de l' terura lando 28.
 ĝis brusto-mez' elstaris de l' glacio,
 kaj tiel mi rilatus al giganto,
 kiel gigant' al brak' de ĉi bestio, 31.
 imagu: kiel ĉiuj partoj kune
 grandegis do, laŭ tia proporcio!

Se bela iam, kiel bruta nune, 34.
 Kreinton sian tamen li agresis,
 ja fontas ĉiu krim' el li justpune.

- En kia ega mir' mi min forgesis, 37.
vidante tri vizagojn sur ĉi besto;
la unu ruĝis: ĝi antaŭe mezis,
l' aliaj du ĉi tiun, en kunkresko, 40.
super la mezo de la ŝultroj trafas,
unuigante ĉe la lok' de l' kresto.
La dekstra duonblankas, duonflavas, 43.
maldekstra estas: kian la gentaro
ĉe l' alvaliĝo de la Nilo havas.
Sub ĉiu sidas granda flugilparo, 46.
al tia ege granda bird' konformaj,
ja ne videblas tia vel' sur maro!
Senplumaj ili estas, vespertformaj, 49.
sin skuas tiel, ke de l' frap' akuta
impete movas sin tri ventoj ŝtormaj,
de kiuj gelas la Kocito tuta; 52.
li sesokule larmas, kaj torentas
tra tri mentonoj plor' kaj muk' sangsputa.
Per ĉiu buŝo li pekulon dentas, 55.
kiel kanabrompil', per mordo kruda,
tiel ke tri samtempe li turmentas.
Sed mord' al la mezulo estas luda 58.
apud la grato: lia spin' ulcera
ofte de l' haŭto iĝas tute nuda.
La Majstro diris: »Tiu plej sufera 61.
animo estas Judas Iskarioto,
kun kap' interna kaj kun gamb' ekstera.
El la du kap-al-subaj, el buŝgroto 64.
de l' nigra kap', jen, Brutus sin etendas,
kiel li streĉas sin, sen vort' el gloto:
kaj tie Cassius, la dikmembra, pendas. 67.
Sed nokt' leviĝas, ĉion ni elspertis,
do venu, ĉar la vojo nin atendas.«
Nun mi lin brakis, kiel li ofertis, 70.
ĉe l' kolo, kaj en temp' kaj loko ĝustaj,
kiam la flugilparo sin apertis,

- li, sin kroĉinte al la viloj brustaj, 73.
descendis de har-tigo al har-tigo
inter hardenso kaj glacioj krustaj.
- Veninte tien, kie en la diko 76.
de l' kokso artikiĝas la femuro,
la Majstro, kun angor' kaj memlacigo,
- la kapon metis al la lok' de l' kruro, 79.
kaj grimpis, kiel kiu supren penas,
reveni ŝajnis hejmon de l' Teruro.
- »Firmtenu! Tiaj ŝtupoj ja konvenas 82.
— la Duk' parolis, dum li peze spiris —
el tie, kie tiom kulpoj enas.«
- Tra roka tru' li fine sin eltiris 85.
kaj metis min sur ŝtonon por eksidi,
mem, zorge elpaŝinte, min aliris.
- Mi levis la okulojn, kredis vidi 88.
nun Luciferon kia mi lin lasis,
kaj — gambalsupre vidis lin rigidi.
- Kia konfuz' min tiam embarasis: 91.
imagu tiu, kiu, hom' senscia,
ne scias, kian punkton mi transpasis.
- »Leviĝu jam! — nun diris Majstro mia — 94.
longa la voj', la pado estas dura,
la sun' jam iras meze en la tria.«
- Ja ne salon' palaca, sed natura 97.
sovaĝa kavo tie nin atendis,
kun grund' abrupta, kaj kun mur' obskura.
- »Nun, antaŭ ol ni el abism' ascendis, 100.
klarigu, Majstro, ĉar mi ne komprenas,
— mi diris, kiam mi min rektetendis —
- kie la gelo? kial tiu tenas 103.
sin kap-al-sube? kial tiel fruis
la sun', ke post vespero tuj matenas?«
- »Vi kredas vin ankoraŭ — li instruis — 106.
transcentre, kie mi ĉe l' harkiraso
kaptis la Vermon, kiu l' mondon truis.

- Vi trovis vin ja transe ĉe l' ekpaso, 109.
sed ĉe l' turniĝ' mi vin tra l' punkton portis,
kien gravitas ĉiu peza maso,
kaj nun, vi sur la hemisfero bordis 112.
antipodanta al la Granda Seko,
sur kies kulm' la Homo iam mortis
naskita kaj vivinta ekster peko, 115.
vi staras plande sur la eta sfero,
interresponda ĝuste al Judeko.
Estas maten', dum transe as vespero, 118.
kaj, kies haroj al ni ŝtupojn faris,
samfikse kuŝas ankaŭ nun tra l' tero.
De la ĉielo li ĉiflanke falis; 121.
la tero, kiu tie ĉi sin trovis,
lin ektimante, sin per mar' vualis
kaj sin al nia hemisfer' transŝovis, 124.
kaj, eble por lin fuĝi, en ĉi subo
la kavon lasis, sin en monton movis.«
Kaj sekvis groto, ekde Belzebubo 127.
samlonga, kiel sin la tomb' etendas,
ne vidis ni, sed montris ĝin sen dubo
la zum' de riveret', kiu descendas 130.
tra l' elmordita rokobuŝo streta;
la fluo serpentumas, ne tre pendas.
La Duk' kaj mi, sur tiu voj' sekreta, 133.
ekiris al la mondo ĉielblua,
kaj, ne zorgante pri ripoz' plej eta,
ascendis, li unua, mi la dua, 136.
ĝis fine mi ekvidis kelkajn belajn
portatajn de l' ĉiel', tra rondo trua,
kaj ni eliris, por revidi stelojn. 139.




La opaj partoj de l' Infero en la Kantoj

(La romaj ciferoj signas kantojn, la arabaj versojn)


La obskura arbaro-- -- -- -- --	I.	1—136
	II.	1—142
La Pordego. Indiferentuloj -- -- -- --	III.	1— 69
Aĥerono	III.	70—136
I. Rondo (Limbo). Nebaptitoj -- --	IV.	1—151
II. Rondo. La kulpuloj de l' amo --	V.	1—142
III. Rondo. Diboĉuloj-- -- -- --	VI.	1—115
IV. Rondo. Disipuloj kaj avaruloj --	VII.	1— 96
V. Rondo. Koleruloj (Stikso) -- --	VII.	97—130
	VIII.	1— 66
Antaŭ la muroj de Dis --	VIII.	67—130
	IX.	1—105
VI. Rondo. Herezuloj -- -- -- -- --	IX.	106—133
	X.	1—136
	XI.	1—115
Pli malgranda ravino -- --	XII.	1— 45
VII. Rondo. Perfortuloj.		
1. ringo. Kontraŭ proksimulo (Flegetono) -- --	XII.	46—139
2. ringo. Kontraŭ si mem --	XIII.	1—151
	XIV.	1— 4
3. ringo. a Kontraŭ Dio --	XIV.	4—142
b Kontraŭ la Naturo	XV.	1—124
	XVI.	1—134
	XVII.	1— 30
c Kontraŭ la Laboro	XVII.	31— 75

	Pli granda ravino -- -- --	XVII.	76—136
VIII. Rondo	(Misbursaro). Trompisto	XVIII.	1— 21
	1. burso : delogintoj -- --	XVIII.	22— 99
	2. burso : flatuloj -- -- --	XVIII.	100—136
	3. burso : simoniuloj -- --	XIX.	1—133
	4. burso : aŭguristoj -- --	XX.	1—130
	5. burso : ordinaraj trompisto	XXI.	1—139
		XXII.	1—151
	6. burso : hipokrituloj -- --	XXIII.	1—148
	La rompiĝinta ponto --	XXIV.	1— 60
	7. burso : ŝtelistoj -- -- --	XXIV.	61—151
		XXV.	1—151
		XXVI.	1— 12
	8. burso : miskonsilantoj --	XXV.	13—142
		XXVII.	1—136
	9. burso : malpacigantoj --	XXVIII.	1—142
		XXIX.	1— 36
	10. burso : falsistoj -- -- --	XXIX.	37—139
		XXX.	1—148
		XXXI.	1— 6
	La Puto -- -- -- --	XXXI.	7—145
IX. Rondo.	Perfiduloj (Kocito).		
	1. subrondo ; kontraŭ paren- coj (Kaina) --	XXXII.	1— 72
	2. subrondo ; kontraŭ patrujo (Antenora) --	XXXII.	73—139
		XXXIII.	1— 90
	3. subrondo : kontraŭ gastoj (Ptolema) --	XXXIII.	91—157
	4. subrondo : kontraŭ la plej altaj aferoj (Judeko) -- --	XXXIV.	1— 69
	Vojo sur la alian hemisferon	XXXIV.	70—139





Dis.



Notoj de l' tradukinto

Ritmo: La hendekasilabon de la originalo mi transmetis per la Esperanta dekunusilabo, kun la sama moviĝema cenzuro, troviĝanta jen post la kvara silabo:

Je l' vojomez' / de nia vivo tera...

jen post la kvina:

kaj ambaŭ falis / al la bola kaĉo...

jen post la sesa:

kaj se en mia kor' / ne estus plena...

jen post la sepa:

antaŭen, Prujnotreto, / Vespertego...

Rilate la *marŝon* de la versoj mi tenis min *laŭeble* kaj *ĝenerale* al la *jambeco* de l' Esperanta »klasika« dekunusilabo. 85% de la versoj estas perfekte jambaj.

Sed en 15% mi fleksis la *rigidecon* de la *jamba skemo*, kies nepra sekvo kaj netuŝebleco ŝajnas al mi tute superflua malfaciligo de la Esperanta metriko. Kaj ankaŭ neniel motivebla, ĉar ja nenio devigas nin, ke ni akceptu sensaĝe ĝuste la plej severajn germanrusajn ritmoregulojn en nemoligebla rigoreco. Eĉ ne la tradicio. Grabowski uzis la tute liberan polan metrikon, kaj ankaŭ mem Zamenhof, kiu sin tenis al la germana-rusa metriko, ofte permesis al si licencojn. Ĝuste ĉi tiuj Zamenhofaj licencoj estas la bazo de tiu pli libera metriko, kies regulojn mi fiksas en mia *Lingvo Stilo Formo* kaj Waringhien en nia *Parnasa Gvidlibro*.

Plejofte mi uzis la komencajn horjambojn (-oo- anstataŭ o- o-), sume en 630 versoj. Ankaŭ ĉi tiu granda nombro montras, ke mi rigardas ilin plene rajtigitaj: eĉ la plej etan diverĝon de la proza vortsekvo ne valoras ilia evito. Ankaŭ ĉe Zamenhof ĉi tiun permeson oni povas trovi plej ofte el ĉiuj.

Same bona, same zamenhofa estas la *ŝvebo*:

Min la severa just' *kiu min* jugas...

tiajn versojn oni trovas 3o.

Sporade mi uzis *komencajn dutrokeojn*:

mirindege / por ĉiu kor' sekura...

kaj *stumblojn*:

Kaj ŝi: »Ne estas *pli granda doloro*...

Tiajn oni trovos po dekdu en la tuta verko.

Interesiĝantoj pri la detaloj sin turnu al la supre cititaj du libroj.

Krome mi uzis la t. n. *sensilabigon* de la neakcentitaj *i* kaj *u* apud alia vokalo. Ilia uzo jam havas certan tradicion en Esperanto (Bennemann, Minor, mi mem) kaj mi vere ne vidas seriozan kaŭzon por ekstermi ĉi tiun licencon. Ĝi ne signifas, ke anstataŭ *i* oni prononcu *j*, sed ĝi elprofitas nur tion, ke ĉi tiujn du »glitajn« vokalojn apud alia vokalo oni povas senpene elparoli tiel, ke la kuna daŭro de du vokaloj egalu la daŭron de *unu* silabo.

Tentate de la itala ekzemplo, ĉi tiun *sensilabigon* mi uzis 16-foje ankaŭ ĉe hiatoj. Kompreneble, en Esperanto oni ne povas uzi la hiatojn tiel, kiel iaŭ la itala prozodio, kie ekzemple *dekunu* silabojn oni kalkulas el la sekvantaj *deksep* silaboj:

Con gli altri, innanzi agli altri apri la canna...

ĉar tio estigus netolereblajn akcentkarambolojn, sed mi kredas, ke en la versoj:

ni venis lokon, kie orkestro tuta,

au:

kiel se de l' kvartana iu ekfridas...

estas tute facile doni al la tri vokaloj *i-e-o* la daŭron de du, kaj al la kvar vokaloj *a-i-u-e* la daŭron de tri silaboj.

Same nenio malhelpas en la sekvanta verso:

Jozefon unu akuzis kalumnio...

elparoli proksimume: unu akuzis...

Kelkfoje mi elprofitis ankaŭ la samvokalan hiaton por gajni unu silabon: olda Alardo, bona Aŭgusto, granda Ahilo, grumble eksidas.

Se ĉi tion iu rigardus *lingva reformo* (kia ĝi ne estas), oni povas ĝin motivi ankaŭ alimaniere, nome, ke oni permesas ĉe la hiatoj kun *u* kaj *i*, kaj ĉe la *samvokalaj*, la *anapestigon* de la jambo.

Rimoj. Mi tenis min al la principoj, kiujn mi eksplikis en mia artikolo »Esperanta Rimo« (Lingvo Stilo Formo).

La nepuraj rimoj de l' traduko estas plejparte *parenrimoj* (vivo-soifo, plenda-fremda) kaj *pluskonsonantaj rimoj* (estro-vesto, rezulte-ŝultre). Kelkaj ne parencaj konsonantparoj estas apogitaj samkonsonante (akcepti-respekti, zorgobordo, balasto-tasko, rigardi-farbi).

Mia idealo certe estis la pura rimo. 80% de la rimoj estas puraj, 17% estas *parenrimoj* kaj *pluskonsonantaj rimoj*, la restaj 3% dividiĝas inter *preskaŭrimoj* (plejofte transkuraj), *mildaj* kaj *elsonoraj asonancoj* (plejparte kombinitaj) kaj *agordoj*. Adasismoj kaj abortaj rimoj mankas.

Mi kredas, ke kun malpli da libereco oni povus traduki la verkon nur malpli fidele, kaj krome nur kun tede ofta ripetigo de l' samaj rimvortoj.

Fideleco. Mi klopodis esti fidela ne nur al la enhavo, sed ankaŭ al la maniero de esprimo, al la stilo, eĉ al la lingvaj strangaĵoj de l' originalo.

Plej grandaj pekoj kontraŭ fideleco estas:

kaj kies fido al ni estas torsa... (XI. 54.)

kie la originalo diras proksimume:

kaj kiu fidon en la burs' ne havas.

Kaj:

kaj kies ostojn tuŝas la piedo

ĉe Ceperan' pro l' apula tromp-arto, (XXIX. 16.)

kie la originalo tekstas:

kaj kies ostojn oni ankoraŭ kolektas ĉe Ceperan',
kie ĉiu apulo iĝis trompisto.

Lingvo. Kompreneble mi utiligis la pli-malpli sankcigitajn apartaĵojn de la poezia stilo: multflankan uzadon de la *verboadjektivoj* kaj *adverboj*, la vorteton ĉi anstataŭ ĉi tiu, la senperan *verbigon de adjektivoj kaj substantivoj* pli larĝe ol en prozo; ĉiuj ĉi »konkeraĵoj« de la poezia lingvo estas netaksebla helpo por la tradukanto kaj eĉ al la leganto ili donas certan plezuron, per la interesa »streĉeco« de esprimo, kiun ili prezentas.

Esperanto ja dankas sian flekseblecon, sian taŭgecon, por poezio, sian grandan superecon al la rigida Ido ĝuste al la ebleco de tiaj formoj. Prave diras *Paul Nylén*: »Pro tiuj *resumaj* vortoj, kiuj lasas grandan spacon al la fantazio, dank' al ĝia manko de troa precizeco kaj dank' al ĝia malpedanta libereco, la *poetoj* ŝatas Esperanton (Sonoj kaj vortoj en Esperanto, pĝ. 35.).

El la aliaj »licencoj« mi uzis trifoje as anstataŭ estas, kvinfoje la *participverbojn* (tenatas, vokitas, deziratas), mi uzis dufoje *kelk* kvazaŭ numeralon. Ĉio ĉi jam estis uzita de Grabowski en la Sinjoro Tadeo.

La formojn *ankore* (dufoje) *anke* (unufoje), cetere

toleratajn de l' Akademio, la formon *havunte* (trifoje), *uno* anstataŭ unu (unufoje), *bon* kaj *tut* anstataŭ *bona* kaj *tuta* (po unufoje) oni povas rigardi lingvaj strangaĵoj, kiaj troviĝas ankaŭ en la originalo.

Same lingva strangaĵo, kaj neniel trudata al la komuna lingvo, estas la uzo de la Dante-a *optativa se*, tio estas: *se* kun *u-modo*. Ekzemple:

Sed, se revidu vi la dolĉan teron... (X. 82.)

kiun oni povas interpreti kiel elizian frazon, anstataŭ:

Sed, se (vi volas, ke) vi revidu...

kaj kies senco estas: sed tiel vi povu revidi la dolĉan teron, (kiel vi diros al mi...).

La fleksebleco kaj senrigida »noveco« de Esperanto, pri kiu mi parolis en la Antaŭparolo, permesas imiti ĉi tiun Dante-an frazkonstruon, kio certe ne estus ebla en alia lingvo.

Propraj nomoj. La italajn proprajn nomojn mi skribis laŭ la originala ortografio. La itala prononco ja estas tiel simpla kaj facile lernebla, ke mi domaĝis ilin difekti per transskribo, prefere mi donas sube la prononcregulojn.

La latinajn proprajn nomojn plejparte mi skribis esperantforme en la Poemo kaj original-forme en la klarigoj. Oni trovas sube ankaŭ la latinajn prononcregulojn.

La grekajn proprajn nomojn mi skribis plejparte esperant-forme en la Poemo., kaj latinforme en la klarigoj, kun la escepto, ke anstataŭ *c* mi skribis *k*.

Kelkaj sporadaj esceptoj eventualaj espereble ne estos tro ĝenaj.

Neologismoj. En ĉi tiu loko, kompreneble, mi ne volas rediskuti pri ĉi tiu temo, mi diras nur, ke la *paralela* pri-riĉiĝo de la Esperanta literaturo kaj Esperanta vortprovizo estas tute natura fenomeno, pri kiu miri, protesti aŭ mal-esperi ŝajnas al mi simpla naiveco.

En la verko ekzistas sume 263 neoficialaj vortoj. El ili 52 estas zamenhofaj, 80 troviĝas en la Plena Vortaro de SAT, 17 ĉe Grabowski, 17 ĉe Grosjean-Maupin, 11 ĉe Boirac, 7 ĉe Christaller, 4 ĉe Rhodes, 3 en la vortaro de Presa Societo, 2 ĉe Verax, 2 ĉe Fulcher-Long, 2 ĉe Wüster; 58 estas registritaj nur en la Parnasa Gvidlibro, 8 estas unuafoje uzitaj.

Kvankam, krom la ok lastaj, ĉiuj vortoj estas trov-eblaj en la SAT-vortaro aŭ en la Parnasa Gvidlibro, mi, laŭ mia principo, klarigas la vortojn ankaŭ en la libro mem. Mi esceptas nur kelkajn vortojn, sufiĉe ofte uzatajn kaj plejparte zamenhofajn: tiujn mi listigas fine de la vortklarigoj.

Mi konsilas al la leganto, ke li unue kontrolu sian scion pri ĉi tiuj vortoj, kaj, se necese, ĝin kompletigu per la Plena

Vortaro. Poste li lernu la liston de la klarigitaj vortoj: granda parto de ili jam certe estos al li bone konata. Tiel arminte sin, li komencu la lecion de la verko kaj tiam ĉiun vorton ankoraŭ nekonatan li trovos klarigita en la vortklariga noto antaŭ la opaj kantoj. Mi kredas, ke pli oportune estas serĉi tie, ol en longa listo, tial mi klarigis tie la vortojn nur unufoje uzitajn.

Vortklarigoj

Signoj: (b) vortaro de Boirac; (fl): Fulcher-Long; (gm): Grosjean-Maupin; (gr): Grabowski; (pa): Presa Societo; (r): Rhodes; (s): Plena Vortaro de SAT; (v): Verax; (w): Wüster; (z): Zamenhof; (*): Parnasa Gvidlibro; (**): vorto unufoje uzita; (f): familiara vorto; (it): itala; (lat): latina.

La samaj signoj validas ankaŭ en la vortklarigoj antaŭ la kantoj.

- | | |
|--|---|
| <i>agapo</i> (z): komunia festeno,
amfesteno; | <i>ekskuzi</i> (s): senkulpigi; |
| <i>basa</i> (*): malalta; | <i>elito</i> (s): kremo, elektita parto
de aro; |
| <i>beata</i> (gr): ĉielfeliĉa; | <i>emergi</i> (s): maldroni, eliĝi; |
| <i>bestio</i> (*): sovaĝbesto; | <i>eparkio</i> (s): distrikto regata de
episkopo; |
| <i>bunta</i> (c): multkolora; | <i>eskapi</i> (gm): sin liberigi de
situacio; |
| <i>burso</i> (*): tornistreto, saketo
ĉe l' zono; ĝi signas ankaŭ
la valetojn de l' oka rondo
(it. <i>bolgia</i>); | <i>evento</i> (gr): ne malgrava
okazaĵo; |
| <i>damo</i> (gr.): sinjorino; | <i>feto</i> (s): embrio post la 3-a
enutera monato; |
| <i>damni</i> (gr): kondamni je
infero; | <i>firsto</i> (s): tegmento-supro; ĝi
signas la cirklaĵn rondmur-
ojn, kiuj dividas la bursojn
de la oka rondo (it. <i>argine</i>); |
| <i>daŭbo</i> (s): kurbigita tabulo,
el kiaj konsistas la barelo; | <i>fluso</i> (s): tajd-alfluo; |
| <i>defraŭdi</i> (w): ŝteli ion ofice
konfiditan; | <i>fraŭdi</i> (ps): trompŝteli misuz-
ante konfidon; |
| <i>deprimi</i> (s): animpremi; | <i>frondo</i> (s): verdfolia branĉo;
(ar)o; |
| <i>descendi</i> (c): malsupreniri; | <i>futuro</i> (s): estonteco; |
| <i>disipi</i> (gr): malŝpari; | <i>gapi</i> (s): rigardegi absorbig-
inte; |
| <i>dizerti</i> (s): transfuĝi el armeo; | <i>gelo</i> (c): frosto; |
| <i>drivi</i> (s): esti portata de fluo; | |
| <i>dura</i> (gm): malmola; | |
| <i>ekspliki</i> (s): disvolvi temon
por klarigo; | |

- giri* (r): ronde turniĝi;
grego (z): ŝafaro, brutaro;
gvati (*): ŝtelobservi; streĉe rigardi;
hasti (c): urĝiĝi, rapidegi;
hemisfero (s): (ter-)duonglobo;
heni (s): ĉevalbleki;
hisi (s): suprentiri per ŝnuro (velon, flagon);
horori (gr): teruriĝi;
hurli (s): bleki sovaĝbeste;
impeta (s): arde subita;
incendio (ps): brulego;
infra (*): malsupra;
iriti (gr): inciti;
kaskado (s): akvofalo;
klabo (s): batalbastono;
klifo (s): bordkrutaĵo;
kompano (gr): kunulo;
koncedi (*): ne kontraŭi;
koncipi (s): ekgravedi;
kulm(in)o (s): plejsupro;
kurta (*): mallonga;
lanĉi (*): ekirigi por elprovi sukceson; ĵeti;
lanta (*): malrapida;
latrono (*): ŝtelistego;
lezi (s): difekti, vundi, malsanigi;
lici (s): esti permesata;
mago (s): magiisto;
merdo (f*): fekaĵo;
molesti (r): ĝenegi;
morna (*): preme malhela malgaja;
nardo (b): odora radiko de valeriano; parfumo;
neglekti (gr): malzorgi;
noci (gr): malutili;
notora (gr): konata (ofte kun aĉa nuanco);
obsedi (s): okupi la animon;
obteni (r): iĝi havanta;
obskura (fl): malluma;
olda (*): maljuna;
oracio (s): oratoraĵo;
orgojlo (*): malhumilo, fierego;
pado (*): vojeto;
pagano (s): idolano;
pigra (*): malvigla, maldiligenta;
pilorio (s): malhonora kolono;
poŭpo (s): ŝipmalantaŭo;
povra (*): kompatinda;
predo (*): rabakiraĵo;
pruo (s): ŝipantaŭo;
pugo (f*): postaĵo, sidvangoj;
putino (f*): publikulino;
rankori (gr): obstine malpardoni, venĝemi;
rara (gr): malofta, maldensa;
ravino (b): fendegaĵo, krutaĵo;
rezidi (gr): loksidi;
senso (s): sentumo;
sinistra (*): maldekstra;
sinki (c): fali malrapide, kvazaŭ retenate;
siro (r): estra, ordona moŝto;
situi (*): havi situacion;
skadrono (s): skadro;
spano (*): distanco inter streĉitaj dikfingro kaj etfingro;
sponta (s): spontanea;
spuro (gm): postsigno;
starti (s): ekiri;
stigma (*): neforviŝebla haŭtmarko (ankaŭ morale);
stinki (**): malbonodori;
stoko (v): varkvanto en tenejo;
strebi (z): klopodi spirite;
streta (*): mallarĝa;
striкта (z): malvasta;

<i>stringi</i> (ps): ĉirkaŭpremi, ĉirkaŭstreĉi;	<i>tenera</i> (b): karesema mola;
<i>sturmi</i> (gr): kurataki;	<i>tigo</i> (s): trunketo (de floro);
<i>suspiri</i> (*): ĝemspiri;	<i>tiki</i> (z): nerve kuntiri la muskolojn;
<i>ŝakri</i> (z): komercaĉi en neleĝa maniero;	<i>treti</i> (z): piedpremi;
<i>ŝtormo</i> (s): ventego;	<i>trista</i> (*): malgaja, malĝoja;
<i>tajli</i> (s): eltranĉi por doni formon (ekz. al ŝtofo);	<i>vaka</i> (*): malplena;
<i>tarda</i> (*): malfrua;	<i>vertrago</i> (gr): leporhundo;
<i>tempesto</i> (s): ventego;	<i>vigli</i> (*): maldormi;
	<i>violenta</i> (gm): perforta;
	<i>vito</i> (b): vinberujo.

Vortoj neklarigitaj, troveblaj en la Plena Vortaro de SAT.

La kursivaj estas zamenhofaj

absolvi, aglomeri, akumuli, amara, amen, angoro, aperti, aperturo, apokalipso, arbusto, aŭdaca, aŭguri, aŭroro, avant-aĝo, blago, bolto, cezuro, cirklo, ĉampiono, defii, devio, drasta, ekzalti, fato, feder(aci)i, feki, fetoro, firmamento, Fortuno, fuĝi, gambo, geheno, geometro, gildo, graki, graviti, investituro, jambo, kanzono, kapriolo, koment(ari)i, konstelacio, kurio, kvaki, mecenato, mergi, navig(aci)i, ornato, -oza, Parco, persvadi, perversa, pseŭdo, retro, sakrilegio, sino, skandi, skorio, spelto, stagni, stolo, surfaco, susuri, suvereno, ŝakto, ŝoki, ŝrumpi, taŭzi, torturi, transversa, tribo, trokeo, trubaduro, talaro, vizio, volbo.

Prononcreguloj

I t a l a j :

C estas: *k* antaŭ konsonanto kaj *a, o, u*.
ĉ antaŭ *e* kaj *i*.

Ci estas *ĉ* antaŭ *a, o, u*.

Ch estas *k* antaŭ *e* kaj *i*.

Ekzemploj: Ciacco (ĉakko), Caccia (kaĉĉa), Fucci (fuĉĉi),
Cerchi (ĉerki), Chiara (kiara).

G estas: *g* antaŭ konsonanto kaj *a, o, u*,
ĝ antaŭ *e* kaj *i*.

Gi estas *ĝ* antaŭ *a, o, u*.

Gh estas *g* antaŭ *e* kaj *i*.

Ekzemploj: Gaddo (gaddo), Gentucca (ĝentukka), Giacomo
(ĝakomo), Gherardo (gerardo), oggi (oggi).

Gli antaŭ vokalo estas proksimume *j* (tre mola *l*).

Gn estas *nj*.

Gu estas *gv* kun tre mola *v* (preskaŭ *gŭ*)

Ekzemploj: Abbagliato (abbajato), Romagna (romanja), Gualdrada (gŭaldrada).

H estas ĉiam muta.

S estas *z* inter du vokaloj, cetere *s*.

Sc estas: *sk* antaŭ konsonanto kaj *a, o, u*,
ŝ antaŭ *e* kaj *i*.

Sci estas *ŝ* antaŭ *a, o, u*.

Ekzemploj: Scarmiglione (skarmijone), Sciarra (ŝarra), pesce
(peŝe), Schicchi (ŝikiki), scimia (ŝimia), asciutto (aŝutto),
Costanza (kostenca), Cosenza (kozenca).

Qu estas *kv* (kŭ).

Z estas *c*, kelkfoje *dz*.

Ekzemploj: Quarnaro (kŭarnaro), giustizia (ĝusticia), mezzo
(medzo).

La prononco estas plejofte sur la antaŭlasta silabo, sed

ekzistas esceptoj. I antaŭ finvokalo plej ofte ne kalkuliĝas kiel silabo (*giusti' zia*).

Oni atentu pri la bona kaj klara prononco de la duoblaj konsonantoj (*gaddo* kaj ne *gádo* aŭ *gado*).

L a t i n a j :

Ae estas *é*.

C estas: *k* antaŭ konsonanto kaj *a*, *o*, *u*.

c antaŭ *e* kaj *i*.

Gu estas *gv*.

Qu estas *kv*.

S estas *z* inter du vokaloj, cetero *s*.

Ti estas *ci* antaŭ vokalo.

Ekzemploj: *Aeneas* (*éneas*), *Curius* (*kurius*), *Caesar* (*cézar*), *quare* (*kvare*), *Horatius* (*horacius*).

Dezső Fáy

Dezső Fáy (deĵo fái) la kreinto de la ilustraĵoj de la libro, naskiĝis en 1888, en Budapeŝt. Fininte la mezlernejon, li laboris du jarojn en la Armetia Lernejo, poste li daŭrigis siajn studojn en München de kie li hejmenvenis al Nagy-bánya kaj dediĉis sin tie al naturalismaj studoj. En 1907 li studas en la pariza Akademio *Julien*, poste li iras al Italio, kie li pasigas 4 jarojn en Romo, Florenco, Verona, Sienna, Padova, Venezia, Ravenna.

Lian spiritualisman arton pleje reprezentas liaj pentraĵoj: *Raffaello kaj Fornarina*, *Konspiro en Verona*, *Memoro al Veronanino* — kiuj vekis viglajn diskutojn.

Per ilustrado li okupiĝas ekde 1920; li ilustras per litografaj kaj lignogravuraĵoj. La unua de li ilustrita libro estis la poemo de Arthur Keleti: *Pax Vobiscum* (51 litografaj). Sekvis la epopeo »*La ciganoj de Nagyida*« de János Arany (15 lignogravuroj). Laste la 39 lignogravuroj al la hungara *Komedio* de Dante (traduko de Babits).

Nuntempe li laboras pri biblia kartaro (*Apokalipso*), konsistanta el 10 grandaj lignogravuroj.

Krom la supre cititaj verkoj prezentas la ĉefan etapon de lia grafikista kreado ankoraŭ lia *Via miserorum*, konsistanta el 24 kuprogravuroj.

*


En siaj ilustraĵoj al la *Komedio*, Fáy ne interpretas unuopajn versojn aŭ apartajn epizodojn, sed donas *elinterne* sian impreson pri tuta kanto, eĉ pri pluraj kantoj resume. La titoloj tute ne elĉerpas la ilustraĵojn, sed signas nur kvazaŭ ilian kernon, ĉirkaŭ kiu grupiĝas ne nur aliaj scenoj, sed eĉ komparoj, aludoj, simboloj, metaforoj de l' Poemo.

Ĉio ĉi estas dissemita sur la bildoj en niĉoj, cirkloj kaj anguloj, dum la fonon konstantan prezentas la descendaj ŝtupoj de la infera vojo de Dante, kuntenante la detalojn en kontinua unueco.

Tute kaj senmanke kompreni la bildojn oni do povas nur post la funda trastudo de la Poemo, kiel Fáy mem en enprofundiĝis en ĉiuj ĝiaj anguletoj. Sed ĝuste per tiu ĉi enprofundiĝo li sukcesis tiom ensorbi la mondon de Dante, ke liaj impresoj, kiujn per perfekta arto li projekcias antaŭ nin, donas al ni sugestian imagon pri la *esenco* de l' Poemo; unuavide ĉi tiu ĝenerala impresio frapas nin, ia Dante-a aero, kiu nin alblovas jam antaŭ ol ni legis eĉ unu version. Mal-facile estas diri, per kio li atingas tion; eble per la severe konstruita kompozicio de la bildoj (al kiu interese kontrastas ilia detal-riĉeco) kaj per la ŝajne primitiva, kvazaŭ mezepoka prezentmaniero (kiu tamen ne malhelpas lin en la akra, certa kaj grandlinia karakterizo de la figuroj). Jes, en ĉi tiuj bildoj ni retrovas je la unua ekrigardo la severe geometrian strukturon de la Poemo, sed ankaŭ ĝiajn zigzagojn, ĝian barokan abundon de detaloj, pro kio ĝi memorigas nin pri katedralo, ornamita per niĉoj, vitraĵoj, statuoj, altarbildoj kaj — gargojloj. Kaj, ĉe Fáy same, kiel ĉe Dante, neniuj detaloj vivas aparte, ĉio estas kaj vivas nur por la Tuto de l' konstruo.

Post la trastudo de la Poemo oni povas komenci la deĉifradon de la detaloj, kies enhava riĉeco kaj linia koncizo estas tiom parenca al la Dante-a bildsvarmado kaj ankaŭ al la Dante-a lakona multe-diro. Legendaj, mitaj scenoj, simbolaj signoj, groteskaj figuroj, farsaj ludoj alternas en la cirkloj, niĉoj kaj anguloj, kiel ankaŭ ĉe Dante mirinde miksiĝas religia ekstazo, majesta patoso, profeta kolero kun pika ironio kaj groteska ŝerco.

La
libro es-
tas eldonita
dank' al materiala
subteno malavara de s-ro
G i n o C a t a r z i



Korektoj

En la notoj:

- Pg. 26, linioj 23/24. ... *Giovanni de Vergilio* ...
Pg. 50, linio 36. ... *Ptolemeus* ... *ptolemea* ...
Pg. 76. linio 9. ... *Cavicciuoli* ...
Pg. 52. linio 7. batalo ĉe *Pharsalos* ...
Pg. 156. linio 10. ... venkon ĉe *Pharsalos* ...

En la Kantoj:

- I. v. 16. mi, ekrigarde, la montŝultrojn vidis,
radi-vestitaj de l' Planedo glora,
I. v. 104. lin nutros amo, saĝo, virto brila
II. v. 135. je l' veraj vortoj, kiuj vin instigis!
IV. v. 88. Estas Homer': plej alta Parnasano.
VIII. v. 108. mi ne forlasos vin en land' infera.«
XVI. v. 48. certe la Duk' ne tenus min de tio,
XVII. v. 66. ekkriis: »Kion en ĉi fos' vi faras?
v. 77. kiu ĵus urĝis min, la Majstro saĝa,
XIX. v. 17. ol kiajn havas vazoj baptokultaj
v. 27. ke ili rompus ĉenojn el saliko.
XXI. v. 42. kaj faras *jes* el *ne* por la denaro.«
v. 127. »Ve, Majstro, kio do? — mi ĝemis vorton. —
XXIV. v. 63. pli kruta eĉ ol kiun ni postlasis.
XXV. v. 44. Ĉar al la Majstro por atent' mi pledas,
v. 134. fendigas, kaj la lang', fendita forke,
XXVI. v. 60. eliran por la romaj semoj sanktaj;

ALIAJ VERKOJ DE K. KALOCSAY

KARINTHY: MORGAU MATENE (dramo).
PETŐFI: JOHANO LA BRAVA (popolepopeo).
MADACH: LA TRAGEDIO DE L' HOMO (drama poemo).
STRECITA KORDO.
RIMPORTRETOJ.
ETERNA BUKEDO (internacia antologio).
LINGVO STILO FORMO.
GOETHE: ROMAJ ELEGIOJ. LA TAGLIBRO.
PARNASA GVIDLIBRO (kun *Waringhien*).
HUNGARA ANTOLOGIO (redakto).

AELA donas al siaj anoj ses librojn en 1933 por malaltega kotizo en amplekso de 2000 paĝoj. Por 1934 programo eĉ pli riĉa. Eksterprogramaj eldonaĵoj okaze por favorprezo.
LITERATURA MONDO BUDAPEST IX. Mester u. 53. V. 7.
Regularo laŭpete sendota.
